**Slovakio:**

# Mirinda ĥimero en la ombro

## de Hungario, Aŭstrio, Ĉeĥio kaj Pollando

### Malmulte konata historio de mezorienteŭropa provinco kaj de la lukto de malgranda popolo por ekzistado kaj libereco

**Historia skizo**

**Kun konsidero de politikaj, etnismaj, lingvistikaj, literaturaj, kulturaj, sociologiaj, ideologiaj kaj internacijuraj aspektoj**

*Por tiuj, kiuj ignoras aŭ forgesis la historion*

*Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli (Svislando)*
*okaze de la 101a Universala Kongreso de Esperanto en Nitra (Slovakio)*
*de kiu ĉi tiu studo estis prisilentita*

    

**Enhavo**

Enkonduko
Slovakio en la mezepoko
„Supra Hungarujo“
En la regno habsburga
Aŭstria konservemo, hungara ŝovinismo kaj slovakaj reagoj
Slovaka lingvo
Ĉeĥoslovakio (1918-38)
Vojo de Slovakio al ŝtata sendependeco kaj alianceco kun Germanio kaj la Slovaka Ŝtato (1938-45) (1938-45) – vojo al milito
La slovaka pekokazo: „Fina solvo“ de la „juda demando“ en Slovakio (1938-45)
Slovaka nacia ribelo de aŭgusto 1944 kaj la rolo de la judoj kaj komunistoj en ĝi
Sorto de la ĉefaj protagonistoj de la slovaka ŝtato
Antisemitismo kaj judfobio en Slovakio post la dua mondmilito
Restarigo de Ĉeĥoslovakio (1945-48)
Stalinisma regado post „glora februara revolucio“ aŭ „komunisma puĉo“ (1948-89)
Reforma movado kaj sovetia invado en 1968
Fino de la komunismo kaj venko de la disidentoj
Novaj perturboj kaj preparado de la ĉeĥ-slovaka disiĝo
Prilaborado de la historia pasinteco en Slovakio
Plua politika evoluo post Mečiar
Etnaj malplimultoj kaj la situacio de la hungaroj kaj romaoj en Slovakio
Ksenofobio, rasismo, antisemitismo en Slovakio nuntempe (t.e. 1990-2008)
Pritakso de la demokratio kaj de la liberecoj en Slovakio
Esenca literaturo

## Enkonduko

Kompare kun aliaj landoj kaj popoloj de la regiono, Slovakio estis malmulte atentata de la historiografio, pro pluraj kaŭzoj. Iuj historiistoj de slovaka deveno kredas, ke en Okcidento la publika opinio pri Slovakio kaj la slovakoj estis manipulata de la ´ĉeĥoslovaka´ interpretado de la slovaka historio, do, esence temis pri misinformado. La okcidenta imago pri Slovakio estis tiu pri malfruiĝinta, postrestinta kaj apenaŭ ekzistanta nacio, kvazaŭa apendico al la multe pli glora ĉeĥaj nacio kaj historio, speco de ĥimero. Povas esti. La malavantaĝo de la slovakoj estas, ke ili ne havis propran historiografion je dispono, kiu, kiel en la kazo de aliaj slavaj landoj de la 19a jarcento, povintus prezenti la slovakojn kiel elstaran nacion, kiel en la kazo de la ĉeĥoj (František Palacký), slovenoj, kroatoj, serboj, bulgaroj, poloj. Ŝajnas, ke la slovakoj estis simple malatentataj, kiam la venkintoj de la Unua Mondmilito komencis repentri la mapon de Eŭropo. Kaj kiam en 1918 la Ĉeĥoslovaka Respubliko (Masaryk) estis fondita, la historio de la slovakoj estis apenaŭ konata. En la dudekaj jaroj de la dudeka jarcento okcidentaj historiistoj kaj slavologoj heziteme komencis okupiĝi pri la pasinteco de la slovaka popolo, sed apenaŭ ekzistis preparaj verkaĵoj, sur kiuj oni povintus baziĝi. Kvankam diference de la hungara tempo en la unua ĉeĥoslovaka respubliko la slovaka lingvo ja estis agnoskita kaj flegata, la slovaka historiografio ne prosperis. Male, slovakaj historiistoj, kiuj klopodis emfazi la apartan evoluon de sia popolo, estis suspektataj en Prago, ke ili povus esti separatistoj. En la centro de la politika propagando kaj scienca intereso troviĝis la tasko konstrui la historion de Ĉeĥoslovakio, kiu konsistas el du popoloj, ĉeĥoj kaj slovakoj. Tio sufiĉis, devis sufiĉi.

Malmulte en ĉi tiu rilato ŝanĝiĝis ankaŭ post la Dua Mondmilito. Nature, en Okcidento kaj ĉe ĉeĥoj kaj slovakoj mem la konsterno kaj seniluziiĝo estis grandegaj, kiam oni devis konstati, ke Ĉeĥoslovakio malaperis malantaŭ la „fera kurteno“ de la barbara komunisma imperio de Stalin, kiu komplete detruis la ĉeĥoslovakan demokration inkluzive de ĝia prosperanta ekonomio. Kvankam grandparto de Ĉeĥoslovakio estis liberigita de la 3a usona armeo, oni devis lasi Bohemion al la rusoj. Pro manko de aliro al la arkivoj la historiografio ne povis esti sufiĉe prilaborata, kaj en Ĉeĥoslovakio mem la oficialaj historiistoj ne povis forlasi la truditan kadron de la marksisma-leninisma ideologia koncepto kaj ĝian stalinisman interpretadon, kiu renversis la validan narativon, ĝis kiam la revolucio de la „Praga Printempo“ en 1968 (Dubček estis slovako!) donis novajn esperojn. Ĉeĥoj kaj slovakoj subite aperis kiel herooj de la monda historio, eĉ se ili tion eventuale tute ne celis, ĉar esence ili volis plibonigi la socialismon.

Ĉiukaze, la historiografio en Ĉeĥoslovakio estis farita de ĉeĥoj en Prago, je la ĉagreno de la slovakoj, kiu devis akcepti ĝin.

La fondo de sendependa slovaka respubliko je la 1a de januaro 1993 celis pravigi la propran historian evoluon de la slovaka popolo sine de la eŭropa kulturo, en kiun ĝi intencis reintegriĝi kadre de Eŭropa Unio, for de la orienta bloko. Ĉefepiskopo Giovanni Cappa, unua ambasadoro de Vatikano en Slovakio, diris flate pri la slovakoj okaze de sia akreditiĝo, ke la slovaka popolo „estas multe ekzamenata de la historio, sed ĝi ne rompiĝis dum multaj jarcentoj de malfacila ekzistado; ĝi estas modesta kaj simpla popolo, inteligenta kaj ligita kun siaj tradicioj, kiel tio estas esprimata en ĝiaj poezio, muziko kaj tuta koloreco de riĉa folkloro; ĝi estas popolo tiel hardita kiel la Tatra montaro, tiel serena kaj optimisma kiel la verdaj vastoj de ĝiaj valoj kaj arbaroj; ĝi estas popolo, profunde ligita kun la valoroj de la eŭropa kulturo – sincereco, persista laboro, familio kaj religia kredo…“.

La historiistoj avide akaparas ĉiun bonan libron, kiu traktas Slovakion, ĉar tia faka literaturo raras. Ankaŭ ĉi tiu studo, kiu celas esti objektiva kaj neŭtrala, baziĝas sur kelkaj verkoj kaj diversaj fontoj, kiuj okupiĝas pri terure neglektata temo, pri kiu ankaŭ la eksterlanda gazetaro raportas nur malofte, kaj ĉefe negative. En (okcidenta) Eŭropo Slovakio ne estas vere perceptata kiel reala ŝtato, sed kiel politika ĥimero.

## Slovakio en la mezepoko

Unuaj slavaj triboj migris en la landon de nuntempa Slovakio en la frua sesa jarcento. Krom montaro kaj arbaroj, kiuj faras la landon malfacile alirebla, kaj krom forlasitaj regionoj, ili renkontis restaĵojn de keltaj kaj germanaj loĝantoj. Alia popolo, la lombardoj, estis ĵus formigronta al Italio, kiam la aziaj avaroj translokiĝis al Panonio. En la jaro 623, *Samo,* legendeca frankonia komercisto kaj militisto kaj eventuala pra-

patro de la mojmiridoj, sukcesis unuigi la lokajn slavajn komunumojn. Sed kiam lia regado finiĝis en 658 la tieaj slavoj estis denove submetitaj al la avaroj, kies regno estis neniigita de Karolo la Granda (768-814), kiu kristanigis la slavan popolon en Slovakio kaj Moravio. Lia posteulo, la orientfrankonia reĝo Ludoviko la Germano (843-874), subtenis tiujn strebadojn de la frankoniaj misiistoj se necese ankaŭ per milita perforto.

Grava centro de la slava civilizo en tiuj tempo kaj regiono fariĝis *Nitra*. Ĉirkaŭ la jaro 828 tie estis inaŭgurita nova preĝejo, kvazaŭ kiel kulmino de la sukcesa kristanigo de Moravio. En Nitra regis la slava princo *Pribina,* kiu estis forpelita de *Mojmír Ia* (830-46), laŭ kiu la moravia mojmirida dinastio estas nomata (la origino de tiu ĉi dinastio estas nebula) kaj kiu estas konsiderata kiel unua reala reganto de Moravio. La moravianoj estis unuafoje menciitaj en la jaro 822 en la „Analoj de la Frankonia Regno", kvankam verŝajne ili ekzistis jam antaŭe. Mojmír unuigis la tieajn slavajn tribojn, fondis la ***Regnon de Granda Moravio*** kaj enkondukis la kristanismon per amasa bapto kiel ŝtatan religion. La ekzistado de la Grandmoravia regno, kies regantoj etendis ĝiajn limojn al ĉiuj ĉirkaŭaj flankoj, signifis konstantan batalon. Unuflanke, la slavaj triboj devis esti kuntenataj, aliflanke la frankoniaj supereco kaj dependeco devis esti evitata kaj forpuŝata. Ludoviko la Germano rekte enmiksiĝis, eksigis Mojmíron kaj anstataŭigis lin per princo *Rastislavo* (846-70), kiu laŭ la fontoj estis lia nevo. Rastislavo (aŭ Rostislavo) montriĝis malpli obeema al la frankonia reĝo ol atendite kaj ne laciĝis kontraŭbatali la frankoniajn ambiciojn. Li petis papon Nikolao Ia fondi propran eklezian provincon en sia regiono kaj mendis ĉe la orientromia imperiestro Mikaelo IIIa pastrojn, kiuj devis esti konantoj de la slava lingvo, kaj episkopon. Per la fondo de propra episkopejo en Moravio ankaŭ Mikaelo vidis taŭgan okazon por limigi la frankonian potencon kaj establi la propran influon. En 863 li sendis la fratojn *Konstanteno-Kirilo* (aŭ *Cirilo, gr. Κωνσταντίνος-Κύριλλος) kaj Metodo* (laŭ PIV, mi preferas *Metodio* laŭ gr. *Μεθόδιος*), kiuj estis du bizancaj kleruloj el Tesaloniko, kiuj konis la slavan lingvon, al Granda Moravio. Ili tradukis la Biblion al la slava lingvo, kaj Kirilo eĉ inventis propran slavan alfabeton, nomatan glagolico. Sed pro koliziantaj interesoj kaj pretendoj de moravianoj kaj frankonianoj, la misio de la du ´slavaj apostoloj´ en Grandmoravio finiĝis per fiasko. En 864 Ludoviko la Germano atakis la moravianojn, kiuj dume tamen povis sukcese defendi sin. Intertempe, Kirilo kaj Metod(i)o forvojaĝis al Romo, kie ili klarigis al la nova papo Hadriano IIa la situacion en Moravio kaj klopodis konvinki lin, ke li permesu al la moravianoj legi la liturgion en la slava lingvo (kiel „sanktaj" lingvoj tiam estis konsiderataj nur la hebrea, greka kaj latina). Dum Kirilo forpasis en februaro 869 en Romo, Metod(i)o estis nomita de la papo ĉefepiskopo de Panonio, kies limoj tamen restis nefiksitaj. Ludoviko akre reagis, arestis, blindigis kaj malliberigis Rastislavon en bavara monaĥejo, kie li mortis en nekonata jaro, kaj instalis lian „nevon" *Svätopluk* (870-94), princo de Nitra, kiel posteulon, dum frankoniaj nobeluloj transprenis la administradon de la lando. Sub tiu Svätopluk Granda Moravio atingis sian plej vastan teritorian etendiĝon kaj krom Bohemio kaj Panonio inkluzivis regionojn, kie vivis luzaciaj soraboj kaj polaj silezianoj kaj vistulanoj. En la sudo Moravio eĉ preskaŭ tuŝis Bulgarion. En eklezia rilato, Svätopluk estis interesata teni bonajn rilatojn kun Romo, al kies patroneco Moravio estis submetita. Sed kompare kun Rostislavo, Svätopluk estis decidita kontraŭulo de la bizanca misio. Kiam Metod(i)o revenis al Grandmoravio por ekofici kiel episkopo, li estis arestita, kondamnita dum iu sinodo de la bavaraj episkopoj en Regensburgo kaj ekzilita al iu monaĥejo en suda Germanio. Post sia liberiĝo en 873 Metod(i)o reiris en la regnon de Svätopluk. Papo Johano VIIIa konfirmis lian rangon kiel ĉefepiskopo kaj submetis lin al la frankonia eklezio. En Moravio li renkontis malagrablan surprizon. La liturgio devis esti legata en la latina lingvo, nur slava predikado estis permesata. Sed tiu kompromiso tute ne plaĉis al la frankoniaj ekleziuloj. Wiĥingo (Wiching, Viching), episkopo de Nitra, kiu estis ŝvabo, akuzis Metod(i)on pro herezio. Metod(i)o mortis en 880 en *Velehrado,* kaj liaj disĉiploj, inter ili *Gorazd*, kiu devintus fariĝi lia posteulo kiel ĉefepiskopo, estis forpelitaj de Moravio, la slava liturgio estis malpermesita (sub papo Stefano Va) kaj la glagolico, kiu estis uzata en tiu liturgio en Grandmoravio, estis elsarkita kiel skribo. La frankonianoj definitive venkis kaj gajnis krom la politika ankaŭ la religian-eklezian lukton, kaj Moravio-Slovakio restis lando de la okcidenta kristanismo. Svätopluk forpasis en 894. *Mojmír IIa,* filo de Svätopluk Ia, regadis Moravion kune kun sia pli juna frato *Svätopluk IIa,* kun kiu li tamen ekkverelis kaj militis, kio sekvigis intervenon flanke de la bavaroj kaj bohemianoj en Moravio. Sed dank´ al la apogo de papo Johano IXa, Mojmír sukcesis renovigi la memstarecon de la moravia eklezia provinco. Romo sendis unu ĉefepiskopon kaj kvar episkopojn al Moravio. La regado de Mojmír IIa, kiu finiĝis verŝajne en la jaro 906 per lia morto, signifis samtempe la finon de la Mojmirida dinastio, kiu elmortis. La pereo de la Regno de Granda Moravio estis probable kaŭzita de iu batalo ĉe Nitra, en kiu la moravia armeo estis venkita de la hungaroj. La bavaroj ankoraŭ provis instali *Svätoplukon IIa* kiel novan

reganton de Moravio, sed ili malsukcesis, ĉar ili estis same venkitaj de la hungaroj en la batalo de Bratislavo en 907, kiu tiam estis unuafoje menciita kiel Brezalauspurc. La posta sorto de la grandmoraviaj regantoj, t.e. la mojmiridoj, perdiĝas en nebulo kaj legendeco.

Kiel montros la venonta ĉapitro, la slovaka etnogenezo estis esence bremsita de la hungaroj.

La slovakoj konsideras La Regnon de Granda Moravio, kiun ili preferas nomi Regnon de Granda Slovakio, kiel komencon de siaj naciaj identeco kaj ŝtateco, kvankam ĝia teritorio ampleksis nur parton de nuntempa Slovakio. Slovakaj historiistoj emfazas, ke Moravio estas nur geografia nomo kaj la ĉeĥoj ludis neniun gvidan rolon en tiu regno. Tiel, la Regno de Granda Moravio fariĝis integra mito en la procezo de la formado de la slovaka nacio, kvankam, interkrampe, ankaŭ ĉeĥaj historiistoj pretendas ĝin, kaj ĉeĥoslovakaj ideologoj eĉ vidis en ĝi fruan formon de la unuiĝo de ĉeĥoj kaj slovakoj, kion la ĉi-lastaj strikte kontestas. Ankaŭ diversaj internacie renomaj slavistoj (slavologoj) obstine klopodis pruvi la slovakecon de la Grandmoravia regno, uzante politikajn, teritoriajn, lingvajn, arkeologiajn kaj etnografiajn argumentojn kaj fontojn. Eĉ la misio de Kirilo kaj Metod(i)o en Granda Moravio estis deklarita kiel slovaka verko. La „grandmoravianoj" Pribina, Mojmír Ia kaj IIa, Rastislav kaj Svätopluk Ia kaj IIa estas konsiderataj de la slovakoj kiel unuaj slovakaj (praslovakaj) regantoj, kvankam en tiu tempo la slovaka etnogenezo ankoraŭ ne estis finita, eĉ abrupte interrompita pro la pereo de la Grandmoravia regno, kaj la nova etnonimo „slovako" aperis nur en la 14/15a jarcento, anstataŭante la etnonimon „slavo", „slovano", „sloveno" aŭ simile.




Proksimuma teritorio de la „Grandmoravia regno" (mapojn vd. sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Grandmoravia_imperio, https://de.wikipedia.org/wiki/Mojmir_II kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Mährerreich). La nomon „Granda Moravio" (gr. ἡ μεγάλη Μοραβία) utiligis la bizanca imperiestro Konstantino VIIa (Porphyrogennetos) en sia fama verko „De administrando imperii", verkita inter 948 kaj 952.

## „Supra Hungarujo"

La (pra)hungaroj – aŭ madjaroj – kiuj aperis en la 6-4aj jarcentoj a. Kr. en la Urala Montaro kaj ĉe la rivero Ob, migris en okcidenta direkto kaj atingis fine de la 9a jarcento p. Kr. la ebenaĵon de Panonio, kiu estis grandparte maldense loĝata, fakte vakua lando, ĉar evidente neniu potenca najbaro okupis tiun landon ĝis nun aŭ estis interesata posedi ĝin. Por la hungaroj tio signifis idealan okazon por resti kaj konstrui propran ŝtaton. Nature, la germanoj (t.e. orientaj frankonianoj) malvolonte vidis tiujn novajn sovaĝulojn kiel najbarojn. Kiam la bavara armeo volis forpeli la enpenetrintajn hungarojn, kiel supre menciite, ĝi estis venkita en la jaro 907 en la proksimeco de Bratislavo. Tamen, en 955 la hungaroj finfine povis esti venkitaj en la batalo sur la Leĥa kampo de la armeo de Otto la Granda kaj iliaj marodadoj povis esti haltigitaj, kiujn la hungaroj plenumis en meza Eŭropo je la granda hororo de la najbaraj popoloj. Géza (971-997), pranepo de Árpád, kiu kondukis sian popolon al Panonio, fariĝis nova reganto de Hungarujo kaj interpaciĝis kun la germanoj. La hungaroj alprenis la okcidentan kulturon, kio esence influis la sorton de tiu popolo, kiu mem fariĝis integra parto de la okcidenta familio kaj por longa tempo establiĝis kiel signifa kaj unika kristanisma potenco en mezorienta Eŭropo.

Post la malapero de la Regno de Granda Moravio, la slavaj loĝantoj inter Danubo, Moravo kaj Karpatoj estis forpelitaj, sklavigitaj aŭ subjugataj de la hungaroj. Tio signifis, ke dum la venontaj mil jaroj la slovakoj ne plu sukcesis liberigi sin de la hungara regado kaj estis malhelpataj elformiĝi kiel

propra etno aŭ nacio. Ili vivis en sia lando nerimarkate de la ekstera mondo kaj estis utiligataj maksimume kiel laborfortoj por Hungarujo.

La princlandon Nitra ricevis Vajk, filo de Géza, kiu baptiĝis kaj edziniĝis kun la fratino de la duko de Bavario kaj posta romia imperiestro, Henriko IIa. El Vajk (997-1038) fariĝis Stefano, la unua glora reĝo de Hungarujo, kiu estis agnoskita kaj de la germana imperiestro kaj de la roma papo. En la lando de la slovakoj estis enkondukita la ´hungara sistemo´. Nur la slavoj, kiuj retiriĝis kaj kaŝiĝis en la arbaroj kaj montaro, restis liberaj kaj utiligis sian lingvon, dum la slava nobela elito, kiu estis hungarigita, probable povis konservi siajn privilegiojn. Danĝeraj por la hungaroj fariĝis nur la poloj de Boleslavo Ia (la Bravulo), kiu enmiksiĝis en la aferojn de Ĉeĥio kaj Slovakio. Por limigi la germanan eklezian influon, la hungaroj petis Romon fondi propran eklezian provincon – tiel estiĝis la eminenta ĉefepiskopejo de Esztergom (Gran). Por la slavoj en Moravio kaj Slovakio tio signifis, ke la latina lingvo definitive venkis kiel eklezia lingvo, malfavore al la slava idiomo, kiu tamen ne malaperis verŝajne pro tio, ke la slavoj rajtis konservi la proprajn ekleziajn strukturojn, kio helpis al la slovaka lingvo plu ekzisti. En la orienta flanko la sovaĝa tribo de la peĉenegoj devis esti kontraŭbatalata kaj en la sudo Kroatio estis unuigita kun Hungarujo. En 1083 la episkopejo de Nitra estis restarigita kiel sola sur slovaka teritorio kaj ekzistis ĝis la 18a jarcento. La slavaj triboj de la supra apudtisa regiono kaj en la nordoriento de „Supra Hungarujo“, kiel la hungaroj nomis la landon de la slovakoj (hungarlingve „Felvidék“ aŭ „Felsőmagyarország“, germanlingve „Oberungarn“, slovaklingve „Horná zem“ aŭ Horné Uhorsko“, ĉeĥlingve „Horní Uhry“, latinlingve „Hungaria superior“) estis prizorgataj de la episkopo de Eger (Erlau).

Sub la elstara Arpada dinastio Hungarujo fariĝis multetna ŝtato. Reĝo Géza IIa (1141-62) amase vokis germanojn al „Supra Hungarujo, kie ili ekloĝis en la regiono de Poprad kaj Spiš (Zips). Ankaŭ judaj komercistoj estis bonvenaj. Tiel, la lando survoje de la komercaj linioj inter Germanio kaj Ruslando, do inter Okcidento kaj Oriento, evoluis, prosperis, riĉiĝis. Frue la hungaroj komprenis la signifon de la minejoj kaj ilia ekspluatado fare de bavaraj, saksaj kaj sileziaj laboristoj. Sed la mongoloj, kiuj subite invadis la landon en la 13a jarcento, detruis la tutan infrastrukturon, kiun reĝo Béla IVa (1235-70) devis rekonstrui. Feliĉe, „Supra Hungarujo“ estis malpli koncernata de la mongola ŝtormo ol la cetera hungara lando. Ŝajnas, ke la slavoj kaŝiĝis en la arbaroj, dum la germanoj forfuĝis al okcidento. Novaj fortaj centroj post la mongola invado en „Supra Hungarujo“ fariĝis Banská Bystrica (Neusohl) kaj Banská Štiavnica (Schemnitz), kiuj eĉ posedis propran juron. Baldaŭ ankaŭ Košice (Kaschau), Gelnica (Göllnitz), Smolník (Schmöllnitz), Rožňava (Rosenau), Spišska Nova Ves (Zipser Neudorf), Jasov (Jossau), Ružomberok (Rosenberg), Žilina (Sillein), Krupina (Karpfen), Prešov (Eperies), Bardejov (Bartfeld), Kremnica (Kremnitz), Levoča (Leutschau), L´ubietová (Libethen), Trenčín (Trentschin), k.a. travivis rapidan ekonomian prosperon. El „Supra Hungarujo“ estis eksportitaj stano, plumbo, fero, kupro, arĝento, oro, ligno. La menciitaj urboj komencis krizi fine de la 13a jarcento post la morto de Béla IVa, kiam la hungara feŭda sistemo kaj aristokratia burokratio fortiĝis kaj bremsis la ekonomian dinamikon.

Post la elmortado de la arpada dinastio, kiel nova reĝo de Hungarujo estis elektita, kun la helpo de la potencaj nobelaj familioj kaj la roma papo, la napolano Karolo Roberto de Anjou (1308-42). Li rompis la potencon de la oligarkoj, fortigis la lojalecon al la reĝo kaj vokis denove multajn germanojn por labori en la komercaj kaj minejaj centroj de „Supra Hungarujo“, kiuj praktike germaniĝis. La germanoj akiris la unuan rangon en la socio kun konsiderindaj specialaj rajtoj en la ekonomio kaj politiko, kiujn ili ricevis de la hungara reĝo. Ŝajnas, ke la slavaj subtavoloj estis malkontentaj pri sia situacio kaj postulis pli da influo, kiun Ludoviko Ia (1341-82), la posteulo de Karolo, pretis doni al ili.

Sub Sigismundo de Luksemburgo (1387-1437), la venonta reĝo de Hungarujo, okazis diversaj krizoj, kiuj influis ankaŭ la vivon de la homoj en „Supra Hungarujo“. Poloj forpuŝis la germanojn el la komercaj kaj minejaj centroj, dum iuj hungaraj magnatoj misuzis la ekonomian malfortecon de tiuj urboj por siaj celoj. Post la kondamno de la ĉeĥa reformisto Jan Hus al la morto (1415) eksplodis husismaj militoj, kiuj atingis ankaŭ „Supran Hungarujon“. Husismaj trupoj kuris tra la lando kaj bruligis kaj ruinigis diversajn urbojn kaj mortigis multajn loĝantojn. Nur reĝo Mateo Ia „Korvino“ (1458-90) sukcesis ĉesigi tiujn atakojn kaj marodadojn de la husanoj kaj restarigis la ordon en la lando. Sed multaj urboj estis konsiderinde malfortigitaj. Nur la entreprenisto Johano Thurzo sukcesis, en kunlaboro kun Jakobo Fugger, savi la ekonomion de „Supra Hungarujo“. Tio vekis la ĵaluzon de hungaraj magnatoj, kiuj komencis intrigi kontraŭ la du entreprenistoj, tiel ke Thurzo forlasis la aferon en 1526.

En 1525 en la minejaj urboj de „Supra Hungarujo“ inter slovakaj laboristoj eksplodis ribelo, kiu verŝajne estis protesto kontraŭ la kreskanta malriĉiĝo kaj la malbonaj laborkondiĉoj. La ribelo estis sange

sufokita de hungaraj aŭ aŭstraj servistoj, kaj la iniciatintoj de la ribelo, inter ili troviĝis protestantaj ekleziuloj, ricevis la mortpunon.

La fatala malvenko de la hungara armeo kontraŭ la turkoj en la batalo ĉe Mohács en aŭgusto 1526, en kiu pereis Ludoviko IIa, reĝo de Bohemujo kaj Hungarujo, decidis la sorton de la malnova regno. „Supra Hungarujo“ povis eviti la turkan okupacion, male, ĝi eĉ fariĝis zono de la kontraŭturka rezisto. Do, la danĝeroj restis daŭre konservataj.

## En la regno habsburga

Karakteriza por la plua sorto de Hungarujo en la venontaj 150 jaroj estis la kurioza duobla regado post la morto de Ludoviko IIa en 1526. En Székesfehérvár (Stuhlweisenburg) estis elektita Johano Zápolya kiel nova hungara reĝo. Sed ankaŭ la habsburga ĉefduko Ferdinando de Aŭstrujo, kiu edziĝis kun Anna de Hungarujo kaj Bohemujo, devintus heredi la tronon de la Hungara Reĝlando. La hungaroj, kiuj rifuzis Johanon Zápolya, kolektiĝis la 16an de decembro 1526 en Pressburgo, proklamis la elekton de Zápolya malvalida kaj elektis Ferdinandon. Zápolya estis forpelita al Pollando kaj la 3an de novembro 1527 Ferdinando kroniĝis kiel reĝo de Hungarujo. En la sekva interna milito Zápolya submetis sin al la turka protekto kaj en 1529 sultano Sülejmano invadis Hungarujon kun armeo de cent mil soldatoj. Kiam la turkoj okupis Budapeŝton, Zápolya estis instalita kiel vasala reĝo, kaj Sülejmano daŭrigis sian militiron ĝis Vieno, kiu estis sieĝata de la otomanoj. En la Traktato de Grosswardein (Oradea) de 1538 Ferdinando agnoskis Zápolya-n kiel reĝon de Hungarujo, sed li sekurigis al si ankaŭ la rajton fariĝi lia posteulo post lia morto. Kiam tiu okazis en 1540, lia vidvino, Izabela de Pollando, kiu estis subtenata de la Alta Pordego, anoncis heredan pretendon por sia filo Johano Sigismundo Zápolya, kiu tiam estis neplenkreska infano. Tiel, Hungarujo restis dividita por longa tempo. Dum la turkoj okupis centran, t.e. ´kernan´ Hungarujon, kiu fariĝis provinco de la Otomana Imperio, nordorienta Hungarujo, do Slovakio plus okcidenta Kroatio kaj Burgenlando estis reunuigitaj sub la nomo „Reĝa Hungarujo“ kiel provinco de la habsburgaj regantoj, kiuj rezidis en Vieno. Formale, la habsburgaj imperiestroj estis kronitaj en la provizora ĉefurbo de habsburga Hungarujo, Pressburgo (Bratislavo), ankaŭ kiel reĝoj de Hungarujo, unue en konkurenco kun la turka vasalo Johano Sigismundo Zápolya, kiu regadis en Transsilvanio kiel kontraŭreĝo ĝis sia abdiko en 1570. Kvankam Ferdinando povis reale regadi nur parton de la hungara tereno, per lia regado komenciĝis la pretendo de la habsburganoj, ke ili povu regadi tutan Hungarujon kaj Bohemujon. En la Pactraktato de Karlovico de la jaro 1699 la turkoj devis agnoski, ke ili perdis Hungarujon post diversaj militaj sukcesoj de la aŭstroj, kiuj gvidis kun la turkoj penajn kaj komplikajn pactraktadojn.

„Supra Hungarujo“ estis submetita al la absolutisma centrismo de la habsburga regno, kaj la hungara administrado estis malkonstruata. La hungara politiko estis farita en Pressburgo, kiu funkciis kiel provizora ĉefurbo de „Reĝa Hungarujo“, ĝis 1848. Ankaŭ slovakoj ricevis politikajn rajtojn kaj oficojn, dum la rajtoj de la germanoj estis reduktitaj. Komenciĝis komplika sistemo de la etnaj ekvilibroj, kiu estis tipa kaj unika por la habsburga imperio.

La husanoj postlasis siajn spurojn en „Supra Hungarujo“, kie la slovakoj kaj germanoj adoptis la luteran kredon, kompare kun la kalvinismo de la hungaroj. Ligita kun la luterismo estis ankaŭ la spirita movado de la humanismo.

Kiel konate, la reformacio provokis la kontraŭ-reformacion, kiu estis rigore puŝita de la habsburganoj kaj de la hungara eklezio en Hungarujo mem, kio estis samtempe ligita kun etna rehungarigo de la lando. La ĉefepiskopo de Esztergom sendis jezuitojn al Trnava, kiuj tie malfermis lernejon por katolikaj pastroj. Sed la sukceso de la katolikoj estis magra. La aŭstroj ankoraŭ estis plene okupataj pri la kontaŭbatalado de turkaj agresoj. Inter 1576 kaj 1612 regis imperiestro Rudolfo IIa. Sub la gvido de la jezuito Petro Kardinalo Pázmány, kiu en 1616 fariĝis ĉefepiskopo de Esztergom, la kontraŭreformacio estis rigore efektivigata en „Supra Hungarujo“ kaj la reformacio estis perforte repuŝata. Intertempe eksplodis la Tridekjara Milito (1618-48), kiu havis sian originon en la fama dua „Praga Defenestracio“, kaj en kiu nature estis envolvita ankaŭ Aŭstrujo kiel parto de la „Sankta Romia-Germana Imperio“ (al kiu Hungarujo kaj Slovakio cetere neniam apartenis). Neniel eblas detale trakti tiun tempon. En Slovakio grandan sukceson havis iu nova kantlibro por katolikoj, kiu estis eldonita en (ĉeĥigita) popola lingvaĵo de la slovakoj, kiu ankoraŭ nun estas adorata de la slovakoj kiel kultura heredaĵo. Sed la luteranoj ricevis apogon de hungaraj magnatoj, kiuj estis malpli interesataj pri religiaj demandoj, sed kies ĉefa

intereso estis defendi siajn politikajn strebadojn kontraŭ la habsburganoj. Iliaj perfortaj rimedoj, kiuj estis aplikataj kontraŭ la hungaraj nobeloj, provokis ribelojn de ilia flanko kontraŭ la viena imperiestro. Ĉi tiuj tumultoj, kiuj komenciĝis en Transsilvanio, estis senteblaj ankaŭ inter la slovaka popolo en „Supra Hungarujo“ kaj negative influis ĝin dum tuta jarcento. La ribelo de 1663 finiĝis en katastrofo, kiam la aŭstra imperiestro Leopoldo Ia (1658-1705) arestis du mil membrojn de la alta hungara nobelaro kaj ekzekutis kelkajn gvidantojn. Sed la aŭstroj komprenis, ke la brutala subpremado de la protestantoj ne povos daŭri eterne. En 1681 parto de politikaj kaj religiaj rajtoj estis redonitaj al la hungaroj kaj protestantoj, ĉar parto de hungaroj, slovakoj kaj germanoj daŭre praktikis tiun kredon. La kunvokita parlamento de 1687 postulis la finon de la religia teroro, kvankam ĝi tamen agnoskis la superecon de la katolika eklezio. En 1703 eksplodis nova ribelo, kiu estis gvidata de la magnato Francisko IIa Rákoczi, kiu militis en tuta „Supra Hungarujo“. Multaj homoj aliĝis al lia militiro, tiel ke tiu evento konserviĝis eĉ en la slovaka folkloro. Kiam la militfeliĉo turniĝis, la aŭstroj kruele venĝis sin. Unu el la slovakaj herooj nomiĝas *Juraj Jánošík* (1688-1713), kiu naskiĝis en 1688 en Terĥovo kiel infano de malliberaj gepatroj. Li konatiĝis kun la rabisto Tomás Uhorčík, al kiu li helpis fuĝi. Kiel gvidanto de rabista bando li atakis kaj priŝtelis riĉajn nobelojn kaj komercistojn. Kiam li estis kaptita en januaro 1713, li estis mortkondamnita kaj pendigita en Liptovský Svätý Mikuláš.

Nur la Paco de Szatmár, kiu estis subskribita en 1711, finis la longajn religiajn militojn en „Supra Hungarujo“. La protestantoj ne plu estis persekutataj, sed ilia eklezio neniam plu reatingis sian iaman signifon. La regado de imperiestro Karolo VIa (1711-40) kaj de lia fama filino Maria Terezia (1740-80) daŭrigis puŝadi la katolikismon ankaŭ kiel rimedon por fortigi la centrisman povon de la habsburganoj. En ekonomia rilato, la hungaraj landoj, kiuj estis fortranĉitaj de Aŭstrujo per dogana limo, postrestis pli kaj pli tiujn de la cetera Habsburga Monarkio, en kiu precipe Bohemio ricevis novan modernigan prosperon.






Maldekstre: „Danuba Monarkio“ kun Slovakio kiel hungara parto.
(https://de.wikipedia.org/wiki/%C3%96sterreich-Ungarn#/media/File:%C3%96sterreich-Ungarns_Ende.png).
Dekstre: Administraj distriktoj de Slovakio en 1882 (https://sk.wikipedia.org/wiki/Historické_župy_na_Slovensku).

## Aŭstria konservemo, hungara ŝovinismo kaj slovakaj reagoj

Francisko Ia/IIa (1792-1835) estis ege konservema aŭstra imperiestro, kiu klopodis eviti ĉian progreseman ŝanĝiĝon per rigora cenzuro kaj polica ordo. En tio li estis helpata de Klemento Metternich (Metterniĥ), ministro kaj kanceliero, kiu gvidis la fifaman aŭstrian polican ŝtaton; en tio li estis subtenata de la ´reakcia´ hungara aristokrataro, kiu same timis ĉiajn reformojn. Sed en la unua duono de la 19a jarcento ankaŭ en certaj hungaraj medioj kreskis la deziro reformi la ŝtaton kaj restarigi proprajn rajtojn. Gvida en tiu reforma movado estis grafo Stefano Széchenyi (1791-1860), kiu celis transformi la agrikulturan landon al moderna liberala industria ŝtato laŭ okcidenta tipo. La reformistoj de Széchenyi luktis por abolo de la nobelaj privilegioj kaj liberigo de la kamparanoj, por modernigo de la trafiko, liberigo de la komerco kaj plivalorigo de la hungara lingvo. En tio li deziris eviti kunpuŝiĝon kun Vieno, kie sidis la falkoj, kiuj obstine kontraŭstaris reformojn. La sklaveco kaj servuteco estis malpermesita en Aŭstrujo kaj Hungarujo en 1812 per la proklamo de la Ĝenerala Civitana Leĝaro tri jarojn antaŭ la Viena Kongreso (1815), kiu havigis al Aŭstrujo plurajn teritoriajn (mal)profitojn, dum Slovakio esence ne estis koncernita.

Pli radikalajn postulojn ol la adeptoj de Széchenyi havis la partianoj de Lajos Kossuth (1802-94), kiu celis hungarigi la ceterajn etnojn en la regno. En tiu senco pledis ankaŭ la hungara gazetaro. Precipe la ambicioj de la slavoj, kiuj esperis ricevi apogon de Ruslando, devis esti subpremataj, des pli ke la rusa carismo estis konsiderata de la hungaroj kiel tiranio.

Tiel, en 1830 la hungara parlamento komencis puŝi kelkajn leĝojn, kiuj devis plivalorigi la hungaran lingvon en ĉiuj sferoj de la publika vivo. Ĉiuj ŝtataj oficistoj devis lerni kaj scipovi la hungaran lingvon, kaj en 1844 la hungara lingvo fariĝis eĉ oficiala lingvo de la hungara reĝlando, escepte de Kroatio, anstataŭ la latino. Kossuth postulis la malfondon de la slavaj literaturaj societoj, kaj ke la hungaroj volis ankaŭ likvidi la eklezan memstarecon de la slovakaj luteranoj, fariĝis evidente, same kiel la strebado elimini la slovakan lingvon el la lernejoj kaj preĝejoj de „Supra Hungarujo“. Széchenyi fiaskis kun sia modera politiko, kiu estis konstante subfosata de la radikaluloj, kaj finfine li devis cedi la ŝovinismon de siaj pli radikalaj samlandanoj. Pri la ambicioj de la slovakoj Kossuth skribis en la gazeto *Pesti Hírlap*, ke ili ĉesu revi pri propra nacio.

En tiu malfacila momento de la slovaka historio elpaŝis ***L´udovít Štúr*** (1815-56), luterisma filologo, instruisto, verkisto kaj politikisto, kiel nacia batalanto de la slovaka popolo, al kiu li volis doni propran nacian identecon. En 1847 Štúr estis elektita al la hungara parlamento kiel delegito de Zvolen (Altsohl). En 1848, jaro de la eksplodo de la ribelo en Budapeŝto, li vojaĝis al Vieno por peti la Kortegon subteni la slovakan popolon kontraŭ la hungariga politiko. Štúr postulis la nuligon de la hungarigaj leĝoj, la diseriĝon de Hungarujo kaj slovakan aŭtonomecon laŭ la modelo de Kroatio kaj Slovenio. Sed tio ne estis ĉio. Štúr okupiĝis ankaŭ pri la lingva demando kaj eĉ kreis la bazon de la slovaka literatura lingvo. Sed por tio poste.

La 10an de majo 1848 en Liptovský Svätý Mikuláš okazis la unua kunsido de la memelektita Slovaka Nacia Parlamento, kiu resumis la postulojn de la slovaka nacio. En tiu deklaro, kiu estis submetita kaj al la imperiestro en Vieno kaj al la hungaria registaro en Pest, la slovakoj postulis la federigon de Hungario, la fiksadon de la limoj de Slovakio, propran parlamenton kaj slovakan nacian gvardion, krome nacian flagon, la rajton baloti kaj egalrajtan reprezentadon de la slovakoj en la hungaria parlamento. Krom tio, oni postulis permesi la uzadon de la slovaka lingvo en ĉiuj oficialaj deklaraĵoj, en la tribunalo, lernejoj kaj universitatoj. Unuafoje en la historio estis skizita programo por slovaka aŭtonomeco. Kompreneble, la hungaroj rifuzis ĉiujn slovakajn dezirojn kaj postulojn. Ankaŭ Vieno ne volis apogi ilin, ĉar la habsburganoj ne intencis fuŝi la rilatojn kun la hungaroj, kies ŝtatecon ili konsideris „historia realeco“. Ankaŭ la ĉeĥoj ne emis helpi al la slovakoj, kiuj kontraŭstaris la t.n. „aŭstroslavismon“, ĉar ili timis ĉeĥan hegemonion kaj entute esprimis sian malintereson pri aliĝo al Bohemio.

Dum la hungaroj reagis per ŝovinisma agreso, L´udovít Štúr kaj aliaj „junaj“ slovakaj patriotoj kiel ***Jozef Miloslav Hurban*** (1817-88) kaj ***Milan Hodža*** (1878-1944) alvokis al ribelo, kiu estis apogita de Kroatio. La 16an de septembro 1848 slovakaj aktivuloj fondis en Vieno la „Slovakan Nacian Konsilion“, kiu tri tagojn poste proklamis en Myjava la suverenecon de Slovakio kaj ĝian disiĝon de la hungaria reĝlando. Sed la ribelo estis disbatita de hungaraj trupoj.

Fakte, ankaŭ en Hungario mem okazis ribelo, kiun la aŭstra imperiestro decidis tamen disbati, kun rusa helpo. En tiu okazo slovakaj libervoluloj subtenis en la nomo de la Nacia Konsilio la aŭstrajn trupojn. En junio 1861 slovakaj gvidantoj reformulis en Turčiansky Svätý Martin siajn politikajn postulojn al la registaro en Vieno, inter alie la starigon de slovaka aŭtonoma teritorio kadre de Hungarujo. Sed ankaŭ la nova imperiesto Francisko Jozefo Ia (1848-1916), kiu la 20an marto akceptis reprezentantojn de la Slovaka Nacia Konsilio en Olomouc (!), hezitis apogi la slovakajn dezirojn, ĉar kun Hungarujo li havis alian planon: La 4an de marto li trudis novan konstitucion, kiu malaltigis la statuson de Hungarujo al nura „kronlando“. Aŭstrujo, kiu fariĝis novabsolutisma monarkio, ĉiuj etnoj ricevis la saman rangon. La slovakoj sentis sin trompitaj kaj estis seniluziigitaj, ĉar ili opiniis, ke ili kondutis lojale rilate al Aŭstrujo. La postuloj de la slovakoj finiĝis per tio, ke la slovakoj ricevis la saman statuson kiel ĉiuj ceteraj etnoj, kiujn la centrisma reĝimo kunigis, kiu estis severe kontrolata de Aleksandro Bach, ministro pri internaj aferoj, kiu tamen almenaŭ hezitis aktive subpremi slovakajn interesojn.

Kiam en la 60aj jaroj la aŭstra reĝimo fariĝis iom pli milda, la slovaka movado reaktiviĝis. En junio 1861 en Turčiansky Svätý Martin okazis kunveno de la „Slovaka Nacia Parlamento“, en kiu partoprenis 6000 homoj. Ilia memorando renovigis la postulojn pri aparta politika statuso de la slovaka popolo kadre de Hungarujo kaj pri la neceso agnoski la slovakan kiel oficialan lingvon. Sed Vieno ignoris la dezirojn de la slovakoj ankaŭ ĉifoje, donante la preferon al la hungaraj interesoj. Sola signifa sukceso de la slovaka movado konsistis en la permeso de la fondo de „Matica slovenská“ (Martin), kultura organizaĵo

kun la taskoj disvastigi la slovakajn lingvon kaj literaturojn, publikigi librojn kaj gazetojn, esplori la slovakan historion kaj fortigi la nacian konscion de la slovakoj.
La fama Aŭstra-hungara interkonsento („Ausgleich“) de la jaro 1867 ebligis al ambaŭ regnaj partoj egalrajtan dualisman ekzistadon, do komunan ŝtaton, realan union kun unu komuna reganto, sed kun du diversaj parlamentoj. La hungaroj interpretis tiun novan staton venko de la unueca ŝtateco, en kiu apartaj aŭtonomecoj ne povas ekzisti. Nur Kroatio-Slavonio havis apartan statuson. La nova situacio signifis ankaŭ, ke la hungara naciismo povis ricevi novajn impulsojn, ĉar Vieno ne plu enmiksiĝis en la internajn aferojn de Hungarujo. La hungaroj do kaptis la okazon por efektivigi rigoran rehungarigon, kiu aparte trafis la slovakan terenon, kiu povis entombigi sian revon pri aŭtonomeco. Tiel, inter 1787 kaj 1910 ĉirkaŭ 2,8 mln. nehungaroj estis hungarigitaj. Nu, en 1868 oni publikigis leĝon „pri la egalaj rajtoj de ĉiuj naciecoj“ por ĉiuj ŝtatanoj de A-H sendepende de ilia deveno, sed tiu formala leĝo, kiu estis konstante subfosata de la hungaraj politiko kaj administrado, ne sufiĉis por la pluvivado de certaj etnoj, ekzemple slovakoj. Male, la asocio „Matica Slovenská“ estis malpermesita, tri slovaklingvaj gimnazioj estis fermitaj, la slovaka lingvo ne plu estis permesata en la kleriga sistemo kaj slovakoj praktike ne plu estis elektitaj al la hungaria parlamento, tiel ke al la slovaka popolo estis forprenita la ebleco partopreni en politikaj decidoj. La rolo de la Slovaka Nacia Partio de Hurban estis limigita al pasiva rezistado kaj alvokado bojkoti la manipulitajn balotojn al la hungaria parlamento. Aliaj slovakaj aktivuloj kiel Miloslav Hodža kaj ***Vavro Šrobár*** (1867-1950), kiuj entuziasmis pri la „ĉeĥoslovaka ideo“ de Tomáš Garrigue Masaryk, fondis la gazeton *Hlas* (voĉo) en la opinio, ke estus pli bone disiĝi de la hungaroj kaj kunlabori kun la ĉeĥoj. Nature, la hungaroj reagis kiel ĉiam per rigora sufokado de ribeloj, limigo de rajtoj kaj persekutado de slovakaj aktivuloj, ĉar ili timis panslavismajn konspirojn sub rusa gvido. La 27an de oktobro 1907 hungaraj ĝendarmoj pafis kontraŭ protestanta amaso en la vilaĝo Černová apud Ružomberok kaj mortigis 12 homojn, dum 90 personoj vundiĝis. La perforta hungariga politiko montris efikojn. En 1910, inter 6185 administraj oficistoj de Hungarujo troviĝis nur 154 slovakoj, kaj ekonomie la slovakoj estis tenataj sur malalta nivelo. Regule okazis laboristaj strikoj. Inter 1889 kaj 1914 pli ol 600´000 slovakoj formigris al Ameriko.




Supre: „Junaj“ slovakoj Ľudovít Štúr, Michal Miloslav Hodža, Jozef Miloslav Hurban kaj Svetozár Hurban-Vajanský.
Sube: Ĉefaj protagonistoj de la slovakaj literaturo, lingvo kaj kulturo de la 19a jarcento: Anton Bernolák, Ján Chalupka, Ján Kollár, Pavel Jozef Šafárik, Pavol Országh Hviezdoslav.



Fakte restis nur la eklezio, kiu apogis la slovakan movadon. Kolera pro la kontraŭkatolikaj agadoj de la hungaria registaro, la hungara nobelo grafo Nándor Zichy fondis la Katolikan Popolpartion de Hungarujo, al kiu aliĝis ankaŭ slovakaj pastroj kiel ***Andrej Hlinka*** (1864-1938) kaj ***Ferdiš Juriga*** (1874-1950), kiuj formis ne nur novan generacion de slovakaj patriotoj kaj naciistoj, kiuj grave aktivos en la 20a jarcento, sed ankaŭ novan organizaĵon, kiu en 1913 estis fondita kiel Slovaka Popolpartio.

Laŭ ***Svetozár Hurban Vajanský*** (1847-1916), plej maljuna filo de Jozef Miloslav Hurban kaj signifa slovaka verkisto kaj ĵurnalisto, la slovakoj plenumis ĉiujn kondiĉojn por esti sendependa nacio (1910).

**Slovaka lingvo**

Kiel aliloke en tiama Eŭropo, ankaŭ en la Hungaria Regno la latino estis la lingvo de la eklezio, ŝtato kaj literaturo. La kleraj elituloj parolis germane, hungare kaj ĉeĥe. En skribaj dokumentoj de slovakaj urboj oni utiligis la ĉeĥan lingvon, kiu enhavis slovakajn elementojn. Dum la reformacio de la 16a jarcento inter slovakoj adoptiĝis la „biblia ĉeĥa lingvo“, sed ĝi restis la lingvaĵo de la luteraj eklezioj, dum la simpla slovaka popolo utiligis lokan dialekton. Ju pli oriente en Slovakio, des pli forte la loka slovaka lingvo diferenciĝis de la ĉeĥa, eĉ jam montrante ukrainajn aŭ polajn influojn. En la tempo de la kontraŭreformacio de la 17a jarcento la jezuitoj klopodis forigi la ĉeĥan lingvon ĉefe por kontraŭstari la protestantismon el Ĉeĥio. La unua slovaka traduko de la biblio estis farita de monaĥoj en Červený Kláštor, kiu troviĝas piede de la Altaj Tatroj. Poste, en la 18a jarcento, precipe katolikaj kleruloj disvastigis slovakan lingvaĵon, kiu forte diferenciĝis de la ĉeĥa idiomo. La unua taŭga gramatika, ortografia kaj etimologia koncepto por la slovaka skriblingvo estis prezentita de ***Anton Bernolák*** (1762-1813), katolika pastro, kiu venis el norda Slovakio kaj vizitis la gimnazion en Ružomberok. Li kreis lingvon surbaze de okcidentaj slovakaj dialektoj, publikigis la unuan gramatikon de la slovaka lingvo (en 1787) kaj tradukis la biblion al tiu idiomo, nomata jezuita slovaka lingvo. En 1783-85 ***Jozef Ignác Bajza*** publikigis la unuan slovakan romanon surbaze de la okcidentslovaka popollingvo. La unua signifa verkisto en la ´nova´ slovaka lingvo nomiĝis ***Ján Hollý*** (1785-1849), kiu originis el la okcidentslovakia regiono de Trnava kaj utiligis la normojn de Bernolák por siaj tradukoj de verkaĵoj de Homero, Vergilio kaj Horacio. Sed la luteranoj insistis pri sia propra lingvovarianto, kaj pro diversaj kaŭzoj venkis nek la slovaka lingvo de Bernolák nek la „ĉeĥoslovaka“ varianto. Pere de du teoriaj centraj verkaĵoj de 1846 ***Ľudovít Štúr*** (1815-56) defendis la dialekton de meza Slovakio kiel bazon por la nova slovaka literatura lingvo. Post la revolucio de 1848/49, ***Ján Kollár*** (1793-1852), protestanto sed kontraŭulo de Štúr, estis taskita de la aŭstra registaro krei oficialan lingvon, kiu estu enkondukota en la lernejojn de Slovakio. Kiel adepto de la „ĉeĥoslovakismo“ Kollár favoris alproksimigi la slovakan lingvon al moraviaj kaj slovakaj dialektoj kaj klopodis integri slovakajn elementojn en sian idiomon por fari ĝin akceptebla por slovakoj. Sed ĉar lia eksperimento de artefarita lingvo estis tro malproksima de la dezirinda slovaka skriblingvo, ĝi estis finfine anstataŭigita per la slovaka gramatiko, kiu estis kreita de Štúr kaj post lia morto kodigita (aŭ normigita) de ***Martin Hattala*** (1821-1903) kaj ***Samuel (Samo) Czambel*** (1856-1909). Kiel Kollár ankaŭ ***Pavel Jozef Šafárik*** (1795-1861), alia elstara filologo kaj arkeologo, kiu devenis el orienta Slovakio kaj fariĝis profesia slavisto kun internacia reputacio, estis influita de la filozofio de Herder kaj Hegel. Revante pri la unueco de la slavaj popoloj, ambaŭ kredis, ke ĉeĥoj kaj slovakoj estas unu nacio, kiu povus kunfandiĝi en novtipa ĉeĥoslovaka kulturo. Kvankam li verkis ĉefe en la lingvoj ĉeĥa kaj germana, Šafárik konsideris sin slovako, sed ankaŭ li restis skeptika pri la versio de la slovaka literatura lingvo, kiu estis proponita de Štúr. Sed ĝuste la lingvaĵo de Štúr-Hattala-Czambel, kiu poste ankoraŭ ricevis iujn modifojn, en principo konservis siajn validecon kaj aktualecon ĝis hodiaŭ. Ĝin adoptis aro de slovakaj verkistoj kiel Samo Chalupka (1812-83), frato de Ján Chalupka (1791-1871), Janko Král´(1822-76), Ján Botto (1829-81), Andrej Braxatoris-Sládkovic (1820-72), Svetozár Hurban-Vajanský (1847-1916) kaj precipe de ***Pavol Országh Hviezdoslav*** (1849-1921), kiu eble estis la plej konata slovaka poeto de tiu periodo, post kiam li rezignis pri sia hungara patrioteco, kaj aliaj.

**Ĉeĥoslovakio (1918-38)**

La unua mondmilito (1914-18) radikale ŝanĝis la politikan pejzaĝon en Eŭropo. Ĉeĥoj kaj slovakoj esperis, ke Aŭstrujo-Hungarujo malgajnos la militon kaj ke ili povos fondi propran ŝtaton. Tiujn strebadojn akcelis precipe jenaj tri politikuloj: *Tomáš Garrigue Masaryk* (1850-1937), *Edvard Beneš* (1884-1948) kaj ***Milan Rastislav Štefánik*** (1880-1919). La 14an de novembro 1915 Štefánik kaj Beneš fondis en Parizo la „Eksterlandan Agadkomitaton“, kiu estis organizaĵo de ĉeĥoj kaj slovakoj vivantaj en ekzilo kaj kiuj apogis la fondon de komuna ĉeĥo-slovaka ŝtato. Alia organizaĵo, la „Nacia Konsilio de bohemaj kaj slovakaj landoj“, kies ĝenerala sekretario estis Beneš, serĉis por tiu ideo la subtenon de la okcidentaj potencoj. Grava faktoro estis la ĉeĥaj kaj slovakaj legionoj, kiuj estis starigitaj de Štefánik, kiu en 1912 fariĝis franca civitano kaj mem servis kiel libervolulo (piloto de militaj avidialoj) en la franca armeo, en kiu li eĉ estis generalo de brigado. Fine de la milito tiu ĉeĥo-slovaka legiono nombris 128´000 soldatojn. La ekzisto de ĉi tiu armeo konsiderinde kontribuis al tio, ke la okcidentaj aliancanoj komencis agnoski la Nacian Konsilion de ĉeĥoj kaj slovakoj. Alia subteno venis de la slovakaj elmigrintoj en Usono, kiuj ampleksis duonmilionon da homoj. Ili estis tre aktivaj, regule atentigis pri la „slovaka demando“ kaj akre kritikis la hungaran registaron. En la Traktato de Klevlando de la 25a de oktobro 1915 la „Ĉeĥa Nacia Konsilio“ kaj la „Slovaka Ligo“ en Usono esprimis sian apogon al la „unuiĝo de la ĉeĥa kaj slovaka popoloj en federacia ŝtato“. Masaryk vojaĝis al Usono, kie li kunigis la gvidantojn de la organizaĵoj de la ĉeĥaj kaj slovakaj elimigrintoj por subskribi la Traktaton de Pittsburgo de la 30a de majo 1918, kiu konfirmis la deziron de la ĉeĥoj kaj slovakoj unuiĝi en komuna ŝtato, en kiu la slovakoj ricevu aŭtonomecon kun propraj administracio, parlamento kaj tribunalo, kaj en kiu la slovaka lingvo fariĝu oficiala lingvo de la slovaka landoparto. Kreante la novan ŝtaton, Masaryk certe pensis ankaŭ pri la ŝtata modelo de Svislando, sed pro la tro grandaj historiaj, strukturaj, politikaj, kulturaj kaj ekonomiaj diferencoj ĝia enkonduko tamen ne povis esti konsiderata en la kazo de Ĉeĥoslovakio, eble kun escepto de la neŭtraleco.



Slovakoj Andrej Hlinka (1908), Vavro Šrobár, Ferdiš Juriga, Milan Rastislav Štefánik



Centraj ĉeĥoslovakaj politikistoj: Masaryk, Beneš, Kramář, Tusar, Švehla (ĉefministroj)

Kun la konsento de la okcidentaj potencoj Beneš proklamis la 14an de oktobro 1918 la formadon de Provizora Registaro de „Ĉeĥo-Slovakio“, kies sidejo estis en Parizo. Masaryk devis fariĝi ŝtatprezidento, Beneš ministro pri eksteraj aferoj kaj Štefánik ministro pri militaj aferoj. *Karel Kramář* (1860-1937) fariĝis unua ĉefministro. Krom la okcidentaj aliancanoj ankaŭ Ruslando agnoskis tiun registaron, kiu eĉ rajtis partopreni la packonferencojn, kvankam Ĉeĥoslovakio ne estis militanta ŝtato.

En Slovakio mem la slovakaj naciistoj faris jenon: *Milan Hodža* instigis fondi „Slovakan Nacian Konsilion“, kiu ricevis la taskon diskuti kun la registaro en Parizo la kondiĉojn de la kreado de ĉeĥo-slovaka ŝtato. Por la slovaka flanko gravis la streketo inter ĉeĥa kaj slovaka, kvankam ĝi poste malaperis, pro kio la slovakoj estis malkontentaj. *Ferdiš Juriga,* kiu restis la sola slovaka deputito en la parlamento en Budapeŝto, postulis en la nomo de la Slovaka Nacia Konsilio la definitivan eksiĝon de Slovakio el la Hungara Reĝlando kaj la rajton de Slovakio mem decidi sian sorton surbaze de la leĝo de la naturo, kio praktike signifis la postulon de la sendependeco.

La 28an de oktobro 1918 ankaŭ la Ĉeĥa Nacia Komitato en Prago donis sian aprobon al la fondo de ĉeĥo-slovaka ŝtato, kaj du tagojn poste ankaŭ la Slovaka Nacia Konsilio faris la samon en Turčiansky Svätý Martin. *Vavro Šrobár* vojaĝis al Prago kaj subskribis en la nomo de la Slovaka Nacia Konsilio la proklamon pri la sendependeco.

La hungaroj klopodis saboti la ĉeĥosloakajn planojn kaj celis savi la integritecon de sia ŝtato per la ideo de „hungara-slovaka kondominio“, kiu devis esti starigita kadre de „Danuba Konfederacio“, sed el la vidpunkto de la slovakoj tiu koncepto de hungaria ŝtato, kies parto estu Slovakio, ne taŭgis. Kiam la hungaroj konstatis tion, ili klopodis eltranĉi Slovakion el la kadro de la kreiĝanta ĉeĥo-slovaka ŝtato kun la celo re-aligi Slovakion al Hungarujo. Poste la hungaroj proponis, ke Slovakio fariĝu aŭtonoma regiono (slovenská krajina), kies limoj estu fiksitaj de la internacia packonferenco. Ĉio kompreneble sub hungara gvidado. Sed proponi ĉiujn tiujn diskredititajn ideojn estis vane, ĉar la internacia packonferenco decidis la slovakan demandon alimaniere.

Kiam la Pariza Packonferenco estis malfermita la 15an de januaro 1919, la provizora registaro de Ĉeĥo-Slovakio jam kreis faktojn sur sia tertitorio. Masaryk ordonis sendi ĉeĥajn trupojn al Slovakio, kaj la konflikto inter ambaŭ popoloj estis lanĉita. Juriga diris en 1921 en la praga parlamento, ke la ĉeĥoj ne kondutis en Slovakio kiel liberigantoj, sed kiel konkerantoj. Fakte, la hungaroj ankoraŭ ne konsideris sian slovakan teritorion. Perdita. Hungaraj soldatoj forpelis la ĉeĥojn el Slovakio kaj reokupis grandparton de la lando. Beneš sukcesis konvinki la aliancanojn, ke ili ordonu al la hungaroj forlasi Slovakion kaj sekurigu la sudan limon de Slovakio per aliancitaj soldatoj.

La komunistoj (Béla Kun) klopodis puŝi alian solvon: La 16an de junio 1919 ili proklamis la „Slovakan Sovetan Respublikon“ (Räterepublik) por „liberigi la slovakan proletaron de la ĉeĥa naciismo“ kaj „kapitalismo“, kun subteno de „forta slovaka Ruĝa Armeo“. Estro de tiu slovaka registaro devis fariĝi la ĉeĥoslovaka komunisto *Antonín Janoušek,* kiu vivis en Budapeŝto. La fondon de tiu soveta respubliko oni sciigis al Lenin, Ĉiĉerin kaj Rakovskij, kiuj sendis ambasadoron. Nur post kiam la franca armeo en Balkanio minacis, ke oni okupos Hungarujon, kaj post kiam rumanaj trupoj venkis la hungaran Ruĝan Armeon ĉe Szolnok, la „ruĝaj gvardianoj“ malaperis el Slovakio kaj kune kun ili ankaŭ la Slovaka Sovetrespubliko en julio 1919. Tamen, la slovakaj komunistoj ne rezignis ankaŭ en la venontaj jaroj pri propra koncepto de slovaka ŝtata sendependeco, kaj la ĉeĥaj komunistoj en Slovakio (K. Gottwald) eĉ rekomendis efektivigi ĝin kadre de USSR! Sed ne nur la politika maldekstro, ankaŭ la politika dekstro disvolvadis fortan aktivecon en la senco de la solvo de la slovaka demando ekster la kadro de Ĉeĥo-Slovakio. La ĉefa protagonisto de tiu ideo estis prof. d-ro *František Jehlička,* kiu kunfondis la Slovakan Popolpartion en 1905 kaj estis intima kunlaboranto de Andrej Hlinka kaj kunfondinto de la partia gazeto *Slovako*. La specifa ideo de Jehlička estis starigi memadministratan ŝtaton („Slovenská krajina“) kun diversaj internaj kompetencoj, dum la ceteraj aferoj estu reguligitaj en kunlaboro kun la *hungara* aŭ *pola* parla- mento, kvankam li ne insistis solvi la slovakan demandon kadre de Hungario. Laŭ li, la slovaka parlamento mem decidu al kiu ŝtato Slovakio apartenu, ĉu al Hungario aŭ al Pollando au ĉu ĝi restu memstara kaj sendependa. Kontraŭ Ĉeĥoslovakio li faris viglan propagandon el diversaj eksterlandaj urboj, de Budapeŝto kaj Vieno ĝis Varsovio, de Romo ĝis Parizo, Berlino, Londono, Ĝenevo kaj Vaŝingtono, kie li fondis la „Slovakan Konsilion“ kaj informis la politikistojn kaj diplomatojn de Ligo de Nacioj. En Romo li diris al sovetiaj diplomatoj, ke Slovakio estas ekspluatata kiel kolonio de ĉeĥaj kapitalistoj, eldiro, kiu vekis la atenton de la komunistoj. Sed la rusoj (aŭ sovetianoj) preferis rilati kun Beneš, kiu gvidis porsovetian politikon. Post kiam Budapeŝto signalis, ke la ideoj de Jehlička ne interesas la hungarojn, li turnis sin al Pollando kaj defendis la ideon, ke la slovakoj vivu en konfederacio kun la poloj, kiuj eĉ montris sin interesataj pri tio, ĉar ili timis la aperon de la Ruĝa Armeo ĉe la suda limo, kiu povus esti vokita de la porsovetiaj ĉeĥoslovakistoj. La 25an de majo 1921 en Pollando fakte estis proklamita „Memstara slovaka respubliko“ en interkonsento kun la poloj. Aliflanke, Jehlička serĉis ankaŭ la kontakton kun la hitleranoj kaj ricevis atenton de Alfred Rosenberg. Mussolini, de kiu Jehlička estis akceptita en aŭdiencoj, regule ricevis liajn komunikojn. La disponeblaj dokumentoj evidentigis, ke en la

intermilita tempo en Pollando, Hungario, Germanio kaj Italio ekzistis vigla intereso, ke Slovakio forlasu la ĉeĥoslovakian kadron. En 1938 Jehlička forpasis en Vieno sub malklaraj cirkonstancoj, tiel ke oni supozis, ke li estis mortigita aŭ de ĉeĥaj aŭ hungaraj agentoj. Lia lobia laboro estis daŭrigata de Tuka, Ďurčanský, Mach, Murgaš, Sidor, Tiso kaj aliaj (pri kiuj pli detale temos pli sube), kiuj deziris, ke la ĉeĥoslovakismo mortu, kaj revis pri memstara slovaka ŝtato. En la gazeto *Slovako* de 1921 estis publikigita unuaj „proponoj de leĝo por sendependa Slovakio“. Laŭ tiu propono, Ĉeĥoslovakio devis konsisti el du aŭtonomaj entoj, kiuj estus agnoskitaj kiel subjektoj de la internacia juro kun memstara reprezentado ĉe Ligo de Nacioj. La unueco de ambaŭ ŝtatoj devis esti esprimita per la ekzisto de komuna ŝtatprezdidento, kiu devus esti alterne ĉeĥo kaj slovako kaj kiu elektita de la popolo. Cetere, la slovaka ´amo´ al Pollando atingis eĉ tian gradon, ke en septembro 1938 la gvidantoj de la Slovaka Popolpartio de Hlinka (Sidor kaj Tiso) komunikis al la pola registaro, ke Slovakio petos la protekton de Pollando kadre de dualisma unuiĝo, kaze ke la teritorio de Ĉeĥoslovakio estos atakita de ekstera malamiko kaj se la slovakoj estos devigitaj proklami sian sendependecon. Ĉi tiu deklaro havis antaŭ ĉio la celon eviti hungaran okupacion de Slovakio, kontraŭ kiu pledis ankaŭ Rumanio kaj Jugoslavio. Sed ĉar kadre de la Munkena Interkonsento (de 1938) la kvar grandpotencoj decidis garantii al Ĉeĥoslovakio ties integritecon, la deklaro pri la pol-slovaka unuiĝo estis nuligita. Pollando neniam sukcesis akapari Slovakion, malgraŭ evidentaj strategiaj avantaĝoj, kiujn tia akaparo estus havinta, kiel la aliro al la Danubo kaj forpuŝado de la ĉeĥa influo en meza Eŭropo. Tiel, la „slovaka demando“ fariĝis internacie diskutata.

Sed ni revenu al la jaro 1919, en kiu la 24an de julio la provizora registaro de Ĉeĥo-Slovakio definitive akiris sian kontrolon ankaŭ pri la slovaka landoparto. Certe, la ĉeĥo-slovaka reĝimo estis trudita al la slovaka popolo, kvankam la strebado de la slovakoj fondi propran ŝtaton estis konata en eksterlando.

Sendube, Ĉeĥoslovakio dankis siajn kreon kaj ekziston al la okcidentaj grandpotencoj, kiuj celis trudi sian koncepton de nova ordo en meza kaj suda Orienteŭropo post la milito. „Versajlo“ devis garantii daŭran pacan ordon en tiu mondoparto. Por redukti la konfliktojn inter la etnoj, la novaj naciaj ŝtatoj devis esti kreitaj surbaze de la principo de la memdecida rajto de la popoloj, kio inkluzivis „justajn“ landlimojn. Sed la komplika etna situacio de orienta Eŭropo apenaŭ permesis realigi tiun planon je la kontenteco de ĉiuj koncernitaj etnoj kaj popoloj. Male, la nova ordo kaŭzis, ke en ĉiu nova nacia ŝtato vivis etnaj minoritatoj, kiuj estis fortranĉitaj de siaj originaj aŭ rilataj naciaj ŝtatoj. Multaj ŝtatoj estis ankaŭ ekonomie tro malfortaj por vere esti sendependaj kaj memstaraj. Baldaŭ tiuj ŝtatoj ree dependiĝis de la grandpotencoj. Beneš komprenis sian ŝtaton ankaŭ kiel instrumenton por distancigi la germanan influon kaj por eviti bolŝevisman revolucion flanke de Ruslando. Pro tio lia propono subpremi la opozicion de la germana minoritato en Ĉeĥoslovakio trovis vastan aprobon.




Ĉeĥoslovakio (1918-38), dekstre ekde 1928 kun la integraj partoj bohemia, moravia-silezia, slovakia kaj karpatukraina.

Ĉeĥoslovakio gajnis teritorion, kiu ampleksis 140´000 kvadratajn kilometrojn kaj havis 13,6 milionojn da loĝantoj, kiuj ekonomie povis profiti la resursojn, kiujn la malaperinta aŭstra-hungara imperio postlasis al ĝi. En la nova ŝtato vivis, laŭ la censo de 1930, 9,8 milionoj ĉeĥoj *kaj* slovakoj (de tio 2,5 mln. slovakoj), 3,3 mln. germanoj, 720´000 hungaroj (t.e. 4,9%), 410´000 rutenoj kaj 100´000 poloj. La limo de Slovakio kun Pollando estis fiksita nur post komplikaj intertraktoj en septembro 1924. Ankaŭ la limo kun Hungario estis granda problemo, kiu estis solvita malfavore al la nova hungara naciŝtato, kies teritorio estis ĉiuflanke draste reduktita je la senlima ĉagreno de la hungaroj, kiuj neniam povis digesti tiun traŭmatan

perdon de pli ol du trionoj de sia teritorio en la Traktato de Trianon. Pro tio, la rilatoj inter Hungario kaj ĝiaj najbaroj, precipe Slovakio kaj Rumanio, longdaŭre restis malbonaj, preskaŭ malamikaj, fakte ĝis hodiaŭ.




Etnoj kaj lingvoj en Ĉeĥoslovakio en 1930 (Vikipedio)

Sed ankaŭ en la nova ĉeĥoslovaka ŝtato, kiu estis unueca centrisma kreaĵo, la „slovaka demando“ restis nesolvita. Slovakio restis ĥimero. La formulo, ke la slovaka popolo estu perceptata kiel „slovaka branĉo de unueca ĉeĥo-slovaka nacio“ dekomence vekis la suspekton ĉe certaj slovakaj naciistoj, kiuj sentis sin uzurpataj de la „ĉeĥoslovakistoj“, al kiuj apartenis krom Masaryk kaj Beneš ankaŭ Hodža kaj Šrobár. Aperis la legendo, ke la fondintoj de Ĉeĥoslovakio, precipe Masaryk, kiu volis kompreni la ĉeĥoslovakan nacion kiel unu tuton, neante la ekziston de propra slovaka nacio, celis kvazaŭ misuzi la slovakojn por formi slavan plimulton kontraŭ la germanoj, kiuj estis tro granda etna malplimulto en Bohemio. La ĉefa celo de la slovakaj patriotoj kaj naciistoj estis liberiĝi de la hungara regado kaj ne fariĝi apendico de la ĉeĥoj, kiujn la slovakoj neniam tro ŝatis, inter alie pro tio, ke inter ĉeĥoj ekzistis ankaŭ kontraŭuloj de la slovaka aŭtonomeco.

Ankaŭ el ekonomia kaj kultura vidpunktoj ekzistis gravaj diferencoj: Dum en la ĉeĥa parto dominis industrio kaj ´progresema´ maldekstrema liberalismo kun inklinoj al ateismo, en la ekonomie postrestinta Slovakio ekzistis ĉefe agrikulturo kun konservemaj kamparanoj kaj dekstremaj katolikaj pastroj.

Krom etnaj problemoj neeviteble aperis en la unua ĉeĥoslovaka respubliko ankaŭ abundaj politikaj tensioj. Inter 1918 kaj 1938 ekzistis 15 diversaj registaroj, kio konsiderinde kontribuis al la politika malstabileco de la ŝtato, malgraŭ funkcianta demokratio, kiu estis mondfama, dum en multaj eŭropaj landoj regadis senskrupulaj aŭtokratoj, diktatoroj aŭ faŝistoj. La komunisma partio de Ĉeĥoslovakio estis fondita en 1921 kaj profitis la malkontenton de vastaj tavoloj en la postmilitaj jaroj, sed ĝi baldaŭ perdis sian popularecon. Bohumír Šmeral (1880-1941), reprezentanto de la maldekstraj partioj, rekomendis densan kunlaboron kun Sovetunio. En 1929 kiel nova ĉefo de la komunisma partio de Ĉeĥoslovakio elektiĝis Klement Gottwald, kiu ludos gravan rolon lige kun la transpreno de la komunisma povo en Ĉeĥoslovakio.

Malgraŭ pravaj aŭ malpravaj plendoj pri diskriminado, ankaŭ la slovakoj certe povis profiti la liberecon kaj demokration, kiuj prosperis en Ĉeĥoslovakio en la intermilita tempo: Ili ricevis 84

altlernejojn, inter ili 53 gimnaziojn, kie la slovaka lingvo estis instruata. Ekzistis pluraj katolikaj kaj luteranaj teologaj institutoj kaj 12 judaj lernejoj. Bratislavo ricevis propran universitaton. „Matica slovenská“, kiu estis malpermesita de la hungaroj, relanĉis sian laboron komence de 1919. Dum en 1918 aperis 23 slovakaj gazetoj, dek jaroj poste ekzistis jam 186.

Ke Bratislavo fariĝis nova ĉefurbo de Slovakio, ne estis tute memkompreneble, ĉar la hungaroj insistis okupi ĝin kiel propran urbon. Por la rolo de slovaka ĉefurbo estis destinitaj aŭ Turčiansky Svätý Martin aŭ Žilina, konsiderataj estis ankaŭ Banská Bistrica aŭ Košice. Pro diversaj kialoj oni tamen elektis Bratislavon (kiu antaŭe nomiĝis slovake Prešporok), ĉar kun siaj 80 mil enloĝantoj ĝi almenaŭ havis la karakteron de kosmopolita grandurbo kaj troviĝis pli proksime al okcidenta Eŭropo. Tiel, Bratislavo povis esti integrita en la novan ŝtaton (Ĉeĥoslovakion) kaj proklamita kiel ĉefurbon de Slovakio nur en januaro 1919, cetere kun la helpo de la ĉeĥoslovaka armeo. Oni nomis ĝin „Wilsonovo Mesto“ honore al Woodrow Wilson, sed jam en februaro ĝi adoptis la nomon „Bratislava“, kiu estis laŭ hipotezo la origina slovaka (aŭ almenaŭ slava) nomo de tiu urbo. Post tiu decido la slovaka registaro translokiĝis de Žilina al Bratislavo. Kiam ankaŭ diversaj gravaj kulturaj instalaĵoj estis translokitaj al la nova ĉefurbo, la homoj en Martin estis nature malkontentaj, ĉar tiel ĉi tiu urbo perdis sian iaman kulturan signifon. Ĝis 1935 la nombro de la enloĝantaro de Bratislavo kreskis al 125 mil.

***Vavro Šrobár***, kiu fariĝis senpartia ministro pri sano kaj pri administrado de Slovakio, ricevis la taskon forpurigi la malnovan hungaran oficistaron, kion li faris brile, rigore kaj efike. Lige kun tiu purigo multaj hungaroj forlasis la landon. Sed la enkonduko de la pli ´efika´ ĉeĥa administra sistemo estis malŝatata en Slovakio, ĉar impostoj estis pli rigore enkasigitaj ol antaŭe, kaj preskaŭ neniu civitano povis eskapi la armean deĵoron. Lige kun la modernigo de la lando ankaŭ sennombraj ĉeĥoj migris al Slovakio, pri kio la slovakoj tute ne entuziasmis, ĉar fremduloj komencis enmiksiĝi en iliajn aferojn. Ŝajnas, ke Prago sendis ĉirkaŭ 200 mil ĉeĥajn oficistojn al Slovakio. Allogaj postenoj estis disdonitaj en la partiaj centraloj de Prago laŭ la gusto de la ĉeĥoj. En la strukturoj de la komuna ŝtato oficis relative malmultaj slovakoj: en 1938, inter 7470 ĉeĥoslovakaj oficistoj de 17 ministerioj estis nur 131 slovakoj, de 1246 oficistoj en la ministerio de la eksterlandaj aferoj venis nur 33 dungitoj el Slovakio, kaj inter 139 armeaj generaloj troviĝis nur unu sola slovako. La ideologio de la „ĉeĥoslovakismo“ do fariĝis politika farso. Laŭ indiko de Ďurčanský (1963), por kiu mi ne povis trovi konfirmon, 600 mil slovakoj estis translokitaj al Ĉeĥio. Inter 1920 kaj 1938 la duono de pli ol 400´000 civitanoj de Ĉeĥoslovakio, kiuj elmigris al Ameriko, estis slovakoj. Multaj slovakoj plendis pli kaj pli ofte pri la „praga centrismo“, kiu diktis ankaŭ la tonon en la ekonomio de Slovakio, kies malnovaj ´hungaraj´ strukturoj devis esti ŝanĝitaj, tiel ke inter malkontentaj slovakoj revekiĝis la postulo pri politika aŭtonomeco.

La gvidanto de tiu aŭtonomeca movado nomiĝis ***Andrej Hlinka*** (1864-1928), kiu estis katolika pastro kaj ĉefa parolisto de la Slovaka Popolpartio (1906-25 ĝi nomiĝis Slovenská L´udová Strana SL kaj 1925-45 Hlinkova Slovenská L´udová Strana HSL´S), kiu estis partio, kiu unuigis plej diversajn sociajn grupiĝojn kaj kun diversaj ideologiaj orientiĝoj. Ĝiaj membroj estis nomataj „ludakoj“.

Ke tiu partio, kiu konsideris sin mem sola legitima reprezentanto de la slovaka popolo, povante unuigi unu trionon de balotvoĉoj, havis radikalan sintenon kontraŭ socialdemokratoj, komunistoj kaj judoj, estis antaŭvideble, ĉar ideologie ĝi klare reprezentis katolikismon kaj naciismon. Sed en la demokratie organizata Ĉeĥoslovakio tia partia sinteno estis malfacile akceptebla. Kvankam ankaŭ Hlinka pledis por komuna ŝtato kun la ĉeĥoj, ĉar li opiniis, ke la plej grava celo de la slovakoj, eksiĝi el Hungarujo, ne povas esti atingita laŭ alia maniero, li frue avertis pri la danĝero, ke la slovakoj povus esti ĉeĥigitaj, kio por li neniel povis esti dezirinda opcio. Nature, la konservema ekleziulo timis ankaŭ, ke la junularo povus perdi siajn katolikajn radikojn pro la kontraŭ-eklezia agado de la pragaj politikistoj. La ekzisto de ĉeĥoslovaka nacio do ne estis sufiĉe kredinda por Hlinka, kiu anstataŭ tio postulis la agnoskon de la etna, lingva kaj kultura memstarecoj de la slovaka popolo. Kiam Hlinka vojaĝis en septembro 1919 al Parizo, kvankam li ne estis invitita al la packonferenco, kaj protestis kontraŭ la „planitaj trompado, ekspluatado kaj subpremado de la slovakoj fare de la ĉeĥoj“, uzante la aserton, ke Slovakio fariĝis „kolonio de Bohemio“, Beneš ordonis al la francaj aŭtoritatoj forpeli Hlinka-n el la lando. Kiam li revenis al Ĉeĥoslovakio, la polico arestis lin kaj kondamnis lin al puno en malliberejo. Nur kiam en aprilo 1920 li estis elektita al la ĉeĥoslovaka parlamento, li estis liberigita. Tiel, la malamikeco inter pragaj politikistoj kaj slovakaj naciistoj estis neevitebla.

En la partio de Hlinka ekzistis eĉ pli radikalaj aktivuloj kiel ***Vojtech Tuka*** (1880-1946), kiu estis ekstremdekstra naciisto, kontraŭulo de ĉeĥoj, liberaluloj, judoj kaj framasonoj. La faŝismon li transprenis de la italoj, poste la naziismon de la germanoj. Li postulis la plenan suverenecon de Slovakio, sed ĝis la

morto de Hlinka li ne ricevis vastan apogon. Kiel ĉefredaktoro de la partia organo *Slovako* Tuka fondis en 1923 ankaŭ kvazaŭ-armean protektan trupon, la nacian defendan trupon „Rodobrana“. En 1925 li fariĝis ĝenerala sekretario de la partio.

Hlinka daŭre subtenis la ideon de komuna ŝtato, kondiĉe ke estu faritaj kelkaj esencaj reformoj en la konstitucio, por garantii pli da aŭtonomeco al la slovakoj. La partio de Hlinka konstante sendis, ĉiam vane, proponojn al la ĉeĥoslokvaka parlamento, kiu rigide rifuzadis ĉiujn postulojn de lia partio. En la tutŝtataj parlamentaj balotoj de novembro 1925 la partio de Hlinka kaj Tuka venkis kiel plej forta slovakia partio, kiu povis sendi 23 anojn en la parlamenton. Tamen, la plimulto de la slovakaj balotantoj voĉdonis por aliaj partioj. En januaro 1927 la Slovaka Popolpartio akceptis la proponon eniri la registaran koalicion. Kadre de konstitucia reformo la historiaj landoj Bohemio kaj Moravio estis reenkondukitaj kaj Slovakio estis agnoskita kiel memstara administra unuo kun propra parlamento. Kvankam du trionoj de ĝiaj membroj estis elektitaj kaj unu triono nomumita de la registaro, ĝiaj kompetencoj estis treege limigitaj, kaj ĝia estro fariĝis oficisto, kiu estis nomumita de la registaro. La Slovaka Popolpartio ne estis tute kontenta. Alia postulo, normaligi la diplomatiajn rilatojn kun Vatikano, kiuj estis rompitaj de Prago, estis plenumita kaj la diocezaj limoj estis refaritaj.

Dubinda jura proceso kontraŭ Tuka, kiu estis kondamnita al 15-jara arestpuno en malliberejo pro „perfido de la ŝtato“, igis la partion forlasi la koalicion. Ĉar ankaŭ la balotantoj ne dankis la partoprenon de la Popolpartio en la koalicio, Hlinka rekondukis ĝin en la opozicion.

Kiam la 14an decembro 1935 T.G. Masaryk demisiis kiel ŝtatprezidento, li admonis sian posteulon „konservi la justecon rilate al ĉiuj civitanoj“ de Ĉeĥoslovakio. Sed Edvard Beneš, kiu fariĝis nova prezidento, ne kapablis efektivigi tiun principon, kvankam li promesis al la slovakoj havigi grand-skalan aŭtonomecon. Kiel unua slovako Milan Hodža fariĝis nova ĉefministro de Ĉeĥoslovakio. Sed Beneš hezitis cedi la postulojn de la slovakoj, des pli, ke en tiu tempo la sudetaj kaj karpataj germanoj, kiuj estis reprezentataj de Franz Karmasin, pli kaj pli laŭte elpaŝis kun siaj postuloj, kio helpis al la naci-socialistoj, precipe Hitlero, pli malpli frue atingi siajn celojn.



Politikistoj de la Slovaka Popolpartio: Supre: Andrej Hlinka (2x, 1937), Vojtech Tuka, Jozef Tiso, Vavro Šrobár, Bohumír Šmeral. Sube: Karol Sidor, Ferdinand Ďurčanský, Alexander Mach, Ferdinand Čatloš, Karol Mederly.

Koncerne la Hlinka-gvardion, kiu funkciis kiel ´para´-armeo de la Slovaka Popolpartio de Hlinka, okazis diskuto, ĉu ĝi estis faŝisma organizaĵo. Nu, ĝia antaŭa organizaĵo, „Rodobrana“, estis konstruita laŭ la modelo de la itala „Fasci di Combattimento“ kaj de la germana SA, do ĝi orientiĝis laŭ la tiam moda faŝismo de la 20aj jaroj, kies idealulo estis Benito Mussolini mem. „Rodobrana“, kiu polemikis kontraŭ

la „juda framasonismo“ kaj kontraŭ Masaryk kaj la ´politika klaso´ en Prago kaj Bratislavo, estis fondita de Tuka en 1923, sed ankoraŭ en la sama jaro ĝi estis malpermesita kaj povis denove ekzisti nur en 1926 por esti reorganizita de Mach. La ĉefa publiko de „Rodobrano“ rekrutiĝis esence el etburĝaj, kamparanaj kaj katolikaj medioj, en kiuj kontraŭĉeĥaj, kontraŭkomunismaj kaj kontraŭjudaj sentoj estis flegataj. Ĝis la definitiva malpermeso de „Rodobrana“, kiu estis akompanita kun la malliberigo de Tuka por 15 jaroj, ĝi sukcesis kolekti ĉirkaŭ 25´000 membrojn. Kiam la Hlinka-gvardio estis fondita en 1938, ĝiaj fondintoj faris rektan ligon al „Rodobrana“. En 1941 parto de la Hlinka-gvardio ricevis instruadon en germanaj SS-tendaroj, kaj de tiam la Hlinka-gvardio estis je la dispono de la germanaj nazioj precipe dum la holokaŭsto en Slovakio. Ekzistis ankaŭ „Hlinka-junularo“. Inter sciencistoj okazas diskuto, ĉu la Hlinka-gvardio estas klasifikebla kiel faŝisma, pseŭdo-faŝisma aŭ kvazaŭ-faŝisma organizaĵo, kaj se jes, en kiu grado kaj laŭ kiuj periodoj. Pli precize estus nomi la slovakan ideologion „klerikala faŝismo“ aŭ *ludakismo*, kiu enhavas la specifajn trajtojn de la slovaka ludmaniero de tiu dekstrema-naciisma-ekleziisma movado, kiu finfine formis unu familion.



La emblemoj de diversaj faŝismaj kaj faŝismemaj organizaĵoj okulfrape similas unu al la aliaj: Hlinka-gvardio (Slovakio), Fera Gvardio (Rumanio), Sagokruculoj (Hungario), Skvadristoj (Italio), NSDAP (nacisocialistoj aŭ nazioj), SA kaj SS (Germanio)



Emblemo de la slovaka armeo 1939-45



Hlinka-gvardio, Alexander Mach. Otomar Kubala antaŭ la tribunalo.

**Vojo de Slovakio al ŝtata sendependeco kaj alianceco kun Germanio kaj la Slovaka Ŝtato (1938-45) – vojo al milito**

La venonta viktimo post la aligo de Aŭstrio al la Germana Regno de Adolf Hitler en marto 1938 devis esti Ĉeĥoslovakio. Por savi la pacon, Italio, Grandbritio kaj Francio cedis en la Munkena Interkonsento de la 30a de septembro 1938 la postulon de Germanio koncerne la sudetan landon, per kio Ĉeĥoslovakio perdis unu trionon de sia teritorio kaj 70 procentojn de la pezindustrio. Pollando kaj Hungario rajtis anonci siajn teritoriajn ambiciojn rilate al Ĉeĥoslovakio kaj Slovakio. Tio signifis la unuan paŝon al la likvido de Ĉeĥoslovakio, kies registaro eĉ ne estis invitita al la koncernaj konferencoj por decidi ĝian sorton. Hitler profunde malamis kaj malrespektis la ĉeĥojn, pri kiuj li opiniis, ke ili estas la naturaj malamikoj de la germanoj, do la ĉeĥoj devis esti forigitaj aŭ germanigitaj. Fakte, neniu ´amiko´ helpis al Ĉeĥoslovakio en ĝia plej malfacila historia momento, tiel ke la ĉeĥoj devis senti sin profunde perfiditaj de francoj kaj angloj, kiuj evidente perdis sian intereson pri Ĉeĥoslovakio, pro kio la ĉeĥoj estis tre seniluziigitaj kaj koleraj. Sed, absurde, eĉ la ĉeĥoslovaka registaro agnoskis la decidojn de la Munkena Interkonsento kaj esprimis la deziron vivi en amikeco kun Germanio. La 5an de oktobro 1938 Edvard Beneš forlasis la prezidentan postenon por daŭrigi la laboron en la londona ekzilo. Kiel lia posteulo estis elektita *Emil Hácha* (1872-1945), kiu estis konsiderata kiel malforta politikisto kaj ne sukcesis kontraŭstari la premon el Germanio, kiu fariĝis nun ankaŭ rekte najbaro de Slovakio.

En la horo de granda danĝero la Slovaka Popolpartio montriĝis dume lojala al la ĉeĥoslovaka ŝtato. Post la morto de Hlinka en aŭgusto 1938, ankaŭ lia posteulo d-ro ***Jozef Tiso*** (1887-1947) rifuzis la centrifugajn fortojn, kiuj celis akceli la disbatadon de Ĉeĥoslovakio, kies parlamentano kaj ministro Tiso iam estis, kaj kiuj postulis apartan slovakan ŝtaton. Tiso opiniis, ke al Slovakio mankas la esencaj kondiĉoj por esti sendependa ŝtato: propraj armeo, polico, financoj, ekonomio. Spite al lia subteno de la statuso de Slovakio kiel memadministrata unuo kadre de Ĉeĥoslovakio, Tiso promesis al la radikaluloj, ke tiu aŭtonomeco ja neeviteble kondukos al ŝtata sendependeco de Slovakio. La 6an de oktobro 1938 estis akceptita la „programo de Žilina“, kiu proklamis la „**Aŭtonoman Landon Slovakio**“ (sk. Slovenská autonomní země) kiel parton de la ĉeĥo-slovaka federacio kaj nomumis provizoran registaron sub la gvido de Tiso. La saman tagon grafo Csáky komunikis al la pola registaro, ke Hungario konsentas pri la sendependeco de Slovakio. Ankaŭ Hitler persone esprimis sian simpation kun la decidoj de Žilina. La venontan tagon la programo de Žilina estis akceptita de la registaro en Prago, eĉ la ĉeĥoslovaka parlamento akceptis tiun ŝanĝon de la konsitiitucio de 1920, kiu en si mem restis valida. Sed en Slovakio aperis simptomoj de aŭtoritatisma, faŝisma reĝimo: La demokratio estis praktike abolita, la etnaj minoritatoj subpremataj, la lando estis malĉeĥigita kaj reslovakigita, kaj la judoj komencis senti la unuajn efikojn de antisemitismo.

Sed kial Hitler malamis la ĉeĥojn kaj amis la slovakojn? Indas aldoni kelkajn pensojn pri la imegablaj rilatoj de la germanoj al la slovakoj en tiu historia fazo. Certe, Hitler tute ne amis la slovakojn, kiujn li konsideris samaj minoraj homoj kiel ĉiuj ceteraj slavaj popoloj. Pri aparta konkerado de Slovakio Hitler eĉ ne pensis, ĉar ĝi povis esti pli utila kiel objekto de interŝanĝo aŭ ĉantaĝo kaj kiel instrumento por eksplodigi Ĉeĥoslovakion, kiu devis malaperi de la mapo. Tiso, Tuka, Mach kaj aliaj gvidaj slovakaj naciistoj bone rilatis kun la germanoj kaj en principo ne signifis danĝeron, do ili povis esti utligataj kaj manipulataj kiel marionetoj de Germanio, kvankam la slovakoj sendube havis ankaŭ proprajn naciajn kaj ŝtatajn interesojn. Rilate al la germanoj la sinteno de Tiso estis ambivalenta: Unuflanke li celis ŝirmi la slovakan popolon de troa germana influo, aliflanke li pretis kunlabori kun Germanio sur la kampoj de la ekonomio, armeo kaj en la militoj kontraŭ Pollando kaj Sovetunio, kaj li havis similan intereson „solvi la judan demandon“ en la propra lando. Ideologie, Tiso mem abomenis liberalismon, kapitalismon, socialismon, komunismon, ĉeĥoslovakismon kaj malŝatis ĉeĥojn, hungarojn, judojn kaj adoris nur katolikismon, slovakecon kaj ŝajne admiris la germanojn kaj la germanecon (li flue scipovis la germanan lingvon), kvankam, kiel dirite, Tiso klopodis eviti troan germanan influon en Slovakio aŭ eĉ germanigon de la slovaka popolo. Sed tiuj konsideroj estis por la germanoj nur detaloj, kiuj ne tro interesis ilin, ĉar ili estis konvinkitaj, ke Slovakio ĉiukaze fariĝos parto de la Tria Regno, kun aŭ sen Tiso. En kazo de kontraŭstarado, Slovakio povis en ajna momento esti facile okupata de la germana armeo, kaj la opozicio likvidita, eĉ se ĝi aperos ene de la radikalaj slovakaj naciistoj mem, la sola reala politika forto, kiu plu ekzistis en Slovakio. Ĉu Tiso kaj lia bando estis konsciaj pri tiuj intencoj de la germanoj, ne estas konate. Sed ĉar la slovakoj dume ne montris specialan kontraŭstaron rilate al la germanoj, eblis kaj necesis esti iom afabla kaj trankvila en la rilatoj kun ili kaj konsideri ilin fidindaj partneroj, eĉ amikoj. Por rekompenci ilian lojalecon, eblis doni al la slovakoj pli da spaco kaj libereco en la politiko ol al aliaj orienteŭropanoj,

kiuj malferme malŝatis kaj timis la germanojn, eĉ se la slovakoj ne restis senriskaj kaj montris kelkajn proprajn kapricojn, kiuj estis ligitaj kun sia nacia aŭ ŝtata sendependeco, ne pli. Inter la riskoj estis ekzemple, ke la radikala frakcio ĉirkaŭ Tuka, kiu celis efektivigi en Slovakio „nacisocialisman revolucion" laŭ germana modelo, esperis senpotencigi la branĉon de Tiso, kiu estis pli modera kaj povis kalkuli pri la subteno flanke de grandparto de la partio, parlamento, oficistaro kaj katolika eklezio. Aliflanke, la Hlinka-gvardio (vd. sube) volis mem transpreni la potencon. Tiso rapide reagis kontraŭ tiu strebo, tiel ke la germanoj timis puĉon flanke de lia frakcio kontraŭ la radikaluloj. Tria problemo estis la tro memstara ekstera politiko de Ferdinand Ďurčanský. Kiel ajn, la germanoj klopodis konservi sian kontrolon pri Slovakio kaj stabiligi la porfaŝismajn tendencojn, kio estis plej taŭga rimedo por teni la influon. La sendependeco de Slovakio havis ĉiukaze malaltan statuson por la germanoj: Ĝi estis konsiderata de ili kiel kromprodukto de la disbatado de Ĉeĥoslovakio kaj povis esti abolita en ajna momento laŭ la deziro de la germanoj. Kvankam Slovakio neniam apartenis al la germana regno kaj la lando ludis neniun rolon en la ideologio de la nazioj, ĝi tamen estis perceptata de la germanoj kiel germana kolonio kaj parto de la grandgermana regno. Tial, en la unua fazo de la rilatoj kun Slovakio Germanio aplikis ĉefe rimedojn de la klasika eksterlanda politiko por atingi siajn celojn sen troa premo kontraŭ la partnero. Sed post la Salzburga Dikto de julio 1940 la germanoj jam vidis kialon por fortigi la premon. Plej multe interesata pri la sendependeco de Slovakio estis Hermann Göring, kiu vidis en tiu lando valorajn tertrezorojn por libere ekspluati utile al la germana ekonomio.

La 17an de oktobro, ***Ferdinand Ďurčanský***, anstataŭanta ĉefo de la registaro de aŭtonoma Slovakio, certigis al Göring en la ĉeesto de Mach, ĉefo de la slovaka propagando, Karmasin, reprezentanto de la slovakiaj germanoj, kaj Seyß-Inquart, germana reganto de Vieno, ke „la slovakoj ne volas reiri al Hungario, sed ili deziras plenan memstarecon kun forta politika, ekonomia kaj armea apogo al Germanio." Krom tio, Ďurčanský postulis okazigi plebisciton sur la teritorio de „moravia Slovakio", „kie vivas multaj slovakoj". Göring komentis, ke li havas nenion kontraŭ slovaka sendependeco. En la sekvo Ďurčanský klopodis paralizi ĉeĥajn kaj hungarajn ambiciojn kontraŭ Slovakio. Kompare kun Ďurčanský, por kiu la aŭtonomeco de Slovakio en la ĉeĥoslovaka kadro ne sufiĉis, Tiso estis malpli hastema rilate la plenan ŝtatan sendependecon de Slovakio. Sed al Ribbentrop, kiu esprimis por la slovaka popolo varman simpation, li diris la 19an de oktobro, ke „la disiĝo de Slovakio baldaŭ sekvos, se Prago ne respektos la interkonsentojn". Krom tio ŝajnas, ke la itala registaro konsentis pri la sinteno de Berlino rilate al Slovakio. La ŝtata sendependeco de Slovakio do estis praktike enplanita por la reorganizado de meza Eŭropo jam en oktobro 1938. Tio certe ne okazis sen la volo de la slovakoj mem, kvankam la poloj fanfaronis, ke ili iniciatis la ideon. En la dua duono de 1938 en Slovakio okazis laŭta propaganda kampanjo por efektivigi tiun ĉi celon. La ĉeĥa publicisto I. Staněk skribis, ke en tiu fazo tuta Slovakio pretiĝis por la disiĝo de Ĉeĥio.

Post la Munkena Interkonsento, la 2an de novembro 1938 sekvis la Unua Viena Verdikto, kiu estas nomata ankaŭ „Viena Dikto", ĉar ĝi devigis Slovakion fortranĉi sudajn landopartojn kaj rezigni pri „Karpata Ukrainio", kie loĝis plimulte hungaroj kaj rutenoj, favore al Hungario. Sen tiuj teritorioj la surfaco de Slovakio mezuris ankoraŭ 10´390 kvadratajn kilometrojn. Hungario ricevis 854´000 loĝantojn, inter ili 272´000 slovakojn. Germanio aneksis la urbojn Petržalka (germ. Engerau) kaj Devín (Theben), kie vivis multaj germanoj.

La 8an de novembro 1938 en Žilina okazis fonda konferenco de la „Partio de la Nacia Slovaka Unueco", sen socialdemokratoj. La opozicio estis elŝaltita, la politiko egalŝaltita en Slovakio, la partia plureco abolita, la komunisma partio malpermesita, kaj la aliaj politikaj partioj estis devigitaj subteni la programon de Žilina. La Slovaka Popolpartio, kiu reprezentis lozan strukturon de plej diversaj interesogrupoj sen strikta interna organizo, ligante sindikatajn, virinajn, sportajn kaj junularajn organizaĵojn, kaj havis ĉirkaŭ 50´000 membrojn, diktis la tonon en tiu movado, kiu havis klare dekstran konservativan karakteron. Fine de la jaro 1938 tiu movado, partio aŭ unio havis jam 122 mil membrojn, kaj fine de decembro 1943 ĝi nombris preskaŭ 400 mil membrojn. Judoj ne povis fariĝi membroj. En 1939 la partio havis 43, en 1944 jam 256 pagitajn funkciulojn; ekzistis 45´110 lokaj kaj 2100 distriktaj funkciuloj. La Unio ankaŭ nete gajnis la elektojn de la 18 de decembro, per kiuj Tiso estis konfirmita kiel ĉefministro de Slovakio. Tra tiu Slovaka Popolpartio definitive transprenis la povon en la lando, preparante la estontecon laŭ propraj imagoj. Sed la partio estis heterogena: La unua alo estis kontrolata de Josef Tiso kaj Karol Sidor, kiuj apogis la slovakan aŭtonomecon kadre de ĉeĥoslovaka ŝtato. Sur la alia vlanko staris Vojtech Tuka kaj Ferdinand Ďurčanský, kiuj strebis al plena ŝtata sendependeco. Laŭ la diverĝaj pozicioj

en tiu partio, la unuopaj reprezentantoj agis individue kaj kutimis rilati kun eksterlandaj politikistoj sen konsulti la alian parton de la partio.

En broŝuro, kiu aperis en majo 1944 en Bratislavo sub la titolo ´Vojo al slovaka libereco´, Ďurčanský, brila ĉefideologo de la slovaka sendependeco kaj akra kontraŭulo de Beneš, skribis pri la intencoj de la slovaka popolo jenon:

„(…) Se la slovakoj pensis pri komuna ŝtato kun aliaj popoloj, tiam ili ne faris ĝin tial, ke ili ne volis vivi memstare, por rezigni pri sia popola individueco aŭ ĉar ili volis krei rus-slovakan, pol-slovakan au ĉeĥo-slovaka popolon, same kiel ili ne vivis en iama Hungarujo por krei iun novan hungaran popolon. Ili ne faris ĝin tial, ĉar ili ne sentus sin slovakoj, sed nur pro tio, por ke la slovaka popolo estu kapabla decidi mem sian sorton, esprimi sian politikan volon, sekurigi la popolan vivon, kurte: por ke la slovakoj povu vivi same kiel iu ajn alia libera popolo. Kaj se ili pretis ne plene insisti pri la rajto je tia libera vivo, tio tute ne signifas, ke ili pretus rezigni pri tio favore al iu alia, sed temis nur pri la kompreno por la ekzistanta situacio, en kiu la slovaka popolo troviĝis el la vidpunkto de la interna kaj internacia realeco. La slovaka popolo ne rezignis pri sia rajto mem decidi sian ordon, sed ĝi konsentis pri sia memlimigo nur en tiu grado, kiel ĝin postulis la ekzistado de komuna ŝtato. Samtempe ĝi volis konservi la eblecon mem decidi sian nacian sorton. Per aliaj vortoj: ĝi konsentis limigi siajn proprajn rajtojn kiel tion postulis la realaĵoj de la politiko kaj la internaciaj kondiĉoj de la potenco.“ En tiu senco Ďurčanský estis bona federisto.

Pri la kondiĉoj de la vivado kun la ĉeĥoj en komuna ŝtato la aŭtoro skribis:

„Promesoj kaj certigoj [al la slovakoj kiel la rajto de la plena memadministrado] ripetitaj de ĉiuj gravaj ĉeĥaj personecoj: ´Ĉe vi vi estos la mastroj kaj ĉe ni ni estos la mastroj´ estis la nekontestebla kondiĉo de la kunlaboro, kiu celis la kreadon de la estonta ŝtato. (…) Ankaŭ la Slovaka Popolpartio deklaris, ke ĝi insistas pri la senkondiĉa kaj nelimigita rajto, ke la slovaka popolo povas mem decidi sian sorton, kaj ke sur tiu bazo ĝi pretendas la partoprenon de la slovaka popolo en la kreado de memstara ŝtato, kiu konsistas el Slovakio, Bohemio, Moravio kaj Silezio. La rajto mem decidi do devas esti certigita al la slovakoj kaj ne al ia nova, finfine artefarita popolo, ĉar en tia kazo tiu nova popolo devintus esti menciita. (…)“

Al la ĉeĥoj Ďurčanský riproĉis, ke anstataŭ krei Ĉeĥo-Slovakion, ili kreis Ĉeĥoslovakion, kiu reprezentis ĉeĥan anstataŭ ĉeĥo-slovakan ŝtaton kun la intenco proklami la slovakan popolon parto de ia nova ĉeĥoslovaka popolo kun nova ĉeĥoslovaka lingvo. Kiel pruvon, ke la ĉeĥoj neas la ekziston de slovaka popolo, Ďurčanský utiligis citaĵon de T.G. Masaryk el la jaro 1921, laŭ kiu li diris, ke „la slovaka popolo ne ekzistas, tio estas nur inventaĵo de la hungara propagando“. Por Ďurčanský la ĉeĥoslovakismo signifis nenion alian ol kaŝita ĉeĥa imperiismo aŭ praga centrismo, kiu celas pereigi la slovakan popolon. La intencojn de la ĉeĥoj, kiujn li konsideris intrigemaj kaj puraj ŝovinistoj, li rifuzis kiel malhonestajn kaj ilian demokratecon nekredinda (p. 60/61). La kulpon pri la pereo de Ĉeĥoslovakio, kiun li taksis fikcio, li nete ŝovis al la ĉeĥoj mem. Por li la plena nacia kaj ŝtata sendependiĝo de Slovakio konformis ne nur al la natura leĝo de la rajto de la popoloj esti memstaraj, sed estis logika konkludo el la historiaj spertoj kun la ĉeĥoj, kiuj faris ĉion por malhelpi la ŝtatan suverenecon de Slovakio. Sed dum Ďurčanský konsideris Ĉeĥoslovakion malhelpanto de la slovaka sendependeco, la ĉeĥoj suspektis la slovakojn perfidantoj de komunaj ´slavaj idealoj´. Por elimini tiun ĉi kontraŭdiron, la unuopaj popoloj devis vivi memstare. La libereco de la slovaka popolo signifis por Ďurčanský homan progreson kaj verkon de la paco. Ĉar ie li aludis, ke la slovakoj eluzis la novan internacian situacion kreitan de Hitler por atingi proprajn celojn, li ŝajnis almenaŭ konscii, ke tiu ´makulo´ de la slovaka historo tamen ekzistas. Same kiel li rifuzis kontrolan rolon de la ĉeĥoj rilate al Slovakio, Ďurčanský rifuzis ankaŭ agnoski la hungaran hegemonion en danubia Mezeŭropo.

Fine de novembro kaj dum decembro 1938 Tiso kaj aliaj slovakaj politikistoj ripete diskonigis publike sian konvinkon pri la neceso starigi sendependan slovakan ŝtaton, ĉar la ekzistanta aŭtonomeco ŝajnis al ili nesufiĉa.







Supre: „Karpata Ukrainio“ en 1938. Sube: Tiso dum inspektado de trupo. Meze: La hungara ŝtatestro, admiralo Miklós Horthy, post la anekso de sudorienta Slovakio en Košice, la 11an de novembro 1938 (Vikipedia). Dekstre: Tiso kiel pastro, 1939.









Vojtech Tuka kiel profesoro kaj politikisto




Maldekstre: Tuka. Dekstre: Mach (tria de maldekstre) dum renkontiĝo kun Wilhelm Frick, germana ministro pri internaj aferoj, en 1942.



Maldekstre: Vojtech Tuka kiel ministro pri eksteraj aferoj kun Wilhelm Keitel kaj Joachim von Ribbentrop dum armea inspektado. Dekstre: Vojtech Tuka subskribas la kontrakton pri aliĝo de Slovakio al la alianco de la tri potencoj.



Jozef Tiso kun Vojtech Tuka kaj Joachim von Ribbentrop en 1940; Jozef Tiso kaj Adolf Hitler en oktobro 1941; Tuka ĉe Hitler en 1941. Kiel tiuj fotoj kaj lia mieno montras, estas evidente, ke Hitler (kiu ja malŝatis ekleziulojn) volonte akceptis Tiso-n kaj aliajn reprezentantojn de la Slovaka Ŝtato, kiuj faras la impreson, ke ili estis kvazaŭ liaj amikoj.



Karol Sidor; Tiso kun Göring kaj kun Hitler; Vojtech Tuka.

Pliajn fotojn vd. sub https://www.pinterest.com/source/axisslovakia.tumblr.com

Ĝis nun la germanoj ankoraŭ ne povis rekte enmiksiĝi, ĉar Slovakio apartenis al fremda suverena ŝtato. En tiu fazo precipe la slovakaj politikistoj (Tuka, Mach, Tiso, Ďurčanský, Sidor k.a.) daŭrigis sian laŭtan propagandon favore al la separo disde Ĉeĥio. Sen demandi Tiso-n kaj sen ricevi mandaton de la registaroj en Prago kaj Bratislavo, la 12an februaro 1939 Tuka vojaĝis al Berlino kaj raportis al Hitlero kaj Ribbentrop pri la deziro de lia frakcio memstarigi Slovakion kun la argumento, ke plua kunvivado kun la ĉeĥoj estus malebla. En tio ŝajnas, ke li tamen agis ankaŭ kontraŭ la volo de la plimulto de la slovaka popolo. La slovakaj politikistoj englitis pli kaj pli malfacilan embarason, ĉar ili devis mem decidi ĉu sendependiĝi aŭ ne. La 13an de marto Hitler klarigis al Tiso, ke li lasas tiun decidon al la slovakoj. Se Slovakio decidos sendependiĝi, li estus kontenta kaj la slovakoj povus kalkuli pri helpo de Germanio, en alia kazo Slovakio estus lasita al sia sorto, kaj la germanoj nure defendus proprajn interesojn. Ĉi tiu

klarigo enhavis nemisaŭdeblan preman minacon flanke de la germanoj, kiu sonis kiel neprononcita ultimato, kaj ŝajnas, ke la slovakoj bone komprenis ĝian esencon kaj estis bone konsilataj por eltiri la ĝustan konkludon.

La 30an de novembro Tiso ankoraŭ menciis la neceson demandi la slovakan popolon, ĉu ĝi deziras memstaran slovakan ŝtaton kun ĉiuj formoj kaj esprimoj de la sendependeco. Sed tia referendumo ne plu okazis, ĉar jam mankis tempo. Post kiam fariĝis evidente, ke Hitler deziras la sendependecon de Slovakio kaj la reprezentantoj de la hungara, ukraina kaj juda minoritatoj signalis sian apogon por ĝi, la vojo estis libera por Tiso diri la 21an de februaro en la bratislava parlamento, en kiu la nomo de Ĉeĥoslovakio ne plu estis menciita, ke „ni estas konstruantaj propran ŝtaton“.

En diplomatiaj medioj de Prago tiu deklaro de Tiso kaŭzis grandan konsternon. La ĉeĥa ĉefministro Rudolf Beran transdonis al la reprezentantoj de la slovaka registaro postulon pri la neceso deklari lojalecon kaj senprokraste eksoficigis diversajn slovakajn ministrojn (kiel Mach kaj Ďurčanský). En kunsido de la estraro de la Slovaka Popolpartio oni decidis rifuzi tiujn kaj aliajn pragajn postulojn, kaj la slovaka ministraro konfirmis sian konkludon, ke Slovakio devas disiĝi de Ĉeĥio, kvankam pri konkreta dato de la separo oni ankoraŭ ne parolis. La 10an de marto Ďurčanský sendis telegramon al Hitlero, en kiu li plendis pri la decidoj de la praga registaro. Hácha eksoficigis la slovakan ĉefministron Tiso kaj tri aliajn ministrojn de la slovaka registaro kaj sendis ĉeĥajn armeajn trupojn kaj policajn taĉmentojn al Slovakio, kie la milita stato estis proklamita kaj kelkcent slovakaj sendependistoj arestitaj. Dum Tuka mem estis arestita malgraŭ lia ministra imuneco, Ďurčanský sukcesis fuĝi al Aŭstrio, kie li alvokis siajn samlandanojn kontraŭstari la ĉeĥan agreson. La 12an de marto 1939 Arthur Seyß-Inquart, la germana reganto en Vieno, postulis de Sidor, ke li proklamu la plenan sendependecon de Slovakio. Sed Sidor rifuzis lian postulon, ĉar laŭ li nur la slovaka parlamento povis decidi tion. Tiso estis vokita al Berlino, kie oni klarigis al li, ke Slovakio estos dividita inter Pollando kaj Hungario, se la slovakoj kontraŭstaros la proklamon de la eksplicita sendependeco de sia lando. Sekve, la slovakaj parlamentanoj, kiuj (sekrete) kunvenis la 14an de marto, devis diskuti la proponon pri sendependiĝo de Slovakio, kiu finfine estis unuanime akceptita, ĉar la germana premo fariĝis tro granda. La hungaraj deputitoj sindetenis. La slovaka popolo ne estis konsultita. Ankoraŭ antaŭ ĝia proklamo, la ĉeĥa ministro pri defendo agnoskis la fakton de la slovaka sendependeco, kaj la ĉefkomandisto de la ĉeĥa okupacia armeo ordonis al siaj soldatoj respekti la decidon de la slovaka parlamento. Tiel, Ĉeĥoslovakio kolapsis almenaŭ sen sanga pafado. Ankoraŭ en marto la nova slovaka ŝtato estis de iure kaj de facto agnoskita sinsekve de Hungario, Pollando, Germanio, Italio, Svislando, Hispanio. En majo kaj junio sekvis la agnosko de Vatikano kaj Jugoslavio, poste ankaŭ de Svedio, Rumanio, Litovio, Bulgario, Sovetunio, Estonio, Latvio, Holando, Finnlando kaj Kroatio. Nur de facto Slovakio estis agnoskita de Grandbritio, Francio kaj Belgio (1939). Inter la ekstereŭropaj ŝtatoj, kiuj diplomatie rekonis Slovakion, troviĝis Japanio, Liberio, Ekvadoro, Kostariko, Manĝukuo, Ĉinio-Nankino. Vichy-Francio diplomatie agnoskis Slovakion en aprilo 1942.

Kiam prezidento Hácha alvenis en Berlino, li retroviĝis antaŭ definitive kreitaj faktoj kaj alfrontis la klopodon ĉantaĝi lin. Nome, post kiam Hitler anoncis la germanan invadon en „Rest-Ĉeĥion“ por la 15a de marto frumatene, Hácha subskribis la kontrakton kun la germana registaro pri la starigo de germana „Protektejo de Bohemio kaj Moravio“. Ankaŭ „Karpata Ukrainio“ proklamis propran ŝtatecon, sed tiu ŝtato estis baldaŭ likvidita kaj aneksita de Hungario, al kiu ĝi apartenis ĝis ĝia okupado fare de la sovetia armeo en 1945.







Disbatita Ĉeĥoslovakio en 1938/39: „Rest-Ĉeĥio“ kaj Moravio post la Munkena Interkonsento de 1938 kaj Slovakio post la Viena Interkonsento de 1938. Maldekstra mapo: 1 sudetgermanaj regionoj (al Germanio), 2 al Pollando, 3 kaj 4 al Hungario, 5 protektejo de Bohemio kaj Moravio, 6 Slovakio.







Administraj distriktoj de Slovakio kaj hungarie okupata teritorio inter 1939 kaj 1945

En la „German-Slovaka Kontrakto pri protekto“ (mallonge nomata „protekta kontrakto“) Berlino garantiis al Slovakio ties ŝtatan protekton kaj teritorian integrecon, sed la registaro en Bratislavo devigis ĝin efektivigi sian eksterlandan kaj armean politikon en „intima interkonsento kun la germana registaro“. Slovakio, kiu estis konsiderata de la germanoj kiel „interŝanĝa objekto“, devis permesi al la germanoj instali „protektan zonon“ sur sia teritorio, kio estis rekompencata per ekonomia kaj financa helpo. Tuka nomis la specifan rilaton kun la germanoj „protekta amikeco“- Ĉar Slovakio disponigis sian teritorion ankaŭ kiel elirbazo por la germana atako kontraŭ Pollando, Germanio proponis al ambaŭ landoj interŝanĝi teritorion. Tiel, Slovakaj trupoj povis okupi la regionojn ĉirkaŭ Orava kaj Javorina, kiuj estis donitaj al Pollando en pli fruaj jaroj. Slovakio do rericevis polan teritorion, kiu ampleksis 722 kvadratajn kilometrojn kaj 35´000 enloĝantojn, inter ili multajn polojn. Samtempe, la slovaka registaro permesis al polaj soldatoj fuĝi tra Slovakio al Rumanio, Hungario kaj Francio.






Orava kaj Javorina (vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Orava_(Landschaft) kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Tatranská_Javorina; la koncernaj bildoj estas pligrandigeblaj, tiel ke la toponimoj estas legeblaj.

Intertempe, en marto-aprilo 1939 eĉ okazis malgranda milito inter Slovakio kaj Hungario, kies armeo atakis la slovakan teritorion elde la okupata „Karpata Ukrainio“ sen averto. La surprizita slovaka armeo lanĉis kontraŭatakon, helpata de ĉeĥaj trupoj, kiuj tie restadis. Engaĝitaj en tiu milito estis 20´000 slovakaj kaj ĉeĥaj soldatoj kontraŭ 30´000 hungaraj soldatoj. La militajn operacojn esence plenumis precipe aviadiloj, kiuj atakis iun armean bazon en Slovakio, kie pereis 13 slovakoj. Kvankam oni interkonsentis pri armistico por la 24a de marto, la batalo estis daŭrigita ĝis la monatfino. Tiso deziris helpon de la germanoj, sed ili rifuzis ĝin. Laŭ la Budapeŝta Armistico de la 4a de aprilo Slovakio devis cedi al Hungario la teritorion ĉirkaŭ Stakčín kaj Sobrance, kio signifis, ke ĝi perdis surfacon de 1697 kvadrataj kilometroj kun 69´930 loĝantoj de 78 komunumoj. Entute, tiu konflikto kaŭzis 22 mortajn armeanojn kaj 36 mortigitajn

civilulojn kun 360 slovakaj kaj 311 ĉeĥaj militkaptitoj je la slovaka flanko, kaj 8 mortajn armeanojn, 15 mortigitajn civilulojn kaj 30 vunditojn je la hungara flanko.

La brita konsulo en Bratislavo, Peter Pares, raportis al Londono, ke en Slovakio ekestis neniu entuziasmo pri la sendependiĝo de Slovakio; eĉ la malo okazis: regis apatio kaj pesimismo. Laŭ la slovaka historiisto Milan S. Ďurica la slovaka popolo tamen ĝenerale aprobis la slovakan sendependecon. En la „Protektejo de Bohemio kaj Moravio" la germanoj starigis senkompatan subpreman reĝimon, kiu plene senrajtigis la ĉeĥojn; ĉiuspeca kontraŭstaro flanke de la ĉeĥoj estis kruele sufokata kaj venĝata, kiel montris la ekzemplo de la vilaĝoj Lidice kaj Ležáky, kiuj estis neniigitaj de la germanoj post la atenco kontraŭ protektejestro Heydrich en majo 1942 fare de ĉeĥaj rezistantoj. Slovakio dume ne estis trafita de tia teroro. La slovaka registaro ne estis sub rekta germana jugo kiel la najbara protektejo, sed ĝiaj politikaj liberecoj estis ege limigitaj, kaj la ekzistado de la slovaka ŝtato pli kaj pli dependis de la germanoj, kiuj limigis la eksteran kaj militan politikon de Slovakio kaj volis enmiksiĝi ankaŭ en ĝian internan politikon. La klarigoj de Tiso pri libereco kaj sendependeco estis nur sensencaj malplenaj frazaĵoj, kaj la slovakaj politikistoj sciis, ke ilia formale sendependa satelita aŭ marioneta ŝtato ekzistos nur tiel longe kiel ĝi utilos al Germanio, kiu misuzis Slovakion kiel modelon por montri al aliaj landoj kiel la germana hegemonio funkcias, kaj por ekonomie ekspluati ĝin.

Certe, kiel aliancano de Germanio kun komunaj interesoj kaj devoj de kunlaboro Slovakio devis montri certagradan lojalecon al la germanoj kaj la slovakaj politikistoj serĉis ilian favoron. Aliflanke, la slovakoj laboris ankaŭ laŭ propra kalkulado, havis proprajn interesojn kaj celojn kaj insistis pri siaj propraj decidliberecoj, precipe se temis pri internaj aferoj. Al germanaj provoj influi la slovakajn organizaĵojn Bratislavo negative reagis kaj obstine rifuzis ´konsilojn´ flanke de la germanoj, se tio kontraŭis slovakajn interesojn. Tiel, la slovakaj politikistoj povis montri al la propra popolo, ke ĝi mem mastras la ŝtaton sen ekstera enmiksiĝo, kun memstara ekstera politiko.

Ĉefaj politikistoj de tiu kvazaŭ-sendependa slovaka ŝtato fariĝis jam bone konataj homoj: Tiso (ĉefministro), Tuka (lia anstataŭanto), Sidor (ministro pri internaj aferoj), Ďurčanský (ministro pri eksteraj aferoj). La gvidanto de la Hlinka-gvardio, Alexander Mach, transprenis la sekretan servon kaj la propagandon. Preskaŭ ĉiuj ministroj konservis siajn oficojn ĝis la fino. La 21an de julio 1939 la parlamento donis al la ŝtato novan konstitucion, kaj la 26an de oktobro Jozef Tiso fariĝis ŝtatprezidento, Tuka ĉefministro. La politiko de tiu slovaka respubliko, kiu estis ankaŭ komparata kun la Vichy-reĝimo de Pétain, estis influita precipe de tiuj du viroj. Ambaŭ ne estis purrasaj faŝistoj, nek nacisocialistoj, same kiel tiu Slovakio en si mem ne estis faŝisma ŝtato, kiel ekzemple la sovetia historiografio facilanime asertis. La konstitucio konsistis el demokratiaj kaj respublikaj principoj, kiujn ĝi intencis kombini kun principoj de eklezia socialenciklikoj, kooperativisma ordo kaj aŭtoritatisma prezidenta sistemo, akompanate de moralismaj maksimoj kaj naciismaj prioritatoj. La prezidento estis elektita de la parlamento. Kiel dirite, praktike nur la Slovaka Popolpartio diktis la politikan tonon kadre de la multfaceta unio, kiu regadis la parlamenton, dum la libereco de alternativaj opinioj kaj kritiko de la Tiso-reĝimo estis limigita. La homaj rajtoj validis nur por slovakoj, germanoj kaj hungaroj, sed apenaŭ por judoj kaj ciganoj. La politika kulturo estis disciplinata kaj kuntenata per tio, ke la germanoj, kiuj puŝis sian influon tra ĉiuj eblaj slovakaj kanaloj, konstante minacis, ke ilia armeo invados Slovakion, se la slovakoj ne faros, kion la germanoj deziras.

Kio koncernas Tiso-n kiel ŝtatprezidenton, lia pluekzistado en tiu ofico estis dankata nur al la cirkonstanco, ke li estis tre populara, karisma figuro, kvazaŭ speco de vivanta sanktulo, kaj garantianto de la paco. Ĉar Tiso estis malpli radikala politikisto ol Tuka aŭ Mach, li estis akceptebla por vastaj tavoloj, kiuj subtenis lin. Do, lia forigo estus povinta kaŭzi superfluajn tumultojn kaj novajn problemojn en la lando, kiujn oni nepre volis eviti. Pro tio, Tiso povis resti prezidento, estante la plej malgranda problemo. Laŭ L´ubomir Lipták, Tiso estis lerta taktikisto, sed malbona strategiisto. Kvankam liaj publikaj paroladoj, kiujn li faris precipe en la provinco, altiris la publikon, ilia aŭtentikeco ne estas ĉiam pruvita kaj dokumentita, kaj ili entenis kuriozaĵojn kaj strangaĵojn, kiuj mirigis kaj konfuzis eĉ ekleziajn mediojn. Kiel Tiso klarigis post la milito, li volis mem demisii kiel prezidento post la renkontigo kun Ribbentrop, kiu senskrupule enmiksiĝis en la internan politikon de Slovakio per krudaj minacoj, sed li restis pro la peto de lia frakcio, de la popolo - kaj de la judoj.

Fine menciindas ankoraŭfoje ***Frank Karmasin*** (1901-70), etna germano kun ĉeĥa patro, kiun Tiso en oktobro 1938 nomumis ŝtatsekretario por la aferoj de la germana popolgrupo en la aŭtonoma slovaka registaro. Li estis kvazaŭ kooptita al la slovaka registaro kaj akiris konsiderindan influon en la poli-

tiko de Slovakio. En marto 1940 li estis elektita kiel „Gvidanto“ de la germana popolgrupo en Slovakio. Laŭ SS-rangoj li estis Brigadeführer (1941), Hauptsturmführer (1943) kaj Sturmbannführer (1944).




Supre: Slovaka mono 1939-45 kun la bildo de Andrej Hlinka.
Sube: Tiso, Štefánik kaj Hlinka sur slovakiaj poŝtmarkoj (plej dekstre poŝtmarko el la eŭro-tempo)




La 24an de novembro 1940 Slovakio aliĝis al la t.n. Antikomintern-Pakto de Germanio, Italio kaj Japanio. En la milito kontraŭ Sovetunio Slovakio partoprenis flanke de Germanio ankaŭ kun la espero, ke Slovakio ricevos post sukcesa milito, kiel danko pro la lojaleco, teritorion, kiu estis perdita al Hungario. La 22an de junio 1941 Slovakio rompis la rilatojn kun Moskvo kaj disponigis al la germana armeo tri diviziojn kun 50´689 soldatoj. Sed tiu militiro ne estis subtenata de la slovaka popolo. En Kaŭkazo slovakaj soldatoj amase dizertis, tiel ke la germana armeo utiligis la slovakajn soldatojn nur por okupaciaj taskoj kaj por la batalo kontraŭ partizanoj. La dizertintaj slovakoj formis la bazon de la 1a Ĉeĥoslovaka Armeo, kiu estis starigita de kolonelo Ludvík Svoboda en Sovetunio. Sekvis slovakaj militproklamoj kontraŭ aliaj ŝtatoj kiel Usono kaj Grandbritio.

## La slovaka pekokazo: „Fina solvo“ de la „juda demando“ en Slovakio (1938-45)

Dum la regado de T.G. Masaryk kaj E. Beneš en Ĉeĥoslovakio ne ekzistis konsiderinda politike motivita antisemitismo. La agado de malgrandaj grupoj kiel la kontraŭjuda kaj antikomunisma „Partio de la kristanaj kamparanoj kaj laboristoj“, kiu estis fondita de Josef Hamšik en 1936, aŭ unuopaj kontraŭjudaj esprimoj en la gazetaro de la partio de la agrikulturista partio, aŭ, kiel ni ankoraŭ vidos, en la Slovaka Popolpartio, restis dume sen efiko, kvankam en preskaŭ tuta Eŭropo la antisemitisma propagando fortiĝis post la akaparo de la povo fare de la partio de Adolf Hitler en Germanio.

Kvankam en Slovakio judoj vivis jam delonge, ilia amaso formiĝis precipe dum la 19a jarcento. Unuavice temis pri judoj, kiuj venis kiel migrantoj el la regionoj de Pollando, kiuj estis okupataj de Aŭstrujo kaj Rusujo. La ĉeĥoslovaka konstitucio de 1920 agnoskis la judojn kiel naciecon (t.e. ĉiuj loĝantoj de Ĉeĥoslovakio estis egalrajtaj antaŭ la leĝo kaj ĝuis la samajn rajtojn sendepende de raso, lingvo kaj religio). En 1921 en Slovakio oni nombris 135´918 kaj en 1930 136´737 homojn kun juda religio. Sed nur 70-73´000 personoj apartenigis sin al la *etna* juda popolgrupo, ĉar multaj germanlingvaj judoj indikis germanan naciecon, dum multaj aliaj judoj deklaris sin slovakoj, ĉeĥoj aŭ hungaroj, kaj ceteraj estis du- aŭ trilingvaj. Pro la cedo de slovakia teritorio al Hungario en novembro 1938 kaj pro la amasa elmigrado de judoj post la Munkena Interkonsento, tiu nombro konsiderinde reduktiĝis. Al Hungario

Slovakio perdis 40-46´000 judojn. Je la komenco de la deportadoj en 1941 restis en Slovakio ĉ. 89´000 judoj, de kiuj 2861 estis baptitaj.

Sendube, antisemitismo aŭ kontraŭjudismo estis disvastigata ankaŭ en Slovakio precipe inter la etburĝaro kaj konservema katolika kamparanaro, kiu timis ekonomian konkurencon, malgraŭ malgranda parto de judoj de nur 3,35 procentoj, kiuj tamen ludis signifan rolon en la ekonomio. Kiel en aliaj landoj ankaŭ en Slovakio la parto de judoj, kiuj laboris en la ekonomio kaj havis liberajn profesiojn, estis proporcie pli granda rilate al ilia malgranda grupnombro, kompare kun aliaj etnoj; la plimultaj judoj apartenis al la urba meza klaso. Ekzistis la opinio, ke la judoj estis la gajnintoj de la moderniga procezo, dum la stagnantaj kamparanoj kredis, ke ili estas ekspluatataj de la judoj. Ĉi tiu fatala antaŭjuĝo, kiu estus flegata en kombino kun religiaj kaj ekonomiaj konsideroj, kulminis en la konvinko inter nejudoj, ke la judoj akaparis grandparton de la nacia posedaĵo de Slovakio kaj okupas la plimulton de ekonomie kaj socie gravaj postenoj, ekzemple juristoj kaj kuracistoj. Tiu konvinko estis prilaborata de la radikala alo de la Slovaka Popolpartio, kiu propagandis kontraŭkapitalismon, kiel tion praktiks ankaŭ la germanaj NS-propagandistoj.

Laŭ Ladislav Lipscher, judoj do estis malfacile integreblaj en la slovakan nacian tuton, ĉar mankis la kondiĉoj por la kultura aŭ nacia slovaka asimilado. Fakte, la judoj en Slovakio estis ekskluditaj el la formado de la slovaka nacio jam antaŭ 1914. La rilatoj inter slovakaj naciistoj kaj judoj estis streĉataj jam de longe. La Slovaka Popolpartio riproĉis al la judoj, ke ili perfidis la slovakan popolon en kompliceco kun la hungaroj, poste kun la ĉeĥoj. Al tio aldonigis la suspekto pri bolŝevisma kaj komunisma prefero ĉe la judoj. *Ivan Dérer*, gvida slovaka socialdemokrato kaj ministro en pluraj ĉeĥoslovakaj registaroj, en 1934 tamen defendis la judojn kontraŭ tiu riproĉo.

Kiel diversaj postvivantoj de la holokaŭsto en Slovakio klarigis, ĝis la nazia tempo la kunvivado de slovakoj kaj judoj estis, malgraŭ la menciitaj tensioj, sufiĉe paca kaj ke Bratislavo estis modela multkultura urbo, en kiu ankaŭ la judoj sentis sin bone. Nur en la dua duono de la 1930aj jaroj la etoso radikale ŝanĝiĝis, kaj iamaj personaj amikoj subite fariĝis malamikoj. La judoj ne estis preparitaj al tiu nova situacio, pri kiu respondecis la Slovaka Popolpartio, kiu sukcesis aktivigi malnovajn kontraŭjudajn stereotipojn en la slovaka popolo en tempo, kiam parto de Eŭropo estis radikaligita de kontraŭjudaj politikaj fortoj kaj emocioj, precipe en nacisocialisma Germanio. Plej malfrue en la 30aj jaroj en la Popolpartio ekzistis la opinio, ke Slovakio havas „judan demandon", kiu estas solvenda. En la gazeto *Slovako* oni povis legi, ke en Slovakio ne ekzistas loko por judoj: En marto 1937 Karol Sidor postulis en la ekster-afera komisiono de la ĉeĥoslovaka parlamento la forigon de la judoj, kiujn li misfamigis kiel komunistojn, el Slovakio kaj sendi ilin al Birobiĝano, kaj Ferdinand Ďurčanský opiniis, ke pro rasaj kaŭzoj judoj estas fremda elemento kaj ne taŭgas por integriĝo en la slovaka popolo, kvankam en sia ideologia manifesto pri la ekzistorajto de la malgrandaj ŝtatoj (1944) li ankoraŭ skribis, ke ankaŭ judoj havas lokon en la kristana regno. Tiu hipotezo pri la fremdeco de la judoj, kiu estis publike prononcita kaj pli kaj pli trovis akcepton, certe estis tre danĝera kaj preparis la fatalan sekvon, tiel ke la kontraŭjudaj sinteno kaj propagando fariĝis modaj kaj oficialaj tendencoj en la Slovaka Popolpartio. Komence de 1939 Sidor jam postulis adekvatajn leĝojn por solvi la „judan demandon". Mach, estro de la slovaka propagando, promesis en februaro 1939 dum parolado en Rišnovce, ke Slovakio forbalaos la judojn, kiujn li karakterizis kiel parazitojn kaj ŝtelistojn.

Fakte, jam plurajn jarojn antaŭ ol tiuj eldiroj estis faritaj, multaj judoj konkludis, ke estus pli bone forlasi Ĉeĥoslovakion: Tiel, inter 1932 kaj 1936 3215 judoj forlasis la landon. Aliaj judoj, kiuj formis la Judan Partion, certigis sian lojalecon al la slovaka ŝtato. Post la malfondo de la Juda Partio estis starigita „Centra juda oficejo por la lando Slovakio", kiu eĉ ricevis oficialan permeson. Tamen, kiel oni povas imagi, ankaŭ ĉi tiu nova instanco, kiu komprenis sin tegmenta organizaĵo de la judoj en Slovakio, baldaŭ ricevis problemojn. Anstataŭ tio la reĝimo kreis „Judan centralon", kiu fariĝis la sola organizaĵo en Slovakio, kiu rajtis reprezenti la interesojn de la judoj. Ĉiuj aliaj judaj organizaĵoj estis malfonditaj. Cionismaj organizaĵoj klopodis aranĝi elmigradon de judoj al Palestino, kune kun ilia mono. La slovakaj aŭtoritatoj subtenis la elmigradon de judoj al Palestino. Sed la germanoj planis ekspedi la judojn al Madagaskaro (plano, kiu nature ne efektiviĝis). Ĝenerale, la judoj esperis, ke la germanoj baldaŭ povos esti venkitaj kaj perdos la militon.

La starigo de la „Aŭtonoma Lando Slovakio" kun ties unupartia regado de HSL´S en aŭtuno 1938 signifis, ke ne nur la demokratio estis abolita, sed ankaŭ la unuan ondon de la diskriminacio de certaj popolgrupoj, precipe judoj. La HSL´S-gazetaro imputis al la judoj, ke ili subtenis la separon de slovakia teritorio favore al Hungario kaj ke ili preferas aparteni al la hungara nacio. La slovakia registaro

volis eviti, ke judoj retranslokiĝu de tiuj novaj hungaraj teritorioj al la slovakia flanko, kaj forpelis judojn el la interno de Slovakio. La 12an de oktobro 1938 gvidaj slovakiaj politikistoj (Ďurčanský, Mach kaj Karmasin) renkontiĝis kun Hermann Göring kaj interkonsentis „solvi la judan demandon en Slovakio laŭ la germana modelo“. Tiuj politikistoj vidis alproksimiĝi la realiĝon de sia revo pri propra ŝtato, kiu apartenu nur al la slovakoj kaj en kiu aliaj etnoj ne havu lokon. Post la Viena Verdikto de la 2a de novembro 1938 en Bratislavo eksplodis tumultoj, dum kiuj fenestroj de judaj loĝejoj kaj vendejoj estis frakasitaj kaj kontraŭjudaj sloganoj vokitaj. Simila eksceso okazis poste en Trnava, kie oni lezis sinagogon. Tiso subskribis ordonon por evakui malriĉajn judojn al iu speciala zono 20 kilometrojn antaŭ la nova limo, kie ili devis restadi en malfacilaj kondiĉoj, ĉar ankaŭ Hungario ne volis havi ilin. Tie aperis tendaroj en la vilagoj Vel´ký Kýr kun 344 kaj en Miloslavov kun 302 personoj, de kiuj granda parto estis infanoj. La operaco, kiu trafis precipe judojn en Bratislavo (4000 deportitoj), Michalovce (292), Kežmarok (237), Poprad (228), Nitra (205) kaj Prešov (197), kaj en kiu partoprenis ankaŭ la fifama „Hlinka-gvardio en eksterlando“ (kun sidejo en Vieno), kiu speciale furoris kontraŭ la judoj en Nitra, finfine fiaskis. La 7an de novembro Tiso sentis sin devigita ordoni la haltigon de la operaco, sed ĝi jam alprenis propran dinamikon kaj estis malfacile kontrolebla. La operaco kaŭzis grandan bruon enlande kaj eksterlande, kie la gazetaro, esence *United Press, Deutsche Allgemeine Zeitung, Frankfurter Zeitung, Neue Zürcher Zeitung* kaj *Pester Lloyd,* sed eĉ ankaŭ naziaj organoj kiel *Völkischer Beobachter* kaj *Der Führer* raportis pri la skandala evento, tiel ke la eŭropa publiko estis informita. Krom tio, judaj organizaĵoj insistis peti Tiso-n haltigi la deportadon. La 8an de decembro la slovakiaj instancoj finfine permesis la revenon de slovakiaj judoj al iliaj originaj loĝlokoj, sed judoj kun neslovakia civitaneco devis esti transprenitaj de la koncernaj ŝtatoj. Dum la tendaroj ĉe la slovaka-hungara limo estis iom post iom likviditaj, multaj judoj retroviĝis en aliaj tendaroj, kiuj estis destinitaj por ili, ekzemple en Nitra, Zlaté Moravec kaj en la bratislava urboparto Patrónka (kie oni planis judan geton). Parto de tiuj judoj decidis elmigri el Slovakio.

Laŭ Nižňanský, kiu esploris la detalojn de la forpelado de judoj en novembro 1938 el Slovakio (1998), per sia ordono Tiso, kiu funkciis kiel ĉefministro kaj ministro pri internaj aferoj, ne nur transpaŝis siajn kompetencojn sed ankaŭ transprenis la plenan respondecon pri la sekvoj de tiu ordono, kiun li pravigis per la „por-hungariaj demonstracioj“ de la slovakiaj judoj kaj kiun li en principo ne estis rajtigita subskribi. Temis pri persona decido de Tiso, per kiu li agis kontraŭ la ĉeĥoslovaka konstitucio, kiu tiam ankoraŭ validis. Se Tiso estus estinta arestita, akuzita kaj kondamnita en ŝtato kun normala jura praktiko, oni certe estus severe puninta lin pro tiuj krimoj.

Ĉar multaj judoj laboris en la arbara branĉo, – 76-80% de judoj laboris en la ligna komerco –, estis fondita nova nejuda asocio por konkurenci la judan komercon. Rezolucio de la ĝenerala kunveno de la Asocio de slovakaj medicinaj studentoj postulis la enkondukon de limigo por judaj studentoj (numerus clausus). La demandon, kial judoj ne estas reprezentataj en la slovaka parlamento, Tiso respondis, ke ili ne petis reprezentadon (sed li forgesis aldoni, ke judoj ne ricevis eblecon kandidatiĝi!). En januaro 1939 estis fondita speciala komisiono por solvi la „judan demandon“, nomata ankaŭ „juda komitato“, kiu estis prezidata de K. Sidor kaj al kiu apartenis F. Ďurčanský, *Pavol Teplanský* (ministro pri ekonomio) kaj J. Virsík. Kun tiu komitato, kiu ekzistis nur ĝis la ŝtata sendependiĝo de Slovakio, kunlaboris la slovaka parlamentano ***Karol Mederly***, gvida HSL´S-ano, juristo kaj reprezentanto de la politika katolikismo. La 5an de marto li submetis al ĝi sian malneton pri speciala „juda leĝo“. La leĝo antaŭvidis difinon, kiu konsideru diversajn limigojn por judoj, ekzemple rilate la praktikadon de profesioj kiel edukistoj, instruistoj, redaktoroj, ricevon de loĝejo, allason al la universitata studo, validecon de pasporto, stiradon de veturilo, aliron al publikaj lokoj kaj ĝeneralajn moveblecojn, malfondon de judaj partioj kaj organizaĵoj. Kiel judoj estis konsiderataj homoj, kiuj apartenis al la hebrea religio je la 6a de oktobro 1938. Judoj, kiuj estis baptitaj post tiu dato, povis esti konsiderataj kiel nejudoj nur ene de tri jaroj kaj post esploro kaj decido fare de speciala komisiono. La ideon batali kontraŭ la judoj sur la stratoj Mederly trovis nebona, sed li preferis integri la judojn en la ekonomion tiel, ke ili povu servi al la slovakoj same kiel en pli fruaj tempoj la slovakoj servis al aliaj (sic). Fakte, multaj el la proponoj de Mederly estis poste efektivigitaj post la deklaro pri ŝtata sendependeco de la 14a de marto 1939 (Slovenská republika). Tiel, la judoj pli kaj pli perdis sian monon kaj sian posedaĵon kaj malriĉiĝis, kio estis la celo de la politiko. Kiam la deportadoj komenciĝis, la judoj apenaŭ plu disponigis rimedojn por subaĉeti koruptajn oficistojn por eviti sian tragikan sorton.

Kiel pastro de la romkatolika eklezio Tiso probable ne apartenis al la plej radikalaj (rasaj) antisemitoj, sed certe li ankaŭ ne estis libera de la tradicia malamikeco kontraŭ la judoj, kies influon en

Slovakio li volis redukti. Tiso ofte kaj abunde palavris pri kristanaj valoroj, pri la rajto je vivado, pri etikaj celoj kaj naturaj leĝoj. Sed tiuj leĝoj evidente ne validis por judoj. En sia radioparolado okaze de la 15a de marto 1939 post la proklamo de la sendependeco de Slovakio, en kiu li skizis la ĉefajn taskojn de la nova ŝtato, Tiso aludis ankaŭ la „judan demandon“, dirante: „Kion ni devos forigi, tion ni forigos, sed ne per malamo, pasio kaj krudeco, sed laŭ kristana maniero.“ La gazeto *Slovako* citis lin per la vortoj, ke estus dezirinde, ke la „juda demando estus solvita juste, sociale kaj homece en Slovakio“. Povas esti, ke Tiso efektive ne deziris, ke la judoj estu mortigitaj en naziaj koncentrejoj, sed, aliflanke, tiaj frazaĵoj faris la ambivalentan sintenon de Tiso koncerne la judojn tute evidenta kaj certe malfortigis la heziton de la respondecaj politikistoj agi kontraŭ la judoj. Neniu politikisto en Slovakio povis klarigi, kion signifu justa, sociala kaj homeca solvo de la juda demando.

Malgraŭ duboj kaj hezitoj flanke de la slovaka registaro, konkretaj diskriminaciaj agoj kontraŭ la judoj baldaŭ sekvis. Unua tia dekreto de la 18a de aprilo 1939 limigis la procentaĵon de judoj en la liberaj profesioj kaj publikaj servoj al 4%. En la rilatoj kun la judoj por la slovakaj politikistoj ideologio ludis malpli gravan rolon ol ekonomiaj konsideroj. Sed la forpuŝado de la judoj el la ekonomia vivo de Slovakio devis havi fatalajn sekvojn, ĉar la lando ege dependis de judaj fakuloj kaj profesiuloj.

En januaro 1940 Tiso postulis rapidan solvon de la „juda(j) demando(j)“ kaj admonis la burokrataron ne malhelpi tiun planon. En sekva dekreto de la 22a de februaro 1940 al judoj estis malpermesate posedi agrikulture utiligeblan grundon. La 24an de aprilo 1940 la slovaka registaro ordonis senjudigi judajn firmaojn. Sekve al tiu ordono 2100 komercaj entreprenoj, 10´000 vendejoj, restoracioj kaj oficejoj kaj 44´000 hektaroj ŝanĝis sian posedanton. Juda posedaĵo estis malmultekoste vendita de la slovakaj instancoj aŭ senpage distribuata al nejudaj slovakoj ĉefe kun la celo rikolti la favoron kaj apogon de la popolo. Sed ŝajnas, ke la plimulto de la juda posedaĵo ne estis publike distribuata, sed precipe ĝi estis retenata de la ŝtato por financi la propran mastrumon kaj por kovri la kostojn de la milito. Por efektivigi la kontraŭjudan politikon en la ekonomio estis fondita la „Centra Ekonomia Oficejo“ (Ústredný Hospodarský Úrad (ÚHÚ), kiu estis submetita al la oficejo de la ĉefministro. La taskoj de tiu instanco, kiu estis gvidata de *Augustin Morávek,* lojalulo de Tuka, estis forigi la judojn el la ekonomio kaj senjudigi („arjigi“) la judan posedaĵon. Per „arjigo“ fine de 1941 9935 judaj entreprenoj povis esti likviditaj. La rikoltita mono fariĝis parto de la slovaka kapitalo. Grandaj sumoj estis akaparitaj fare de malnovaj slovakaj grandkapitalistoj. La judaj terposedaĵoj transiris en 1942 al la slovaka „Fonduso por la administrado de la agrikultura posedaĵo“. Tuka opiniis, ke la tero devus aparteni al tiuj, kiuj vere prilaboras ĝin. 50% de la juda havaĵo, kiu estis deponita en bankoj, devis esti transdonita al tiu fonduso. La tuta registrita juda domposedaĵo havis suman valoron de 1 mrd. 250 mln. 697 mil kronoj, kio egalis al 29% de la tuta domposedaĵo de Slovakio (1 RM egalis al 11,62 kronoj). La „kapitalposedaĵo“ de la judoj estis indikita per la sumo de 1 mrd. 459 mln. kronoj, kio okupis la unuan rangon.

En majo 1941 la slovaka registaro deklaris sin preta disponigi al Germanio 120´000 devigitajn laboristojn el Slovakio, sed ŝajnas, ke tiu ´propono´ ne estis tuj efektivigita, kvankam la germanoj postulis sendi aldonajn 20´000 laboristojn, kiuj devis konstrui „novajn judajn loĝzonojn“. La slovakoj konsentis kaj postulis de la germanoj, ke ili deportadu la tutan judan komunumon, ĉar la slovakoj ne deziris konservi „malproduktivajn“ judojn en sia lando.

En septembro 1941 estis fondita alia instanco: Ústredňa Židov (UŽ), kiu estis submetita al ÚHÚ kaj havis la taskon pludoni la ordonojn de la slovaka registaro al la judoj, transformi la judojn al laboristoj kaj okupiĝi pri judaj lernejoj kaj organizaĵoj. UŽ havis sian sidejon en Bratislavo kaj filiojn en Trnava, Žilina kaj Nitra.

Tiel aperis en Slovakio pli kaj pli granda ĝangalo de kontraŭjudaj leĝoj, kies reguligoj parte kontraŭdiris unu la aliajn. La 9an de septembro 1941 aldoniĝis alia grava leĝo (n-ro 198), kiu fariĝis konata kiel ***„Juda Kodo“*** (sk. Židovský Kodex). kaj enkondukis la rasismajn principojn laŭ la modelo de la Nurembergaj Leĝoj, kvankam la slovaka versio eble estis pli mola (t.e. malpli rasisma) ol la germana, ĉar krom la rasa ĝi atentis ankaŭ la religian vidpunkton. Tiu leĝo, kiu estis nek diskutata en la parlamento, nek portis la subskribon de Tiso, reguligis en 270 paragrafoj rajtojn kaj devojn de la judoj. Inter alie ili ne plu rajtis publike kolektiĝi kaj libere moviĝi, kaj al nejudoj estis malpermesite geedziĝi kun judoj (kvankam laŭ alia intepreto miksitaj geedziĝoj ne estis malpermesitaj). „Miksitaj“ judoj tamen estis konsiderataj kiel nejudoj, do ili ne rajtis esti persekutataj kaj devis esti protektataj (kio tute ne plaĉis al la nazioj). Sed kiel ĉe la analoga germana leĝo oni distingis unua- kaj duagrade miksitajn judojn. Judoj ankaŭ ne plu rajtis troviĝi sur certaj publikaj placoj, ili devis esti aparte signitaj kaj porti brakbendon kun la davida stelo, judaj loĝejoj devis esti rekoneblaj per la davida stelo, ktp. Judoj ne plu rajtis loĝi en domoj,

kiuj troviĝis ĉe stratoj nomitaj laŭ Hitler kaj Hlinka. Ofte tiuj stratoj situis en la urbocentro, kie ekzistis belaj kaj luksaj domoj, kiuj estis reokupataj de apogantoj de la reĝimo. La ŝtatestro (Tiso) rajtis fari esceptojn. Judoj, kiuj povis ricevi protekton de la ŝtato, estis judoj vivantaj en miksitaj geedziĝoj kaj „ekonomie gravaj judoj“.

Al la enkonduko de tiu „Juda Kodo“ la slovaka publiko ne reagis, nek pozitive, nek negative, do restis indiferenta. Dum la germanaj nazioj estis kontentaj pri la adopto de la „Juda Kodo“ en Slovakio, la eklezio esprimis sian proteston kontraŭ ĝi, precipe se ĝi tuŝis la interesojn de katolikoj (pli detale vd. pli sube).

La leĝo de la 15a de marto 1942 ordonis forpeli 15´000 judojn el Bratislavo. 6700 judoj estis translokitaj al Trnava kaj orientaj regionoj de Slovakio. Kaj en majo 1942 la slovakaj registaro kaj parlamento adoptis leĝojn, kiuj konfirmis la legitimecon de la deportadoj de la judoj kaj permesis ellandigi ilin el Slovakio. Neniu parlamentano voĉdonis kontraŭ; dum iuj sindetenis, aliaj aprobis tiujn leĝojn.




Maldekstre: Tabulo kun la surskribo (en slovaka, germana kaj hungara lingvoj): „Nejuda vendejo“. Dekstre: Judoj kun la davida stelo.

Por puŝi la kontraŭjudajn leĝojn, Slovakion vizitis diversaj nazioj el Berlino kiel Adolf Eichmann, Dieter Wisliceny, Wilhelm Frick, Hans Globke kaj Reinhard Heydrich. Eichmann havis la permeson de la germana ministerio de la internaj aferoj inkluzivi la slovakajn judojn en la deportadojn al Pollando. Kiel konate, Eichmann partoprenis en konferenco de la nazia burokrataro, kiu sekrete okazis sub la gvido de Heydrich la 20an de januaro 1942 en Wannsee apud Berlino kaj havis la celon diskuti la tempoplanon por la „fina solvo de la juda demando“, difini la ´celpublikon´ de la holokaŭsto kaj interkonsenti pri la kunlaboro de diversaj germanaj ministerioj kaj naziaj instancoj en la teritorioj, kiuj estis okupataj de Germanio. En la listo de landoj, kiu estis prezentita dum la konferenco, la nombro de judoj en Slovakio estis indikita per 88´000.



Germanaj nazioj respondecaj por Slovakio: Adolf Eichmann, Dieter Wisliceny, Hanns Ludin, Wilhelm Frick, Hans Globke kaj Reinhard Heydrich, Josef Witiska, Hermann Höfle, Arthur Seyß-Inquart

*Koncentrejoj:* Por devigitaj kaj deportotaj judaj laboristoj estis konstruitaj specialaj laborlagroj en ***Nováky, Sered´*** kaj ***Vyhne*** en okcidenta Slovakio kaj en ***Záhor*** en orienta Slovakio, kiuj estis instalitaj kaj funkciigitaj en 1940-42 kaj servis krom al ekonomiaj celoj ankaŭ kiel kolektejoj por koncentradi

judojn, kiuj estis destinitaj por la deportado al la neniigejoj en Pollando (ĉefe Aŭŝvico kaj Majdanek), Germanio (Sachsenhausen) kaj Ĉeĥio (Terezín). Al Vyhne estis retransportitaj en februaro 1940 judoj, kiuj postvivis la „operacon Nisko“ en Pollando. Laŭ atestantoj la reĝimo en Sered´ estis pli severa kaj brutala ol en Nováky. Aliaj tiaj kolektejoj troviĝis en Žilina kaj Poprad. En ***Ilava*** ekzistis terura malliberejo, kiu servis al la Tiso-ŝtato por malaperigi kontraŭulojn. Ankaŭ la nazioj utiligis ĝin. La koncentrejoj estis kontrolataj de la fifama Hlinka-gvardio, de kiu kelkaj taĉmentoj estis reorganizitaj laŭ la modelo de la germana SS aŭ eĉ integritaj en ĝin. En tiuj tendaroj la malliberuloj produktis metiajn varojn, kies vendado alportis sufiĉe grandan profiton. Ĉirkaŭ 40´000 homoj iris tra tiuj koncentrejoj, de kiuj (almenaŭ?) 120 rekte mortis en ili mem. Ĉar tiuj lagroj estis submetitaj al la ministerio de la defendo, kiu volis konservi la laboristojn ĝis la plej lasta transporto al Pollando, pri kiu devis okupiĝi la ministerio de la internaj aferoj, okazis groteskaj konfliktoj de kompetenco, kiuj estis tipaj ankaŭ por la nazia burokratio. Tiuj lagroj estis malfonditaj en majo 1943, kiam transportoj de judoj jam ne plu forlasis Slovakion.




Barakoj de la koncentrejo en Sered´





Supre: Judoj kun nazioj en slovakia koncentrejo. Dekstre: Labor-koncentrejo en Nováky.
Sube: 6a Slovaka Brigado de judoj en Svätý Peter, julio 1940. Dekstre: Judoj laboras en Vyhne (el la fotogalerio de Jad Vaŝem).




Por judoj, kiuj surbaze de la leĝo de la 31a de januaro 1940 estis eligitaj el la slovakia armeo kune kun ciganoj kaj ´nenormalaj elementoj´, estis formita la ***6a Slovaka Brigado*** (kun ĉirkaŭ 1000 anoj), kiu devis helpi, sub mizeraj kondiĉoj kaj laŭ armeeca maniero kiel malmultekostaj laborfortoj sen sociala protekto en la konstruado de la publika infrastrukturo en Slovakio kaj Pollando, ekzemple en senakvigaj projektoj en okcidenta Slovakio (Svätý Jur, Lab kaj Zohor). Generalo ***Ferdinand Čatloš***, slovakia ministro pri defendo, cetere la sola evangelia reprezentanto en la registaro kaj strikta lojalulo de Tiso, rifuzis deportadi tiujn brigadanojn al Pollando. Kiam la brigado estis malfondita en majo 1943, ĝiaj anoj estis translokitaj al diversaj laborlagroj aŭ transdonitaj al civilaj labortrupoj.

*Preparado kaj efektivigo de la deportadoj:* Kio okazis ĵus antaŭ la deportado de la unua parto de judoj al Pollando? Por kompreni la embarasan situacion de la slovakoj, necesas aldoni kelkajn klarigojn pri la kontraŭdiroj en la strukturo de decidoj ene de la ŝtataj organoj de Slovakio. El tio oni povos vidi, kiuj slovakaj instancoj kaj politikistoj akcelis la deportadon kaj kiuj hezitis pri ĝi.

Intertempe, la „juda demando“ perdis sian ekonomian aŭ politikan signifon kaj fariĝis socia problemo, kiun la slovakaj politikistoj volis malhavi kiel eble plej baldaŭ. Do, la ekonomie prirabita juda popolo nur senutile ŝarĝis la civilan administracion. La problemo povis esti solvita sole per deportado de la judoj. La iniciaton prenis germana RSHA, kiu demandis la registaron en Bratislavo, ĉu Slovakio pretas kaj konsentas efektivigi la deportadon de siaj judoj al Pollando. La 2an de decembro 1941 Bratislavo konsentis sendi la judojn al *getoj en la „oriento“ por laboro.* En tio Germanio baziĝis je du kontraktoj kun Slovakio el la jaroj 1939 kaj 1941, kiuj antaŭvidis la disponigon de slovakaj laborfortoj al Germanio. Berlino postulis plialtigi la nombron de tiaj laborfortoj, sed la registaro en Bratislavo respondis, ke ĝi ne kapablas plenumi la peton. Anstataŭ tio, *Isidor Koso,* ĉefa funkciulo de la registara administracio kaj de la ministerio de la internaj aferoj en Bratislavo, ofertis al la germanoj 20´000 judojn. La germanoj konsentis transpreni tiujn judojn kiel laborfortojn. Sed Eichmann klarigis al Wisliceny, ke laŭ ordono de Himmler tiuj judoj ne estu disponigitaj al la germana laborministerio, sed estu senditaj al fermitaj entreprenoj kaj koncentrejoj, kiuj estas gvidataj de RSHA. La slovakoj estis kontentaj pri tiu respondo kaj opiniis, ke por ili la „juda demando“ estas solvita. Tuka volis trakti la proponon en la konsilio de ministroj por ricevi ilian konfirmon, kaj la germana ambasado en Bratislavo sciigis Berlinon, ke la slovakoj entuziasmas pri tiu aranĝo, kiu devus esti ligita kun la ekscivitanigo de la judoj, kiuj forlasos Slovakion. La ministro pri internaj aferoj verkis raporton pri la planita deportado de la judoj, pri kiu la registaro estis informita. Laŭ la protokolo de la kunsido de la Ŝtata Konsilio de la 6a de marto 1942 Tuka raportis pri la intencita deportado de slovakaj judoj al *Ukrainio,* kio estus ligita kun anticipa pago de po 500 markoj por ĉiu deportita judo al la germanoj, por rekompenci la „kostojn por la profesia kaj lerneja klerigo“, kiujn la judoj „ricevos“ (la slovakoj konsentis pagi 3,6 milionojn da markoj kontraŭ la promeso, ke la germanoj ne resendos la judojn al Slovakio kaj ne postulos de la slovakaj judoj novajn pagojn). Cetere montriĝis, ke la slovakoj ne kapablis pagi la tutan sumon, kiun ili ŝuldis al la germanoj, ĉar tiu sumo superis ilian kapaciton (temis pri preskaŭ 335 mln. kronoj por 57´628 judoj, kio egalis al 28´814 mln. RM), tiel ke la slovaka financministerio finfine ĝiris al Germanio nur 100 mln. kronojn. Oni interkonsentis, ke la deportado komenciĝu en marto kaj estu finita en aŭgusto. Sivák, slovaka ministro pri lernejoj kaj klerigo, diris poste kiel akuzito dum la proceso kontraŭ li, ke en tiu situacio la germanoj premis la slovakojn „solvi la judan demandon“, alikaze ili farus ĝin mem. Reprezentantoj de la slovaka industrio kaj la estro de la nacia banko avertis, ke la slovaka ekonomio suferos grandan damaĝon pro la deportado de la judoj. Dum la koncerna kunsido de la slovaka registaro oni ne trovis definitivan solvon kaj decidis ŝovi la aferon al la ministro pri ekonomio, al la ministro pri internaj aferoj (Mach) kaj al ŝtatestro Tiso mem por klarigi al la germanoj la dubojn pri la taŭgeco de la plano, t.e. la deportado de la judoj, ĉar ili mankos en la ekonomio. Mach respondis, ke li ne povas konsenti pri la hezito, ĉar Germanio postulis tiun kvanton de judoj kiel laborfortojn. Kiam ***Martin Sokol***, prezidanto de la slovaka parlamento, eksciis pri tiu plano, li kontaktis Tiso-n por proponi kunsidon de la prezidio de la Popolpartio, ĉar temis pri eksterordinare grava afero, kaj alvokis solvi la demandon laŭ la „kristana moralo“.

Kvankam ĝis nun neniu registara aŭ parlamenta decido estis prenita, la slovaka ministerio de la internaj aferoj komencis preparadi la deportadon. Ĉiu judo, unue la viroj kaj poste la virinoj, devis registriĝi ĉe la polico en Bratislavo. Post tio la ministerio de la internaj aferoj ankoraŭ pli limigis la liberecon kaj rajtojn de la judoj kaj malbonigis ilian materian situacion. En dua fazo estis organizita la transportado de la judoj al koncentraj centroj, kio ne povis okazi sen la efika kunlaboro de la fervojo. La

transportoj de la judoj estis traktataj prioritate kiel armeaj transportoj. La tuta operaco, nomata „operaco da“ (davido) okazis per nekutima rapideco kaj neimagebla ekzakteco.

La 23an de marto komenciĝis senkompata ĉasado de judoj en Bratislavo kaj aliaj slovakaj urboj. La polico, kiu devis plenumi la arestadon de la judoj, estis apogata de la Hlinka-gvardio. La judoj estis pelataj en la koncentrejon de Sered´. Ĉe la alveno en la koncentrejoj, kiuj en principo funkciis same kiel tiuj en la Regno, la judoj estis mistraktataj, esplorataj kaj priŝtelataj de sovaĝaj Hlinka-gvardianoj, kiuj kontrolis ilin. Ĉiu judo ricevis numeron. Usonaj pasportoj estis konfiskitaj kaj detruitaj. Malobeemaj homoj estis punitaj. En Sered´ kaj aliaj slovakiaj koncentrejoj la judoj estis preparataj por plua transportado – rekte en la neniigejojn de Pollando. Antaŭ ol envagoniĝi, la judoj devis subskribi dokumenton, per kiu ili konsentis „donaci“ sian tutan havaĵon al la Juda Centralo en Bratislavo.

La 24an de marto la slovaka registaro kolektiĝis en rutina kunveno, dum kiu Mach informis pri la stato de la preparado de la deportado. En la protokolo estis notite, ke „la registaro akceptis la proponon de konstitucia leĝo pri la forigo de la judoj de la teritorio de la Slovaka Respubliko“. La sekvan tagon la ministro pri internaj aferoj sendis la proponon al la prezidio de la parlamento kun la peto trakti ĝin dum la venonta kunveno, ĉar oni komencus deportadi la judojn en la venontaj tagoj. Sed la parlamento ne traktis ĝin. Prezidanto Sokol klarigis la rifuzon per tio, ke li ankoraŭ volas diskuti modifojn kun Tuka.

La 26an de marto en la Ŝtata Konsilio la deportadoj estis denove traktitaj. Sed tiu konsilio, kies prezidanto estis iu V. Ravasz, ne estis la kompetenta organo, kiu povis decidi tiajn temojn, des pli ke ĝiaj membroj ne apartenis al la plej radikalaj politikistoj de Slovakio. En la konsilio okazis debato pri la moraleco de la deportado de la judoj. Dum iuj membroj atentigis pri la principoj de la konstitucio kaj de la katolika versio de la naturleĝaj principoj, kiuj estas respektindaj, aliaj kiel Mederly klarigis, ke en esceptaj tempoj oni estas devigita forlasi konstituciajn preskribojn, „por ke la nacio povu vivi“. Aliaj trovis en sia senlima naiveco bone, ke 30-40´000 homoj trovos laborlokon. Finfine, la Ŝtata Konsilio „decidis rekomendi al la registaro konsideri la gravajn ekonomiajn interesojn dum la sinsekva elektado de judoj por la deportado“.

En la unuaj ok transportoj, kiuj okazis inter la 26a de marto kaj 5a de aprilo, forveturis 8000 ĉefe junaj judoj, viroj kaj virinoj. Oni volis deportadi unue ĝuste la junularon, kies sindefendan aŭ protestan potencialon kontraŭ la operaco oni verŝajne timis. La trajnoj, kiuj aspektis kiel varvagonoj sen ajna higiena komforto, sed tamen almenaŭ kun necesa kvanto de nutraĵoj kaj kun judaj kuracistoj, veturis al la limo ĉe Zwardoń sur pola tero, kie la slovakoj transdonis la trajnojn kun la enhavo al la germana polico, kie okazis kontrolo kaj dogana deklaracio.

Tuka, Mach kaj Koso postulis deportadi ankaŭ plenajn familiojn. Sed Eichmann kontraŭis tiun postulon kun la klarigo, ke li ne scias kie loĝigi ilin. Tamen baldaŭ ankaŭ li ŝanĝis sian vidpunkton. Nun la respondeca slovaka ministerio kompletigis la direktivojn tiel, ke la deportado de judoj okazu ne nur el de koncentrejoj, sed ankaŭ rekte el difinitaj urboj mem. Tiel, la unua familia transporto forveturis la 11an de aprilo el Trnava, sekvate de transportoj el Nitra kaj Topol´čany. Komence de majo estis la vico de orienta Slovakio, kie vivis la plimulto de slovakiaj judoj. Dum 17´000 „laborkapablaj“ judoj estis senditaj al Aŭŝvico aŭ Majdanek, aliaj 10´000 judoj, inter ili 7000 infanoj, kiuj estis forprenitaj de siaj gepatroj, estis transportitaj al koncentrejoj en la regiono de Lublin en la Ĝenerala Gubernio, kie troviĝis la fifamaj naziaj neniigejoj Bełżec, Sobibór kaj Treblinka, kie la nazioj mortigis pli ol 2 milionojn da judoj kaj 50´000 romaojn (ciganojn). Okazis, ke kelkaj deportitaj viktimoj revenis el Pollando kaj rakontis en Slovakio, kiel la germanoj procedas kun la judoj en tiuj lokoj. Al la tuta cinika selektado laŭ la politiko de „esceptoj“ apartenis ankaŭ ordonoj pri certaj grupoj de judoj, kiuj dume rajtis resti en Slovakio.

Por informi la publikon, kiu dume eksciis pri la intenco kaj plano de la slovaka registaro, kaj por pravigi la operacon kontraŭ la judoj Mach diskonigis en la radio, ke oni ne kredu la troigitajn novaĵojn, kiujn la judoj disvastigas, ĉar ili forveturos nur por labori. Por ilia deportado Mach kvazaŭ kulpigis la judojn mem, ĉar laŭ li ili ne sukcesis integriĝi en la fizika laboro en Slovakio. Krom tio li kontestis, ke la slovaka registaro estis devigita kaj premita de la germanoj, kaj kredigis, ke ĝi agis memstare. Fakte temis pri komplete cinika, trompa kaj mensoga informado.

Tamen, kelkaj membroj de la slovaka registaro, eĉ Tuka, ne nur volonte vidis tiujn deportadojn, ĉar ili riskis damaĝi la internacian reputacion de Slovakio, kaj ankaŭ inter la slovaka popolo ili estis kontestataj kaj kaŭzis abomenon. Kaj tute sekrete ili ne povis okazi. En la radio oni eĉ kontraŭdire diskutis la aferon. Heydrich veturis al Bratislavo por konvinki la slovakan registaron, ke deportadi ankaŭ baptitajn judojn al Pollando ne estas problemo. Eichmann postulis altigi la nombron de deportotaj judoj al 35´000.

Tiel, ĝis la 26 de junio 1942 estis deportitaj proksimume 53´000 slovakiaj judoj al Pollando, inter ili ankaŭ 86 rabenoj, kaj en Slovakio restis entute ĉ. 26´000 judoj.

Ankoraŭ dum la deportadoj en la slovaka parlamento daŭris debato pri la leĝpropono submetita la 25an de marto flanke de la ministro pri internaj aferoj. Sokol atentigis la deputitojn, ke per tia leĝpropono Slovakio riskos esti ŝarĝita per granda kulpo. Finfine, la parlamentanoj akceptis modifitan konstitucian leĝproponon, kiu ŝajnis akceptebla por ili. La sola deputito, kiu voĉdonis kontraŭ ĝi, estis deputito Eszterházy. Deputitoj Čarnogurský, Moravčik, Mora, Tvrdý kaj la katolikaj pastroj Ferenčík kaj Filkorn forlasis la salonon antaŭ la voĉdono. La leĝo oficialigis la principan eblon deportadi judojn el Slovakio. Al tio apartenis la konfirmo de la rajtoj konfiski la posedaĵon de la deportitaj judoj kaj forpreni ilian slovakan ŝtatanecon, kio koncernis 38´169 personojn, kiuj forlasis Slovakion. La leĝo tamen faris escepton por judoj, kiuj estis baptitaj antaŭ la 14a de marto 1939 kaj por judoj, kiuj havis nejudan edzon aŭ edzinon, kondiĉe ke la geedziĝo okazis antaŭ la 10a de septembro 1941, t.e. antaŭ la validiĝo de la „Juda Kodo“. La protekto validis tiel longe, kiel la slovaka registaro konsideris ĝin necesa, kaj la leĝo estis retrovalida. Multaj judoj (miloj) posedis t.n. protektajn leterojn de la ŝtatestro, sed finfine ankaŭ ili ne plu povis helpi en multaj kazoj. Fakte, prezidento Tiso, kiu ekde 1942 nomis sin „Gvidanto“ (sk. Vodca), povis persone decidi, kiuj judoj estu protektitaj, kaj tiuj decidoj estis sekrete faritaj. La nombro de protektitaj judoj varias laŭ fonto. Hanns Elard Ludin, germana ambasadoro en Bratislavo post la forveturo de Killinger, raportis en junio 1942 al Berlino, ke ĉirkaŭ 35´000 judoj posedas specialajn legitimilojn, kiuj protektas ilin de la deportado.






Supre: Stropkov, Slovakio, judoj dum deportado en majo 1942.






Deportado de slovakaj judoj en la stacidomo de Poprad (marto 1942); Slovakaj judoj atendas sian transportadon en la stacidomo de Dobsina; Slovakaj soldatoj ŝarĝas trajnon per judoj, 1942. (El la fotogalerio de Jad Vaŝem). Verŝajne tiuj judoj estis deportitaj al Aŭŝvico.




Deportado de slovakaj judoj; Slovakaj soldatoj mistraktas judon (el la fotogalerio de Jad Vaŝem).




Deportado de judoj en Slovakio (el la fotogalerio de Jad Vaŝem); Deportado de judoj en Nitra (1942).



Stacidomo Zwardoń nuntempe (foto Wikimedia)

Malgraŭ la klaraj kontraŭjudaj alvokoj de Tiso, kiujn li publike faris en aŭgusto 1942, ke la „juda elemento minacis la vivon de la slovakoj“, ke – „laŭ la leĝo de Dio“ – la slovakoj devas „liberigi“ sin de siaj „malamikoj“ kaj ke „Slovakio apartenas al la slovakoj!“, la transportoj estis subite haltigitaj, ĉar diversaj obstakloj bremsis aŭ malebligis la deportadon. Inter la ĉefaj kaŭzoj de la haltigo kaj ĉesigo de deportadoj en aŭtuno 1942 la fakliteraturo mencias la efikon de la protektaj leteroj, riparadon de trajnreloj en Pollando, negativan reagon ĉe la slovaka popolo, kiu trovis tiujn deportadojn abomenaj kaj neakcepteblaj, ŝanĝitan sintenon ĉe parto de la slovaka politikistaro, protestojn flanke de la Ruĝa Kruco, de la eklezio kaj Vatikano kaj de judaj organizaĵoj, aŭ eĉ konfuzon, malcertecon kaj indiferentecon ĉe la germanoj, kiuj ŝajne ne kontraŭis fari ´paŭzon´, rekomendante prokrasti la deportadon ĝis la 15 de decembro, eĉ se ili ne nepre insistis pri tiu dato. La slovakoj mem proponis daŭrigi la deportadojn en printempo

1943. Laŭ Milan S. Ďurica, kiu vidis en la haltigo de la deportado de judoj heroan „rezistan ribelon“ de la slovaka flanko, Tiso kaj la slovakaj instancoj faris ĉion eblan por helpi al la judoj kaj eviti ilian deportadon al la neniigejoj de la „Tria Regno“. Nature, aliaj pli kritikaj historiistoj ne dividas tiun vidpunkton.

La plej lasta deportado de aŭtuno 1942 estis aranĝita la 20an de oktobro. En la fino estis deportitaj nekuraceblaj malsanuloj, handikapuloj, mensmalsanuloj. La koncentraj centroj en Bratislavo, Poprad kaj Žilina estis fermitaj.

Je la 1a de junio 1943 la oficiala nombro de judoj en Slovakio estis 18´648 personoj. Du grupoj estis distingitaj: La unua grupo, ĉ. 16´000 (oficiale 15´626) homoj, konsistigis judaron, kiuj posedis protektan leteron de la ŝtatestro (1111), vivis en miksita geedzeco (985), estis baptitaj antaŭ la 14a de marto 1939 (4217) aŭ estis konsiderataj utilaj en la ekonomio (9687). La alia grupo de judoj vivis en diversaj koncentrejoj aŭ labortendaroj de Slovakio.

Lipták vidas du ĉefajn fazojn rilate la akceptitecon de la Tiso-reĝimo: La kreskanta fazo daŭris de 1939 ĝis 1941, kiam la eŭforio pri la konstruado de memstara slovaka ŝtato estis forta, ĉar por multaj slovakoj ĝi estis nova kaj alloga sperto. La reĝimo komencis perdi sian akcepton en 1943, kiam la aferoj ne evoluis laŭ la deziro de Germanio: La fiasko kaj kapitulaco de la germana armeo ĉe Volgo kaj en Stalingrado en februaro 1943 kaj la falo de Mussolini en julio de ĉi tiu jaro, kiu kaŭzis vastan seniluziiĝon ĉe la simpatiantoj de la faŝisma movado, signifis gravan cezuron ankaŭ por la pozicio de la slovaka ŝtato, kies gvidantoj komencis kompreni kaj timi, ke la estonteco de la slovaka ŝtato povus esti malcerta, precipe en la kazo de tiuj, kiuj aktive partoprenis en la deportado de la judoj. Do, iuj reagis per tio, ke ili fariĝis pli singardaj pri kion ili faras, aliaj klopodis forgesi kion ili faris, kaj iuj aliaj, kiuj kredis, ke la rimedoj kontraŭ la judoj estis pravaj kaj laŭleĝaj, eĉ pli fanatike daŭrigis sian ĝisnunajn fifarojn. La kontraŭjuda sinteno ĉe la popolo, kiu komencis timi seriozajn konsekvencojn, mildiĝis, kaj la tono en la gazetaro, kiu eĉ komencis kritiki la registaron, malakriĝis kontraŭ la judoj. La nombro de kritikistoj de la registara politiko kaj opoziciuloj kreskis. Ankaŭ la parlamento kun sia prezidanto Sokol komencis okupiĝi pri la reviziado de la kontraŭjudaj leĝoj. Oni komencis havi konsciencriproĉojn, pentis kaj alvokis dion, ke li komprenu, pardonu aŭ helpu. Pri la ideo de la „solvo de la juda demando“, kiu devis esti centra elemento de la „slovaka revolucio“, la slovaka popolo komencis dubi kaj honti, post kiam oni komprenis la tragikan sorton de la judoj, kiuj estis minacataj kaj trafitaj de amasmurdo, en kiu slovakoj partoprenis. Inter slovakaj politikistoj, kiuj restis skeptikaj pri la ´projekto´ kaj postulis de la germanoj, ke slovaka delegacio povu inspekti la restadejojn de la deportitoj, kion la germanoj nature rifuzis, troviĝis ***Jozef Sivák***, ministro pri edukado. Sivák klopodis eviti la influon de la nacisocialisma ideologio en la lerneja programo de Slovakio. Laŭ peto de rabenoj Sivák restis en la registaro por informadi la judojn pri la preparado de antisemitismaj aktivecoj. Li ankaŭ klopodis helpi al rasisme persekutataj homoj. Ankaŭ kiam Tuka postulis de Tiso la eksigon de Sivák por anstataŭigi lin per la naziema propaganda ĉefo *Karol Murgaš* (kiun Tiso en 1939 internigis en la koncentrejo de Ilava), Tiso decidis konservi lin en ties ofico, kiun li forlasis nur en septembro 1944.

Sed post la murdo de 57´000 slovakiaj judoj, ĉiuj tiuj klopodoj savi sin mem per pentado estis tro malfruaj, same la provo rehabilitadi la judojn, kiuj restis vivaj en Slovakio, estis vana ideo. Slovakio komplete kompromitiĝis kaj devis timi malagrablajn konsekvencojn post la milito. En Bratislavo, kie nova geto devis esti starigita por la judoj, falis bomboj. Nature, tiel longe, ke la nazioj regis Germanion kaj la landojn, kiujn ili okupadis, kaj deziris konduki la projekton de la „fina solvo“ al ĝia celo, la danĝero por la judoj ne ĉesis ekzisti, sed, male, ĝi eĉ kreskis post la okupado de Hungario fare de la germana armeo en marto 1944. En Hungario multaj fuĝintaj slovakaj judoj vivis neoficiale, kaj forlasinte Slovakion, ili aŭtomate perdis la slovakan ŝtatanecon. Fuĝi al Hungario estis sekure nur ĝis 1944, kiam tiu lando iĝis okupata de la germanoj. En majo komenciĝis amasdeportado de hungariaj judoj, kiun Eichmann bone preparis. Entute estis murditaj 550´000 (laŭ B. Asmuss nur 270´000) deportitaj hungariaj judoj en naziaj neniigejoj, do la kruda dekoblo de la nombro de mortigitaj judoj el Slovakio, kiu komencis servi eĉ kiel rifuĝejo por persekutataj judoj el Hungario kaj aliaj landoj de la regiono.

Post la disbatita nacia ribelo (vd. la sekvan ĉapitron) judoj estis eĉ pli intense serĉataj kaj persekutataj de la germanoj. El la koncentrejoj Nováky kaj Sered´, kie la ribelo estis lanĉita, multaj judoj fuĝis kaj kaŝiĝis en diversaj lokoj de Slovakio. En la slovaka ribelo partoprenis ĉ. 1600 judoj (t.e. 10% de ĉiuj ribelantoj aŭ 5,7-6,4% de la juda popolo) kun la subteno de la movado Haŝomer Hacair kaj de judaj paraŝutistoj el Palestino. 269 judoj pereis. Laŭ postulo de Himmler, kiu kulpigis la judojn, ke ili partoprenis kaj helpis la slovakan nacian ribelon, la germanoj daŭrigis persekutadi la judojn kaj kolektis ilin en la koncentrejo de Sered´, kiu estis komandita de la fifama SS-ĉefsturmgvidanto Anton Brunner, kiu devis

organizi la transprotadon de la arestitoj al Aŭŝvico. La slovaka registaro, kiu komplete perdis la kontrolon pri tiu afero kaj estis senpotencigita de la germanoj, ankoraŭ petis la germanajn instancojn lasi la judojn en Slovakio. Sed la ĉagrenitaj germanoj ne estis interesataj pri tia peto, kaj Tiso nenion plu povis fari. Male, li restis pasiva, kaj ankaŭ liaj protektaj leteroj ne plu povis helpi al la judoj. La 21an de septembro 1944 SS-sturmbanngvidanto Hermann Höfle, kiu estis sperta protagonisto de la „fina solvo de la juda demando", ordonis trovi la judojn de la ribelo kaj daŭrigi ilian deportadon, kiu estis kaŝita kiel milita operaco, el Slovakio. La 30an de septembro la unua trajno kun deportotaj judoj estis preparita en Sered´. La Ruĝa Kruco ankoraŭ klopodis eviti tiujn transportojn, sed tiuj penoj jam estis vanaj. Ĝia delegito Dunand vojaĝis al Bratislavo por intertrakti la aferon kun la germanoj, sed lia klopodo fiaskis kaj li riskis esti arestita. Grandparto de la arestitaj judoj estis senditaj al la „Protektejo de Bohemio kaj Moravio" kaj al Germanio, kie multaj judoj tamen sukcesis postvivi la holokaŭston. 6000 judoj, kiuj daŭre kaŝiĝis en Slovakio, sukcesis ricevi nutraĵojn de diversaj helpantoj kiel la slovakia eklezio kaj la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco. La 9an de decembro 1944 SS-standartgvidanto Josef Witiska povis anonci, ke 9635 judoj estis arestitaj, de kiuj 8957 estis distribuitaj al diversaj koncentrejoj, kaj la resto estis mortigita.

Resume, la rezulto de la kontraŭjuda kampanjo en Slovakio estis jena: Laŭ diversaj kalkuloj pereis en tiuj jaroj ĉirkaŭ 60´000, pli precize inter 57´600 kaj 59´500 slovakiaj judoj, kaj nur 20´000 aŭ 21´000, laŭ aliaj fontoj 29-32´000 slovakiaj judoj, havis la ŝancon postvivi la holokaŭston. Kiel supre menciite, antaŭ la deportado en Slovakio troviĝis 89´000 judoj. Je la 1a de junio 1943 estis nombritaj 18´648 judoj. La diferenco estas 70´808. Sed ĉar ĉirkaŭ 12´000 sukcesis eskapi la deportadojn, ´nur´ 53´000 estis reale deportitaj. La fakliteraturo indikas inter 60´000 kaj 70´000 viktimojn, ĉar la nombroj de viktimoj de la jaro 1944 kaj de mortigitoj en Slovakio mem plus tiu de pereintoj dum la nacia ribelo ne estas certa. La cifero 60´000 kongruas kun tiu nombro, pri kiu la slovakoj interkonsentis kun la germanoj. La plimultaj judoj estis deportitaj inter marto kaj oktobro 1942, nome ĉirkaŭ 58´000, precipe al Aŭŝvico, Majdanek (4501) kaj al koncentrejoj de la Lublina regiono. 34´600 judoj estis transportitaj al Treblinka. Kune kun la judoj, kiuj loĝis en Hungario pro la teritoria ŝanĝo, la nombro de la viktimoj estis verŝajne cent mil. En Pollando nur 284 personoj, kiuj estis deportitaj el Slovakio, povis esti retrovitaj. Ŝajnas, ke neniu judo, kiu estis selektita por deviga laboro, saviĝis ĝis 1944. En la jaroj 1944 kaj 1945 estis senditaj 11 trajnoj kun entute 12´306 personoj al germanaj koncentrejoj – 7936 al Aŭŝvico, 2732 al Sachsenhausen kaj 1638 al Terezín/Theresienstadt. La „Juda Centralo" de Slovako estis likvidita kaj ĝiaj funkciuloj arestitaj kaj deportitaj. Rabeno ***Ĥaim Weissmand(e)l***, unu el malmultaj konataj nomoj de judaj vitimoj, estis deportita kun sia familio al Aŭŝvico. Sed dum la vojaĝo li sukcesis salti de la trajno kaj kaŝiĝi en sekreta loko en antaŭurbo de Bratislavo, dum liaj familianoj pluveturis al Aŭŝvico, kie ili neeviteble pereis. De sia kaŝejo en Slovakio Weissmand(e)l estis translokita al Svislando (kun la helpo de du naziaj kunlaborintoj!), de kie li elmigris al Usono, kie li mortis en 1957.

*Konsideroj koncerne la juran pritakson de la kontraŭjuda kampanjo en Slovakio de 1938-45:* La ĉefaj reprezentantoj de la slovaka ŝtato ĉiam emfazis, ke iliaj kontraŭjudaj rimedoj estas efektivigitaj laŭ la validaj leĝoj kaj okazas kadre de la valida jura ordo kaj laŭ la konstitucio de la 31a de julio 1939. En la preamblo estis skribite, ke la principoj de la kristana instruo estas konsiderataj kiel idea fundamento de la konstruado de la slovaka ŝtato. Akcentitaj estis la dia kreado de la ŝtato kaj de la juro kaj proklamita estis la natura juro de la oficiala ŝtata ideologio. En tio ne temis pri reeldono de la kleriga movado de la 18a jarcento, sed pri moderna versio de la mezepoka katolika natura juro laŭ Tomaso de Akvino. Laŭ tio, dio, la kreinto de la ŝtata potenco kaj de la mondo, gvidas tiun sistemon aŭ ontologion laŭ specifaj trajtoj, kiujn li mem kreis. La plej altan lokon en tiu ordo okupas la spirito de la homo, kiu estas esprimita pere de ties racio kaj libera volo. El tio sekvis, ke la ŝtato devas laŭ maksimumaj ebloj protekti la homojn, kiuj ĝuas certajn, netuŝeblajn rajtojn, kiuj estas donitaj de la naturo, kaj havigi al ili la necesajn rimedojn por digna vivado, por certigi al ili ties privatan posedaĵon kaj protekti la familiojn. La ĉefa protagonisto de tiu ŝtata ideologio estis ĝuste Josef Tiso, la katolika ŝtatestro, mem, kiu kiel la plimulto de aliaj politikistoj kaj ideologoj dum la tuta ekzistado de la slovaka ŝtato ne laciĝis prediki ĝin. Evidente, liaj instruoj validis nur por kristanoj kaj ne por judoj. El la paroladoj de Tiso oni povas konkludi, ke li tute ne intencis apliki tiujn bazajn rajtojn, se temas pri judoj, kiujn li konsideris plago kaj malamiko de la slovaka nacio. Per tio li ne nur kondukis sian ideoloion al la absurdo, sed transdonis la kazon de la judoj kvazaŭ al la kriminala juro. Se la judoj estis plago, ili devis esti kontraŭbatalataj kaj forigitaj kiel la pesto dum la mezepoko. Sed tian teorion Tiso, kiu estis doktoro pri teologio kaj fakulo pri moralteologio kaj kristana sociala etiko, kiun li instruis en la porpastra seminariejo de Nitra, ne povis bazi sur la kristanismo sed devis prunti de

la nacisocialismo. Se la kontraŭbatalado de la judoj ne povis esti bazita sur la konstitucio, kiu garantiis al ĉiu civitano de la ŝtato la bazajn rajtojn de la vivo kaj de la libereco sendepende de deveno, lingvo, civitaneco, nacio, raso, religio aŭ profesio (paragrafo 81), kaj sur la valida jura ordo, kun kiu la kontraŭjuda politiko de la slovaka registaro vole-nevole konfliktis, devis esti serĉata kaj trovita alia vojo. Karakteriza por tiu slovaka konstitucio estis, ke ĝi enhavis krom ideoj el la tempo de la ĉeĥoslovaka respubliko ankaŭ principojn, kiuj pravigis la konstruadon de aŭtoritatisma reĝimo. La problemo estis, ke la registaro interpretis la koncernajn paragrafojn de la konstitucio laŭ sia propra, subjektiva kaj arbitra maniero. La reprezentantoj de tiu registaro ne nur estis konvinkitaj, ke ĉiu kontraŭjuda rimedo estas kovrita de la leĝo, sed ili ankaŭ prenis al si la rajton apliki tiujn leĝojn, kiel ili estis faritaj kaj akceptitaj de la parlamento, kiu taskis la registaron plenumi ilin. Tiu mekanismo estis antaŭvidita de la konstitucio. Krom tio, je la dispono de la registaro estis la konstitucia leĝo 210/1940, kiu estis akceptita de la parlamento kaj larĝigis la potencon de la registaro por limigita tempo (tian eblecon antaŭvidas cetere ankaŭ demokratiaj ŝtatoj, sed nur en esceptaj kaj eksterordinare gravaj kazoj). En Slovakio la registaro prenis al si tiun rajton dum la tuta daŭro de la ekzistado de tiu ŝtato, almenaŭ rilate al la kontraŭjuda kampanjo, sen ajna parlamenta kontrolado de la registaraj ordonoj kaj praktikoj. Nu, certaj kompetencoj de la registaro estis klare difinitaj, dum aliaj ordonoj estis faritaj ekster tiuj kompetencoj. Kune kun certaj paragrafoj de la fifama „Juda Kodo“, laŭ kiuj judoj povis esti persekutataj kaj ĉikanataj de la sekureca polico, aliaj reguligoj kaj ordonoj formis kruelan kaj cinikan sistemon de „escepta leĝaro“ de Slovakio. (Laŭ Lipscher, p. 94-97). Do, la rilatoj inter katolikismo kaj nacisocialismo (ideologio) unuflanke, la rilatoj inter konstitucio, ŝtatestro, parlamento, registaro kaj aŭtoritatoj kiel juraj organoj de Slovakio aliflanke perfekte funkciis en simbiozo por persekuti la judojn kaj aliajn nedeziratajn elementojn de Slovakio en tiuj jaroj. El la vidpunkto de la juro temis ne nur pri kruda lezado de la konstitucio kaj valida leĝaro, sed ankaŭ pri grandskala krimo, kiu estis kovrita de neniu natura leĝo kaj kiu devis esti klasifikita kiel genocido kaj krimo kontraŭ la homeco. Kiel la respondeculoj de tiu slovaka reĝimo estis punitaj post la milito, estos priskribite pli sube.

*La sinteno kaj agado de la eklezioj:* Ambaŭ eklezioj, kaj evangelia kaj katolika, havis sufiĉe grandan influon en Slovakio. La evangelia eklezio iusence ludis la rolon de la ´lojala opozicio´, kiu tamen preferis ne enmiksiĝi en la aktualan politikon. Malgraŭ tio, ekzistis unuopaj evangeliaj episkopoj, kiuj protestis kontraŭ certaj leĝproponoj diskriminaciantaj homojn, kaj kondamnis kontraŭjudajn memorandojn, predikojn, pogromojn kaj deportadojn. Nature, ankaŭ la evangelia eklezio de Lutero ne estis libera de tradicia antisemitismo. Tamen, la kontraŭjuda politiko kaj precipe la deportadoj de la judoj en Slovakio ne estis rekte instigita de la kristana antisemitismo, sed esence la germanaj nacisocialismaj ideoj kaj praktikoj kaŭzis ĝin.

Kvankam la slovaka ŝtato de 1939-45 ne celis esti nacisocialisma, esence komprenante sin katolika, tio ne malhelpis al ĝi jure diskriminacii kaj transdoni la judojn al la germanaj mortigistoj. Gvidaj ekleziuloj de Slovakio, antaŭ ĉio Hlinka kaj Tiso mem, rifuzis nacisocialismon kaj rasismon, ĉar tiuj ideologioj ne kongruis kun ilia mondkoncepto. La ideologion de la nazioj la katolika eklezio konsideris paganismo.

La rilato de la katolika eklezio, al kiu apartenis la plimulto de la slovaka popolo, al la „juda demando“ estis ambivalenta. Tio ne estis dankinda unuavice al la tradicia antisemitismo de tiu eklezio, sed precipe al la intimaj rilatoj, kiun la katolika eklezio havis kun la slovaka naciismo. Certe, inter la ekleziularo ekzistis reprezentantoj, kiuj opiniis, ke la judoj devus esti ekskluditaj el la politika kaj ekonomia vivo de Slovakio. Tiel kredis ekzemple la estro de la slovakaj jezuitoj, *Rudolf Mikuš,* kiu subtenis en februaro 1939 la ideon starigi getojn por judoj. Kelkaj slovakaj gvidantoj ne konsideris la papon sed la slovakan nacion plej supera principo. Tio kaŭzis, ke la retoriko de la slovakaj naciistoj forlasis la kadron de la romkatolikaj dogmoj, ekzemple se Tiso proklamis en aŭgusto 1942, ke la liberigo de Slovakio de la judoj estas kvazaŭ ago ordonita de dio k.s. Al tiu dubinda eldiro la eklezio reagis per oficiala ekspertiza esploro. Tiso ricevis riproĉon, sed tio havis neniajn sekvojn por li. Ankaŭ ĉefministro Tuka ŝokis per eldiro, laŭ kiu por li la opinio de lia konfesprenanto (t.e. ´konfespatro´), kiu benis lian konsciencon apoge al la forpelado de la judoj, pli multe voloras ol tiu de la papo mem. Kvankam la katolika landa eklezio en Slovakio rigide respektis la dogmojn de la universala romkatolika eklezio, ĝi agnoskis la ekziston de „juda demando“. Aliflanke, ĝi malkonsentis pri unuopaj leĝoj, kiuj estis adoptitaj kontraŭ la judoj, kaj protestis kontraŭ la malhomeca traktado de la judoj, sen tamen en si mem rifuzi la ŝtatajn leĝojn, kiuj diskriminaciis la judojn. Alimaniere dirite, la eklezio opiniis, ke ĝi „ne povas kontraŭstari leĝajn rimedojn flanke de la ŝtato, kiuj limigas la damaĝan influon de la judoj“. Male, la slovaka katolika eklezio sentis

la bezonon reatentigi pri la laŭdira „malamika sinteno de la juda popolo rilate al la kristanaro", konstatante, ke „ankaŭ ĉe ni la influo de la judoj damaĝis" la „ekonomion, kulturon kaj etikon". Tiel, la eklezio trovis (komplikajn) formulojn, kiuj estis pure hipokritaj sed klarigeblaj el la percepto de la „juda demando" en tiu eklezio, en intima ligo kun la slovaka naciismo kaj ĝia aktuala politiko. Certe, eĉ en katolikaj medioj ekzistis reprezentantoj, kiuj devis konsideri la kontraŭjudajn leĝojn absurdaj por ŝtato, kies prezidento estis katolika pastro.

Malgraŭ sia evidenta distanco rilate al la judoj, la slovakaj episkopoj konfirmis sian pretecon bapti ĉiun homon, kiu emas sincere kristaniĝi. La katolika konferenco, kiu okazis en Nitra la 7an de oktobro 1941, subtenis la sintenon de Tiso rilate la baptitajn judojn, kiuj devis esti protektataj. En la ĉi-koncerna „Memorando de la slovakaj episkopoj de la 7a de oktobro 1941 al la ĉefministro", la slovakaj episkopoj akre reagis al la t.n. „Juda kodo", en kiu ili vidis kaŝitan rasisman fundamenton, kiun ili ne povis akcepti, ĉar ĝi rekte kunpuŝiĝis kun la ′diaj leĝoj′ de la katolika eklezio kaj do malkongruis kun la kristana mondkoncepto. La episkopoj kvazaŭ plendis, ke la ŝtato adoptis tiun „Judan Kodon" sen interkonsultiĝo kun la katolika eklezio kaj postulis ŝanĝi ĝin en la senco de la eklezio kaj de la „naturaj leĝoj". La 5an de majo la ŝtata sekretariejo de Slovakio anoncis, ke oni modifos la koncernajn leĝojn. En tiu memorando klare videblis protesto kontraŭ la limigo de la kompetencoj de la eklezio, kiu timis perdi sian influon en la socio, sed ĝi enhavis ankaŭ klaran defendan pledon favore al baptitaj judoj, kiuj aliĝis al la katolika kredo kaj per tio fariĝis kristanoj en la senco de la katolika eklezio, kiuj devas esti traktataj de la ŝtato kiel tiaj. La memorando estis subskribita de d-ro Karol Kmet′ko, episkopo de Nitra, Ján Vojtaššák, episkopo de Spiš, Pavel Gojdič, episkopo de Prešov, Jozef Čársky, episkopo kaj apostola administranto de Prešov, d-ro Pavol Jantausch, episkopo kaj apostola administranto de Trnava, d-ro Andrej Škrábik, helpepiskopa de Banská Bistrica, d-ro Michal Buzalka, helpepiskopo kaj armea vikario en Trnava.

En sia sekva „Mesaĝo al la katolika publiko" de la 26a de aprilo 1942, kiu aperis en la gazeto *Katolické noviny* (kaj kiun la cenzuro volis eviti), la aŭtoroj (t.e. la slovakaj episkopoj), konfirmis, ke en principo ĉiu, kiu sincere deziras tion, povas esti baptita. Sed la kondiĉo por la allaso al la babtiĝo estas plurmonata antaŭpreparado, dum homoj, kiuj volas esti baptitaj nur pro portempaj, politikaj aŭ materiaj kialoj, havos malbonan ŝancon (sic). Due estis emfazite, ke baptitaj judoj estas konsiderataj kiel „niaj kredantoj" kaj povas ĝui daŭran protekton de la eklezio. Tamen, plej okulfrapas aŭ harhirtigas la tria punkto, en kiu la episkopoj ankaŭ klarigis, ke la „tragedio de la juda popolo konsistas en tio, ke ĝi ne agnoskis la savanton kaj kaŭzis al li kruelan hontindan morton sur la kruco", pro kio la „savanto punis la judan popolon pere de ĝia disigado tra la tuta mondo". Dum sia disiĝado, kiu daŭras jam de dumil jaroj, „la judoj nenie asimiliĝis en la mondo kaj fariĝis solecaj kiel fremda elemento", kaj „sian malamikan sintenon rilate al la kristanismo ili neniam ŝanĝis". Pro tio „povis okazi, ke la nacioj kelkfoje montris sian ĉagrenon kaj seniluziiĝon pri la judoj, ofte en troigita, malmola kaj kruela maniero, kiu troviĝis en kontraŭdiro kun la kristana moralinstruo." Pri la rolo de la judoj en Slovakio la episkopoj skribis jenajn frazojn: „Ankaŭ ĉe ni la influo de la judismo estis damaĝa. En mallonga tempo ili akaparis nian tutan ekonomian kaj financan vivon kaj tiel damaĝis al nia popolo. Ne nur ekonomie, sed ankaŭ kulture kaj morale ili efektivigis damaĝan influon al la popolo. La eklezio do ne povas esti kontraŭ tio, se la ŝtata potenco prenas leĝajn rimedojn, per kiuj tiu damaĝa influo de la judoj estos malebligata." Post tiu fatala punprediko la ekleziaj aŭtoroj tamen fariĝis pli mildaj kaj aldonis: „Ĉe la solvo de tiu malfacila demando oni ne forgesu, ke ankaŭ la judoj estas homoj kaj ke oni devas trakti ilin homece. Antaŭ ĉio oni devas zorgi pri tio, ke la valida ŝtata kaj la natura kaj dia leĝaroj ne estu lezataj." Celante la judojn, fine de sia letero, la episkopoj avertis ankaŭ pri tio, ke „ĉiu havas la naturan rajton akiri privatan posedaĵon per sincera laboro kaj utiligi ĝin laŭ la principoj de la kristana moralinstruo."

Kiam en 1943 aperis la postulo deportadi la restantajn judojn de Slovakio, la slovakaj episkopoj denove reagis per publika letero, en kiu la lezado kaj malrespektado de la „naturaj leĝoj, normoj kaj principoj" estis konsiderataj kiel eraraj. Ili atentigis, ke neniu individuo rajtas esti persekutita aŭ punita sen evidenta kaŭzo, kaj oni ankaŭ ne rajtus akuzi aŭ kolektive kondamni iun popolon kulpa kaj puni ĝin, nur ĉar iuj individuoj de tiu popolo faris eraron aŭ krimon, aŭ ĉar temas pri judoj. Laŭ la natura principo kaj la ŝtata konstitucio antaŭ ol efektivigi punon la kulpo unue devus esti esplorita. La konstitucio, al kiu la mortpuno ne estis aldonita, enhavas la principon, ke ĉiu civitano havas la rajton ĝui la protekton de la vivo, de la libereco kaj de la posedaĵo sendepende de deveno, lingvo, civitaneco, nacio, raso, religio aŭ profesio. En tiu senco estis verkita, la 8an de marto 1943, la tria memorando de la slovakaj episkopoj, kiu estis publike laŭtlegita en ĉiuj preĝejoj de Slovakio la 21an de marto kaj subskribita de la sama episkoparo kiel la memorando de la 7a de oktobro 1941. Kiel pastro de Bánovce Tiso eĉ mem prezentis ĝin al siaj

komunumanoj. La reĝimo denove volis malpermesi la publikan laŭtlegadon de la teksto. Per tiuj tri memorandoj la slovakaj episkopoj klare esprimis siajn vidpunktojn pri la „juda demando“, tiel ke iusence ili estis protektitaj de miskomprenoj, liberigitaj de eventuala kulpo aŭ respondeco kaj absolvitaj de la historio.

En la realeco aŭ praktiko, la volo bapti judojn tamen estis limigita. Hlinka fajfis pri baptitaj judoj, ĉar li estis citita per la vortoj, ke judo restas judo, eĉ se li estis baptita de cent episkopoj. Kaj la sinteno de slovakiaj episkopoj rilate la „judan demandon“ estis diversa kaj ambivalenta. Ekzemple pri ***Karol Kmet´ko***, kiu estis (ĉef)episkopo de Nitra kaj instalis pastron Tiso en Bánovce, ekzistas kontraŭdiraj informoj: En 1943 li ja ordonis aŭ petis al monaĥejoj kaj aliaj ekleziaj instalaĵoj, ke ili kaŝu judojn, kion tiuj ankaŭ faris. Tio tamen ne signifis, ke li ne konsideris la judojn kulpantoj pri la mortigo de Jesuo, kion li ankaŭ ne hezitis diri al judaj reprezentantoj, kiuj petis lin influi la haltigon de la deportadoj.

Dum la episkopo de Zips (Spiš), ***Ján Vojtaššák***, membro (vicprezidanto) de la Ŝtata Konsilio, restis indiferenta pri la deportadoj de judoj, kiujn li nek apogis nek kondamnis, kaj interesiĝis nur pri baptitaj judoj, ***Pavol Jantausch***, episkopo de Trnava, fariĝis konata kiel decidita kontraŭulo de la deportadoj de judoj. En marto 1942 li protestis ĉe Tiso, sed ŝajne nenion atingis, tiel ke li mem helpis kaj savis iun lokan rabenon. Ankaŭ aliaj slovakaj episkopoj kaj simplaj pastroj intervenis ĉe la slovakia registaro per sia protesto kaj diversmaniere helpis favore al judoj, cetere pro diversaj motivacioj, kiuj ne ĉiam estis evidentaj.

Elpaŝojn de slovakaj episkopoj favore al judoj oni povas konsideri eĉ kuraĝaj, ĉar Mach, ministro pri internaj aferoj, minacis, ke li malliberigos ĉiujn episkopojn, kiuj enmiksiĝas en la politikon. Flanke de Vatikano sian influon utiligis ĝia diplomatia reprezentanto *Giuseppe Burzio,* kiu kritikis la persekutojn de la judoj kaj raportis al la papo pri kio okazas kun la judoj en Slovakio. Li ne hezitis rekte kulpigi la ministrojn Tuka kaj Mach, kiujn li trovis abomenindaj politikistoj, ĉefaj respondeculoj pri la kontraŭjudaj agadoj. Papo Pio XIIa estis rekte petata zorgi pri tio, ke la deportado de judoj estu evitata. Kiel konate, al tiu papo oni riproĉis, ke li restis tro pasiva rilate la sorton de la judoj dum la dua mondmilito kaj publike eĉ prisilentis la holokaŭston, kvankam li estis sufiĉe informata pri la situacio de la judoj en Eŭropo. Tamen, ŝajnas, ke li almenaŭ rifuzis la „Judan Kodon“, kiu estis enkondukita en Slovakion en septembro 1941. Tra Burzio Vatikano tamen almenaŭ adekvate protestis ĉe la slovaka registaro kontraŭ la deportado de la slovakiaj judoj al Pollando, sed Tuka malakceptis la proteston kiel enmiksiĝon de Vatikano en la internajn aferojn de Slovakio. Tuka, kiu mem konsideris sin kristano, respondis, ke la slovaka ŝtato ne estas kristana kaj ke en la konstitucio mankas paragrafo, kiu deklaras ĝin tia. Kaj li ankaŭ atentigis, ke koncerne la judojn estus vane apliki kristanajn principojn, ĉar li estis konvinkita, ke Slovakio devas esti „liberigita de tiu pesto, tiu bando de krimuloj kaj gangstroj“, kiel li nomis la judojn, tiu „neintegrebla kaj malkapabla raso, damaĝa kaj detrua elemento, kiu devas esti senkompate elsarkita kaj forigita“. Do, ajna racia diskuto kun tia fanatika antisemito, kiu estis konvinkita pri sia „misio“, komplete perdis sian sencon. Burzio estis demandita de Tuka, kiun li konsideris „frenezulo“, kial Vatikano ne protestis, kiam „la slovaka popolo estis ĵetita en la malfeliĉon de la judaj parazitoj kaj devigita elmigri al Ameriko“. La menciojn pri deportado de judoj al Pollando kaj Ukrainio Tuka nomis „juda propagando“. Li promesis engaĝi komisionon, kiu esploru tiun aferon. Se tio estas vera, li persone ordonos ĉesigi la deportadojn, sed tio probable estis mensogo (la 7an de februaro 1943 Tuka proklamis, ke 80% de la slovakia judaro estas eliminita kaj ke oni intencas baldaŭ deportadi ankaŭ la restajn 20´000 judojn). La interparolado kun Burzio tamen havis pozitivan efikon: Burzio estis akceptita de Tiso, kiu bedaŭris la konduton de Tuka, kaj la slovaka ministraro nomis la intervenon de Burzio „honoro“ kaj promesis, ke la deportado de 4000 judoj estos suspendita. Ĉion tion Burzio skribis en sia raporto al la papo, kiu tiukanale povis informiĝi pri la aktuala situacio en Slovakio.

La 8an de novembro 1944 [t.e. jam post la slovaka ribelo“] Tiso sentis la bezonon skribi al la papo jenan leteron, kiu entenis liajn pravigojn por la sinteno de la slovaka ŝtato rilate al la judoj kaj aliaj minoritatoj kaj bone ilustras la cinikan argumentadon de la slovaka ŝtatestro: „(…) La onidiroj pri kruelaj agadoj de la slovaka registaro kontraŭ homoj pro ties nacieco kaj raso kontraŭ la principoj de la homeco kaj justeco estas troigo de la propagando, kiu estas malamika al ni. La malo estas vera, ke en la kvin jaroj de nia sendependeco eĉ ne unu mortkondamno estis esprimita. Dum la politikaj perturboj de la 6a de oktobro 1938 kaj de la 14a de marto 1939 (…) fluis eĉ ne unu guto de sango. Ke la registaro resendis la en Slovakio superfluajn ĉeĥojn hejmen kaj delegis la judojn al Germanio por laboro, kio okazis ankaŭ kun multaj slovakoj, ne povas esti riproĉite al la registaro. La prenitaj rimedoj de la slovaka registaro kontraŭ ĉeĥoj kaj judoj ne okazis pro ilia nacieco aŭ raso, sed pro la deviga defendo de la nacio kontraŭ

malamikoj, kiuj damaĝis ĝin jam de jarcentoj, tiel ke en Slovakio restis ne malmultaj judoj kaj ĉeĥoj en bonaj vivkondiĉoj. (…) Sed oni devas diri, ke ĉeĥoj kaj judoj (…) en aŭgusto de ĉi tiu jaro elpaŝis flanke de malamikaj paraŝutistoj kaj lanĉis malferman ribelon kontraŭ la slovaka ŝtato. Malgranda Slovakio, kiu estis malkapabla defendi sin mem, vokis la helpon de sia protektanto Germanio. Pro tio ekde tiam temas pri militaj aktivecoj, kiuj estas ekster la influo kaj respondeco de la slovaka registaro. (…) Nia ŝuldo konsistas en nia dankemo kaj fideleco rilate al la germanoj, kiuj ne nur promesis al nia popolo agnoski la rajton je sendependeco kaj nacia libereco, sed helpis al ni ankaŭ en la lukto kontraŭ ĉeĥoj kaj judoj, kiuj estas malamikoj de nia popolo. (…) La provo de niaj malamikoj akuzi nin por malpliigi la honoron de la eklezio, estas fariseaĵo. (…)“

Ĉi tiu citaĵo parolas por si mem kaj ne bezonas komenton.



Gvidaj slovakaj ekleziuloj dum la holokaŭsto: Imrich Karvaš, Pavol Jantausch, Karol Kmet´ko, Ján Vojtaššák, Michal Buzalka, Giuseppe Burzio

Kvankam multaj slovakoj kontentis pri tio, ke oni inkluzivis la katolikan aferon en la politikon, en kio ili ne vidis problemon, por Vatikano Tiso estis problema kazo. Kiam la demando aktualiĝis, ke Tiso transprenos la oficon de la ĉefministro kaj fariĝos ministro pri internaj aferoj en 1938, papo Pio XIa (kiu mortis en februaro 1939) pasive konsideris la aferon kiel neŝanĝeblan fakton. Post kiam en marto 1939 estis proklamita la sendependeco de Slovakio kaj en oktobro Tiso transprenis la oficon de la ŝtatprezidento, Vatikano malvolonte vidis tion. Kiam Tiso en tiu pozicio volis fari „pilgriman vojaĝon“ al Romo, Vatikano diskrete sciigis al li, ke li ne estas bonvena, kaj la vojaĝo ne okazis, sed oficiale pro aliaj kialoj. Do, la etoso de la rilatoj inter Vatikano kaj Slovakio estis streĉata dekomence. Kiam Bratislavo sendis Karolon Sidor kiel slovakan ambasadoron al Vatikano, kiu plendis, ke la eklezia ŝtato ankoraŭ ne sendis reprezentanton al Bratislavo, Romo tute ne reagis. Krom tio, Tiso konfuzis la kardinalojn en Vatikano per strangaj publikaj paroladoj en Slovakio kaj dubindaj diplomatiaj decidoj, tiel ke en Vatikano oni harhirtiĝis kaj komencis esplori la aferojn kaj postulis de Kmet´ko klarigojn pri la eldiroj de Tiso koncerne la temon de la rilatoj inter nacio kaj eklezio. Vatikano ankaŭ ne sendis gratulon al Tiso okaze de lia elektiĝo kiel ŝtatestro. Oni eĉ rifuzis doni al li pli altrangajn hierarkiajn titolojn kaj ankaŭ ne rekonfirmis lian honortitolon ´Monsignore´, kiun li aŭtomate perdis kiam Benedikto XVa mortis. La pastra integreco de Tiso tamen estis daŭre agnoskita de Vatikano. Dum la luteranoj (evangelianoj aŭ protestantoj) de Slovakio ne multe fidis al Tiso, la romkatolika eklezio rigardis lin kun skeptiko, sed publika kritiko al lia adreso estis esprimita nur en nebula, kaŝita formo, kiu ne estis komprenebla por simplaj homoj.

La slovakiaj judoj a) ne povis imagi, ke en la 20a jarcento tuta popolo (kiel la slovakoj) apogas la ideon forigi, deportadi kaj neniigi la judojn, kiuj tiel longe kunvivadis kun ili, kaj b) ne povis kredi, ke tio povus okazi en ŝtato, kies pintulo estas katolika pastro kaj en kiu la katolika eklezio havas grandan influon por eviti tian kruelan rimedon kontraŭ la judoj. Ŝajnas, ke la unuaj sciigoj pri kontraŭjudaj rimedoj en Slovakio atingis Vatikanon tra la ambasado en Berlino. El tio sekvis, ke flanke de Vatikano diplomatoj petis informojn de siaj ambasado en eksterlando pri la situacio de la judoj en Slovakio, ĉar ilin maltrankviligis la embarasa fakto, ke katolika pastro troviĝas ĉe la politika pinto de Slovakio. Tio povus damaĝi la reputacion de la katolika eklezio entute. Sed la eklezio nenion konkretan entreprenis tiel longe, ke okazis nur diskutoj pri kontraŭjudaj leĝoj. Kvankam Vatikano dubis, ke Slovakio povas esti konsiderata kiel sendependa ŝtato, La Sankta Seĝo intencis sendi reprezentanton (chargé d´affaires) al Bratislavo kaj finfine sendis tien Giuseppe Burzio, kiu ankaŭ komencis aktive observi la politikan evoluon en Slovakio precipe post la renkontiĝo de Tiso kaj Tuka kun Hitlero en Salzburgo fine de julio 1940. Ĉi-koncernaj artikoloj estis publikigitaj en la gazeto *Osservatore Romano*. Sed la slovakaj raportoj trompis la

vatikanajn diplomatojn, kiuj siavice ŝajnis subtaksi la seriozecon de la intencoj de la germanaj naci-socialistoj kaj iliaj slovakaj helpantoj kaj koncentris sian atenton pri la baptitaj judoj, al kiuj oni volis helpi eviti ĉikanojn kontraŭ ili flanke de la slovakia ŝtato. Por ekscii pli pri la konkretaj intencoj kontraŭ la judoj kaj por plendi kontraŭ ilia mistraktado Burzio petis aŭdiencojn ĉe Tiso, kiu donis al li trankviligajn respondojn, kiujn Burzio tamen ne opiniis konvinkaj. Kaj ankaŭ la slovakaj episkopoj ne konsideris la neceson reagi urĝa, fidante je la informoj de la ŝtatestro, kiu anoncis, ke la ŝtato faros esceptojn por diversaj kategorioj de judoj, finfine Tiso ja ne subskribis la „Judan Kodon", kontraŭ kiu la vatikana diplomatio tamen protestis. Pri ĉio tio Burzio raportis al la papo, kiu do devis esti informita pri la aktuala situacio en Slovakio.

Post kiam en oktobro 1941 en Slovakio komenciĝis unuaj deportadoj de judoj al Pollando, Vatikano sentis sin devigita ricevi pli da sciigoj, kies ĝustecon necesis kontroli. Sed la organizantoj de la deportadoj bone scipovis kaŝi siajn operacojn, kiuj okazis nokte kaj sen esti rimarkitaj de la popolo aŭ de fremdaj observantoj. La slovakoj eĉ ŝovis la kulpon al la germanoj, kiuj estis respondecigitaj pri la masakrado de judoj en Slovakio. Kiam la ekleziuloj komprenis, ke la judoj ne estos deportataj por labori en la „oriento", sed ke ili estas destinitaj por esti mortigitaj, Burzio sendis leterojn al Tuka por ricevi konfirmon. Sed Tuka defendis la rimedojn kontraŭ la judoj, kiujn li ne trovis malhomecaj aŭ nekristanaj. Mach eĉ cinike certigis, ke ĉio iras laŭjure kaj laŭleĝe. Sed Vatikanon pli kaj pli ofte atingis maltrankviligaj informoj el ambasadoj en aliaj ŝtatoj, precipe Svislando, Hungario, Anglio, Hispanio kaj Usono pri amasaj deportadoj de judoj el Slovakio kaj Hungario, entute 135´000. Post tio Burzio estis petita de Romo fortigi siajn klopodojn favore al la judoj, kaj kardinalo Maglione fidis je Burzio, sed li ne povis fari multon por eviti la deportadojn. Post kiam aperis novaĵo, ke slovakaj judinoj estas sendataj al la orienta fronto por servi al germanaj soldatoj kiel prostituitinoj (onidiro kiu ne estis konfirmita), la papo estis alvokita interveni. Al Sidor estis komunikite, ke Vatikano trovas la kruelaĵojn, kiuj okazas en Slovakio, kiu estas katolika lando, hontindaj. Sed Sidor respondis, ke la juda demando estas solvita en tuta Eŭropo, ke la slovakaj judoj estas translokitaj al Pollando, kie ili povos vivi en sekureco, kaj ke la aserto, ke judaj knabinoj estas senditaj por prostituado al la orienta fronto, estas mensogo, ĉar la Nurembergaj Leĝoj malpermesus seksan kontakton inter germanoj kaj judoj. Kiam en printempo 1943 la deportadoj de judoj rekomenciĝis en Slovakio, Burzio denove ricevis trankviligan respondon de Tiso, sed tiam la vatikana diplomato komprenis, ke li estis trompita de li. Mons. Tardini, kiu ellaboris diplomatian noton de Vatikano al la slovaka registaro en Bratislavo, parolis pri skandalo, kiu okazas en lando, kies ŝtatestro estas katolika pastro, eĉ se la judoj ne estas ardaj amikoj de la katolika eklezio. Tuka furioze kaj kolere rifuzis ĉiujn plendojn kaj kritikojn, kiuj atingis lin de la vatikana flanko, kaj certigis al Burzio, ke Vatikano fariĝis viktimo de la juda propagando. Krom tio li klarigis, ke ĉio okazas kongrue kun lia kristana konscienco. Al Burzio restis nur fari la atentigon, ke Slovakio riskas perdi sian reputacion kaj ke la historio mem juĝos pri gi. Post tiu malagrabla interparolo, Tiso vokis Burzion por esprimi al li sian bedaŭron pri la konduto de Tuka. En majo kardinalo Maglione ellaboris novan diplomatian noton al la adreso de la slovaka registaro, en kiu li esprimis sian bedaŭron pri la ekzisto de rasaj leĝoj en Slovakio, kiuj formas rektan kontraston kompare kun la katolikaj principoj, kaj ke Vatikano eksciis kun doloro pri la deportadoj de judoj en Slovakio, kiuj estis sekrete organizataj, kvankam ili estis neataj de Tuka. En printempo 1944 la Juda Mondkongreso alvokis la vatikanan ambasadon en Vaŝingtono, ke la papo entreprenu taŭgajn paŝojn por ĉesigi la persekutadon de la judoj en Slovakio. Post kiam en aŭgusto 1944 en orienta Slovakio eksplodis ribelo, kiu estis disbatita de la germanoj, akompanate de novaj amasaj arestoj de judoj, Burzio raportis al Romo, ke li ricevis la ordonon de Pio XIIa ´fari ion´ por la malliberuloj. La ŝtatsekretariejo de Vatikano (al kiu apartenis Giovanni Montini - posta kardinalo kaj papo Paŭlo VIa) skribis al Burzio, ke li komuniku al Tiso, ke li kondutu laŭ maniero, kiu ´konformas al la principoj kaj sentoj de la katolika popolo en Slovakio´. Sidor respondis, ke li jam ne plu ricevas informojn el Bratislavo, ĉar la frekvencoj de la radio estas perturbataj kaj okupataj de la aliancanoj. Krom tio, okazis liberigo de malliberuloj, inter kiuj estis ĉ. 16´000 judoj, en diversaj prizonoj kaj koncentrejoj de Slovakio, kies orientan limon transpaŝis la Ruĝa Armeo. Usono minacis Slovakion, ke la deportadon de la judoj oni ne forgesos. Malgraŭ tio, la 29an de septembro okazis nova ondo de arestado de ĉirkaŭ 2000 judoj, kio estis aranĝita de Gestapo. Ŝajnas, ke inter ili troviĝis ankaŭ kelkaj usonaj ŝtatanoj. La 30an de septembro Tiso diris al Burzio, ke li tute ne kompatas la judojn, eĉ se ili estas baptitaj. Tiso konsideris la judojn kaŭzo por ĉia malbono kaj la rimedojn prenitajn kontraŭ ili necesaj. Nun ekagis ankaŭ Angelo Roncalli (posta kardinalo kaj papo Johano XXIIIa), nuncio en Istanbulo, kiu klopodis helpi al judoj en Turkio, Hungario kaj Slovakio, skribante al Tiso la peton ĉesigi la deportadojn kaj kritikante la silentadon de la papo. La plej lastan diplomatian noton

de Vatikano de la 15a de novembro 1944 Sidor respondis kun la sciigo, ke la judoj aliĝis al la partizanoj kaj batalas kontraŭ la germanoj, kion li trovis neakceptebla. Kiam Burzio konsultiĝis kun Vatikano, kion li faru, se la Ruĝa Armeo alproksimiĝos al Bratislavo, kie li rezidis, se la slovaka registaro fuĝos al Germanio kaj se la ambasadoroj de aliaj ŝtatoj forlasos Slovakion, Tardini ordonis al li resti, ĉar kiel pastro li povus helpi al la kredantoj. Fakte, Burzio restis ĝis januaro 1945 en Bratislavo, kiun li iam poste forlasis por reveni en oktobro al Romo, ĉar lia nunciejo ĉesis funkcii.

Kiel oni povas vidi, la (internacia) vatikana diplomatio ludis gravan rolon favore al la judoj en Slovakio, kie unu triono de judoj povis esti savitaj, eĉ se papo Pio XIIa publike silentis. La dokumentoj, kiujn Vatikano intertempe disponigis, pruvis, ke la Sankta Seĝo ne konsentis pri la politiko, kiun Tiso kaj la slovaka registaro aplikis rilate al la judoj. Restas la demando, kial la papo silentis, al kio aldoniĝas la demando, kiajn realajn politikajn instrumentojn kaj ekonomiajn rimedojn de povo li estus havinta por eviti la holokaŭston en Slovakio. Pro la milito la praktikaj eblecoj estis ege limigitaj por savi la judojn. Vatikano devis apliki neŭtralan sintenon por eviti riproĉojn de la militaj partioj. Restis nur la povo de moralaj argumentoj kaj la atentigado pri kristanaj principoj, la espero ke drastaj vortoj, plendoj kaj kritikoj en diplomatiaj mesaĝoj efikos kaj ke kelkaj konkretaj helpagadoj sur relative malalta praktika nivelo, kiuj probable ne impresis la fanatikajn antisemitojn, povos helpi al ili. Eĉ pli da premo kontraŭ Tiso, ekzemple la ideo ekskomuniki lin el la eklezio (ŝajnas, ke tia propono efektive aperis anonime en Vatikano), verŝajne ne povintus plibonigi la situacion de la judoj, ĉar la germanaj nazioj decidis ilian sorton, kiu ne dependis de la papo. La meritoj por helpi al la judoj do ĉefe apartenis al kelkaj vatikanaj diplomatoj, dum la slovakaj ekleziuloj devis alfronti la riproĉon, ke ili fiaskis el homa kaj politika vidpunktoj kaj morale kiel katolikaj respondeculoj.

*Helpo al kaj savado de judoj kaj solidareco en Slovakio:* Kiel oni povis vidi en la ĉi-supra priskribo, en la jaroj 1938-45 en Slovakio nek la ŝtataj organoj (ŝtatestro, registaro, parlamento), nek la eklezio (ĉefe katolika), nek la popolo reale klopodis por eviti, ke la judoj estu trafitaj de la katastrofo de la amasaj persekutado kaj senrajtigo, sed male aktive aŭ pasive, intence aŭ pro indiferenteco subtenis la rimedojn prenitajn de diversaj flankoj kontraŭ ili, por ke finfine ili estu senditaj al la naziaj koncentrejoj de la „Tria Regno“, kie la judoj de Slovakio grandparte pereis mizere en gasĉambroj aŭ pro alia kaŭzo (resume pri tio vd. ĉe Lipscher, p. 183-194). Estas do tute evidente kaj sufiĉe pruvite, ke la slovakoj kaptis idealan historian okazon por liberiĝi de ´siaj´ judoj, kiujn ili konsideris malamikoj de la nacio, eĉ se multaj homoj kredis, ke ilia mortigo ne povas esti la plej taŭga solvo.

Malgraŭ la ekzisto de kontraŭjudaj leĝoj kiel la fifama „Juda kodo“, manieroj de unuopa kaj individua helpo al judoj ekzistis en Slovakio multfacete kaj diversforme. Ili inkluzivis la pretecon kaŝadi judojn, eviti deportadon, helpi fuĝadon al eksterlando, kristanan baptadon ktp. Ankaŭ en diversaj registaraj instancoj troviĝis funkciuloj, kiuj iel klopodis helpi al la minacataj kaj persekutataj judoj. Ene de la „Juda Komisiono“ (Ústredňá Židov, UŽ) ekzistis grupo de judaj funkciuloj, kiuj klopodis eviti, ke iliaj samgentanoj estu deportitaj, ekzemple per prokrastigado de transportoj. Per tia formo de agado kelkmil judoj povis esti savitaj. Inter politikistoj kaj administraj oficistoj de Slovakio troviĝis pluraj kontaktpersonoj, kiuj iel kontribuis al la savado de judoj. Iliaj nomoj estas konataj kaj menciitaj en la ĉi-koncerna fakliteraturo. Ekzemple la ministerio de la financoj hezitis maldungi judojn, probable ĉar ĝi dependis de iliaj fakaj konoj kaj kapabloj. Ekzistis oficistoj, kiuj akceptis monon aŭ falsitajn dokumentojn kaj tiel helpis al judoj, kiujn ili ´preterrigardis´. *Ferdinand Klinda*, estro de la prezidio en la ministerio de la ekonomio, protestis kune kun *Imrich Karvaš*, guberniestro de la Slovaka Nacia Banko, kontraŭ la deportado de judoj, kiuj posedis ŝtatan protekton. La ministro pri internaj aferoj promesis, ke tiaj aferoj ne plu okazu. Unuopaj parlamentanoj kondamnis la deportadojn de judoj kiel malhomecan kaj jure dubindan aferon. La burokratio de Slovakio ne povis esti komparata kun la germana burokratio, kaj la tribunaloj de Slovakio ofte agis kaj decidis en ´ĉeĥoslovakisma´ senco kaj pli ´liberalisme´ traktis la judojn ol aliaj instancoj. Pri la rolo de la eklezio estis raportite pli supre. Judoj estis kaŝataj en monaĥejoj kaj aliaj eklezia instalaĵoj, ekzemple la „Unuiĝo de sanktaj Kirilo kaj Metod(i)o“ en Michalovce kaj la hospitalo de Sankta Elizabeto en Bratislavo kaŝis judojn, unuopaj pastroj kiel d-ro Gallo en Jarok apud Nitra, kiel A. Pozdech, pastro en Bratislavo, kaj iuj episkopoj helpis al judoj laŭ siaj ebloj. Walter Brandmüller (eklezia historiisto kaj kardinalo, kiu rifuzis la kulpon de la eklezio en la holokaŭsto) menciis ankoraŭ vicon de aliaj ekzemploj de slovakoj kaj hungaroj, kiuj helpis al judoj: ekzemple d-ron Ivan Murín, profesoro pri teologio en Nitra, d-ron Ján Balko kaj Msgr. Ján Pösténi, kiuj provis en marto 1942 submeti proponon al la Ŝtata Konsilio por kondamni la deportadon de judoj. Rimarkinda estis ankaŭ la agado de la hungara

deputito en la parlamento en Bratislavo, grafo János Eszterházy, favore al la persekutataj judoj. Li rifuzis sankcii la leĝon pri la deportado de la judoj kaj pro tio riskis akran reagon en la gazetaro de Tuka. Burzio mem transdonis al d-ro Eduard Nécsey ĉiumonate kelkmil kronojn por helpi al judoj. Ankaŭ la ĉefrabeno de Slovakio kaj aliaj estis savitaj, ĉar ili estis kaŝitaj de la franciskanoj en Beckov. Ankaŭ multaj judaj infanoj estis kaŝitaj de franciskanoj kaj alia eklezia ordeno en Žilina aŭ de iu eklezia kongregacio en Trenčín. La kristanaj sindikatoj sub la gvido de Rudolf Čavojski aplikis en sia gazeto negativan sintenon rilate al la Germana Regno. Episkopo Kmet´ko estis pritaksita kiel kontraŭulo de la germanoj kaj kiel protektanto de la judoj, malgraŭ kruda antisemitisma sinteno. Oni devas agnoski la fakton, ke ĉiuj tiuj agantoj eble faris la maksimumon por helpi al persekutataj personoj sub la tre malfacilaj kondiĉoj kaj komplikaj cirkonstancoj, kiuj tiam regis en Slovakio.

Ne malmultaj judoj trovis portempan ŝirmon ĉe kamparanoj, inter kiuj ili pace vivadis antaŭ la milito, ĉe konataj aŭ fremdaj familioj, en malsanulejoj aŭ en bunkroj, kiuj troviĝis en la montaro aŭ en urboj, ekzemple Bratislavo. Eĉ la slovaka registaro, parte ĉefministro Tuka mem, provis haltigi la detruan maŝinon de la nazioj, kie tio estis ebla.

En la aktuala listo „Justuloj inter la popoloj“ de Jad Vaŝem (stato de la 1a de januaro 2016) troviĝas 539 personoj, kiuj helpis al judoj dum la holokaŭsto en Slovakio sub la kondiĉoj de propra risko kaj danĝero esti punitaj de la germanaj kaj slovakaj regantoj, kiuj postĉasis judojn en la tuta lando kaj senkompate mortigis ilin, se ili kaptis ilin, kaj sen preni monon de ili.

Nature kaj ne plej laste, judoj mem helpis al deportotaj kaj minacataj samgentanoj. Kiam inter judoj disvastiĝis la sciigo pri deportado al la naziaj neniigejoj en Pollando, iuj judaj organizaĵoj verkis memorandon, kiun ili sendis la 5an de marto 1942 al ŝtatestro Tiso, en kiu estis menciitaj juraj, ekonomiaj kaj homaj konsideroj por eviti deportadon de judoj el Slovakio. Sed Tiso reagis laŭ sia maniero. Anstataŭ respondi al la skribintoj, li pludirektis la leteron al la polica administracio en Bratislavo kaj ordonis detalan esploron por konstati, de kie la judoj eksciis la decidon, ke oni deportados ilin. Finfine montriĝis, ke ĉiuj oficialaj kaj neoficialaj elpaŝoj kaj intervenoj de la juda flanko ne efikis por ŝanĝi la sintenon de la slovaka registaro. Inter la rimedoj helpi al la judoj, kiuj estas koncernataj de deportado, apartenis ankaŭ korupta subaĉetado de funkciuloj (kaj slovakaj kaj germanaj) pere de sufiĉe grandaj monsumoj. Tiel, ene de la „Juda Centralo“ formiĝis kontraŭleĝa grupo, kiu estis nomata „kromregistaro“ aŭ „apuda registaro“, kiu organizis helpon, starigis kontaktojn kun gravaj personoj, celis prokrasti transportojn aŭ akiris monon, parte eĉ el eksterlando, por subaĉeti decidpovajn funkciulojn. Gvida figuro de tiu „kromregistaro“ estis elstara homo, ***Ĥaim Miĥoel Dov Ber Weissmand(e)l***, rabeno de Nitra, kiu estas menciita supre. Al SS-ĉefsturmestro Wisliceny mem oni promesis havigi 40´000 usonajn dolarojn, kiu tiam estis grandega sumo. En la helpagado partoprenis ankaŭ diversaj junularaj cionismaj grupoj, kiuj klopodis savi judojn aŭ kontrabandi ilin al Hungario. (Lipscher, p. 122-8).

**Slovaka nacia ribelo de aŭgusto 1944 kaj la rolo de la judoj kaj komunistoj en ĝi**

Ĉi tiu grava kaj unika historia okazaĵo, la Slovaka Nacia Ribelo (sk. Slovenské národné povstanie), kiu estis lanĉita kontraŭ la reĝimo de Tiso en aŭgusto 1944 kaj kiun Tiso menciis en sia letero al la papo, estas konsiderata, krom la multe pli famaj dummmilitaj ribeloj de la judoj en la varsovia geto kaj de la Pola Patria Armeo, kiel sola elstara ribelo de iu popolo en la regadosfero de nazia Germanio dum la dua mondmilito. Sed nesufiĉa preparado, malbona organiz-ado de la partoprenantoj, kiuj havis tre diversajn celojn kaj interesojn, kaj la politika strategio de Sovet-unio, kiu komencis enmiksiĝi en slovakajn aferojn, kaj nature la germana potenco en Slovakio devige kondukis al la kompleta fiasko de tiu heroeca ribelo, kiu eble estis tro malforte aprezata en Okcidento, kie ĝi pli kaj pli forgesiĝis.

Kvankam la slovaka registaro kaj parto de slovakoj kunlaboradis kun la germanaj nazioj, de kiuj ili ne plu povis liberiĝi propraforte, aliaj tavoloj de la slovaka popolo ne konsentis pri tiu diabla pakto kaj estis pretaj oferi sian vivon por liberigi la patrujon de fremdaj regantoj, de la naciaj „faŝistoj“. Per tio la slovaka popolo parte savis sian honoron en la lukto kontraŭ malamiko de la civilizita homaro. Problemo estis, ke ĉefe komunistoj ludis gvidan rolon en tiu ribelo, kiun ili poste uzurpis kiel propran meriton, kvankam ekzistis ankaŭ aliaj subteraj grupoj, kiuj partoprenis ĝin. La gvidon de la (ankoraŭ malpermesata) slovakia komunisma partio transprenis en tiu fazo *Gustáv Husák* kaj *Ladislav Novomeský*, kiuj estis konsiderataj kiel „slovakaj naciaj komunistoj“, kaj kiuj malŝatis la „ĉeĥoslovakismon“ de la Beneš-registaro, kvankam tiu ne elpaŝis kiel kontraŭulo de Sovetuno. Ilia celo estis la starigo de „Slovaka

Socialisma Sovetrespubliko“. Sed Stalin ne aprobis tiun ideon. Por eviti memstarajn aventurojn en Slovakio, Stalin sendis *Karol Šmidke* kaj *Karol Bacílek* al Slovakio, kiuj devis formi la novan gvidantaron de la KP kune kun Husák kaj Novomeský. Laŭ iu memorando, kiun ili verkis en aŭgusto 1944, Slovakio devis fariĝi parto de nova federacia ĉeĥoslovaka ŝtato, en kiu la slovaka memstareco estu agnoskita. Georgi Dimitrov, bulgara estro de Kominterno, entuziasmis pri tiu plano, kiun li konsideris sola ebla solvo de la nacia demando en Ĉeĥoslovakio sub komunisma gvido.

Kvankam la registaro de Tiso ne estis tre populara en Slovakio, ĝi tamen povis dume kalkuli pri la konsento kaj subteno de vasta parto de la slovaka popolo, ankaŭ pro tio, ke Slovakio povis eviti rektan germanan okupacion kiel tio okazis en najbara Ĉeĥio, kiu eĉ estis likvidita kiel ŝtato. Multaj slovakoj konsideris sian ŝtaton, kiu eĉ ekonomie iom prosperis, komenco de la nacia sendependeco kaj kiel plenumiĝon de la naciaj revoj. Do, en la unuaj jaroj tiu entuziasma etoso pri tiu ŝtato nature ne favoris la ideon efektivigi nacian ribelon kontraŭ la reĝimo de Tiso. Nur en la plej lasta fazo de la milito, en 1944, kiam Tiso perdis sian kredindecon, kontraŭfaŝismaj fortoj, kiuj konsistis kaj el komunistoj kaj el aliaj, povis formiĝi en Slovakio. Pli kaj pli da funkciuloj, studentoj, profesoroj, politikistoj, oficiroj kaj policistoj emis subteni la kontraŭstaradon kaj estis kaptitaj de nova ondo de panslavismaj sentoj. La sekurecaj organoj perdis pli kaj pli sian kontrolon super la opoziciaj elementoj. En tia etoso ĉie en la lando ekestis malgrandaj grupoj, kies celo estis savi la landon de la antaŭvidebla pereo. Sed la opinioj kiel la batalo estu realigata, estis diverĝaj. La provo de Beneš kunordigi la opoziciajn grupojn helpe de siaj lojaluloj malsukcesis, dum la agadoj de la komunistoj estis pli taŭgaj. Tiel komenciĝis kurioza politika simbiozo inter komunistoj kaj anoj de burĝaj partioj, kiuj diskutis komunan agadon, cetere sen konsulti la londonan ekzilregistaron. En decembro 1943 ili decidis fondi novan Slovakan Konsilion kiel ĝermon de estonta registaro. La prezidio de tiu konsilio konsistis el po tri membroj de la komunistoj (Šmidke, Husák, Novomeský) kaj burĝoj (Ursíny, Lettrich, Matej Josko). Dum la ribelo tiu konsilio transprenis ŝtatajn funkciojn en la liberigitaj regionoj kaj agis kiel provizora registaro de Slovakio. Naciaj komitatoj anstataŭis la ĝisnunajn aŭtoritatojn kaj agis kiel solaj plenumantoj de la administra povo. Krom tio ekzistis partizanoj, kiujn la nacia konsilio volis utiligi por siaj celoj. Ĉar tiuj fortoj estis malbone armataj, la nacia konsilio petis helpon de Moskvo, pri kiu Klement Gottwald kaj Nikita Ĥruŝĉov, kiu tiam estis partiestro en Ukrainio, konsentis. Tiel, partizanoj el najbara Ukrainio enpenetris Slovakion por apogi la slovakiajn partizanojn, kiuj organizis diversajn sabotojn kaj atencojn kontraŭ la strukturoj de la slovaka ŝtato.

Paralele al tiuj operacoj, en printempo 1944 kelkaj altaj slovakiaj oficiroj ĉirkaŭ kolonelo ***Ján Golian*** (1906-45), kiu estis ligita kun Beneš, diskutis siajn intencojn kun lia registaro kaj planis armean puĉon. Lia plano estis sekurigi la pasejojn en la Karpatoj por ebligi al la sovetia armeo rapidan progreson en okcidenta direkto por liberigi Slovakion. Sed la kreskantaj agadoj de la partizanoj ĝenis la puĉajn preparojn kaj vekis la atenton de slovakoj kaj germanoj. La sovetianoj en Moskvo observis la planojn de la puĉistoj kun suspekto, ĉar ili timis, ke aŭ la germanoj povus invadi Slovakion aŭ Beneš povus profiti de ili, kaj anstataŭ tio rekomendis daŭrigi la partizanajn operacojn, kiujn Sovetunio apogis per aldonaj homfortoj. Sed la slovakaj komunistoj mem volis harmoniigi la partizanajn operacojn kun la armea puĉo. Kiam la 25an de aŭgusto 1944 Rumanio proklamis la militon al Germanio, la situacio komplete ŝanĝiĝis. Por Sovetunio, kiu devis ŝanĝi sian militan strategion, Slovakio perdis la prioritaton kaj estis dume lasita al la propra sorto. Malgraŭ tio, la ribelo eksplodis.

La ribelo komenciĝis heroe kaj finiĝis tragike, ankaŭ por la slovaka ŝtato mem. La partizanaj atakoj, kiuj komenciĝis en la plej lasta semajno de aŭgusto 1944 precipe en centra kaj orienta Slovakio, povis profiti de la surpriza efiko. La partizanoj eksplodigis relojn, fermis tunelojn, atakis trajnojn kun germanaj trupoj, murdis germanajn oficirojn, liberigis prizonulojn el malliberejoj kaj koncentrejoj, kie troviĝis multaj judoj, okupis fabrikojn, forpelis aŭ likvidis germanajn direktorojn. Tiel, pluraj lokoj en meza kaj norda Slovakio estis konkeritaj, kie la komandon transprenis la Slovaka Nacia Konsilio, kiu rezidis en Banská Bystrica. En la ribelo partoprenis ĉ. 16´000 batalantoj, krom komunistoj kaj burĝaj grupoj ankaŭ taĉmentoj de la ĉeĥoslovaka armeo kaj anoj de 6a Slovaka Brigado. Flanke de la judoj, kiuj konsistigis ĉ. 10% de la batalantaro, la ribelo estis lanĉita en la koncentrejoj Nováky, Sered´ kaj Vyhne, kiuj estis liberigitaj de ili. En tio elstaris la t.n. Nováky-grupo de judaj partizanoj, kiu estis apogita de paraŝutistoj el Palestino. Pluraj tiaj judaj partizanoj estis kaptitaj de la rusa armeo de la perfidulo Vlasov, kiu subtenis la germanojn, kaj estis ekzekutitaj. Viktimoj de la venĝo de la partizanoj fariĝis precipe kaj germanoj, kaj reprezentantoj de la Tiso-reĝimo, sed ankaŭ anoj de la germana popolgrupo. Prezidento Tiso, kiu ĝis nun bagateligis kaj diskreditis la partizanan movadon kiel „batalojn inter bandoj“, kiuj ne kapablas defendi sin per propraj fortoj, vokis germanan helpon. La 12an de aŭgusto la milita stato estis

proklamita. La 29an de aŭgusto germanaj trupoj kaj anoj de Sipo kaj SD sub la komando de la fifamaj nazioj Gottlob Berger kaj Hermann Höfle invadis Slovakion kaj aranĝis masakron kontraŭ „partizanaj nestoj“, mortpafante partizanojn aŭ malliberigante opoziciulojn. Sed la perdoj en la vicoj de la partizanoj povis esti rapide anstataŭigitaj kaj rekompencitaj, tiel ke la germanoj eksentis sufiĉe fortan premon. La londona ekzilregistaro sendis generalon *Rudolf Viest* por anstataŭigi la slovakan ĉefkomandiston Golian. Post kiam ***Ferdinand Čatloš***, slovaka ministro pri defendo (fakte ankaŭ li planis puĉon kontraŭ Tiso por starigi armean diktaturon por konduki Slovakion al la sovetia flanko), dizertis al la flanko de la ribeluloj, *Štefan Haššík* fariĝis nova ministro. Kiel estro de la ŝtata sekretariejo por la sekretaj servoj kaj la polico, ***Otomar Kubala***, kiu apartenis al la radikalaj anoj de la Popola Partio kaj estis ĉefkomandisto de la Hlinka-gvardio, estis unu el la ĉefaj protagonistoj de la disbatado de la nacia ribelo kaj de la sekva germana okupacio de Slovakio.

La slovakaj ribeluloj sentis sin en mizera situacio sen sovetia helpo. Kun malfruo la sovetia armeo klopodis liberigi orientan Slovakion, sed la germanoj forte kontraŭbatalis ĝin, tiel ke en tiu batalo la sovetia armeo perdis multajn soldatojn (la nombro de 100´000 tamen vekas dubon), antaŭ ol ĝi sukcesis progresi en Slovakio semajnojn post la disbatado de la ribelo. La 27an de oktobro la germanoj okupis ankaŭ la urbon Banská Bystrica, la centron de la ribelo, kie ĝi estis kunordigita. La partizanoj retiriĝis en la montaron, de kie ili daŭrigis siajn operacojn ĝis la militfino.



Kolonelo Ján Golian kaj generalo Ferdinand Čatloš (sur tanko), Viest, Berger



Bildoj de la Slovaka Nacia Ribelo (Vikipedio)



Roluloj en la tempo de la nacia ribelo en Slovakio de la jaro 1944: Šmidke, Husák, Novomeský, Gottwald, Bacílek, Ursíny, Lettrich

La bilanco de la ribelo estis konsterna: 7500 slovakaj solatoj kaj 2500 partizanoj plus 2000 civiluloj perdis la vivon en la bataloj kun la germanoj. Ankaŭ 52 anoj de la 6a Slovaka Brigado pereis, sed la plimulto de la anoj de tiu brigado tamen saviĝis. Dum siaj venĝaj operacoj la germanoj mortigis pli ol 3000 slovakojn, kiuj simpatiis kun la ribeluloj kaj mortpafis multajn slovakajn oficirojn. Rudolf Viest kaj Ján Golian estis kaptitaj de germana taĉmento apud Bánska Bystrica kaj malaperigitaj en germana koncentrejo (Flos-

senbürg), kie ili estis likviditaj en 1945. Krom tio, ĉirkaŭ 10´000 slovakoj trovis la morton post tribunaloj procesoj kontraŭ ili. La 30an de oktobro Tiso celebris la „venkon" per diservo en Banská Bystrica, salutante la armean paradon de la germanaj trupoj kaj honorigante multajn SS-oficirojn per altaj slovakaj ordenoj. La slovakoj devis transpreni la kostojn de la germana okupacio. La armeaj varoj, kiuj estis produktitaj en Slovakio, estis konfiskitaj de la germanoj kaj senditaj al Germanio. Dekmiloj (?) da slovakoj estis ekspeditaj al deviga laboro en Germanion.

La 5an de septembro 1944 ***Štefan Tiso***, doktoro pri juro, iama juĝisto en Trenčín kaj prezidinto de la Supera Kortumo de Slovakio, fariĝis nova ĉefministo de Slovako post la demisio de Vojtech Tuka. La 4an de oktobro la nova registaro prezentis sin al la slovaka parlamento. Štefan Tiso mem transprenis la ministeriojn de la eksteraj aferoj kaj de la justico. En 1945 sovetiaj trupoj pli kaj pli ´liberigis´ Slovakion de la germana okupacio. Bratislavo estis konkerita de la Ruĝa Armeo la 4an de aprilo 1945. La germana armeo forlasis Slovakion, kiu ĉesis ekzisti kiel sendependa ŝtato la 29an de aprilo 1945. La 8a de majo 1945 Štefan Tiso devis subskribi la kapitulacon de Kremsmünster.



Štefan Tiso

**Sorto de la ĉefaj protagonistoj de la slovaka ŝtato**

**Josef Tiso** fuĝis tra Aŭstrio al Bavario, kie li kaŝiĝis en iu monaĥejo (en Altötting!). Aliaj anoj de la iama slovaka registaro povis esti arestitaj kaj devis aperi antaŭ popolaj tribunaloj. **Vojtech Tuka** estis kondamnita al morto kaj ekzekutita kiel militkrimulo la 20an de aŭgusto 1946 en Bratislavo. **Aleksander Mach** ricevis punon de 30-jara arestado en malliberejo. **Ferdinand Ďurčanský** fuĝis tra Svislando al Romo, de kie li organizis la opozicion kontraŭ la nova ĉeĥoslovaka ŝtato, kaj mortis en 1974. Aliaj estis mortkondamnitaj in absentia. **Karol Sidor** migris al Kanado, kie li fariĝis gvida funkciulo de la slovaka ekzilmovado ĝis la morto en 1953. **Ferdinand Čatloš** estis kondamita en 1947 de la ĉeĥoslovaka popoltribunalo al kvinjara puno de aresto en malliberejo, sed li estis liberigita jam en 1948 kaj povis labori kiel dungito en Martin. **Martin Sokol**, prezidinto de la slovaka parlamento, estis deportita en 1945 al Sovetunio, de kie du jarojn poste li estis transdonita al Ĉeĥoslovakio, kie popoltribunalo kondamnis lin al 5-jara arestpuno, sed liberigis lin en 1949. **Otomar Kubala**, kiu organizis la retiriĝon de la slovakaj trupoj, mem retirĝis al Bohemio, kie li transdonis sin al la usona armeo. Post lia transpreno fare de la ĉeĥoslovakaj aŭtoritatoj, li estis mortkondamnita la 24an de aŭgusto 1946 kaj ekzekutita kiel militkrimulo per pafado. **Štefan Haššík** fuĝis al eksterlando, unue al Italio, poste al Argentino kaj plej laste al Klevlando en Usono, kaj estis mortkondamnita de ĉeĥoslovaka tribunalo la 11an de novembro 1947 in absentia. La 4an de majo 1945 **Jozef Sivák** estis arestita kaj kondamnita de ĉeĥoslovaka tribunalo al dujara arestado, krom tio, lia tuta posedaĵo estis konfiskita. Post la liberigo en 1947, li devis translokiĝi kun sia familio al iu sudbohemia vilaĝo, poste al Trubín, kie li forpasis en 1959. **Gejza Fritz**, kiu estis membro de la Ŝtata Konsilio, justicministro kaj estro de la Supera Konstitucia Tribunalo de Slovakio, estis kondamnita al dujara arestado. **Július Stano**, kiu estis ministro pri trafiko kaj publika laboro de Slovakio, estis kondamnita de ĉeĥoslovaka popoltribunalo al kvarjara arestado. Post sia liberigo en 1949 li laboris kiel administra dungito en Ružomberok. **Štefan Tiso** (kiu laŭ iuj fontoj estis kuzo de Jozef Tiso kaj laŭ aliaj ne estis lia parenco), plej lasta ĉefministro de Slovakio, ricevis 20-jaran arestpunon kaj mortis en la malliberejo en 1959. Otomar Kubala **Franz Karmasin**, kiu estis germana civitano, ne rajtis esti transdonita de Germanio al Prago, kie li estis mortkondamnita en 1947 in absentia (li forpasis en Germanio en

1970). Inter la ekleziuloj, episkopo **Ján Vojtaššák**, kiun Burzio karakterizis kiel „malbelan ŝoviniston“, ricevis sian proceson en julio 1950, post kiu en januaro 1951 la 73-jarulo estis kondamnita al 24 jaroj de arestado en malliberejo pro ŝtatperfido. En 1963 li estis amnestiita kaj poste vivis en libereco sub polica kontrolo. **Karol Kmeťko** forpasis en 1949, sen esti riproĉita de sia eklezio pro la kruda antisemitismo, kiun li praktikadis en Slovakio. Tute kruela kaj maljusta sorto trafis d-ron **Michal Buzalka**, helpepiskopo kaj armea vikario en Trnava, kiu aranĝis agadojn helpe al la judoj. En komunisma farsproceso li estis kondamnita al dumviva arestpuno en malliberejo, ĉar oni konsideris lin „spiono“. Lia ´krimo´ konsistis en tio, ke li sendis kiel episkopo de la slovaka armeo raportojn al Vatikano pri la situacio de la judoj el zonoj, okupataj de la sovetia armeo.

**Josef Tiso** mem estis transdonita de la okcidentaj aliancanoj al la sovetiaj instancoj kaj poste al la ĉeĥoslovaka registaro, kiu konfirmis la mortjuĝon kontraŭ li pro ŝtata perfido kaj ekzekutis lin la 18an de aprilo 1947 kiel militkrimulon, post kiam Beneš rifuzis amnestion. Tiso sentis sin „martiro de la slovaka nacio kaj de la kontraŭbolŝevisma vidpunkto“. La proceso kontraŭ Tiso, kiu estis konsiderata kiel simbolo de la „faŝisma“ Slovakio, estis pritaksata de observantoj kaj fakuloj kaj de parto de la slovakia publiko kiel maljusta farso, kiun la komunistoj, kiuj plimulte konsistigis la juĝistaron, puŝis por atingi lian likvidon kaj por povi eltiri politikan kaj moralan profiton en propraj propagandaj interesoj. En la fina pledo, kiun li prezentis al la tribunalo, Tiso rifuzis ĉian personan kulpon en ĉiuj rilatoj, dirante, ke li respektis la leĝojn de sia ŝtato kaj faris nenion kontraŭleĝan, ke li savis aŭ almenaŭ celis savi la slovakan popolon de la pereo kaj de la germanigo, ktp. La „judan demandon“ li volis solvi en maniero justa, egala kaj humaneca. La judoj devis ricevi siajn rajtojn kaj havaĵon laŭproporcie, kaj la slovakoj, al kiuj Slovakio apartenas, devis rericevi sian posedaĵon, kiu estis forprenita de la judoj laŭ li. Li konfirmis, ke li aprobis la politikon de la slovaka ŝtato koncerne la judojn, sed li firme neis kaj rifuzis ĉian kulpon pri la deportado kaj likvido de la slovakiaj judoj en la neniigejoj de la „Tria Regno“ (ĉiujn tiujn vortojn li eĉ ne menciis). La parto pri la „juda demando“ sonis ege malvarme kaj senkore, kaj ia formo de bedaŭro, pardonpeto aŭ pento pri la tragedio de la judoj, kiujn la slovakoj kaŭzis al ili, oni vane atendis. En la ĉapitro pri la demando de la kulpo ĝenerale li abstrakte teoriumis pri la motivo de certa ago farita de homo en principo, sed tio probable interesis neniun aŭskultanton en la salono. Maksimume li pretis konfesi, ke li eble ne ĉiam faris iun ĝustan decidon por aŭ kontraŭ io, kiam ĝi devintus esti farita. Sed ĉar li konsideris sin simpla homo kun malfortoj, li opiniis, ke oni ne havas la rajton kulpigi lin pro homaj eraroj. Li emfazis, ke lia tasko estis servi al la slovaka popolo, de kiu li estis ŝatata kaj subtenata, kaj klarigis, ke li neniam volis altrudi sin kiel ŝtatestron, sed ĉar oni petis aŭ devigis lin, li ne demisiis kaj daŭrigis plenumi la oficon lojale kaj konscie kun la respondeco, kiun li havis kiel politikisto, obee al la validaj leĝoj de ĈSR (ĝis la 14a de marto 1939) kaj de la posta slovaka ŝtato. Li kontestis, ke li povas esti kondamnita pro iuj krimoj, kiuj estis faritaj ekster tiuj leĝoj. La proceson, gvidatan de d-ro Igor Daxner, slovako, li konsideris politikeca kaj diris, ke estus rekomendinde konsulti la opinion de la popolo, ĉar li estis konvinkita, ke tiu popolo ankoraŭ nun kredas lin. Ktp. La mortekzekuto de Tiso sekvigis tumultojn en Slovakio, kie aperis novaj postuloj pri sendependiĝo disde la ĉeĥoj. Iuj slovakaj historiistoj eĉ strebis absolvi lin de la riproĉo de la antisemitismo, ĉar li ne subskribis la „Judan Kodon“ de 1938 kaj laŭdire estis kontraŭ la deportado de la judoj, protektante sennombrajn judojn per havigo de esceptaj leteroj. En iuj ekleziaj medioj oni eĉ volonte estus vidinta lian beatigon aŭ sanktigon. Tamen, plimulto de historiistoj ekster Slovakio konsideras Tiso-n kunaŭ eĉ ĉefrespondeca por la persekutado de judoj en Slovakio.

Cetere, Dieter Wisliceny kaj Hanns Ludin estis transdonitaj al la ĉeĥoslovakaj aŭtoritatoj, kiuj mortekzekutis ilin en Bratislavo en 1947 kaj 1948.

### Antisemitismo kaj judfobio en Slovakio post la dua mondmilito

Ĉeĥoslovakio estis unu el la malmultaj ŝtatoj, kiuj subtenis la kreon de propra juda ŝtato en 1947/48. Sed sian por-israelan sintenon ĝi rapide demetis en 1948, kiam Stalin ŝanĝis sian opinion. La plej senglora simbolo de tiu „kontraŭ-cionisma“ ŝanĝo estis la proceso kontraŭ Rudolf Slánský, kiu estis judo, kaj kiu havis evidentan kontraŭ-judan komponanton. En 1975 Ĉeĥoslovakio subskribis la UN-rezolucion n-ro 3379, kiu deklaris cionismon formo de rasismo. Sed en Ĉeĥoslovakio evoluis formo de antisemitismo, kiu ekzistas ĝis nun: antisemitismo sen judoj. Post la malfondo de Ĉeĥoslovakio en 1991/92 plej forta

„socia distanco“ rilate al la judoj estis observata en Slovakio. Tiam ĉiu tria enketito indikis, ke li/ŝi ne ŝatus havi judon kiel najbaron.

La imago, ke post la holokaŭsto la antisemitismo kontraŭ la judoj finiĝis, montriĝis iluzia. La judoj, kiuj sukcesis postvivi la ŝoaon, estis liberigitaj en la koncentrejoj kaj revenis al siaj iamaj originaj loĝlokoj, devis ofte konstati kun teruro, ke tie ili ne plu estis bonvenaj, ankaŭ en Slovakio.

Kiel montras la tre interesa studo de *Ivica Bumová,* la klopodo de la integrado de judoj en la slovakian socion post la dua mondmilito montriĝis tre malfacila. Al iuj homoj iliaj judaj najbaroj memorigis la politikajn vidpunktojn, kiuj estis influitaj de la antisemitisma propagando. En tiaj kazoj regis emo rifuzi judojn, ĉar slovakoj, kiuj akiris judajn entreprenojn dum la milito, nun timis perdi ilin. Sed ekzistis ankaŭ kazoj, en kiuj slovakoj rebonvenigis siajn iamajn judajn najbarojn kaj pretis helpi al ili. La slovakia registaro havis neniun konkretan programon por la socia kaj ekonomia reintegrado de revenintaj judoj, kio kaŭzis malkontenton sur ambaŭ flankoj. En la politika lukto inter komunistoj (kiuj gajnis la balotojn en Ĉeĥio) kaj demokratoj (kiuj gajnis ilin en Slovakio) la judoj fariĝis viktimoj de lokaj intrigoj, kaj certa parto de slovakoj nete rifuzis ilian peton aŭ postulon rehavigi al ili la iaman posedaĵon. La frustriĝo kulminiĝis en antisemitisma incidento, kiu okazis en Bratislavo komence de aŭgusto 1946. La skandalo disvastiĝis al aliaj slovakaj urboj. En Topoľčany jam en septembro 1945 48 judoj estis atakitaj kaj vunditaj. Certa nombro de judoj eĉ estis mortigitaj en Kolbasov en decembro. 13 kontraŭjudaj incidentoj (nomataj „partizanaj pogromoj”) okazis komence de aŭgusto 1946 en Žilina, kie 15 personoj estis vunditaj. Judoj estis atakitaj kaj lezitaj surstrate kaj iliaj domoj ricevis damaĝon. La politikaj instancoj de Slovakio unue bagateligis la okazaĵojn kaj poste akuzis la hungarojn vivantajn en Slovakio, ke ili lanĉis tiujn aktivecojn. Kvankam la reago de la centra ĉeĥoslovaka registaro en Prago estis pli rigora, oni maltrafis atentigi la mondon pri la nova ondo de antisemitisma perforto, kiu eksplodis en Slovakio tuj post la fino de la dua mondmilito. Tiaj kontraŭ-judaj incidentoj ripetiĝis en Bratislavo kaj en aliaj lokoj en aŭgusto 1948.

Pli detale tiuj okazaĵoj estis priskribitaj de *Michala Lônčíková* en sia leginda kontribuaĵo pri la kontraŭ-juda perforto en Slovakio post la holokaŭsto. Ĉi tiu studo aperis en libro eldonita de Wolfgang iluz, en kiu estas publikigitaj pluraj esploroj pri kazoj de perforto kontraŭ judoj en aliaj orienteŭropaj landoj tuj post la dua mondmilito, inter kiuj elstaris la „pogromo de Kielce“ en Pollando en 1946 (kiu estis esplorita kaj priskribita de J.T. Gross), sed ankaŭ aliaj kontraŭ-judaj incidentoj en Hungario, Transsilvanio kaj aliaj landoj, en kiuj judoj revenintaj el koncentrejoj ne estis dezirataj.

Plej bone konata kazo de postmilita perforto kontraŭ judoj estas la pogromo de Topoľčany de septembro 1945. Pri la kadraj kondiĉoj kaj cirkonstancoj de la problemoj oni devas scii, ke en la tempo de la Slovaka Ŝtato en tiu ĉi urbo vivis 3000 judoj, kio signifis unu trionon de la loĝantaro. Multaj judoj apartenis al la t.n. meza klaso kaj okupis gravajn poziciojn en la ekonomio kaj komerco, kaj la ĉefan tendencon de la judismo superregis la ortodoksa judaro, kiu ekzistis izolite kaj agis ekster la kristana komunumo. Dum la dua mondmilito la judoj de Topoľčany ege suferis persekutadon kaj deportadon, tiel ke nur 500 homoj travivis la holokaŭston. Pri la reveno de judoj post la milito la novaj ekonomiaj roluloj kaj posedantoj ne estis interesataj. La ekonomiaj ambicioj de la nova postmilita tavolo kombiniĝis kun tradiciaj superstiĉaj imagoj de la surlokaj loĝantoj kaj kun diversaj onidiroj kaj intrigoj, kiuj cirkuladis inter urbanoj kaj najbaraj vilaĝanoj, kio estis tre eksplodiga miksaĵo. La kontraŭjuda sinteno en Topoľčany estis apogata precipe de homoj, kiuj subtenis la Tiso-reĝimon en tiu urbo, kiu estis fakte tre forta. Kio do konkrete okazis: En la mateno de la 24a de septembro 1945 sesdeko da homoj kolektiĝis en la urbocentro. Rondiris la onidiro, ke judaj instruistoj intencas ŝtatigi la lernejojn kaj forigi katolikajn monaĥinojn, kiuj instruis en la loka popollernejo. Postaj esploroj montris, ke la 23an de septembro fine de la diservo iu sinjorino nomata Némethová sugestis, ke en la venonta mateno virinoj protestu antaŭ la loka lernejo kontraŭ tiaj intencoj. Kvankam du lokaj funkciuloj kontestis la supre menciitan informon, tiu certigo tamen ne sufiĉis por trankviligi la ekscititan plebaĉon, kiu kreskis al 160 personoj, kiu paŝis en la direkto de la lernejo, vokante kontraŭjudajn sloganojn. Sciigoj pri tiu manifestacio rapide disvastiĝis ankaŭ ekster la urbo. Dum foiro, kiu okazis en tiu tago, la onidiro, ke oni forpelis monaĥojn de la eduka instituto en Bojná, kaj provoka ŝerco de iu judino, kiu laŭdire diris, ke ĉiuj kristanaj infanoj de la urbo estos mortigitaj kiel puno por tio, kio okazis al la judoj dum la milito, eĉ intensigis la panikon kaj histerion de la agresema popolo en la urbo kaj verŝis oleon en la fajron. La fizika perforto direktis sin kontraŭ la konstruaĵo de la lernejo kaj speciale kontraŭ iu juda kuracisto Karol Berger, kiu en tiu tago vakcinis 7-8-jarajn infanojn kontraŭ la variolo, kio favoris la imagon, ke tiu juda doktoro volas mortigi kristanajn infanojn, kiuj kriis en la lernejo, kie la deviga vakcinado okazis. Post la vakcinado Berger eliris la koridoron, kie li ekvidis

20 homojn, kiuj montris minacan mienon. Post vortaj atakoj kontraŭ Berger, lin persekutis du junaj knaboj kaj komencis bati lin sur la kapon kaj dorson. Timigita, Berger kuris al la sidejo de la Ŝtata Sekureco, kiu troviĝis nur cent metrojn apude. Malgraŭ la mallonga distanco, Berger estis serioze vundita kaj devis esti sendita al la malsanulejo. Sed la Ŝtata Sekureco entreprenis nenion por forpeli la sovaĝan amason, ne kapablis protekti la viktimojn kaj perdis la kontrolon pri la sekvaj okazaĵoj, en kiuj judaj domoj estis atakitaj de la plebo. La ordo tamen povis esti restarigita tagmeze per la interveno de taĉmento de la loka armea garnizono, gvidita de kapitano Malár. La rezulto de la pogromo estis 47 damaĝitaj personoj (inkluzive 4 virinojn, 7-jaran knabinon, 13-jaran knabon kaj 72-jaran oldulon), de kiuj 15 devis esti flegitaj en la hospitalo. La pogromo ne restis limigita al la urbo Topoľčany mem, sed transsaltis al iuj najbaraj vilaĝoj kiel Žabokreky, Krásno kaj Nedanovce, kie suferis aliaj viktimoj, dum la Ŝtata Sekureco restis pasiva. Jura esploro tamen estis komencita de la civilaj kaj armeaj aŭtoritatoj, kaj tagojn poste la Demokratia Partio (DS) kaj la Komunisma Partio diskonigis la eventojn, sed evidente ĉefe kun la celo fari politikajn propagandajn riproĉojn unu al la alia. Iuj membroj, kiuj partoprenis la pogromon, ricevis punon aŭ estis senditaj al la prizono de Ilava. La pogromo vekis la atenton de politikistoj kaj estis diskutita en la ĉeĥoslovaka registaro, kiu kondamnis la perforton, kaj Viliam Široký, vicĉefministro de Ĉeĥoslovakio, persone vizitis la urbon. Kvankam iuj tribunalaj procesoj kontraŭ partoprenantoj de la progromo okazis en la 50 jaroj, la verajn kulpantojn, organizintojn aŭ iniciatintojn neniam povis esti trovitaj aŭ akuzitaj. Ankaŭ la kaŭzoj restis nebulaj, kaj iuj aktivuloj eĉ ŝovis la kulpon al la judoj mem. Neniu volis transpreni la respondecon. Laŭ la opinio de observantoj aŭ fakuloj, pri la fortigo de la kontraŭjuda etoso ŝajne estis interesataj precipe reprezentantoj de la eklezio, de la novaj domposedantoj kaj de la Hlinka-partio. La pogromo akcelis la elmigradon de judoj el Topoľčany kaj el tuta Slovakio, tiel ke judoj poste mankis en tiu urbo. Ŝajnas, ke la organizintoj de la pogromo atingis sian celon.

## Restarigo de Ĉeĥoslovakio (1945-48)

La perdita milito kondukis en iuj (ĉeĥoslovakismaj) medioj al la deziro restarigi malnovan Ĉeĥoslovakion. Nome, Ĉeĥio, konsistanta el Bohemio kaj Moravio, devis esti renaskitaj. En tio la ĉefan protagonisman rolon ludis la ĉefo de la londona ekzilregistaro, Edvard Beneš. Sed li devis varbi ĉe la venkintaj potencoj por povi realigi tiun planon, ĉar lia opinio, ke la malnova ĉeĥoslovaka ŝtato ankoraŭ jure ekzistas kaj ke li estas ĝia legitima ŝtatestro, unue ne konvinkis ilin. Sed Beneš gajnis la simpation de Francio, kie li starigis dum la dua mondmilito taĉmenton de libervolaj soldatoj por subteni la francan armeon. La „Ĉeĥoslovaka Nacia Komitato“, kiun li fondis, estis agnoskita de Parizo la 14an de novembro kaj de Londono la 20an de decembro 1939. Post la falo de Francio, Beneš translokiĝis al Londono kaj nomis sian komitaton „Provizora Registaro de Ĉeĥoslovakio“. La 21an de julio 1940 la brita registaro agnoskis ĝin kaj konsentis disponigi al ĝi la necesajn financajn rimedojn. Beneš transprenis la prezidon kaj nomis la moravian katolikan pastron (!!!) Ján Šrámek (1870-1956), estron de la Ĉeĥa Popolpartio (!!!), kiu kunlaboris en multaj ĉeĥoslovakaj registaroj, ĉefministro. Slovakaj ekzilpolitikistoj estis akceptitaj nur se ili montris „konvinkan ĉeĥoslovakan sintenon“, ĉar la ĉagreno de la ĉeĥoj pri la slovakaj „perfiduloj“, kiuj esence kontribuis al la detruo de la ĉeĥoslovaka ŝtato, estis granda kaj pluekzistis ankaŭ en la ekzilo. Post la germana atako kontraŭ Sovetunio la 18an de julio 1941, ankaŭ Moskvo agnoskis la provizoran registaron de Beneš. Post tio la samon faris la usonanoj. La Munkena Interkonsento de 1938 estis nuligita, kio signifis, ke la malnovaj limoj de Ĉeĥoslovakio estis revalidigitaj. Dum la okcidentaj potencoj estis kulpigitaj, ke ili neglektis kaj perfidis Ĉeĥoslovakion, kiam ĝi bezonis urĝan helpon en malfacila momento de la historio en 1938, la prestiĝo de Sovetunio kreskis. Kun ĝi la 12an de decembro 1943 Beneš ubskribis kontrakton pri „amikeco, reciproka subteno kaj kunlaboro post la milito“ en la kredo, ke al Ĉeĥoslovakio utilos bonaj rilatoj kun Sovetunio. Pri la partopreno de la komunistoj en la nova registaro, kiu estis postulata de Stalin, Beneš intertraktis kun Gottwald, la estro de la ĉeĥoslovaka ekzilo en Moskvo, kiu antaŭnelonge ankoraŭ insultis lin kiel vasalon de la okcidentaj potencoj. Anstataŭ parlamenta sistemo, postmilita Ĉeĥoslovakio estu regata de „Nacia Fronto“, kiu unuigas ĉiujn „kontraŭ-faŝismajn“ partiojn, kaj anstataŭ la Slovaka Popolpartio, kiu estu malpermesita, la Slovaka Nacia Konsilio ludu gvidan rolon. Beneš konsentis, kun fatalaj sekvoj.

Sed la aferoj ne evoluis laŭ la deziro de Beneš. En oktobro 1944 la sovetia armeo okupis „Karpatan Ukrainion“, kies enloĝantoj laŭte postulis aliĝon al Sovetunio, kio ankaŭ okazis. Tio signifis, ke Ĉeĥo-slovakio perdis konsiderindan parton de sia ŝtata teritorio. Nacia Kongreso, kiu estis superregata de la

komunistoj, en novembro elektis Nacian Konsilion, kiu transprenis la registaran laboron. La londona ekzilregistaro protestis, sen efiko. Ankaŭ en Slovakio aperis postuloj starigi sovetian respublikon, sed tio tamen ne okazis, ĉar la sovetia registaro respektis la volon de Slovakio fariĝi parto de Ĉeĥoslovakio. Tamen, en la regionoj de Slovakio, kiuj estis liberigitaj de la Ruĝa Armeo, la Slovaka Nacia Konsilio transprenis la povon sub la aŭspicio de la sovetia armea administracio kaj en kunlaboro kun iamaj partizanoj kaj malliberuloj, kiuj devis purigi Slovakion de iamaj kunlaborantoj de la Tiso-reĝimo. Tiel, kun la apogo de la sovetia sekreta servo kaj de sovetiaj „konsilantoj", la komunistoj rapide gajnis la kontrolon en Slovakio.

Post akra diskutado pri la personaro formiĝis la unua ĉeĥoslovaka registaro, kiu konsistis el *Zdeněk Fierlinger,* maldekstra socialidemokrato, kiu fariĝis ĉefministro, *Klement Gottwald,* anstataŭanta ĉefministro, kaj ***Viliam Široký,*** posta estro de la Slovaka Komunisma Partio. La ĉeĥoslovaka KP ricevis ŝlosilajn ministeriojn, kaj la slovakaj ministroj ricevis nur la agrikulturon kaj socian sekurecon. La slovako ***Vladimír Clementis*** (1902-52) fariĝis ŝtata sekretario kaj havis la taskon ´asisti´ la senpartian ministron pri eksteraj aferoj, *Ján Masaryk,* filo de la ŝtatfondinto. La ĉeĥo *Ludvík Svoboda,* senpartia simpatianto de la komunistoj, fariĝis ministro pri defendo. Kun tia registara konsisto, la ambicioj de la komunistoj kaj la influo de Sovetunio fariĝis klare, ke la ŝtato de T.G. Masaryk ne trovis saman daŭrigon. En la balotoj rajtis partopreni nur la partioj de la „Nacia Fronto", al kiu la malpermesita Slovaka Popolpartio ne apartenis. La germanaj kaj hungaraj popolgrupoj estis ekskluditaj kaj la rutenoj transiris al Sovetunio. La ekonomio devis esti „naciigita" kaj reorganizita laŭ socialisma maniero. La komunistoj esperis, ke la popolo subtenos tiun politikon.

La slovakoj vidis la tutan aferon iom alimaniere. Precipe Ďurčanský (1954) polemikis kontraŭ la restarigo de Ĉeĥoslovakio sub la gvido de la ĉeĥoj kaj de Beneš, kiun li profunde malŝatis, ĉar li opiniis, ke li ne respektis la deziron de la slovakoj esti sendependaj, memstaraj kaj liberaj. Ďurčanský argumentis, ke la Slovaka Ŝtato, kiu estis fondita en 1939 ankoraŭ en tempo de paco kaj diplomatie agnoskita kaj rekonata de iure aŭ de facto fare de dekoj da aliaj ŝtatoj, ne pereis, malgraŭ germana okupacio kaj malgraŭ perdita milito de Slovakio je la flanko de Germanio, kiel Usono interpretis la juran staton de Slovakio. Laŭ Ďurčanský la Slovaka Ŝtato do pluekzistis kiel subjekto de la internacia juro, kvankam ĉeĥoj, okcidentanoj kaj Sovetunio havis alian opinion. Male, Ďurčanský estis konvinkita, ke Ĉeĥoslovakio pereis kaj ne plu ekzistas kiel ŝtato, des pli ke en 1948 ĝi perdis sian suverenecon favore al Sovetunio, kies armeo okupis Slovakion, pro kio oni devus konsideri Slovakion teritorio okupata de Sovetunio.

En sia katalogo, kiun la prezidio de la Slovaka Nacia Konsilio ellaboris dum sia konferenco, okazinta de la 28a de februaro ĝis 1a de marto 1945 en Košice, kaj kiun ĝi submetis al la stalinistoj en Moskvo, estis postulate, ke en la onta komuna ŝtato la kunekzistado de slovakoj kaj ĉeĥoj baziĝu sur absoluta egaleco. Ambaŭ popoloj devis ricevi proprajn landajn parlamentojn. Krom tio, la Slovaka Nacia Konsilio postulis ricevi proprajn kompetencojn sur la kampoj de la interna, jura, kleriga kaj socia politiko. Por rapidigi la ekonomian evoluon en Slovakio la konsilio rekomendis konservi propran ekonomian unuon kun propra valuto. Kvankam Beneš distanciĝis de siaj originaj centrismaj imagoj, li rifuzis la federaciajn proponojn de la slovakoj, kaj ankaŭ la ĉeĥaj partioj malaprobis la slovakan „separatismon" kaj ne estis pretaj havigi al la slovakoj pli ol kultura aŭtonomeco. La slovakaj vidpunktoj estis vigle defendataj de ***Gustáv Husák*** (1913-91), kiu uzurpe heroigis la slovakan nacian ribelon kiel meriton de la komunistoj (lia ĉi-rilate verkita libro aperos en la 60aj jaroj). Tiel, la slovaka nacia demando, kiu ekzistis ankaŭ en la unua respubliko, restis konservata ankaŭ post 1945. En iu kompromisa interkonsento, kiu antaŭvidis agnoski la slovakojn etne memstara nacio, la Nacia Konsilio estis konfirmita kiel reprezentanto de la ŝtata povo en Slovakio, kaj ĉiuj decidoj, kiuj koncernis la komunan ŝtaton, devis esti prenitaj kun la konsento de la Slovaka Nacia Konsilio. Tiel formiĝis nedeviga ŝtata konstruaĵo kun ĉeĥaj, slovakaj kaj tutŝtataj organoj, sed la konkretaj kompetencoj devis esti reguligitaj „poste".

Ĉar la provizora registaro de Ĉeĥoslovakio, kiu estis formita en Moskvo, havis sian unuan kunsidon en la 5a de aprilo 1945 en Košice, la registara programo nomiĝis „programo de Košice". Kaj unu tagon post kiam la sovetiaj tankoj atingis Pragon, la ĉeĥoslovaka registaro eklaboris en la malnova kaj nova ĉefurbo. La partioj, kiuj diktis la tonon en tiu registaro, estis la ĉeĥa kaj slovaka KP. La fakto, ke la lando estis liberigita de la Ruĝa Armeo, nature havigis al tiuj partioj la necesan legitimecon kaj privilegiitan pozicion en la politiko. En aprilo 1946 la komunismaj partioj nombris jam pli ol unu miliono da membroj, ne nur inter laboristoj, sed ankaŭ intelektuloj apartenis al ili. Multaj slovakoj konsideris la komunistojn garantianto de pli moderna kaj pli progresema, pli liberala (!) kaj pli justa socio. Eĉ anoj de burĝaj partioj kredis, ke Sovetunio estas fidinda protektanto de la renaskiĝinta respubliko. Ŝajnas, ke la ekonomian

ŝtatigon, la forpeladon de minoritatoj, la tribunalajn amasprocesojn kaj la „kontraŭfaŝismajn“ purigajn operacojn, kiuj enkondukis la reorganizadon de la politiko kaj socio de Ĉeĥoslovakio, evidente neniu kritikis. La germanoj kaj hungaroj estis stigmatizataj kiel „suspektindaj elementoj“. Malgraŭ tio, la hungara minoritato ne estis ĝenerale ekscivitanigita. Male, la registaroj de Ĉeĥoslovakio kaj Hungario interkonsentis interŝanĝi saman kvanton de hungaroj kaj slovakoj. Tiel 73´000 slovakoj el Hungario povis reveni al Slovakio, dum 68´000 slovakiaj hungaroj estis translokitaj al Hungario.

La 28an de oktobro 1945 unuafoje kunvenis la Provizora Nacia Asembleo en Prago. Ĝiaj deputitoj estis elektitaj laŭ interkonsentita ŝlosilo. Ĉiu partio de la Nacia Fronto havis po 40, la du slovakaj partioj ricevis po 60 mandatoj. La komunistoj posedis kune 90 mandatojn de entute 300 membroj. La dato de la unuaj postmilitaj balotoj estis fiksita je la 26a de majo 1946. Interesa en tiu ĉi rilato estis la fakto, ke la nombro de la slovaka popolo kreskis, kio influis la nombron de voĉdonrajtaj civitanoj.

Slovakio tamen troviĝis en malfacila situacio. Unue, la Slovaka Nacia Konsilio ne kapablis starigi efikan landan administracion. La radikala purigo de la socio de „kunlaborintoj“ de la Tiso-reĝimo kaj la malaperinta juda inteligentularo, inter kiu troviĝis multaj kvalifikitaj laborfortoj, postlasis grandan vakuon. Tio kaŭzis novan dependecon de la ĉeĥoj, kiuj devis transpreni iliajn funkciojn en Slovakio, inter kiuj troviĝis ankaŭ multaj nekvalifikitaj fortoj, ekzemple iuj partizanoj, kiuj ricevis certajn postenojn nur pro siaj historiaj meritoj dum la ribelo. En Prago oni, t.e. la „ĉeĥoslovakistoj“, nature eluzis tiun situacion por eviti la slovakan emancipiĝon kaj limigi la kompetencojn de la slovakia landoparto. Krom tio, la kvereloj inter la komunistoj kaj la gvidantoj de la Demokratia Partio de Slovakio akriĝis kaj profundiĝis, kun neeviteblaj fatalaj sekvoj. Ili paralizis la laboron de la Slovaka Nacia Konsilio kaj blokis ĝiajn klopodojn por kontraŭstari la uzurpajn intencojn de la centra registaro en Prago. Ankaŭ la ĉeĥoslovaka KP mem ne tro subtenis la slovakajn kamaradojn, se temis pri la antaŭenpuŝado de naciaj slovakaj interesoj. Tiel, la duobla premo kontraŭ Slovakio kreskis kaj flanke de la centraj ĉeĥoslovakaj organoj kaj partioj kaj flanke de la komunistoj, kiuj pli kaj pli krude puŝis siajn ideojn kaj ambiciojn kaj altrudis siajn interesojn kaj konvinkojn. Kiel interkonsentite en Moskvo, la Slovaka Nacia Konsilio devis submetiĝi al la centra registaro en Prago. La prezidio de la Slovaka Nacia Konsilio kaj la slovaka parlamento (pleno de la Nacia Konsilio) restis formale konservataj, sed iliaj funkcioj estis pli kaj pli subfosataj, kaj la malklara jura situacio favoris tiun malstabilan situacion.

Kiam la Slovaka Nacia Konsilio postulis fiksi la promesitan federiĝon de la respubliko en la konstitucio, Gottwald reagis nervoze. Li admonis la slovakojn, ke ili ne insistu pri tridimensia solvo, sed nur interkonsentu pri la kompetencoj de la centro kaj la slovaka landoparto. Tiel, komence de junio la Slovaka Nacia Konsilio cedis kaj konsentis pri solvo, kiu estos nomata „politika asimetrio“, kaj tiel Ĉeĥoslovakio fariĝis nek centrisma nek federisma ŝtato de du egalrajtaj respublikoj. La problemo estis, ke la slovakoj ja posedis siajn proprajn parlamenton kaj registaron, dum en Ĉeĥio analoga strukturo mankis. En Prago rezidis nur la Nacia Asembleo kaj la registaro por tuta Ĉeĥoslovakio, kie precipe ĉeĥoj diktis la tonon, kio nature ne povis plaĉi al la slovakoj. Do, la tensioj inter ambaŭ ´frataj´ popoloj, ĉeĥoj kaj slovakoj, denove kreskis: Slovakoj malfidis la ĉeĥojn, pri kiuj ili pensis, ke ili povus akapari la tutan kontrolon pri la ŝtato, kaj ĉeĥoj suspektis la slovakojn pro separatismo. Eĉ en la gvidaj organoj de la slovaka KP eksplodis kverelo inter ´centristoj´ kaj ´naciistoj´, tiel ke Gottwald vidis sin devigita interveni, ĉar lia frakcio jam delonge elektis la centrismon. Lia zorgo estis, ke li ne perdu la kontrolon super la kapricaj kamaradoj, kaj admonis ilin konservi la disciplinon. La slovaka KP restis memstara, sed ´naciismaj´ funkciuloj estis anstataŭigitaj per ´lojalaj´ kamaradoj el Moskvo. Tiel, en aŭgusto 1945 ***Viliam Široký*** fariĝis nova ĉefo de la slovaka KP, kiu komplete submetis ĝin al la centro.



Šrámek, Svoboda, Gottwald, Fierlinger, Široký, Clementis

Ĉar en la kvereloj kun Prago la slovakaj komunistoj pli kaj pli silentiĝis, venis la momento por la Slovaka Demokratia Partio (SDP) por defendi la naciajn interesojn. Ĉi tiu partio estis fondita en septembro 1944 de ***Ján Ursíny, Jozef Lettrich, Martin Kvetko, Fedor Hodža*** kaj ***Ján Lichner***, sed la fonda kongreso okazis nur en aprilo 1945 en Košice. Kiam la kompetencoj de la Slovaka Nacia Konsilio estis eĉ pli limigitaj, la protagonistoj de SDP reagis malagrable. Oni troviĝis en la periodo antaŭ la balotoj, en kiu la slovaka katolika eklezio rekomencis ludi rolon, esprimante sian subtenon al la demokratoj. Per tio SDP praktike anstataŭigis la malpermesitan Slovakan Popolpartion, garantiante al ĝi la potencialon de voĉdonantoj, kiujn antaŭmilite havis SPP. Kompreneble, la komunistoj tuj komprenis la novan danĝeron kaj adekvate reagis per vasta misfamiga propaganda kampanjo kontraŭ la nova kontraŭulo, kiu falis neatendite kvazaŭ de la ĉielo. Tiel, en la balotoj de la 26a de majo 1946 la ĉeĥoslovaka KP kandidatiĝis nur en Ĉeĥio, kiu tie gajnis 43,3 procentojn de la voĉoj, kio estis konsiderata kiel grandega sukceso, ĉar neniu KP en Eŭropo iam ajn ricevis tian subtenon. La ĉeĥoslovakaj komunistoj vidis sian ´ĝustan vojon´ konfirmita. En Slovakio la slovaka KP rikoltis nur 36,7 procentojn de la donitaj voĉoj kaj do restis malantaŭ la Demokratia Partio, kiu tie ricevis 62 procentojn de la donitaj voĉoj. La gajnintaj demokratoj interpretis la rezulton kiel esprimon kontraŭ komunismo kaj por federacia ŝtatformo. Stalinisto Gottwald reagis per punprediko kontraŭ la slovakaj komunistoj, al kiuj li riproĉis malkapablon puŝi la „popoldemokratian reĝimon“ antaŭen kaj vidis ĉe ili la kulpon, ke la malnovaj „reakciaj“ fortoj de la adeptoj de Hlinka kaj Tiso venkis. Gottwald konkludis, ke la „faŝismaj“ tendencoj en Slovakio devos esti reduktitaj kaj ke la partio devos pli rigore gvidi la slovakajn komunistojn por atingi tiun celon. Por la slovakaj demokratoj tiu situacio signifis, ke ili devis lukti mem por siaj interesoj en la tutŝtataj organoj, kio estis malfacila afero sen komunistoj, kiuj ne estis interesataj kunlabori kun la demokratia partio. Gottwald scipovis eluzi tiun embarason kaj trovis manieron por plene submeti Slovakion al la praga centro, kaj li ankaŭ ricevis la necesan apogon por tio kaj fine venkis.

Sekvis brutala finkalkulado de la komunistoj kun la slovakaj demokratoj. La sekurecaj servoj de Slovakio jam estis komunisme subfosataj kaj pretis kontraŭbatali la opozicion ankaŭ per kontraŭleĝaj rimedoj. Retorika protagonisto en tiu kampanjo estis Gustáv Husák, kiu riproĉis al la demokratoj, ke ili „kondukis Slovakion al serioza politika krizo“, ĉar ili koketis kun la faŝisma subtera movado. Katolikaj membroj de SDP estis arestitaj kaj submetitaj al lacigaj esploraj interparoloj. Sed la provo forigi la demokratian partion el la „Popola Fronto“ fiaskis pro la rezisto de la nekomunismaj partioj en Ĉeĥio. Nun la komunistoj tiris ĉiujn registrojn. Kiam Beneš feriis en Slovakio, oni ŝajnigis atencon kontraŭ li, kio sekvigis ondon de arestoj de suspektindaj personoj fare de la sekurecaj servoj. Ankaŭ Ján Ursíny, gvida demokrato, kontraŭulo de la Tiso-reĝimo kaj partopreninto en la slovaka nacia ribelo, estis arestita, kio havis la sekvon, ke li kaj aliaj membroj de SDP demisiis. Okazis manipulitaj publikaj protestoj kontraŭ SDP kun la celo diskrediti ĝin en la publiko kiel perfidulon. Gottwald vojaĝis al Bratislavo por konvinki la demokratojn ĉesigi sian aktivecon, sed ĉar li ne ricevis la subtenon de la nekomunismaj partioj de Ĉeĥio, lia sukceso estis malgranda. La komunistoj bezonis tri pliajn monatojn por elŝalti la demokratojn.

### Stalinisma regado post „glora februara revolucio“ aŭ „komunisma puĉo“ (1948-89)

Certe, Stalin jam delonge enfokusigis Ĉeĥoslovakion por fari ĝin parto de la sovetia bloko. kaj Churchill fatale kunludis ĉe la disdivido de Eŭropo laŭ influzonoj en Jalto en februaro 1945, kiu estis grandega honto, kiun la orienteŭropaj popoloj neniam forgesos. Ĉi tiu temo estas aparta ĉapitro kaj ne povas esti detale traktata ĉi tie.

La vico por submeti Ĉeĥoslovakion al la komunisma imperio venis en februaro 1948, kiam la kvereloj en la praga registaro atingis sian kulminon, kiam la burĝaj membroj de la registaro, kiuj celis eviti la komunisman potencon kaj fini la stalinisman teroron en la lando, postulis de la komunisma ministro pri internaj aferoj, Václav Nosek, ĉesigi la komunisman subfosadon kaj nuligi la nomumon de komunismaj policaj oficiroj. Ĉar li rifuzis fari tion, la ministroj de la Ĉeĥaj Socialistoj, de la Ĉeĥa Popolpartio kaj de la Slovakaj Demokratoj spontane proponis sian demision. Sed la kalkulo de la burĝoj ne plenumiĝis, ĉar nur unu socialdemokrato aliĝis al tiu propono, kaj la senpartiaj ministroj, inter ili Ján Masaryk, ministro pri eksteraj aferoj, ne volis demisii. La komunistoj konservis la plimulton en la registaro, tiel ke ĝi restis decidpova. Beneš, kiu aprobis la decidon de la burĝaj partioj, sindetenis. Gottwald ruze eluzis la situacion, publike deklarante la konduton de la burĝaj partioj „konspiro“, kaj alvokis

kontraŭstaradi la „reakcion“. Iu komunisma agadkomitato organizis ´spontanajn´ amasmanifestaciojn, kaj armitaj sindikatanoj kaj iamaj partizanoj patroladis tra la urboj kaj minacis per ĝenerala striko. En la tuta lando oni postulis sociekonomian ŝanĝon sub la gvido de la komunistoj. En tia manipulita etoso de kvazaŭ-intercivitana milito, Beneš, iam maljuna kaj malsana, la 25an de februaro akceptis la demision de la burĝaj ministroj kaj konfirmis la registaron de la „Renovigita Nacia Fronto“ de Gottwald, al kiu apartenis nur komunistoj, maldekstraj socialdemokratoj kaj personaj lojaluloj de Gottwald. Nun la komunistoj kontrolis ĉiujn ŝlosilajn ministeriojn, kaj la gvidanto de la slovakaj komunistoj, Široký, fariĝis vicĉefministro en la reformita registaro. Ankaŭ en Slovakio la komunistoj venkis la batalon kontraŭ la nekomunismaj fortoj. Husák, estro de la „Komitato de la Komisiitoj“ (sk. Zbor povereníkov), kiu estis la plenuma instanco de la Slovaka Nacia Konsilio, eksoficigis ĉiujn demokratajn sekciestrojn. Jozef Lettrich estis devigita rezigni pri sia ofico kiel prezidanto de la Slovaka Nacia Konsilio kaj estis anstataŭigita per la malnova komunisto Karol Šmidke. *Čas* (Tempo), la plej lasta libera gazeto eldonita de la slovakaj demokratoj, estis malpermesita. La Nacia Asembleo en Prago, el kiu multaj deputitoj fuĝis aŭ estis arestitaj, la 9an de majo 1948 akceptis novan konstitucion, la t.n. Gottwald-konstitucion, kiu estis verkita laŭ sovetia modelo kaj proponita de la komunistoj. En ĝi la slovakoj estis nomitaj unu el la „frataj popoloj“. Sed Beneš rifuzis konsenti pri tiu konstitucio kaj demisiis kiel ŝtatestro la 7an de junio. Ĉefministro Gottwald transprenis laŭkonstitucie la taskojn de la prezidento kaj donis la necesan subskribon. Ĉe la parlamentaj balotoj, kiuj estis okazigitaj la 30an de majo, rajtis partopreni nur kandidatoj de la unueca listo, kiu estis purigita de nekomunismaj opoziciaj elementoj. Anstataŭ la Slovaka Demokratia Partio, du novaj „burĝaj“ slovakaj partioj, la „Renoviga“ kaj la „Libereca“ partioj, ambaŭ lojalaj organizaĵoj de la slovakaj komunistoj, partoprenis en la balotoj. Laŭ anticipe fiksita ŝlosilo ambaŭ komunismaj partioj pretendis 211 de 300 mandatoj en la Nacia Asembleo. La 27an de junio la socialdemokratoj unuiĝis kun la komunistoj, kio ebligis al la ĉi-lastaj pligrandigi sian kapaciton en la tutŝtataj parlamento kaj registaro. Tiel, la „glora februara revolucio“, kiu estis nomata en Okcidento „praga ŝtatpuĉo“ de komunistoj, venis al sia sukcesa fino. Iom post iom estis kreata nova klientaro, kiu aranĝis sin kun la reganta partio, kiu donis privilegiojn al lojaluloj, kiuj akceptis la novan sistemon kaj senkritike kunlaboris kun la komunisma partio, kiu ekskludis, subpremis kaj persekutis ĉiujn aliajn, kiuj aktive kontraŭis ĝin. Kvankam iuj idealistoj inter la komunistoj estis seniluziigitaj pri la nova realeco, la plimulto tamen montris sin simpatiantoj, ĉu pro konvinko, pro oportunismo aŭ pro manko de alternativo.

Post sia akaparo de la povo la komunistoj kontraŭbatalis la slovakajn naciistojn. En la administracio de Slovakio 6000 oficistoj estis forigitaj kaj anstataŭigitaj per ĉeĥaj funkciuloj pro politikaj aŭ naciaj kialoj. Laŭ la kompreno de la ĉeĥoslovakaj komunistoj, la „venko de la laborista klaso“ faris la burĝan slovakan naciismon superflua. Slovakio povis konservi siajn registaron kaj nacian konsilion, sed tiuj organoj funkciis pli malpli formale kaj kiel modelo en la senco de la malnova leninisma nacia politiko. La taskoj de la Slovaka Nacia Konsilio limiĝis al la sferoj de la klerigo kaj kulturo, se tio kongruis kun la tutŝtata plano. Leĝaj iniciatoj el Slovakio devis esti subskribitaj de la ĉeĥoslovaka ĉefministro por havi ŝancon esti konsiderata de la pragaj politikistoj. La membroj de la plenuminstanco de la Slovaka Nacia Konsilio, la „Konsilio de la Komisiitoj“, devis esti konfirmitaj de la ĉeĥoslovaka registaro, kaj la ĉeĥoslovakaj ministroj havis la rajton rekte enmiksiĝi en la aferojn de Slovakio, kiu estis pli kaj pli administrata rekte de Prago.

En julio 1948 la centraj partiaj instancoj likvidis la memstarecon de la slovaka KP, kiu estis kunfandita kun la centra ĉeĥoslovaka KP. Ŝajnas, ke tio ne okazis sen akraj kvereloj en la partio mem. La slovakaj komunistoj ricevis la nuran funkcion plenumi la ordonojn el Prago. Kamaradoj, kiuj ne emis obei, estis forigitaj de la partio.

Sub la farsa titolo „popoldemokratio“ Ĉeĥoslovakio do estis fere regata de la komunisma partio, kiu ludis la „gvidan rolon“ en la ŝtato kaj socio. Ĉiuj esencaj decidoj en la lando estis faritaj de tiu „reganta“ partio, kiu kontrolis la politikon, la legislativon, la justicon kaj la ekonomion. Ja ekzistis aliaj partioj, nomataj „blokpartioj“, sed tiuj fakte estis nuraj servistoj de la KP, kvankam formale ili estis memstaraj. Ĉiuj nekomunistoj kaj komunistoj, kiuj rifuzis submetiĝi al la disciplino de la oficiala politiko, ricevis gravajn problemojn. Ján Ursíny, unu el la estroj de la Demokratia Partio, estis arestita pro „konspira agado kontraŭ la ŝtato“. Dek ses membroj de tiu partio estis akuzitaj, ke ili kunlaboris kun slovakaj elmigrintoj en Okcidento kaj ricevis kune 99 jarojn da arestpuno. Dum Ursíny, Bugár, Kempný, Styk kaj aliaj estis koncernitaj de tiu verdikto, Lettrich, Kvetko, Böhm, Fraštacký kaj Hodža elmigris al eksterlando. Ankaŭ dek tri iamaj deputitoj de la Socialisma Partio estis kondamnitaj aŭ al la morto aŭ al dumviva arestpuno en malliberejo. La socialisma deputitino Milada Horáková estis la unua virino en Ĉeĥo-

slovakio, kiu estis ekzekutita (en junio 1950), dum la gvida socialisto Bohumil Laušmann povis fuĝi al Aŭstrio, kie poste li estis kaptita de la ĉeĥoslovaka sekureca servo kaj mortis sub neklaraj kondiĉoj en 1963 en praga prizono.

Senkompate la komunistoj batalis ankaŭ kontraŭ la katolika eklezio. En oktobro 1949 la ĉeĥoslovaka registaro submetis ĉiujn religiajn komunumojn al la kontrolo de speciala oficejo por ekleziaj aferoj. La tuta eklezia posedaĵo estis konfiskita de la ŝtato. Tio estis akompanata de akra misfamiga kampanjo kontraŭ la eklezio, kaj en multaj farsprocesoj episkopoj kaj pastroj estis ĉikanitaj per absurdaj akuzoj. Sep episkopoj kaj du mil pastroj retroviĝis en malliberejoj. En pasko 1950 okazis grandskala arestado de membroj de ordenoj kaj monaĥejoj. Multaj el ili estis devigitaj labori en fabriko, religiaj ordenoj kaj gazetoj estis malpermesitaj, porpastraj seminariejoj estis fermitaj, kaj la posedaĵo de la monaĥejoj estis konfiskita de la ŝtato. En Slovakio Husák fariĝis komisaro por ekleziaj aferoj (li tamen almenaŭ kritikis la fermon de monaĥejoj kaj la arestadon de ekleziuloj). Iuj ekleziuloj povis daŭrigi sian laboron kiel ŝtataj oficistoj, sed ili devis akcepti la superecon de la komunisma partio kaj estis severe punitaj, se ili fuŝis siajn devojn kaj lezis la validajn leĝojn. Infanoj de religiuloj ne rajtis studi en universitato. La grek-katolika eklezio estis devigita integriĝi en la ŝtate kontrolata ortodoksa eklezio.

Post kiam la komunistoj elŝaltis siajn nekomunismajn malamikojn, ili komencis purigi la homojn en la propraj vicoj. Iliaj viktimoj estis unuavice aŭ komunistoj, kiuj pasigis la militan tempon en la okcidenta emigracio, aŭ ili estis judoj aŭ „burĝaj naciistoj“. Partoprenantoj en la slovaka nacia ribelo de 1944 estis akuzitaj pro tio, ke ili engaĝiĝis por naciaj celoj kaj perfidis komunismajn interesojn. Por persekuti proprajn kamaradojn Gottwald ricevis rektan benon de Stalin en Moskvo, kiu aranĝis tiajn kampanjojn en ĉiuj landoj de la sovetia bloko. Post la skismo kun la jugoslaviaj komunistoj en 1948 estis lanĉita histeria kampanjo kontraŭ ĉiuj „titoismaj perfiduloj“, kiuj estis troveblaj en ĉiuj socialismaj landoj. Ĉirkaŭ dek mil komunistoj estis arestitaj. Estis organizitaj specialaj farsprocesoj kontraŭ Nosek, Loebl, Novomeský, Šmidke, Horvath, Holdoš, Okáli, Clementis, Husák kaj Slánský, kiuj perdis siajn postenojn, estis malliberigitaj, elpuŝitaj el la partio aŭ mortkondamnitaj kaj ekzekutitaj (kiel Clementis kaj Slánský en 1952). Ili ĉiuj estis anstataŭigitaj per lojalaj ´moskvanoj´.

Klement Gottwald forpasis la 14an de marto 1953 hazarde kelkajn tagojn post la morto de Stalin. Novaj potenculoj de Ĉeĥoslovakio fariĝis la triopo *Antonín Zápotocký* (oficiala posteulo), *Viliam Široký* (ĉefministro) kaj *Antonín Novotný* kiel nova estro de la ĉeĥoslovaka KP. Ĉiuj estis konataj kiel fidindaj marionetoj de Moskvo. Al Bratislavo la praga registaro sendis la lojalan kontroliston Bacílek, kie li fere regis la slovakan KP kiel nova ĉefo kaj krude subpremis la malkontentecon de slovakaj laboristoj. Ĉeĥaj funkciuloj estis multnombre senditaj al Slovakio por daŭrigi la jurajn procesojn kontraŭ ĉiuj kontraŭuloj kaj kritikantoj de la oficiala partia linio. En aprilo ankaŭ 1954 Husák estis kondamnita kaj devis iri en malliberejon por multaj jaroj. Kvankam en Ĉeĥoslovakio mortkondamnoj ne plu estis esprimitaj kaj la poststalinisma reĝimo fariĝis iom pli milda, ĝi restis same aŭtokratiisma, absolutisma kaj totalisma kiel antaŭe. Ĉeĥoslovakio fariĝis aŭ restis unu el la plej malmolaj diktaturoj de la komunisma mondo.




Ĉeĥoslovakio de 1948-90 kadre de la „orienta bloko“ kiel satelita ŝtato aŭ bufra zono de Sovetunio

En la ekonomion de Ĉeĥoslovakio estis enkondukita la sovetia stalinisma planmodelo, kiu ruinigis la altnivelajn ekonomiajn strukturojn, standardon kaj kvaliton de Ĉeĥoslovakio, precipe Bohemio, kiel ili ekzistis antaŭ la milito. La tradicia interŝanĝo de varoj kun la Okcidento estis haltigita kaj anstataŭe akcelata tiu kun la orientaj landoj. Ĉar Ĉeĥoslovakio devis produkti armilajn varojn por la armeoj de la Varsovia Pakto, la milita kaj peza industrioj estis fortigataj malfavore al la civila kaj konsuma industrioj, kiuj estis neglektataj. Slovakio ricevis novajn ŝtalfabrikojn, kiuj krude malrespektis ĉiujn normojn pri malpurigo kaj protekto de la ĉirkaŭaĵo, aero kaj akvo kaj elĵetis malpuraĵon en tiu grado, ke en certaj regionoj de Slovakio aperis gravaj problemoj kun fumo kaj odoro. Rekompence al la manko de nacia libereco, Slovakio estis ekonomie evoluigata, kio sekvigis pli altan ekonomian kreskon, pli multajn laborlokojn kaj pli da klerigaj kaj profesiaj eblecoj. La diferencoj de la ekonomia nivelo inter Ĉeĥio kaj Slovakio pli kaj pli malaperadis. La fabrika entrepreno ZT´S fariĝis la plej granda kun 60´000 laborlokoj, kaj en Martin estiĝis giganta centro de peza kaj maŝina industrio. Sed la karakterizaj malfortoj de la komunisma plansistemo kaŭzis malbonan kvaliton kaj mankon de konsumvaroj, malemon de la dungitoj labori kaj principan malintereson produkti, ĝeneralajn indiferentecon, apation kaj ŝtelemon ĉe la laboristoj. La salajroj estis malaltaj kaj la nekonvertebla landa mono havis nenian valoron (en komparo kun la pli valora okcidenta mono), kio esence kontribuis al la materia malriĉiĝo de la popolo, kiu dependis de tiaj enspezoj. En la 60aj jaroj ĉeĥoslovakaj reformkomunistoj kiel *Ota Šik* (1919-2004) volis plibonigi la ekonomian situacion de Ĉeĥoslovakio kaj solvi la menciitajn problemojn. Sed la troa proksimiĝo de iliaj teorioj kaj intencoj al kapitalismaj metodoj kaŭzis negativan reagon ĉe la ortodoksaj komunistoj en Moskvo, kiuj finfine ĉesigis la reformprocezon en Ĉeĥoslovakio kaj lasis disbati la „Pragan Printempon“, kiu havis politikan kaj ekonomian dimensiojn, en somero 1968 fare de la sovetia armeo, kiel priskribos la venonta ĉapitro.

## Reforma movado kaj sovetia invado en 1968

La komunismaj gvidantoj de Ĉeĥoslovakio devis baldaŭ konstati, ke nur ekonomia investado ne kondukos al definitiva solvo de la ´nacia demando´. Sed kiel jam la unua respubliko, ankaŭ la komunisma reĝimo ne pretis rezigni pri sia centrisma kontrolo favore al federacia aranĝo, kiu povus kontentigi la slovakojn. Certe, depost kiam Ĥruŝĉov proklamis ´malstalinigon´ en Sovetunio, ankaŭ la slovakaj naciistoj volis profiti de tiu nova ´degela vetero´ kaj postulis revizii la pragajn decidojn. En tio ili estis eĉ iom sukcesaj, ĉar la ĉeĥoslovaka registaro pretis refortigi la slovakajn aŭtonomiajn organojn. Inter la malliberigitaj „burĝaj“ komunistoj ankaŭ Gustáv Husák povis forlasi la prizonon en 1960. Sed post la popolaj ribeloj, kiuj eksplodis en 1956 en Hungario kaj Pollando, tiu degelo rapide finiĝis kaj la subpremado estis daŭrigata. Per planekonomiaj argumenoj la politikaj organoj de Slovakio estis denove senpotencigitaj, kaj la nova ĉeĥoslovaka konstitucio de 1960 konfirmis la principojn de 1948. Multaj slovakoj estis konvinkitaj, ke oni volas definitive limigi aŭ eĉ likvidi la slovakan aŭtonomecon. Sed la ´dua malstalinigo´ en Sovetunio de la jaro 1961 ne estis sen sekvoj por Ĉeĥoslovakio. Precipe slovakaj intelektuloj fariĝis aktivaj, lanĉante diversajn diskutrondojn en altlernejoj kaj universitatoj, dum kiuj oni kritikis la malrapidan malstalinigon en Ĉeĥoslovakio kaj la pragan prisilentadon de la juĝoj kontraŭ la slovakaj naciaj komunistoj, kiujn oni forĵetis el la partio aŭ sendis en la prizonon. Avangarda en tio fariĝis la literatura revuo *Kultúrny život* (kultura vivo), kiu estis vaste legata ne nur en Slovakio, sed ankaŭ en Ĉeĥio. La partio devis cedi al la publika premo kaj konfesis erarojn. Speciala komisiono sub la gvido de Drahomír Kolder (ĉeĥo) komencis esplori en septembro 1963 la politikajn juĝojn kontraŭ komunistoj faritajn inter 1949 kaj 1954. Dua komisiono, gvidita de *Jozef Lenárt,* estro de la Slovaka Nacia Konsilio, devis esplori la politikan persekutadon de slovakaj komunistoj. La publikigo de la rezultoj sekvigis akrajn protestojn, kaj dum kongresoj de slovakaj verkistoj kaj ĵurnalistoj en 1963 la stalinismo estis kondamnita kiel atako kontraŭ la slovakaj naciaj deziroj. Oni postulis la rehabilitadon de la viktimoj kaj la punadon de la kulpuloj. La (marksisma) slovaka partia historiisto ***Miloš Gosiorovský*** povis repostuli la federigon de Ĉeĥoslovkio sen timi sankciojn. La 22an de aŭgusto 1963 la Supera Kortumo nuligis la verdiktojn kontraŭ preskaŭ ĉiuj slovakaj viktimoj de la stalinisma arbitro. Karol Bacílek, Viliam Široký kaj aliaj, al kiuj oni riproĉis „malkapablon“, devis forlasi sian postenon, Husák, Novomeský kaj aliaj slovakaj komunistoj estis mirinde rehabilititaj kaj rebonvenigitaj en la partio. ***Jozef Lenárt*** (1923-2004) fariĝis ĉefministro de Slovakio kaj ***Alexander Dubček*** (1921-92), fakte nekonata homo ĝis nun, fariĝis unua sekretario de la slovaka KP. Dum Dubček lasis libere diskutadi la intelektulojn, Novotný, kiu daŭre estis

ĉefo de la ĉeĥoslovaka KP, komencis polemiki kontraŭ ili, nomante ilin „slovakaj reviziistoj“ kaj „separatistoj“. Al Husák kaj Novomeský estis riproĉite, ke ili detruas la unuecon de la partio. En tio Novotný estis subtenata de dogmuloj kiel ***Vasil´ Bil´ak*** (slovako) kaj Bohuslav Chňoupek. Kiam en aŭgusto 1964 en Slovakio oni omaĝis la nacian ribelon de la jaro 1944, Ĥruŝĉov vojaĝis al Bratislavo por honori la eventon. Eĉ nekomunismaj kaj iuj okcidentaj aliancanoj, kiuj kontribuis al la nacia ribelo de 1944, trovis honoran mencion. Samtempe, la reputacio de Slovakio, kiu estis grave makulita de la faŝismema Tiso-reĝimo, devis esti restarigita. La postan jaron eĉ pli grandan atenton trovis la omaĝo pri la 150a naskiĝtago de la slovaka verkisto kaj politikisto L´udovit Štúr, kiun la komunisma reĝimo en Prago konsideris „burĝa-reakcia naciisto“. Sed la reformkomunistoj nun konsideris lin „nacia heroo“ de Slovakio.

Kiam eksplodis publikaj protestoj de slovakaj studentoj, kiuj estis malkontentaj pri la malbonaj kondiĉoj de la vivo kaj studado, la partio reagis nervoze kaj celis subpremi la proteston. Intertempe, Ĥruŝĉov estis forpuŝita de grupo de konservemaj politikistoj ĉirkaŭ Leonid Breĵnev, kiu fariĝis nova potenculo en Moskvo, kiu ŝanceliĝis inter daŭrigo de reformoj kaj restarigo de pli rigida partia kurso. En decembro 1967 li vojaĝis al Prago por mem informiĝi, kio okazas en Ĉeĥoslovakio kaj por haltigi la perdon de la povo, kiu senkompate minacis la komunistojn. Ŝtatestro Novotný kaj aliaj gvidaj potenculoj de la ĉeĥoslovaka KP devis forlasi siajn funkciojn, dum Dubček, kiu ĝuis la fidon de la sovetiaj kamaradoj, fariĝis lia posteulo kiel unua sekretario de la ĉeĥoslovaka KP. Eksgeneralo *Ludvík Svoboda*, viktimo de la Gotvaldaj purigoj, fariĝis nova ĉeĥoslovaka ŝtatestro kaj *Oldřich Černík* nova ĉefministro. Gustáv Husák kaj la menciita ekonomiisto Ota Šik, kiu revis pri „tria vojo“ de la „socialisma merkatekonomio“ aŭ „humanisma ekonomia demokratio“, estis elektitaj kiel anstataŭantaj ĉefministroj. Ĝenerale, la publiko kredis, ke Dubček estos sama pala kaj sensignifa burokrato, kiu nur blinde obeas la ordonojn de la sovetianoj. Sed Dubček estis ankaŭ slovaka naciisto, kiu ofte kverelis kun Novotný pri Slovakio. En sia klopodo peradi inter dogmuloj kaj reformkomunistoj, li scipovis arigi ĉirkaŭ si seriozajn homojn, kiuj celis reformi Ĉeĥoslovakion. Per tio li mem avancis al la pinto de pli kaj pli vasta reformmovado, kiu baldaŭ fariĝos internacie konata kiel „Praga Printempo“, en kies ombro troviĝis la „Bratislava Printempo“, kiu faris, en eksterlando tro malmulte konate, gravan preparan laboron por la ĉeĥoslovaka revolucio. Certe, ankaŭ Dubček neniel celis rezigni pri la „gvida rolo“ de la komunisma partio en la lando, sed li apogis la ideon, ke la tuta socialisma sistemo fariĝu pli demokrateca, pli plurisma, pli liberalisma, ekonomie pli efika kaj dinamika, malpli burokrateca, kun pli forta kunlaboro kun okcidentaj landoj, de kiuj Ĉeĥoslovakio estis preskaŭ hermetike fermita. Anstataŭ stalinismo, en Ĉeĥoslovakion devis esti enkondukita „socialismo kun homeca vizaĝo“, jen la historie signifa slogano de la ĉeĥoslovakaj reformistoj. Grandparto de la popolo (ĉ. 89%) de Ĉeĥoslovakio fakte ne postulis aboli la socialismon, kiun oni daŭre konsideris pli justa sistemo ol la kapitalismo, sed oni deziris kaj celis ĝian reformadon. Slovakio kaj la etnaj minoritatoj devis ricevi pli justan traktadon de siaj rajtoj. En la ekstera politiko oni emfazis la gravecon de la sekureco en Eŭropo kaj de bonaj rilatoj kun ĉiuj eŭropaj kaj precipe najbaraj landoj, sen forlasi la Varsovian Paktor, sed tamen sen sovetia hegemonio. Ĉi tiuj principoj estis fiksitaj en la oficiala agadprogramo de la ĉeĥoslovaka KP de la 5a de aprilo 1968. Lenárt estis anstataŭigita la 8an de aprilo. La gazetara cenzuro estis abolita. Tamen, Dubček klopodis bremsi la rapidecon de la intencitaj reformoj, ĉar li timis sovetian intervenon, ĉar kio okazis en lia lando, ne povis plaĉi al la sovetiaj dogmuloj, kiuj rapide povis paroli pri „perfido“ kaj „kontraŭrevolucio“. La „frataj landoj“ fakte jam signalis al Ĉeĥoslovakion per interveno por ĉesigi la reforman eksperimenton. Hodiaŭ oni scias, ke malgraŭ premo de diversaj flankoj Breĵnev havis longan paciencon kun la ĉeĥoslovakaj reformistoj kaj volis trovi pacan, politikan solvon de la politika krizo anstataŭ armea interveno, al kiu li evidente estis puŝita flanke de siaj pli radikalaj kolegoj en la moskva politburoo. Ankaŭ la kamaradoj en orienta Berlino (precipe Ulbriĥt), kiuj timis, ke la komunistoj povus perdi la monopolon kaj ke tio povus esti la komenco de la disfalo de la sovetia bloko (dum kiu GRD probable estus forbalaita kiel ŝtato), estis interesataj pri perforta solvo en Ĉeĥoslovakio, sed, paradokse, GDR mem finfine ne partoprenis en la interveno per sia armeo, ŝajne pro historiaj kialoj. Kaj kolego János Kádár en Budapeŝto, kiu jam havis spertojn de la jaro 1956 pri tiaj aferoj kaj kiu faris proprajn konkludojn por Hungario, avertis kamaradon Dubček pri la malbonaj intencoj de la „homoj en Moskvo“, al kiuj Dubček ŝajne tro naive fidis. Per ruza, saĝa, trankvila diplomatio Kádár povis atingi por sia lando preskaŭ idealajn kondiĉojn, pri kiuj en aliaj komunismaj landoj oni povis nur revi. Sed ĉi tie ne estas la loko por detale trakti la evoluon de la „Praga Printempo“ kaj de la armea invado de trupoj de la Varsovia Pakto en somero 1968, pri kio oni povas abunde legi aliloke. Nur tiom: La 29an de julio en Čierna nad Tisou, orienta Slovakio, okazis kunveno

inter Dubček kaj Breĵnev, kiu admonis la ĉeĥoslovakan gvidanton ĉesigi la reformprocezon. Sed tion Dubček kompreneble ne faris. La 21an de aŭgusto 1968 la soveta novaĵagentejo TASS disvastigis oficialan komunikon, kiu informis la mondon pri la komenco de armea interveno en Ĉeĥoslovakio. En la komuniko estis skribite, ke membroj de la partio kaj civitanoj de la ŝtato de Ĉeĥoslovakio petis Sovetunion kaj aliajn aliancanojn alporti urĝan helpon al la ĉeĥoslovaka frata popolo, inkluzive helpon de armitaj fortoj. Hodiaŭ oni scias, ke la (iom mistera) petletero al Breĵnev, kiu aperis en moskvaj arkivoj, estis subskribita de Alois Indra (slovako), Drahomír Kolder, Oldřich Švestka, Antonín Kapek kaj Vasil Biľak (slovako). La komuniko de TASS parolis pri kontraŭrevoluciaj fortoj, kiuj celis renversi la socialisman ordon, kiu estas la laŭkonstitucia ordo de la ĉeĥoslovaka ŝtato, pere de konspiro kun la helpo de eksteraj malamikaj fortoj. La komuniko plue certigis, ke Sovetunio kaj aliaj socialismaj landoj sentis siajn interesojn minacataj kaj ke la danĝero por la socialisma ordo en Ĉeĥoslovakio signifas samtempe ankaŭ danĝeron por la eŭropa paco.

Dum la invado, kiu estis nomita „Operaco ´Danubo´“, ĉirkaŭ 200´000, laŭ alia fonto 300´000 anoj de la armeoj kun 2000, laŭ alia fonto 7000 tankoj de la Varsovia Pakto, partoprenis la invadon en Ĉeĥoslovakion. Komuna soveti-pola armeo, en kiu generalo Jaruzelski ludis gvidan rolon, paŝis kontraŭ Jablonec, Ostrava, Olomouc kaj Žilina. El Hungario invadis Slovakion komuna soveti-hungar-bulgara armeo al la direkto de Bratislavo, Trenčín, Banská Bystrica. La plej granda armeo, komandata de generalo Greĉko, venis el Sovetunio mem. Laŭ Valentin Falin, kiu tiam estis alta funkciulo en la ministerio de la eksteraj aferoj de Sovetunio, Breĵnev telefonis al Dubček por „peti“ lin sendi sovetiajn trupojn al Ĉeĥoslovakio. Dum la invado pereis 98, laŭ alia fonto 72 ĉeĥoj kaj slovakoj, inter ili 19 en Slovakio, 266 estis serioze kaj 436 leĝere vunditaj kaj ĉirkaŭ 50 soldatoj de la „frataj“ armeoj mortis. Ŝtatestro Ludvík Svoboda alvokis la popolon resti trankvila, kaj Dubček kaj la ĉeĥoslovaka KP rekomendis al la popolo rezigni pri kontraŭstarado. Ĉeĥoj kaj slovakoj tamen reagis per tio, ke ili malmuntis aŭ detruis vojindikilojn aŭ ŝanĝis ilian direkton por konfuzi la armeojn. Ĉeĥoslovakaj fervojistoj kondukis trajnojn al eraraj reloj. En Prago, Bratislavo kaj aliaj urboj estis pendigitaj miloj de afiŝoj, kiuj primokis la okupantojn kaj alvokis al pasiva rezistado. Homoj ĵetis stonojn kontraŭ tankoj. Radiostacioj en Ĉeĥoslovakio kaj Aŭstrio informis la popolon pri la aktuala situacio.



Alexander Dubček (1921-1992)



Gustáv Husák (1913-1991) kun Breĵnev kaj Honecker

La tuta entuziasmo, kiu lasis esperi la popolon de Ĉeĥoslovakio je pli bonaj tempoj, estis do subite neniigita de sovetiaj tankoj, kiuj aperis en la urboj de Ĉeĥio kaj Slovakio, kie la milita juro estis proklamita. La reago de ĉeĥoj kaj slovakoj estis drasta kaj ege malagrabla, kun la sekvo, ke la malamo, frustriĝo kaj malrespekto, direktitaj kontraŭ la sovetiaj okupantoj, estis grandega kaj daŭra kaj

komparebla kun traŭmato. Grandparto de la membraro de la ĉeĥoslovaka KP estis ŝokita kaj seniluziigita pri la konduto de la „frataj landoj", kiuj montriĝis malamikoj de la reformmovado. Dubček kaj aliaj altrangaj funkciuloj estis arestitaj kaj transportitaj al Moskvo, kie oni metis ilin sub premo kaj senpotencigis ilin iom post iom. La aserto, ke la ĉeĥoslovaka KP petis la helpon de Sovetunio kaj de la Varsovio Pakto, estis malkaŝita de la ĉeĥoslovaka flanko kiel mensogo. En la konfuzo de la invado kaj okupacio la ĉeĥoslovaka KP eĉ sukcesis okazigi sekretan nacian konferencon (22a de aŭgusto) en Vysočany, en kiu la invado estis klare kondamnita, la agadprogramo de la ĉeĥoslovakaj reformistoj reaprobita kaj la registaro de Dubček konfirmita, dum Bil´ak estis malelektita.

Post la reveno de la ĉeĥoslovaka registara delegacio el Moskvo unue nenio ŝanĝiĝis en la aktuala politiko de Ĉeĥoslovakio. Male, la reformoj ne estis nuligitaj kaj malnovaj stalinistoj estis forigitaj el la CK kaj anstataŭigitaj per pli liberalaj homoj kiel en Slovakio okaze de la kongreso de la slovaka KP, kiam ĵurnalistoj aŭ verkistoj kiel ***Pavol Štefček, Miroslav Kusý, Zora Jesenská*** kaj ***Svetozár Štúr,*** kiuj engaĝiĝis dum la „Praga Printempo", estis alelektitaj. En la gazetaro la okupantoj, kiuj pafis kontraŭ la publiko en Bratislavo kaj mortigis 17-jaran studentinon antaŭ la enirejo al la Komenia universitato, estis akuzitaj pro intencita murdo. En la literatura revuo *Kultúrny život* aperis serio de artikoloj, kiuj esprimis malesperon kaj pesimismon pri la estonteco kaj pridubis la „fratajn" sentojn de aliaj slavaj popoloj, kiuj detruis la amikecon kun la ĉeĥoslovaka popolo. Ankoraŭ dum konferenco de slovakaj verkistoj en decembro 1968 en Bratislavo oni kondamnis la invadon kaj misfamigis Sovetunion kiel „popolan malliberejon". Nur en aprilo 1970 nove elektita prezidio de la verkista asocio de Slovakio distanciĝis de tiu opinio. La revuo *Kultúrny život* estis malpermesita. La novstalinisma reakcio povis komenciĝi.

Post la definitiva disbatado de la reformmovado Dubček devis demisii kiel estro de la partio la 17an de aprilo 1969. En septembro Dubček ankoraŭ transprenis la prezidon de la ĉeĥoslovaka parlamento. Poste li estis por mallonga tempo ambasadoro en Turkio. En junio 1970 li estis ekskludita el la ĉeĥoslovaka KP kaj sendita hejmen al Slovakio, kie li devis labori kiel inspektoro de la arbara administracio en Bratislavo.

Post la malaperigo de Dubček, la sovetianoj puŝis kamaradon Gustáv Husák, kiu montriĝis fidela kaj fidinda lakeo de Moskvo. Husák, kiu aktive kunlaboris en la „Praga Printempo" kaj kiu fariĝis anstataŭanta ĉefministro en aprilo 1968, en aŭgusto estis nomita unua sekretario de la Centra Komitato de KP de Slovakio. En aprilo 1969 li estis instalita laŭ la volo de Sovetunio kiel unua sekretario de la CK de KP de Ĉeĥoslovakio kun la tasko nuligi iom post iom la rezultojn de la „Praga Printempo", restabiligi la plenan potencon de la laŭmoskve orientita komunisma partio kaj restarigi la kondiĉojn, kiel ili ekzistis antaŭ la „Praga Printempo". La restariga procezo estis nomata „normaligo" (ĉ. normalizace, sk. normalizácia). La biografio de Husák kiel estro kaj unua potenculo de la ŝtato ricevis groteskan turniĝon, se oni memoras, ke en 1944 Husák estis slovaka naciisto, kio tute ne favoris karieron en la ĉeĥoslovaka sistemo, ke dum la Gotvalda tempo, persekutata de la stalinistoj, li troviĝis en la malliberejo, kaj se oni konscias pri la faktoj, ke Husák konfesis sian lojalecon al la politiko de Dubček, nomis la invadon de la trupoj de la Varsovia Pakto „arbitra ago" kaj „lezo de la normoj de la internacia juro" kaj prijuĝis la moskvan interkonsenton malvenko por la reformmovado. Sed poste li turnis la lancon, nuligante la decidojn de la sekrete okazigita XIVa partia konferenco en Vysočany, kaj dirante, ke la invado signifis „akton de la internacia solidareco", pri kio la ĉeĥoj kaj slovakoj estu „dankemaj al la socialismaj aliancanoj, antaŭ ĉio al Sovetunio mem".

La sola elemento, kiun Husák povis savi el la reformoj, estis la formala federigo de Ĉeĥoslovakio, kion eĉ la sovetianoj toleris, tiom longe ke la centra povo de la komunisma partio ne estis tuŝita. Tiu formala federismo devis formi integran parton de la „normaligo" por neŭtraligi la koleron de la slovakoj kontraŭ la sovetiaj okupantoj. Husák proklamis tiun federigon okaze de la 50a datreveno de la fondo de la unua ĉeĥoslovaka respubliko ankoraŭ la 28an de oktobro 1968, sed en Slovakio la popolo, kiu estis paralizita de la invada kaj okupacia ŝokoj, montris nenian entuziasmon kaj restis indiferenta pri la ´festo´. Kiel ofte ĉeĥoslovakaj politikistoj palavris pri federigo de la ŝtato, kvankam konkretaj pozitivaj sekvoj ne evidentiĝis! La konstitucia modifo tamen funde ŝanĝis la statuson de Slovakio: La nova ŝtato, nomata Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko (ČSSR) devis konsisti, ekde la 1a de januaro 1969, el du egalrajtaj naciaj respublikoj, kiuj cedas nur parton de sia suvereneco al la centra federacia ŝtato. Ambaŭ popoloj ricevis propran Nacian Konsilion, propran landan registaron kaj Superan Tribunalon. Sed eĉ Husák, kiu provis kontentigi la slovakojn per tiaj koncedoj, devis kompreni, ke lia reformo estas nur farso, ĉar la povon en la ŝtato ne havis naciaj politikaj organoj, sed la komunisma partio. Por reale disdividi la povon, ankaŭ la partio devintus esti federigita, sed pri tio la sovetianoj ne konsentis. Estas do klare, ke la nacia

demando restis nesolvita ankaŭ sub tiaj federaj kondiĉoj. Proprajn ambiciojn en la ekstera politiko la reĝimo de Husák ne povis havi, kompare ekzemple kun aliaj „socialismaj“ landoj kiel Rumanio, Albanio aŭ Jugoslavio, kiuj ne obeis al Moskvo. Kvin sovetiaj armeaj divizioj restis parkitaj en Ĉeĥoslovakio. Ili havis la taskon kontroli la procezon de la „normaligo“ kaj subpremi ajnan provon eksiĝi el la Varsovia Pakto kaj sovetia bloko.



Slovaka ĉefministro Peter Colotka (1969-89); Vasil´ Bil´ak. Ministroj pri defendo de Ĉeĥoslovakio: ĉeĥo Ludvík Svoboda (1948-53), kiu estis ankaŭ ŝtatestro de Ĉeĥoslovakio (1968-75), slovakoj Martin Dzúr (1968-85) kaj Milán Václavík (1985-89).

Alia aktoro en la absurda teatro, Ludvík Svoboda, kiu fariĝis prezidento de Ĉeĥoslovakio fine de marto 1968, post la invado de la trupoj de la Varsovia Pakto rifuzis kunlabori kun la registaro, kiu estis establita de la sovetiaj okupantoj, ĉar li konstatis, ke li estis misuzita. Nu, li povis almenaŭ atingi la liberigon de la ĉeĥoslovakaj registaranoj, kiuj estis retenataj en Moskvo. La malforteco de Svoboda iel memorigis pri Emil Hácha, antaŭa prezidento de Ĉeĥoslovakio. Lia rezistado kontraŭ la valida politiko de la „normaligo“ iom post iom elĉerpis liajn fortojn kaj malfortigis lian pozicion, kiun li pli kaj pli cedis favore al Husák. Post kiam la 29an de majo 1975 Svoboda, grave malsana, estis eksoficigita kiel ŝtatestro, Gustáv Husák transprenis lian postenon kaj tiel fariĝis unua kaj unika slovaka ŝtatprezidento de Ĉeĥoslovakio. Ministro pri defendo de Ĉeĥoslovakio fariĝis la slovako ***Martin Dzúr*** (1968-85), kiu originis el Liptovský Mikuláš. Inter 1969 kaj 1989 la registarojn en Slovakio gvidis ĉefe ***Peter Colotka*** (nask. 1925) kun partneroj (kiel *Štefan Sádovský, Ivan Knotek, Pavol Hrivnák* kaj *Milan Čič*).




Ankoraŭ en 1989 aperis ĉeĥoslovaka bankbileto kun la portreto de Klement Gottwald. Aliaj bankbiletoj de tiu tempo montris la bildon de la nekomunismaj slovakaj patriotoj Hviezdoslav kaj Štúr, kaj la valoro de la 50-krona bileto estis indikita en la slovaka lingvo. Novotný, Svoboda, Dubček aŭ Husák neniam sukcesis aperi sur ĉeĥoslovakaj bankbiletoj.

Malgraŭ la tombeja silento, kiu regis la ŝtaton de la ĉeĥoj kaj slovakoj en la periodo de la „normaligo”, tamen ekĝermis nova generacio de protagonistoj de opozicia movado: tiu de la disidentoj ĉirkaŭ intelektuloj kiel *Jiří Dienstbier, Ludvík Vaculík, Václav Havel, Pavel Kohout, Ivan Klíma, Pavel Landovský, Jiří Kolář, Jiří Gruša, Eva Kantůrková, Jiří Lederer, Jiří Hanzelka, Aleksandr Kliment, Jaroslav Seifert, Petr Uhl, Jiří Hajek, Zdeněk Mlynář, Miklós Duray* kaj ***Dominik Tatarka*** (el Slovakio) kaj multaj aliaj, kiuj subskribos la faman manifeston „Ĉarto 77“, kiu sekvigos novan ondon de subpremado kaj reprezalioj kontraŭ disidentoj flanke de la komunisma reĝimo, kiu mem spertis pli kaj pli grandan premon pro rapida malboniĝo de la ekonomio, kiu komplete dependis de Sovetunio, kaj pro la totalaj malkontenteco kaj pasiveco de la popolo. Kiu vizitis Ĉeĥoslovakion en tiu tempo, vidis preskaŭ nur ´grizajn vizaĝojn´ ĉe la homoj kaj miris pri la ´morta´ etoso en tiu lando, dum la disidentoj sidis en la malliberejo aŭ forlasis la landon.

Kiam la 11an de marto 1985 Miĥail Gorbaĉov fariĝis nova ĝenerala sekretario de KPSU en Moskvo post la morto de Breĵnev, Andropov kaj Ĉernenko kaj enkondukis sian politikon de „glasnosto” kaj „perestrojko”, la tempoj komencis ŝanĝiĝi ankaŭ en Ĉeĥoslovakio. Gorbaĉov vizitis Pragon en 1987, kie li signalis al la homoj sen eblo miskompreni, ke la ´betona´ komunismo estas eksa afero. Sed la beton-komunistoj en Ĉeĥoslovakio ankoraŭ ne volis malaperi de la scenejo aŭ cedi sian povon al nekomunistoj. Gustáv Husák tamen komprenis, ke lia tempo pasis, tiel ke li demisiis en decembro 1987 kaj adiaŭis la politikan scenejon.

## Fino de la komunismo kaj venko de la disidentoj

En 1988 la malkontenteco de la popolo en Ĉeĥoslovakio komencis denove boladi. Okazis manifestacioj de studentoj, kiuj protestis kontraŭ la invado kaj okupacio de Ĉeĥoslovakio fare de la Varsovia Pakto antaŭ 20 jaroj kaj festis la 70an datrevenon de la fondo de la ĉeĥoslovaka ŝtato kaj memoris la membruligon de Ján Palach en Prago. La polico brutale disbatis la manifestaciojn kaj arestis la protestantojn, inter kiuj troviĝis ankaŭ la disidenta verkisto *Václav Havel*, kiu apartenis al la subskribintoj de la „Ĉarto ´77“. Sed la situacio en Ĉeĥoslovakio fariĝis tikla, post kiam en aliaj landoj de la Orienta Bloko kiel Pollando, GDR kaj Bulgario en okobro kaj novembro 1989 la homoj amase protestis kontraŭ la komunismaj reĝimoj kaj forpelis malŝatatajn poststalinismajn regantojn kiel Erich Honecker kaj Todor Ĵivkov. En Pollando la komunistoj draste malgajnis la liberajn balotojn. En Ĉeĥoslovakio Gustáv Husák retiriĝis kaj cedis sian lokon al *Miloš Jakeš*, kiu estis konata kiel malbela relikto el la jaro 1968, kiam li apartenis al la frakcio, kiu helpis ĉesigi la eksperimenton de la „Praga Printempo” kaj purigis la partion de reformemaj elementoj. Sed Jakeš ne povis resti longe: En novembro 1989 li estis devigita demisii kaj estis eksigita el la KP, kiel tiu partio kutimis procedi kun tiaj membroj, se politike ili ne plu estis konvenaj. Ĉefministro *Ladislav Adamec*, ĉeĥo, kiu ankoraŭ fifamiĝis pro sia agresema polemiko kontraŭ disidentoj, oficis nur ĝis la 10a de decembro 1989, kiam li estis anstataŭigita per ***Marián Čalfa***, slovako. Multaj grupiĝoj subtenis la forigon de la komunistoj kaj postulis liberecon kaj demokration. En Prago aktivuloj ariĝis ĉirkaŭ la „Civitana Forumo“ (Občanské forum OF), kaj en Slovakio estis fondita la organizaĵo „Publikeco kontraŭ perforto“ (Verejnosť proti nasiliu). Centmiloj da slovakoj partoprenis en la amasaj manifestacioj, kiuj faligis unu el la plej malagrablaj subpremaj reĝimoj en orienta Europo. Kion Václav Havel kaj Jiří Dienstbier faris en la ĉeĥa parto, ***Martin Bútora, Miroslav Kusý, Ján Čarnogurský, Milan Kňažko, Ján Budaj, Anton Popovič, Ján Langoš, František Mikloško, Peter Zajac, Ján Korec Ľubomír Feldek, Václav Malý*** k.a. (priskribojn kaj fotojn vd. sub http://domov.sme.sk/c/5111944/slovensko-nemalo-havla-viedli-ho-viaceri.html), tute nekonataj nomoj en eksterlando, atingis en Slovakio en la 80aj jaroj jam longe antaŭ la falo de la komunismo, starigante la demokatian movadon de la disidentoj kaj organizante diversajn agadojn precipe kun religia karaktero. Kiam en Ĉeĥoslovakio estis kolektitaj subskriboj por restarigi la religian liberecon, du trionoj de tiuj subskriboj venis el Slovakio. La komunistoj reagis per serio de televidaj elsendoj kun la celo misfamigi kaj nigrigi la katolikan eklezion. Sed kiam la komunistoj ne plu kapablis elteni la premon kaŭzitan de la amasaj protestoj de la „Velura revolucio“, ili demisiis unu post la alia kaj cedis la lokon al la disidentoj: Aleksandr Dubček, kiu estis reelfosita el la kvazaŭa tombo kiel iama simbola figuro de la „Praga Printempo“ , estis freneze rebonvenigata kaj elektita kiel nova prezidanto de la Nacia Federa Asembleo, dum Václav Havel, kiu longan tempon sidis en la malliberejo, iom kurioze fariĝis ŝtatprezidento, kvankam li havis nenian praktikan sperton kiel politikisto, sed kiu tamen estis konsiderata kiel simbolo de la velura revolucio kaj lumturo de la bona politika moralo. La komunisma monopolo estis nuligita kaj la interveno de la Varsovio Pakto en 1968 deklarita kiel kontraŭleĝa. En la ekstera politiko la novaj regantoj de Ĉeĥoslovakio reviziis siajn rilatojn kun Sovetunio kaj alvokis ĝian armeon forlasi la landon. La plej lasta sovetia soldato fakte malaperis el Ĉeĥoslovakio la 20an de junio 1991. La unuaj liberaj elektoj en Ĉeĥoslovakio okazis la 8-9ajn de junio 1990, en kiu la „Civitana Forumo“ kaj „Publikeco kontraŭ perforto“ akiris 168 de 300 mandatoj en la ĉeĥoslovaka Federa Asembleo, dum la komunistoj ricevis nur 47 mandatojn, kio egalis al 14% de la voĉoj. Marián Čalfa, kiu forlasis la komunisman partion, estis petita de Havel formi la novan registaron, kiun konsistigis plimulte anoj de civitanaj movadoj aŭ senpartiaj fakuloj.

**Novaj perturboj kaj preparado de la ĉeĥ-slovaka disiĝo**

Sed la eŭforio de la ´venko´ de la demokratio super la komunisma regado rapide forflugis kaj la malnovaj problemoj baldaŭ revenis. Kvankam kun la malfermo de la landlimoj, la okazigo de demokratiaj balotoj kaj la enkonduko de objektiva jura ŝtateco kaj de libera ekonomio multaj aferoj ŝanĝiĝis en pozitiva direkto, la nova ŝtato kunportis ankaŭ gravajn hipotekojn de la pasinteco: la ekonomio estis kvazaŭ ruinigita, kaj la reveno de oportunismaj funkciuloj de la malnova reĝimo, kiuj ´ŝanĝis sian veston´, maltrankviligis la demokratojn. Okazis misuzado de la potenco kaj dubinda ekonomia riĉiĝo. La frustriĝo direktis sin unuavice kontraŭ Václav Havel, la ŝtatestro, mem, al kiu oni riproĉis, ke li subtaksis tiujn problemojn kaj neglektis ilian solvadon, farante tro multajn kompromisojn kun la iamaj komunistoj. La specifeco de Ĉeĥolsovakio, precipe Ĉeĥio, estis, ke la komunismo estis sufiĉe forte enradikiĝinta, kompare kun aliaj landoj de meza Orienteŭropo. En Ĉeĥoslovakio oni neniam forgesis la perfidon de la okcidentaj potencoj de 1938, kio havis katastrofajn sekvojn por la ŝtato; ĉi tiu koŝmara sperto longdaŭre detruis la fidon de la ĉeĥoj kaj slovakoj je la okcidentaj demokratiaj ŝtatoj kaj kaŭzis sufiĉe grandan apogon al socialismo kaj komunismo en tiu lando, kie ĉirkaŭ 1,5 mln. homoj konstante membris en la KP, kio signifis 10-12 procentojn de la tuta popolo, malgraŭ oftaj partiaj membropurigoj (fakte, entute eĉ multe pli da homoj, nome ĉirkaŭ sep milionoj, membris en la ĉeĥoslovaka KP). Sed ankaŭ la bilanco rilate la viktimojn de la komunisma reĝimo estis impresa: En pli ol ducent mil juĝoj 248 civitanoj estis kondamnitaj al morto, 4500 mortis en malliberejoj kaj 327 pereis ĉe la landlimo, kaj ĉirkaŭ 7000 personoj estis deportitaj al laborkoncentrejoj en Sovetunio. En malliberejoj, koncentrejoj kaj labortendaroj de komunisma Ĉeĥoslovakio mem troviĝis 250 mil personoj, la trioblo de homoj, kiuj estis persekutataj pro profesiaj aŭ sociaj kialoj, kaj 500-700 mil homoj estis diskriminaciataj pro religiaj kialoj. La suma nombro de homoj, kiuj estis subpremataj en Ĉeĥoslovakio pro politikaj motivoj, estis du milionoj, kio signifas, ke kune kun siaj familiaj membroj en Ĉeĥoslovakio ses ĝis ok milionoj da homoj estis trafitaj de reprezalioj de la komunisma reĝimo. Sed kiel ni montris supre, okaze de la „Praga Printempo“, kiu furoris ankaŭ en Slovakio, kie la komunismo portis naciismajn kaj kontraŭĉeĥajn trajtojn, la ĉeĥoslovaka KP funkciis ankaŭ kiel portanto de la espero por plibonigi la situacion en la lando.

Sed okaze de novjaro 1992 Havel defendis sin kontraŭ tiuj riproĉoj kun averto pri la pace okazinta revolucio kaj ankaŭ konfesis, ke oni vere subtaksis la kapablon de la malnovaj komunismaj potenculoj adapti sin al la novaj kondiĉoj. Ĉar en Ĉeĥoslovakio la komunisma partio ne estis malpermesita, malnovaj aktivuloj de tiu ĉi partio povis esti reelektitaj en la parlamentojn, en kiuj ili ĝuis imunecon kontraŭ jura persekutado. Malnovajn komunistojn oni tamen malhelpis reveni en gvidajn poziciojn, kaj en la ŝtataj arkivoj, kiuj dume restis fermataj, estis deponitaj amaso da dokumentoj, kiuj povus kompromiti ilin. Certe, oni komencis jure esplori la agadon de tiuj iamaj funkciuloj surbaze de nova „lustracia“ leĝo kun la celo purigi la ŝtaton de personoj, kiuj eventuale estis ŝarĝitaj de kulpo. Kvankam estis komencitaj juraj procesoj kontraŭ iuj iamaj gvidaj komunistoj, neniu povis esti akuzita aŭ kondamnita pro „krimoj“ faritaj dum la komunisma periodo, ĉar finfine ĉiuj tiuj politikistoj ja agis laŭ la validaj leĝoj kaj pruvi al ili krimon pro politikaj kialoj estis malfacile, aŭ la deziro de la politiko kaj justico simple mankis. Maksimumo farebla estis ilia ekskludo el la komunisma partio, sed tio jam estis la interna problemo de la komunistoj mem, kiuj devis mem solvi la sorton de siaj kamaradoj kaj membroj. En Ĉeĥoslovakio komunistoj daŭre ĝuis sufiĉe grandan apogon, do procesi kontraŭ ili estis ankaŭ politike tikla afero, kvankam ilia politika sistemo estis plene diskreditita kaj povis esti „ĵetita en la rubaĵujon de la historio“.

Malgraŭ malfacila ekonomia situacio, kiu malriĉigis vastajn sociajn tavolojn, la ekonomia kolapso povis esti evitata en Ĉeĥoslovakio. Kun la helpo de la Internacia Monfonduso, al kiu Ĉeĥoslvakio aliĝis en septembro 1990, la ekonomia situacio povis esti stabiligita kaj rapide plibonigita. Kompreneble, la ekonomia transforma politiko de tiu Fonduso, kiu estis ligita kun malfacile plenumeblaj sed tamen ne iluziaj kondiĉoj, signifis totalan liberigon de la prezoj kaj de la ekstera komerco kaj radikalan reprivatigon de la posedaĵo kun la celo allogi investorojn, kun ĉiuj avantaĝoj por iuj homoj kaj malavantaĝoj por aliaj. Sed jam en 1992 la inflacio povis esti limigita al 12 procentoj, malgraŭ drasta senvalorigo de la nacia valuto, la ŝuldoj al eksterlando restis kompare malaltaj, la devizaj rezervoj rekreskis kaj la pagbilanco fariĝis pozitiva. La merkato estis refokusata al la okcidentaj landoj. Komence de 1992 Ĉeĥoslovakio ricevis kune kun Hungario kaj Pollando perspektivon fariĝi membroŝtatoj de Eŭropa Unio (tiam ankoraŭ Komunumo), kio estis tre alloga opcio precipe por la ĉeĥa landoparto.

Dum la lando ŝajnis esti sur bona vojo precipe rilate al la ekonomio, ĝin minacis novaj nigraj nuboj lige kun la nacia demando, kiun multaj homoj kaj precipe diversaj politikistoj en Ĉeĥoslovakio konsideris daŭre nesolvita. Kvankam en eksterlando oni esperis aŭ kredis, ke en la nova, nekomunisma Ĉeĥoslovakio la popoloj finfine trovos interkonsenton kaj pace vivos kune, la danĝero, ke Ĉeĥoslovakio povus rompiĝi, ne malaperis. Precipe sur la slovaka flanko aperis nova timo, ke la ĉeĥoj povus denove dikti la tonon kaj ke slovakaj politikistoj tro malmulte faras por eviti tiun scenaron. La kverelo eksplodis jam lige kun la ĝusta nomo de la nova ŝtato. Dum Václav Havel opiniis, ke ĝi nomiĝu Ĉeĥo-Slovakio (kun liga streketo inter ambaŭ partoj, kio vekis malagrablan memoron pri pli fruaj tempoj), la Nacia Asembleo decidis en aprilo 1990, ke la ŝtato nomiĝu Ĉeĥa *kaj* Slovaka Federacia Respubliko (ČSFR). En junio 1990 okazis la unuaj liberaj elektoj al la Nacia Asembleo kaj al la parlamentoj en ambaŭ landopartoj. En Slovakio la movado „Publikeco kontraŭ perforto“ gajnis 32-37 procentojn en la tutŝtata parlamento kaj 29,3% en la Slovaka Nacia Konsilio. La Kristandemokratia Partio ricevis 19% kaj la Komunisma Partio 13% de la voĉoj. La Slovaka Nacia Partio (SNS), kiu utiligis naciismajn kaj kontraŭĉeĥajn argumentojn, postulante sendependan Slovakion, ricevis 11% por la federacia parlamento kaj 14% en Slovakio. Ĉi tiu partio estis apogata ankaŭ de slovakaj ekleziuloj, kiuj esprimis sian skeptikon pri la komuna ŝtato, kiun ili klopodis misfamigi kiel plej ateisman kaj kontraŭeklezian ŝtaton de Eŭropo. *Jozef Markus*, prezidanto de „Matica slovenská“, emfazis naciajn slovakajn poziciojn kaj iniciatis en Ružomberok kaj Bratislavo manifestaciojn honore al Andrej Hlinka, la ĉefa figuro de la slovaka naciisma movado dum la intermilita tempo (vd. supre), kies spirito revekiĝis. Post la menciitaj balotoj en Slovakio reeksplodis verva debato pri la onta formo de la konstitucio de la komuna ŝtato. Sed la diskuto fiaskis, ĉar la ĉeĥaj deputitoj klopodis sekurigi por si kiel eble plej multajn rajtojn, dum la slovakaj reprezentantoj postulis ampleksigi la proprajn kompetencojn. Finfine, en decembro 1990 la Nacia Asembleo sukcesis disdividi la kompetencojn kaj decidis, ke la federacio okupiĝu pri nacia defendo, ekonomia reformado, eksteraj politiko kaj komerco, valuta supereco kaj imposta libereco. Sed multaj slovakoj ne kontenis pri tiu solvo, des pli ke Havel faris sin malpopulara en Slovakio, se li publike diris, ke la slovaka sendependisma movado signifas danĝeron por la demokratia procezo en Ĉeĥoslovakio. Fakte, por Havel fariĝis jam malagrable kaj danĝere viziti Slovakion, kie oni renkontis lin per agresemaj vortoj aŭ eĉ fizike atakis lin. Kiam la 14an de marto 1991 ripetiĝis la datreveno de la proklamo de la sendependa ŝtato Slovakio en 1939, en Bratislavo manifestaciantoj vokis sloganojn pri disiĝo de Prago kaj postulis la rehabilitadon de Josef Tiso. Kvankam ĉeĥaj politikistoj kritikis la arogantecon de iuj samgentanoj rilate al la slovakoj, la ĉilastaj restis ĉagrenitaj kaj maltrankvilaj. Antaŭ la venontaj balotoj de junio 1992 Havel admonis siajn samlandanojn, ke ili ne kredu la tentojn de naciismaj sloganoj. Sed estis tro malfrue por savi la komunan ŝtaton, ĉar baldaŭ montriĝis, ke precipe la politikaj elitoj ne plu deziris havi ĝin, same kiel antaŭe ili ne plu deziris havi la komunismon. Ne nur la elitoj. En la censo de 1991 nur 59% slovakoj deklaris sin „ĉeĥoslovakoj“ (ankaŭ en Ĉeĥio temis nur pri tre malmultaj homoj, kiuj faris tion). Do, la ĉehoslovakismo estis definitiva morta, kompareble kun la „jugoslavismo“ en Serbio, Kroatio kaj Slovenio.

Sur la politika scenejo de Ĉeĥoslovakio intertempe profiliĝis du herooj, kiuj fatale decidos la sorton de la lando: ĉeĥo *Václav Klaus* (nask. 1941) kaj slovako ***Vladimír Mečiar*** (nask. 1942). Temas pri du iamaj politikaj disidentoj, kiuj perdis sian honoron post la „Praga Printempo“ de 1968 kaj devis akcepti minorajn laborlokojn. Sed ili ne apartenis al la „romantikaj idealistoj kaj revuloj“ de la literaturista speco de Havel, Dienstbier, Gruša, Kohout, Kolář, Landovský, Malý, Seifert, Uhl, Vaculík k.a., kiuj subskribis la „Ĉarton 77“. Mečiar, filo de provincaj mizeruloj, kiuj havis nenion por perdi dum la komunismo, sed male, eble eĉ povis profiti de ĝi, amatora sporteksboksisto, iama junkomunisto, kiu estis ekskludita el la KP post la „Praga Printempo“ en 1970 kaj kiu poste devis labori en vitrofabriko kaj plukleriĝis kiel ekonomia juristo. Kiel iama komunisto, kiu spertis la sorton de malriĉuloj, li konservis sian sentemon por la ´socia demando´, kompare kun aliaj, kiuj estis aŭ nuraj revemaj intelektuloj aŭ purrrasaj komercistoj-bankistoj. En junio 1990 Klaus estis elektita al la ĉeĥoslovakia registaro kiel financministro. Poste li gvidis la „Civitanan Forumon“, kie li elpaŝis kiel merkatekonomia radikalulo kun fortaj kontraŭsocialismaj akcentoj. Kiam li renkontis kritikon kaj kontraŭstaron, li reagis per skisma detranĉo de la dekstra branĉo de la CF, fondante la „Demokratian Civitanan Partion“, kiun li bone organizis kaj enplantis en la tuta lando. Per siaj postuloj radikale liberigi la ekonomion de socialisma balasto kaj rapide reprivatigi la posedon, en la balotoj de junio 1992 lia partio sukcesis ricevi 30% de la donitaj voĉoj. En Bratislavo Mečiar fariĝis ĉefministro de Slovakio en junio 1990, sed en aprilo 1991 li devis cedi sian lokon al sia rivalo ***Ján Čarnogurský*** de la Kristandemokratia Movado, filo de la religia fanatikulo kaj Hlinka-adoranto ***Pavol Čarnogurský***. La onidiro, ke la ĉeĥoj lanĉis la eksigon de Mečiar, faris el li specon

de martiro. Ankaŭ Mečiar fondis en marto 1991 novan propran partion aŭ movadon, la famiĝontan HZDS, movadon por demokratia Slovakio. Mečiar adoptis la politikajn viziojn de Čarnogurský pri „slovak-ĉeĥa konfederacio“ kaj samtempe postulis suverenan Slovakion, kiu estu establita kiel internacie agnoskita ŝtato, kiu havu kun Ĉeĥio nur komunan eksteran, defendan kaj valutan politikon. Lia ĉefa celo estis distancigi Slovakion de la tro hasta praga ekonomia transformpolitiko, ĉar li komprenis, ke la slovaka popolo ne estas sufiĉe preparita al ĝi. Certe, la diverĝaj, fakte abismaj ekonomiaj strukturoj de Ĉeĥio kaj Slovakio favoris la dispartiĝon de ambaŭ landopartoj. Dum en Ĉeĥio ekzistis restaĵoj de la malnova konsumvara industrio, Slovakion dominis la stalinisma pezindustrio kun koncentriĝo al armea produktado, pri kiu neniu kliento estis plu interesata post la kolapso de la komunismo kaj la malfondo de Sovetunio (kiu okazis fine de 1991). La krizon de la slovaka armila industrio akrigis praga ordono haltigi la eksporton de militaj varoj. Do, la ekonomia krizo kaj la malriĉeco kaj senlaboreco (ĉ. 10%) estis pli grandaj problemoj en Slovakio ol en Ĉeĥio (kie la senlaboreco estis nur 2,5%).

Certe, tiom longe ke la komuna ĉeĥoslovaka ŝtato ekzistis, la ekonomiaj ordonoj venadis el Prago, kio estis dorno en la okuloj de la slovakoj, kiuj kredis, ke ili devas plimulte porti la ŝarĝon de la praga ekonomia politiko. Okulfrapa interesa paralelo estis observebla en la kazo de disfalonta Jugoslavio, kie Kroatio kaj Slovenio laciĝis akcepti ordonojn el Serbio por labori favore al la pli malriĉaj respublikoj en la sudo kiel Bosnio kaj Hercegovino, Makedonio, Kosovo kaj Montenegro, kiuj profitis de tiu sistemo kaj alkutimiĝis al ĝi.

Intertempe, la kverelo inter ĉeĥaj kaj slovakaj politikistoj, kiuj esence konsistis el disidentoj kunlaborintaj en 1989, estis daŭrigata kaj akriĝis dank´ al la demando de la disdivido de la laboro kaj taskoj en ambaŭ landopartoj kaj precipe pro la rapideco de la ekonomiaj reformoj. Enketo realigita en aŭgusto 1991 en Slovakio montris, ke la homoj estis malcertaj. Kvankam 34% de la homoj esprimis sin kontentaj pri la ekzisto de la federacio, nur 16% deziris sendependiĝon de Slovakio, dum 31% preferis specon de konfederacio kiel unuiĝon de du suverenaj ŝtatoj, tamen sen havi konkretajn imgojn pri la karaktero de tia kreaĵo. Tia konfuzo kaŭzis, ke la movado de Mečiar povis gajni la balotojn de junio 1992, en kiuj ĝi ricevis 33,5-33,9% por la federaciaj ĉambroj kaj 37,3% por la Slovaka Nacia Konsilio. La Partio de la Demokratia Maldekstro ricevis 14,7% kaj la Kristandemokratia Partio de Čarnogurský rikoltis nur 9% de la voĉoj, dum saman kvanton akiris la Slovaka Nacia Partio. Do, la politikistoj, kiuj pledis por la konservado de la federacio, malvenkis kaj perdis sian influon. Kvazaŭ ignorante la rezultojn en Slovakio, en Prago Klaus obstine daŭrigis sian politikon de la radikala liberaligo kaj privatigo, kion la slovakoj volis eviti en sia lando.

Kiam Klaus kaj Mečiar estis ĉefministroj de siaj landopartoj, oni komencis diskuti pri la formado de komuna federacia registaro, sed montriĝis, ke ambaŭ ne plu deziris havi ĝin. Klaus atentigis, ke li akceptas nur du alternativojn: aŭ formadon de federacio aŭ separon de ambaŭ landopartoj. La propono de Mečiar fondi konfederacion de du suverenaj ŝtatoj estis rifuzita de la ĉeĥaj politikistoj. Sed pli kaj pli ankaŭ Klaus venis al la konkludo, ke por Ĉeĥio probable estus pli utile daŭrigi la vojon en memstareco sen la ŝarĝo de la subevoluinta slovaka landoparto, kiu eventuale nur malhelpus la rapidan aliĝon de la Ĉeĥa Respubliko al la eŭropaj organizaĵoj, kaj la ĉeĥoj mem komencis laciĝi pro la konstanta postulemo de la slovakoj. Ŝajnas, ke eĉ Havel perdis sian emocian ligitecon kun la ĉeĥoslovaka ŝtato. Laŭ enketoj, la parto de homoj en Ĉeĥio, kiuj deziris apartiĝi de Slovakio, kreskis. Sed la slovakoj rigardis kun skeptiko al ŝtata memstareco kaj timis negativajn ekonomiajn sekvojn, kiujn tia separo povus havi. Tutlanda referendumo, kiu devige decidus la sorton de ambaŭ popoloj, estis rifuzita de ambaŭ registaroj, ĉar ili opiniis, ke la mandato, kiun ili ricevis tra la balotoj de junio 1992, sufiĉas por decidi la demandon mem, kvankam tiuj balotoj fakte ne signifis, ke la slovaka popolo pledis por ŝtata separo. Kaj krom la Slovaka Nacia Partio neniu esenca slovaka politika forto klare esprimis sin por ŝtata separo, nek la ĉeĥa movado de Klaus. Finfine, la vojo al separo estis neevitebla kaj decidita de la politikaj elitoj laŭ konstitucie dubinda maniero, kaj sen konsulti la opinion de la koncernataj popoloj. Kaj Mečiar troviĝis en embaraso. Ĉar evidente li timis perdi sian potencon, li konsentis pri la separo, kiu ŝajnis aktuale oportuna, tiel ke la 17an de julio 1992 la slovaka parlamento proklamis Slovakion sendependa ŝtato. Daŭrigitaj estis nur la intertraktoj de ambaŭ ĉefministroj pri la formalaĵoj de la separo kaj la disdivido de la ŝtataj posedaĵoj. Tiu demando estis solvita laŭ la teritoria principo, t.e. ĉiu landoparto povis konservi kio troviĝas sur la propra teritorio. Krom tio, ambaŭ ŝtatoj devis ricevi propran konstitucion, sed ne rezignu pri densa kunlaboro sur la kampoj de la persona trafiko, labormerkato, komuna dogana kaj komerca politiko rilate al triaj ŝtatoj. La formala separa proceduro okazis tute pace, sed tamen ne sen groteskaj incidentoj (normalaj en demokratio). Post kiam la 17an de novembro la Naciaj Konsilioj de Ĉeĥio kaj Slovakio rekomendis en paralela

kunsido de la Federa Asembleo la nuligon de la konstitucio de ČSFR, la venontan tagon la sama instanco devis konfirmi la nuligon. Sed tio fiaskis, ĉar ne ekzistis la kvorumo de la slovakaj deputitoj en la Federa Asembleo. Mankis tri voĉoj por la necesa plimulto. Al tiu paneo la ĉeĥaj politikistoj reagis senprokraste kaj faris kurtan proceson. La 19an la ĉeĥa parlamento proklamis kun la konsento de la ĉeĥa registaro, ke la ĉeĥoj volas efektivigi la ŝtatan potencon por la ĉeĥa landoparto. La anstataŭanta ĉeĥa ĉefministro Jan Kalvoda interpretis tiun eldiron tiel, ke la ĉeĥa landoparto povas suverene agi kaj ne devas respekti la sintenon de aliaj, do de slovakaj deputitoj, kiuj kontraŭstaris kaj blokis la nuligon de ČSFR. La nuligo de ČSFR kaj per tio la disiĝo de ambaŭ landopartoj sur federacia nivelo estis ratifita de la Federa Asembleo en Prago la 25an de novembro per plimulto de 92 voĉoj (90 estis necesaj) kun po sep ĉeĥaj kaj slovakaj kontraŭaj voĉoj. Tio signifis, ke la komuna ŝtato nomata ČSFR ĉesis ekzisti fine de la jaro 1992.



Plej nova generacio de ĉefaj politikistoj de postkomunisma Slovakio: Vladimír Mečiar, Rudolf Schuster, Vladimir Gašparović, Mikuláš Dzurinda, Robert Fico, Michal Kováč, Andrej Kiska

## Prilaborado kaj pritaksado de la historia pasinteco en Slovakio

Slovakio estas taŭga kaj samtempe tragika ekzemplo por montri, kiel diversaj fanatikaj kaj reakciaj ideologioj kaj subpremaj sistemoj kiel naciismo, katolikismo, nacisocialismo kaj komunismo, kiuj aperis kiel diktaturoj kun aŭtokratiisma-imperiisma-koloniisma, absolutisma aŭ totalisma karaktero, povis transformi iun landon kaj popolon al totala kultura dezerto kun longdaŭraj, tre malfacile ripareblaj difektoj kaj damaĝoj. Unu civiliza katastrofo post la alia trafis Slovakion kaj la slovakojn, kiuj nur post 1989 finfine sukcesis eviti diktaturon kaj subremadon kaj fariĝi libera kaj ´normala´ popolo. La furorado de diversaj ideologiaj kaj politikaj reĝimoj havis ankaŭ gravajn sekvojn por la historiografio, kies aktuala situacio estu montrita en la sekva alineo.

*Historiografio:* Kiel konate, dum la komunisma regadoperiodo en orienta Eŭropo la valida historiografio estis tendencisma, reviziisma, partieca, unuflankeca, mankohava, baze falsita, tordita, renversita kaj grave manipulata de la aktuala politika kurso, fuŝita jam en la kerno laŭ la premisoj de la marksisma-leninisma instruo kaj finformita laŭ la persona opinio de Stalin, do ĝi estis monotona, malplena, apriorie malhonesta, neobjektiva kaj mensoga, praktike nefidinda kaj neutiligebla. Konsiderante la komunisman historiografion „totala falsado“ de la realeco, Benedetto Croce (kaj aliaj) demandis sin, „kiel eblas, ke la komunismo taksas sin kapabla skribi historion, kvankam ĝi signifas la absolutan neadon de ĉia historio“. Nu, kiel Erich Goldhagen atentigis, Pokrovskij, la dojeno de la sovetia historiografio, diris laŭsence, ke la historiisto devas fari politikan propagandon kaj nenion alian. En la sovetkomunisma historiografio la traktado de la „juda demando“, precipe de la holokaŭsto, estis evitata, subpremata, publike netuŝebla, kvazaŭa tabuo. La judoj ne estis agnoskitaj kiel ĉefa memstara viktima grupo de la dua mondmilito, sed formis kun ĉiuj ceteraj sovetiaj popoloj, kiuj fariĝis viktimoj de la nacisocialisma, „hitlerfaŝisma“ agresmilito, unu homogenan tuton. Estas ankaŭ vere, ke la gvidaj teoriistoj de la komunismo, kiuj parte mem estis judoj, estis radikalaj antisemitoj kaj kontraŭcionistoj. Krom tio, la sovetkomunistoj akuzis la cionistojn, ke ili kunlaboris kun la nacisocialistoj, do la perfida konnotacio al la judaro, la ĉefa viktimo (krom la sovetia popolo) de la dua mondmilito, estis perfekta. La sovetia historiografio subpremis la memoron pri la holokaŭsto, ĉar la komunistoj laŭdire timis kaj volis eviti revekiĝon de la antisemitismo kaj juda naciismo. Gravan rolon rolon ludis ankaŭ la politika subteno de la komunismaj landoj al la palestinanoj kontraŭ Israelo, ŝtato fondita en 1948, cetere kun la apogo kaj aprobo de Stalin (sed Jan T. Gross montris en sia libro ´Timo´, ke la antisemitismo de Stalin maturiĝis jam pli frue). Sub tiaj kondiĉoj de sistema mensogado kaj altgrada morala perverseco, kiun la sovetia historiografio permesis al si, eĉ ne unu mono-

grafio pri la holokaŭsto aperis en Slovakio (aŭ Ĉeĥoslovakio) post la akaparo de la politika povo fare de la komunistoj en 1948. La subita kolapso de la komunisma reĝimo en 1989 surprize trafis la popolojn de orienta Eŭropo, por kiu ili, ankaŭ la slovakoj, ŝajne ne estis preparitaj.

Per la politika turniĝo de 1989 estis lanĉita ankaŭ nova diskuto pri la historia pasinteco de Slovakio, precipe de la „faŝisma" Slovaka Ŝtato de 1939-45 kaj pri la ĝenerala aktuala stato de la slovaka historiografio mem. Sed post kiam en 1989 povis komenciĝi libera necenzurita plurisma debato, meze de la 1990aj jaroj jam okazis agresema disputo inter la apogantoj de la demokratia jura ŝtato kaj la diversaj interpretistoj de la eklezia (aŭ „klerikala") faŝismo. Inter la plej fruaj fakaj kontribuaĵoj, kiuj traktis tiun temon, troviĝis la studoj de ***Richard Marsina*** (nask. 1923), kiuj estis publikigitaj en *Historický Časopis*. En tiuj la aŭtoro bedaŭris la mankon de akademia fako, kvankam ĝi ja ekzistis inter 1938 kaj la 50aj jaroj en Slovakio. Por eviti nedeziratajn influojn, Marsina, kiu estis la disĉiplo de ***Daniel Rapant*** (1897-1988), kiu estas konsiderata kiel fondinto de la slovaka historiografio, pledis por memstara slovaka historiografio sendepende de la ĉeĥoslovaka kunteksto. La scienca debato de la 90aj jaroj estis karakterizitaj per teoriaj diskutoj pri la nocioj ´identeco´, ´nacio´ kaj la rilato inter nacio kaj ŝtato. En marto 1992 en Banská Bystrica estis organizita scienca konferenco okaze de la 50a datreveno de la deportado de la judoj el Slovakio, kaj en novembro 1998 la Instituto pri Judistiko de la Komenia universitato okazigis seminarion, post kiu aperis grava publicaĵo. Kiel parto de la Slovaka Nacia Muzeo, la Juda Muzeo en Bratislavo eldonis aron da scienca kaj sciencpopulara literaturo pri la historio de la judoj en Slovakio. Krom amaseto da aliaj studoj, en 1995 aperis la elstara verko ´Historio de Slovakio kaj de la Slovakoj´ (Dejiny Slovenska a Slovákov) de ***Milan S. Ďurica*** (nask. 1925), kiu vekis larĝan kontraŭdiran disputon. Ambivalenta estis ankaŭ la rilato al la percepto de la Slovaka Ŝtato mem: Dum ekzemple ***Ivan Kamenec*** (nask. 1938), filo de judaj gepatroj kaj iama membro de la KP, kiu verkis elstaran ´Historiografion pri la periodo 1938-1945´, kredis kun sinteno de espero, ke la „tro supraĵa rigardo al la Slovaka Ŝtato estas for", ***Jeŝajahu A. Jelínek*** (nask. 1933), iama slovako elmigrinta al Israelo kaj Usono, verkinta pri la holokaŭsto en Slovakio en la periodaĵo *Bohemia* (1993), opiniis, ke kialo por tro eŭforia optimismo tute ne ekzistas, ĉar li simple ne tro fidas al la slovakoj, se temas pri ilia rilato al etnaj minoritatoj, precipe judoj. Kvankam la interesiĝo pri la historio de la judoj fortiĝis en Slovakio post 1989, Jelínek daŭre konstatas malagrablan rilaton en la slovaka publiko rilate al la judoj, kiuj eĉ havus kialon por timi. Tio ne estas miriga, ĉar ekzemple la grava verko de ***Ladislav Lipscher***, ´La judoj en la Slovaka Ŝtato 1939-1945´, kiu estiĝis post lia elmigrado el Ĉeĥoslovakio en 1969 kaj tial ne povis aperi en lia patrujo, sed estis eldonita en Okcidento en 1980, tiel ke la slovakoj ne konis tiun verkon. La plej ampleksan publicaĵon pri la temo aperigis ***Ladislav Hubernák*** en formo de kvinvoluma (editore kaj enhave ne tute kontentiga) dokumentaro (1994, 1999, 2000) pri la solvo de la juda demando en Slovakio en 1938-45. *Eduard Nižňanský, Ivan Kamenec, Katarina Hradská, Katarína Zavacká, Petra Larišová* kaj aliaj preparis alian serion de publikaĵoj pri la holokaŭsto en Slovakio, kiu aperis en 1999-2002. *Igor Baka* studis la situacion en la koncentrejo Nováky, ***Eduard Nižňanský*** esploris pri Vyhne, *Ladislav Zajac* pri la situacio en la VIa bataliono. Ivan Kamenec, kiu aperigis la gravan libron ´Po stopách tragédie´(Laŭ la spuroj de la tragedio), kiu estis skribita jam komence de la 1970aj jaroj, postulis doni pli fortan atenton al diversaj aspektoj kaj detaloj de la slovaka historio kiel la problemo de la decidoj faritaj de la tiama registaro sub la kondiĉoj de la germana premo, la komparo de la slovaka ludakismo kun la reĝimoj de Kroatio, Hungario kaj Vichy-Francio, aŭ la antisemitismo en Slovakio post la milito, ekzemple la pogromo en Topoľčany en septembro 1945. Krom tio, *Tatjana Tönsmeyer*, kiu verkis legindan libron pri la germanaj konsilistoj en Slovakio dum la 2a mm, lamentis, ke la biografioj kaj personaj mondkonceptoj, valoroj, konvinkoj kaj karieroj de la gvidaj slovakaj protagonistoj de la Slovaka Ŝtato estas malmulte konataj kaj esplorataj, same iliaj rilatoj al la nacisocialismo. Ankaŭ ne estas klare, ĉu la slovakaj politikistoj sciis, kio vere okazas en Aŭŝvico kaj ĉu ili propradecide grandigis la kvanton de deportotaj judoj, kiel la iama SS-ĉefsturmestro Wisliceny asertis en Nurembergo.

Dum en la regadotempo de Mečiar la postuloj de Jelínek kaj Kamenec ricevis neniun ŝancon esti konsiderataj, atenton ricevis almenaŭ diversaj memuaroj, kiuj estis verkitaj kaj de postvivintaj deportitaj judoj kaj de slovakaj politikistoj. Pro tempomanko mi devis neglekti la legadon de la elstaraj kontribuaĵoj de *Jörg K. Hoensch*, kiu estas konsiderata kiel dojeno de la Slovakio-historiografio (la koncernaj titoloj estas menciitaj en la bibliografio).

Estas notinde, ke al Slovakio revenis grupo de elmigrintaj historiistoj, kiuj reprezentis emfazitan naciisman sintenon, kiu zorgis pri la aperigo de ´reviziismaj´ verkaĵoj, en kiuj la politiko de la Slovaka Ŝtato estas defendata kaj en kiuj la respondeco por la deportado de judoj estas ŝovitaj al la germanoj. En

tio Tiso estas senkulpigita per la argumento, ke per siaj protektaj leteroj li helpis al al miloj da judoj. Al tiu tendenco apartenas ankaŭ la verko de la menciita ***Milan Stanislav Ďurica*** (nask. 1925), ĉirkaŭ kies libro *´Historio de Slovakio kaj de la slovakoj´* (kiun mi ne konas) eksplodis akra kverelo, ĉar ĝi enhavis ´politike nekorektajn´ interpretojn, kiuj tute ne plaĉis al la respondecaj EU-organoj, kiuj financis tiun verkon. La ´Historio´ de Ďurica evidente tendencas gloradi la Slovakan Ŝtaton de 1939-45 kiel „plenumiĝon de la miljara strebado de la katolika slovaka nacio al propra ŝtateco“ kaj klopodis rehabilitadi la reĝimon de Tiso. La holokaŭsto ŝajne estas misprezentata laŭ ksenofobiaj kaj antisemitismaj stereotipoj. Kompreneble, lia libro trovis viglan aprobon en HZDS kaj en ekleziaj medioj, ĝis kiam Bruselo postulis la repagon de la mono. Lige kun lia artikolo pri la dekstrema sceno en orienta Eŭropo, la kritikantoj de Ďurica, kiu laboris kiel profesoro en la teologia fakultato de la Komenia universitato en Bratislavo kaj tiel situis proksime de la eklezio, vidis en lia persono „ultranaciisman historiiston“, dum aliaj laŭdis lin, ĉar li rikoltis meritojn pro kolektado de multaj interesaj fontoj el italaj arkivoj, kiam dum la komunismo li vivis kaj laboris en Italio. Al la kritikistoj de Ďurica oni respondis, ke ili celas lanĉi kampanjon kontraŭ ĉio, kio helpas fortigi la slovakan nacian evoluon, kaj suspektis eksterlandan konspiremon, ktp. Oni eĉ pridubis la sciencan kompetencon de tiuj kritikistoj, kiuj mem devis sin demandi, ĉu ili entute povas esti konsiderataj kiel slovakaj historiistoj. Kvankam post la eksigo (aŭ eksiĝo) de Mečiar en 1998 la situacio en la historiografio iomete trankviliĝis, oni ankoraŭ ne povis paroli pri malstreĉita stato, inter alie, ĉar en la publiko oni verve diskutis pri du diversaj konceptoj: pri la „slovaka historio“ kaj la „historio de Slovakio“, kiuj havus diversajn metodologiajn alirojn al la traktado. En tio ege gravas ankaŭ la aspekto de la rilato de la slovakoj al la etnaj minoritatoj, kiu tradicie estas streĉata, precipe rilate ĉeĥojn, hungarojn kaj romaojn, malpli judojn, germanojn aŭ polojn. Per la titolo ´Historio de Slovakio kaj de la slovakoj´ Ďurica celis, laŭ propra klarigo aŭ laŭ la klarigo de liaj interpretantoj, ligi la teritorion kun la nacio sur egala nivelo. Cetere, en Slovakio regas la opinio, ke la historiisto ne devas interpreti la historion, sed prezentu ĝin kia ĝi vere estas. Sed historiografio ĉiam estas ankaŭ interpretado, sen kiu ĝi ne povas ekzisti aŭ esti akceptebla, kaj ĝi nature estas ankaŭ falsebla, influebla kaj manipulebla de diversaj flankoj kaj interesogrupoj. Granda problemo estas, ke oni ne (sufiĉe klare) difinas la nociojn. Ekzemple la Slovaka Ŝtato de 1939-45 foje estas nomita „vasalo“, foje „satelito“, foje „duonsuverena“, foje „faŝisma“, foje „aŭtoritatisma“, kun „marioneta“ registaro, ktp. Kiu termino validas? Aŭ ke Germanio povis „permesi“ aŭ „malpermesi“ al la slovakoj fari aŭ ne fari tion kaj jenon. Kion tio signifas? Ktp. ktp. Tiel, Slovakio ricevis sian propran „kverelon inter historiistoj“, kiu montris, ke la debato havas limojn kaj ke certaj temoj ne povas esti findiskutataj, kvankam ekzistus urĝa neceso kaj multaj kialoj, okazoj kaj temoj por findiskuti kaj daŭre esplori. Ŝajnas, ke la slovakoj ankoraŭ ne ´digestis´ ĉiujn tiklajn temojn kaj problemojn de la historio, sed veras ankaŭ, ke la slovaka socio nek tro pretas nek interesiĝas ´ekscii la historian veron´, malgraŭ evidentaj progresoj, restante indiferente al ĝi, ĉar kritiko kontraŭ la nacio malhelpas la naciajn konscion kaj evoluon de popolo, kiu staras praktike ĉe la komenco de sia nacia kaj ŝtata solidiĝo. Por ĉiuj tiuj cirkonstancoj oni devas havi komprenon kaj paciencon. Ekzemple en Svislando dum jardekoj post la dua mondmilito oni, t.e. la politiko (kaj socio kaj ekonomio), neglektis trakti tiklajn temojn de la svisa historio rilate la (nerektan) partoprenon en la holokaŭsto, ĝis kiam post 1989 Svislando estis devigita (de ekstere) radikale kaj sentabue okupiĝi pri ĝi.

Ankaŭ en Svislando precipe la pli maljuna generacio, kiu ankoraŭ travivis la militon, malvolonte parolas pri tiaj temoj, ĉar ili estas malagrablaj kaj embarasaj. Certaj reprezentantoj en la ´moderna´ (kontraŭ-eŭropisma) partio SVP (cetere la plej granda en Svislan-do), kiu iusence estas komparebla kun la malnova Slovaka Popolpartio, kaj al kiu apartenas s-ino Yvette Estermann, kiu naskiĝis kiel Iveta Gavlasová (en 1967) en Slovakio kaj sidas de 2007 en la svisa parla-mento, ne hezitas senhonte reaktivigi ksenofobiajn, rasismajn kaj antisemitismajn emociojn kontraŭ „krimaj“ eksterlandanoj, germanoj, judoj kaj aliaj. Kompare kun Slovakio, Svislando havas nek nacisocialismon nek komunismon por digesti kaj prilboradi, sed ´nur´ la rifuzadon de judoj ĉe la landlimoj, la kaŝadon de juda oro en la bankoj kaj, poste en la 1980aj jaroj, la ŝtatan observadon de centmilo da civitanoj, kiuj estis maldekstruloj aŭ havis rilaton kun komunismaj landoj (ankaŭ mi mem estis koncernata de tia observado, kvankam mi ne estis membro de maldeksta partio), fare de la svisa konfederacia polico. Tiaj praktikoj kaj problemoj estas preskaŭ bagateloj kompare kun tio, kio okazis en Slovakio. Certe, en Slovakio la historio de la faŝismo/nacisocialismo kaj komunismo estas tro malagrablaj kaj tro pezaj temoj, kiuj povus denove diskrediti la slovakan nacion, kion oni timas kaj celas nepre eviti, ĉar neniu deziras honti pro eventuale faritaj eraroj, kiuj ne estas korekteblaj, kaj pri kiuj la junaj generacioj ne kulpas.

La tasko de la slovaka kaj internacia historiografio do estas trovi la historian veron kaj taŭgan ekvilibron de objektive komunikindaj kaj kredindaj historiaj faktoj, kiuj devas formi la historion de iu popolo, kun ĉiuj ĝiaj heroaj kaj negativaj elementoj. Al tiu vero eble sukcesis alproksimiĝi sufiĉe bona, sciencpopulara libro, kiu en 2002 aperis en la Slovaka Pedagogia Eldonejo en Bratislavo, kiu detale kaj sufiĉe objektive prezentas la historiajn faktojn de Slovakio ekde la komencoj ĝis la nuntempo. Ĝi estas konceptita kiel enciklopedio, portas la titolon *´Leksikono de la Slovaka Historio´* kaj konsideras la slovakan, ĉeĥan, hungaran, aŭstran kaj germanan historiografiojn. Krom versio en slovaka lingvo (´Lexikón slovenských dejín´) ekzistas german- kaj anglalingva versioj. Kontentige multaj bazaj informoj estas dediĉitaj ankaŭ al la sorto de la judoj en Slovakio dum la dua mondmilito. Certe, pro la amplekseco de la traktenda materialo kaj la koncizeco de la prezentaĵo, kiu estis kunfinancita de aŭstraj kaj brita institucioj, aperis ankaŭ mankoj (ekzemple mi ne memoras, ke mi renkontis la vorton ´holo-kaŭsto´, kiu tamen estas centra nocio en la eŭropa konscio). Ĝuste tiuspecaj libroj povus veki la intereson pri la historio de Slovakio kaj de la slovakoj, kiu ekster Slovakio tute ne estas konata, pro kio oni povas deziri al tiaj verkoj larĝan disvastiĝon.

*Komunismo kaj „lustracia" procezo:* La okupiĝo pri la komunisma pasinteco longe ne troviĝis en la centro de la politika debato en Slovakio. Oost la ĉeĥoslovaka disiĝo ĉe la malnovaj komunistoj evidentiĝis, ke ili klopodis konservi sian politikan povon en Slovakio, partoprenante en reformita formo en la adiaŭado de la malnova sistemo. La civitana movado utiligis la reputacion de la disidentoj, sed ĝi ĉefe rekrutiĝis el la kritikaj medioj de la oficialaj strukturoj. Kaj la katolika parto de la civitana movado signalis, ke ĝi pretas pardoni kaj nacie repaciĝi laŭ la hispana modelo. Per la deziro amnestii siajn iamajn persekutantojn de la sekreta sekureco (StB), la konsento pri la neceso rehabilitadi iamajn viktimojn aŭ per ilia demonstra partopreno en la entombigo de Gustav Husák, disidentoj kiel František Mikloško kaj Ján Čarnogurský metis klarajn signojn.

Fakte, la „lustracia" leĝo, kiu estis akceptita en 1991 de la federacia parlamento kaj kiu antaŭvidis la purigon de la politikaj elitoj, validis en Slovakio ĝis 1996. Sed ĝi neniam estis aplikita, ĉar la slovakoj malŝatis ĝin, sed ĝi ankaŭ ne estis nuligita. Vladimír Mečiar, kiu elpaŝis kvazaŭ kiel fondinto de nova slovaka ŝtato, anoncis ankoraŭ antaŭ la balotoj de junio 1992, ke tiu leĝo ne estos aplikata en Slovakio kun la argumento, ke la homoj en Slovakio ne estas klasifikataj laŭ partia membreco. Mečiar postulis, ke ĉiuj StB-aktoj devas resti en Slovakio. Ŝajnas, ke Mečiar, kiu rifuzis la „lustracion" en principo, timis, ke li estos mem malkaŝita kiel kunlaborinto de la sekureca servo StB, ĉar oni trovis akton kun la kaŝnomo „Doctor", kiu kongruis kun Vladimír Mečiar. La StB-aktoj de Mečiar estis privatigitaj kaj anonimigitaj, kio donis impreson pri tio, kiel la jura kulturo en Slovakio estos praktikata sub la reĝimo de Mečiar, kiu konis neniujn skrupulojn persekuti kritikistojn laŭ malnova komunisma maniero. Slovakio riskis refali en sinistrajn stalinismajn tempojn. En 1994 fortan kritikon la politiko de Mečiar ricevis de ***Michal Kovač*** (nask. 1930), kiu tiam oficis kiel (unua) prezidento de Slovakio, tamen li ne povis eviti la revenon de Mečiar kiel ĉefministro. Kovač estis ekonomiisto, kiu estis ekskludita el la KP post la „Praga Printempo", kiel lia samsortano Mečiar. Kovač partoprenis en la Ĉeĥoslovaka revolucio de 1989 kaj aktiviĝis en la ĉeĥoslovaka kaj slovaka politiko.

Ŝtataj institucioj rezignis kontraŭleĝe pri „lustraciaj" decidoj en kazo de gravaj enpostenigoj. Tiel, ankaŭ dek jarojn post la fino de la komunismo tri kvaronoj de plej altaj postenoj en la ŝtato estis okupataj de iamaj partiaj funkciuloj. Ŝtatprezidento ***Rudolf Schuster*** (nask. 1934) mem estis membro de la CK de la slovaka KP kaj en novembro 1989 li eĉ estis elektita kiel partia sekretario. Parlamentestro *Jozef Migaš* funkciis kiel sekciestro de la CK de SKP, kaj la iama komunisma justicministro *Milan Čič* fariĝis prezidanto de la slovaka konstitucia tribunalo kaj unu el la patroj de la nova slovaka konstitucio. Ankaŭ ministraj postenoj kaj aliaj ŝlosilaj funkcioj en la parlamento estis okupitaj de iamaj komunistoj. Ĉiuj ŝtatestroj kaj du trionoj de la parlamentaj deputitoj dum la regadotempo de Mečiar estis iamaj KP-membroj. Iama kunlaboro kun StB ne signifis obstaklon por la kariero, tiel ke ankaŭ en la novaj sekurecaj servoj retroviĝis iamaj StB-kunlaborantoj. Juĝistoj, kiuj malliberigis civitanojn en la 80aj jaroj pro la disvastigo de kontraŭleĝa literaturo, daŭrigis sian laboron. Kvar tiaj juĝistoj eĉ laboris ĉe la plej alta tribunalo de Slovakio. En multaj firmaoj kaj ekonomiaj organizaĵoj ekzistis iamaj StB-kunlaborantoj en gvidaj pozicioj.

Tamen, en 1996 la slovaka parlamento akceptis leĝon pri la „senmorala kaj kontraŭleĝa karaktero" de la komunisma reĝimo. Sed tiu decido tute ne signifis enkondukon de nova ĉapitro en la prilaborado de la historio, sed ĝi devis signifi finon al la komunisma pasinteco. Kvankam la slovaka leĝo

entenis la saman klaŭzon pri preskriptaj periodoj por la tempo de la komunisma regado same kiel la ĉeĥa leĝo, Slovakio grandparte rezignis pri jura persekutado de iamaj funkciuloj. Ekzemple la iama ĉefo de la ŝtata sekureco, generalo Alois Lorenz, kiu estis kondamnita ankoraŭ en Ĉeĥoslovakio pro kontraŭleĝa detruado de dokumentoj kaj pro la arestado de 300 disidentoj al kvarjara restado en malliberejo, eskapis la ekzekuton de la puno per translokiĝo al Slovakio, kie li restis libera kaj netuŝebla, dum la proceso kontraŭ li estis nuligita en 1998. Nur post la foriro de Mečiar Lorenz estis kondamnita en aprilo 2001 al 15-monata malliberejа puno je probacio. Ankaŭ en la kazo de dokumentitaj mortigoj de homoj ĉe la ŝtata limo neniu respondeculo estis prezentita al la tribunalo.

Post la kolapso de la komunisma reĝimo, Husák, Bil´ak, Lenárt, Colotka kaj Jakeš perdis siajn politikajn funkciojn kaj estis eksigitaj el la KP. Gustáv Husák forpasis la 18an de novembro 1991 78-jara en Bratislavo. *Jozef Lenárt* estis akuzita pro ŝtatperfido kaj riproĉita pro tio, ke li kreis la fundamenton de la sovetia interveno en 1968. Kvankam li estis slovako, post la malfondo de Ĉeĥoslovakio li restis en la Ĉeĥa Respubliko kaj ricevis la ĉeĥan ŝtatanecon. En septembro 2002 la akuzo pro ŝtatperfido estis nuligita. Li mortis en 2004. Depost junio 1990 *Peter Colotka* estis persekutita pro suspekto je misuzo de la politika povo, koruptado kaj ŝtelado, sed jam en junio 1994 Colotka, kiu ankoraŭ vivas, estis plene liberigita de ĉiuj akuzoj. *Vasil´ Bil´ak,* kiu subskribis la fifaman leteron de 1968 al Breĵnev kaj tiel vokis la „fratan helpon“ de Sovetunio por interveni en Ĉeĥoslovakio, trankvile vivis en sia vilao en Bratislavo, ĝis kiam en marto 2000 li estis akuzita pro ŝtatperfido. La akuza dosiero ampleksis 23´000 paĝojn. Sed laŭ slovakia leĝo, plimulto de la iamaj krimoj de funkciuloj de la komunisma reĝimo jam ne plu povas esti persekutitaj, ĉar la tempo elĉerpiĝis. Bil´ak forpasis en februaro 2014 en la aĝo de 96 jaroj, post kiam li ankoraŭ sukcesis publikigi siajn memuarojn.

Tiel, la komunisma pasinteco de Slovakio glate transiris en la postkomunisman tempon. La malnova modelo estis transprenita kaj naskis novan aŭtoritatisman kolektivismon sub la gvido de ´reciklitaj´ elitoj. La transiro de la nacia slovaka komunismo al la postkomunisma naciismo okazis flue. Malnovaj slovakaj komunistoj daŭrigis sian laboron kiel metamorfoziĝintaj novaj slovakaj naciistoj, dum morale kredindaj ´kontraŭ-elitoj´ mankis.

Nur post la malelekto de Mečiar Slovakio en 1998 travivis duan demokratian ´revolucion´. Tiam ankaŭ la kritika prilaborado de la historio ricevis novan ŝancon. Laŭ ĉeĥa modelo en la justicministerio estis kreita malgranda oficejo kun tri dungitoj por la dokumentado de la krimoj de la komunismo, kiu okupiĝis unuavice pri politike motivataj krimoj. Sed la preteco de la publika socio okupiĝi pri la krimoj de la komunismo estis limigita aŭ nula. Per la iniciato de ***Ján Langoš,*** iama disidento kaj federacia ministro pri internaj aferoj, en 2002 la Slovaka Nacia Konsilio adoptis leĝon pri la malfermo de la arkivoj de la sekurecaj servoj en la periodo 1939-89 kaj pri la starigo de **Instituto pri nacia memoro** laŭ la modelo de samtipa institucio en Pollando. Kiel plej lasta lando de mezorienta Eŭropo Slovakio malfermis la arkivojn de StB, kiuj ĝis nun estis kontrolataj de la sekureca servo SIS, kiu en la tempo de Mečiar mem estis envolvita en kontraŭleĝaj agadoj. Unuafoje slovakaj civitanoj ricevis aliron al la StB-aktoj. La Instituto, kiu engaĝis jam 79 kunlaborantojn, komencis dokumenti la heredaĵon de du slovakaj diktaturoj – la „faŝisma“ Slovaka Ŝtato de 1939-45 kaj la komunisma respubliko de 1948-89. Per tio estis publikigitaj ne nur la nomaroj de oficialaj kaj neoficialaj StB-kunlaborantoj, sed ankaŭ de tiuj oficistoj, kiuj dum la tempo de la Slovaka Ŝtato respondecis pri la senposedigo kaj deportado de slovakiaj judoj en la neniigejojn de la „Tria Regno“. Kompare kun la analoga ĉeĥa institucio, la slovaka oficejo ne havas la kompetencon jure esplori, sed ĝi povas iniciati jurajn procesojn. La aktiveco de la slovaka instituto estas kontrolata de la parlamento.

La demandon de la rehavigo de la antaŭa eklezia posedaĵo la slovakaj politikistoj traktis pli grandanime ol la ĉeĥaj.

### Plua politika evoluo post Mečiar

Por eviti la daŭrigon de la regado de Mečiar, en 1997 kvin opoziciaj partioj kreis unuiĝon, kiu gajnis la balotojn en 1998 sub la gvido de ***Mikuláš Dzurinda*** (nask. 1955), kiu fariĝis nova ĉefministro. Lia registaro akcelis la reintegradon de Slovakio en la strukturojn de EU, OECD kaj NATO, al kiuj Slovakio povis aliĝi. La Monda Banko ĝojis pri la merkataj reformoj, kiujn tiu slovaka registaro efektivigis, kaj Dzurinda kolektis multajn internaciajn laŭdojn kiel kapabla kaj efika politikisto. Nature, el radikala maldekstra flanko la „liberala ekstremismo“ (Hofbauer) de Dzurinda trovis fortan kritikon. Malgraŭ tiu

sukceso, en la lando restis multaj problemoj por solvi, la enlaboreco kreskis al 20 procentoj. En 2006 Dzurinda perdis sian postenon kiel ĉefministro favore al ***Robert Fico*** (nask. 1964), kiu venkis kun sia maldekstrema partio *Smer-SD*, forĝante koalicion kun la naciisma partio SNS de *Ján Slota* kaj de la esence malfortigita HZDS de Mečiar. Sian politikan karieron Fico komencis en 1987 per aliĝo al la ĉeĥoslovaka KP, en kiu li membris ĝis 1990. Poste li aktiviĝis en la postkomunisma Partio de la Demokratia Maldekstro (SDL´). En 1999 Fico forlasis tiun ĉi partion kaj fondis novan partion – *Smer* (direkto), kies prezidanto li fariĝis. Politologoj karakterizas tiun partion nacipopolisma kun socialdemokrateca orientiĝo (kvankam en komparo kun klasikaj socialdemokratiaj partioj de okcidenta Eŭropo ekzistas gravaj diferencoj). Kun tiu partio Fico faris fulmrapidan karieron, utiligante la seniluziiĝon de vastaj sociaj tavoloj pri la politiko de Dzurinda kaj Mečiar, kies politika potencialo ŝajne elĉerpiĝis. En 2009 ***Ivan Gašparovič*** (nask. 1941), gvida membro de HZDS kaj intima amiko de Mečiar, fariĝis nova ŝtatestro. Interrompita de ***Iveta Radičová*** de la Dzurinda-opozicio kiel ĉefministrino por du jaroj (2010-12), en 2012 Smer-SD rikoltis en la balotoj 44,4% de la donitaj voĉoj, kio signifis, ke Fico, kies partio ricevis la absolutan plimulton, povis daŭrigi sian mandaton kiel ĉefministro. Kvankam en la parlamentaj balotoj de 2016 Fico povis konfirmi la unuan rangon, lia partio draste perdis voĉojn, tiel ke la procentaĵo falis al 28,3%. Malgraŭ tio, Fico formis novan koalicion kun kelkaj aliaj partietoj kaj savis sian politikan povon ĝis nun.

En la ekstera politiko Fico distanciĝis de Usono kaj fortigis la rilatojn kun ŝtatoj, kiuj ne apartenas al EU, precipe Ruslando, Serbio, Belorusio, Libio, Kubo, Venezuelo kaj Ĉinio. Sub Fico Slovakio rifuzis la starigon de novaj usonaj armiloj en Ĉeĥio kaj Pollando, malagnoskis la sendependecon de Kosovo kaj reprenis la slovakajn trupojn el Irako. Malgraŭ tio, Fico restis pragmatisma rilate al Usono. En ekonomia rilato, Fico aligis Slovakion al la Ŝengena Spaco kaj enkondukis la eŭromonon en Slovakion, kion Ĉeĥio kiel konate rigide rifuzas fari. Kiam en 2014 Fico kandidatiĝis kiel ŝtatprezidento de Slovakio, li estis apogita de la franca kaj ĉeĥa ŝtatestroj François Hollande kaj Miloš Zeman kaj de Martin Schulz, prezidanto de la Eŭropa Parlamento. Sed nova ŝtatestro de Slovakio fariĝis ***Andrej Kiska*** (nask. 1963), iama entreprenisto, kiu neniam estis komunisto. Ekde 1999 la prezidento de Slovakio estas elektita de la popolo.

En la interna politiko Fico lanĉis kelkajn patriotismajn agadojn, starigante bustojn de historiaj slovakaj figuroj ĉe la enirejo de la parlamentejo kiel tiujn de la oficiale rehabilitita pastro-politikisto Andrej Hlinka kaj de la mezepoka grandmoravia princo Svätopluk Ia. En Komárno oni starigis statuojn de Kirilo kaj Metod(i)o, kaj en Bratislavo oni renovigis la kastelon.

Plej aktuale, en socikultura rilato Fico esprimis skeptikon: Por li multkulturismo estas fikcio, kaj la islamo ne havas lokon en Slovakio. Kiam en 2015 el Sirio kaj aliaj aziaj kaj afrikaj landoj rifuĝintoj amase invadis Eŭropon. Fico kontraŭstaris, kune kun aliaj mezorienteŭropaj landoj, la adopton de deviga kvoto por akcepti rifuĝintojn, kiu estas diktita de EU. En la dua kvarono de 2016 Slovakio akceptis nur dek azilpetantojn. Ankaŭ rilate al diversaj minoritatoj (ekzemple seksaj) Smer estas konservativisma. Kvankam Fico probable diris kiel politikisto kion multaj homoj en tiuj landoj pensas, liaj eldiroj kontraŭ rifuĝintoj, azilpetantoj kaj islamanoj estis kritikitaj de la Socialdemokratia Partio de Eŭropo, kiu minacis lin per eksigo.

Tra la parlamentaj balotoj de la jaro 2016 la Nacian Konsilion sukcesis eniri la partio „Kotleba – Popolpartio Nia Slovakio". Politologoj karakterizas tiun partion ultranaciisma-ekstremisma-dekstrema. ***Marian Kotleba*** (nask. 1977) adoras la Slovakan Ŝtaton de 1939-45 kaj la Slovakan Popolpartion de Andrej Hlinka, precipe ties iaman gvardion. Kotleba, kies elekto vekis atenton en tuta Eŭropo, havis problemon kun la polico kaj justico, ĉar li montris hitlerisman konduton kaj fondis partion, kiu estis malpermesita, ĉar ĝi lezis la slovakan konstitucion. Malgraŭ tio, li havas sufiĉe da apogo precipe en Banská Bystrica, kies regiona prezidanto (župan) li fariĝis en 2013. En 2016 li anoncis la intencon fondi apartan milicon por „protekti" la civitanojn de „ciganaj parazitoj".

Fine menciindas ankoraŭ alia slovaka politikisto: ***Ján Figel´*** (nask. 1960), kiu eĉ havas ligon al la Esperanto-movado. Kvankam en sia tiama funkcio kiel „EU-komisaro pri profesia klerigo, kulturo kaj multkulturismo" li ankoraŭ diris (en septembro 2005), ke Esperanto havas malmultan utilon en Eŭropo, en 2016, kiel freŝbakita „speciala sendito (aŭ ambasadoro) pri religia libereco ekster Eŭropo" la sama Ján Figel´ laŭdis Esperanton en alta tono en sia preskaŭ perfekte esperantigita parolado okaze de la inaŭguro de la 101-a Universala Kongreso en Nitro (Slovako)! Estinte deputito de la „Nacia Konsilio de la Slovaka Respubliko" (1992-8), ŝtatsekretario en la ministerio de la eksteraj aferoj en la registaro de Dzurinda (ĝis 2002) kaj ministro pri trafiko, poŝto kaj telekomunikado (2010-12) en la registaro de Iveta Radičová,

Figel´ nun oficas kiel prezidanto de la katolika-konservativa movado (Kresťanskodemokratické hnutie KDH) kaj vicprezidas la Slovakan Nacian Konsilion (parlamento).




Slovakaj monbiletoj kun bildoj de Pribina, Kirilo kaj Metod(i)o kaj Madono de Levoča (supre), Bernolák, Štúr kaj Hlinka (sube)

## Etnaj malplimultoj kaj la situacio de la hungaroj kaj romaoj en Slovakio

En Slovakio vivas krom slovakoj kompare malmultaj ĉeĥoj, rutenoj, ukrainoj, germanoj, poloj kaj kelkcent (!) judoj (indikojn vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Slowakei#Ethnien). En la censo de 1991 85,7% deklaris sin slovakoj (4,5 mln.), 10,8% hungaroj (madjaroj), 1,1% ĉeĥoj kaj 1,4% romaoj (ciganoj). Nuntempaj diskutoj pri la rajtoj de etnaj minoritatoj en Slovakio koncernas precipe hungarojn (madjarojn) kaj romaojn (ciganojn). Ĉi tie la aktuala situacio povas esti karakterizata nur per kelkaj resumaj aŭ aludaj frazoj kaj bazaj faktoj.
*Hungaroj:* Ĉirkaŭ 11% aŭ 600 mil homoj en Slovakio estas de hungara deveno. Ke la slovakoj ne volas doni al ili rajtojn de aŭtonomio kaj lingvo, havas historian klarigon kaj kaŭzas de tempo al tempo akrajn konfliktojn inter ambaŭ etnaj grupoj, kiuj povas eĉ vastigi al diplomatia kverelo inter Bratislavo kaj Budapeŝto. Precipe en la erao de Mečiar la hungara lingvo estis subpremata kaj la limoj de la administraciaj distriktoj estis, kvazaŭ laŭ stalinisma maniero, tiel fiksitaj, ke la hungaroj formis en ĉiu distrikto nur malgrandan plimulton, kiu ne sufiĉis por ricevi apartan statuson. En 1994 la slovaka parlamento adoptis lingvan leĝon, laŭ kiu la lingvo de la minoritato en la distriktoj aŭtomate fariĝas dua oficiala lingvo, se en tiu distrikto minimume 20% de loĝantoj apartenas al tiu minoritato. Tio inkluzivis la rajton, ke 587 lokoj en Slovakio rajtas uzi hungaran nomon. La nova versio de la slovaka lingva leĝo de 1999 vastigis tiujn rajtojn por la hungaroj. La Slovaka Nacia Partio protestis kaj atentigis pri la danĝero de la hungarigo de suda Slovakio. Sed la hungaroj, kiuj ankaŭ malkonsentis pri la distranĉo aŭ malfondo de Ĉeĥoslovakio, ŝajne daŭre restas malkontentaj pri ajna solvo, kiu venas de la slovaka flanko. Ekzemple oni postulis la enkondukon de la hungara lingvo ankaŭ en la municipojn, do en la pli malaltrangajn administrajn unuojn en la distriktoj, kie vivas madjaraj malplimultoj, sed tion la slovakoj ĝis nun obstine rifuzis fari. Tiel, ankaŭ en la regadotempo de Fico la rilatoj inter slovakoj kaj hungaroj restis malbonaj. En tio kulpis ankaŭ la hungara flanko mem, kiu ne hezitis provokadi la slovakojn per dubindaj patriotismaj esprimoj kaj per reaktivigo de radikalaj ekstremuloj, kiuj lanĉis aĉajn skandalojn.
*Romaoj:* Laŭ la censo de la jaro 1980 en Ĉeĥoslovakio vivis 288´400 romaoj, fine de 1989 jam 399´654, de kiuj 253´843 (63,5%) loĝis en Slovakio. En la censo de 1991 nur 1,4% slovakianoj deklaris sin romaoj, kio korespondas al ĉ. 80´000 personoj. Sed ĉar sennombraj romaoj hezitis oficiala deklari sin ciganoj, oni estimas, ke la nombro de ciganoj en Slovakio estas multe pli alta. Neoficiale oni oni estimas 350´000-520´000 romaojn en Slovakio, kio signifas almenaŭ 10% de la loĝantaro. En Slovakio plej multaj romaoj vivas en Prešov (43´097 en 2011), Košice (36´476) kaj Banská Bystrica (15´525).

Post la enkonduko de la komunismo en 1948 romaoj estis proklamitaj de iure kiel egalaj membroj de la socio, kion la konstitucio garantiis al ili. En 1950 la „cigana leĝo“ de 1927 estis nuligita. En 1952 aperis dekreto, kiu reguligis la „reedukadon“ kaj la forigon de la „subevoluinteco“ de la ciganoj, kiun laŭdire kaŭzis la kapitalisma sistemo. En la sama jaro estis publikigita leĝo, kiu devigis la romaojn loĝi

en fiksaj lokoj kaj minacis ilin per arestpuno en malliberejo, se ili malrespektas tiun leĝon. Fakte, en 1959 tiu leĝo estis efektivigita per polica forto, la tendaroj de la ciganoj estis okupataj, la radoj de la vagonoj, ĉefa simbolo de la ciganoj, estis malmuntitaj kaj detruitaj, kaj la romaoj devis translokiĝi al loĝejoj en proksima vilaĝo, kiuj estis donitaj al ili. Lige kun la diskuto pri la demando, ĉu la romaoj estas nacio, oni trudis al ili iun koncepton de asimilado, kiu komplete ignoris iliajn kulturajn tradiciojn kaj ebligis sisteman subpremadon ankaŭ de ilia lingvo. En la 60aj jaroj la romaoj ne estis konsiderataj kiel etno, sed kiel „social-patologia“ grupo sen rajto posedi proprajn kulturajn trajtojn, kiu rezistas asimiladon kaj rifuzas setlan disiĝon, kun la celo detrui iliajn koherajn loĝstrukturojn. Per tio okazis ilia stigmatizado fare de la politiko kaj socio kaj la detruado de la romaaj kulturo kaj identeco. Dum la „Praga Printempo“ la situacio de la ĉeĥoslovakaj romaoj fariĝis iom pli bona inter alie pro la fondo de la „Asocio de ciganoj-romaoj“ en Brno. Krom diskriminado en socia rilato, precipe klerigaj problemoj malfaciligis la integradon de romaoj. La movado de „Ĥarto ´77“ kritikis la sisteman subpremadon de la ciganoj en Ĉeĥoslovakio kaj atentigis pri tio, ke la parto de romaaj infanoj, kiuj vizitas specialajn lernejojn, estas sufiĉe alta, minimume 20-30%, dum ĉe la cetera popolo tiu parto estas nur 3%. Specialaj lernejoj signifas lernejojn por malfacile edukeblaj, klerigeblaj kaj integreblaj, subaveraĝe inteligentaj kaj talentitaj ktp. infanoj, kun fatalaj sekvoj: ekzemple la senalfabeteco, kiu en la 1970aj jaroj estis 30%, kreskis. Multaj ciganoj tro mallonge vizitas lernejojn aŭ entute neniam vizitis lernejon. En la postkomunisma erao romaoj organiziĝis pli ofte en asocioj. Sed la diskriminado fare de la socio ne finiĝis. Male, romaoj fariĝis atakeblaj celoj flanke de ksenofobiaj, rasismaj kaj novnaziaj aktivuloj. Iu novnazia partio en Ĉeĥio eĉ postulis la „finan solvon de la cigana demando“ kaj la deportadon de la ciganoj al Hindio. Ankaŭ en la interreto okazis malbelaj kampanjoj kontraŭ ciganoj. Alia skandalo koncernis la intencon sterilizadi romaajn virinojn. Kanado enkondukis vizon por ĉeĥaj civitanoj, ĉar oni registris pli altan nombron de ciganoj el tiu lando, kiuj volas migradi al Ameriko. Ankaŭ Finnlando enkondukis vizon por civitanoj de Slovakio, ĉar tro da slovakiaj romaoj petis azilon. Estas notinde, ke ciganoj en Ĉeĥio kaj Slovakio ĝenerale vivas en pli malfavoraj kondiĉoj ol neciganoj. Fifamaj estas la kvartaloj Košice-Luník IX kaj Svinia en Slovakio, Most-Chanov kaj Litvínov-Janov en Ĉeĥio. Ankaŭ nun tro da ciganaj infanoj estas senditaj al specialaj lernejoj, kio malhelpas ilian pluprogreson en la klerigo kaj edukado kaj baras la eblon trapasi altlernejon, kio estas ligita kun apenaŭa ŝanco je profesia kariero. Malalta klerigo, malriĉeco kaj senlaboreco do formas eternan diablan cirklon. Politika reprezenteco de romaoj en la parlamentoj de Ĉeĥio kaj Slovakio mankas. Pro tio ekestas novaj konfliktoj kaj la agrespotencialo kreskas. Nur malmultaj bonvolaj aktivuloj engaĝiĝas por la rajtoj kaj la kulturo de la ciganoj, kio ofte havas esence folklorismajn aspektojn aŭ limiĝas al sciencaj (etnologiaj) okupoj. Ekzemple ***Ján Cibuľa*** (1932-2013), kiu estis kuracisto kaj venis el Slovakio kaj finfine loĝis en Svislando, estis tia nekutime pozitiva personeco, kiu volis helpi al la ciganoj, al kiuj li mem apartenis.







Maldekstre: Romaoj en Slovakio (Fonto: https://de.wikipedia.org/wiki/Roma_in_Tschechien_und_der_Slowakei)
Dekstre: Religioj en Slovakio (Fonto: https://de.wikipedia.org/wiki/Slowakei#Ethnien)

**Ksenofobio, rasismo, antisemitismo en Slovakio nuntempe (t.e. 1990-2008)**

Kvankam en nuntempa Eŭropo preskaŭ ne plu videblas judoj en la publiko, antisemitismaj, kontraŭ-judaj, rasismaj kaj ksenofobiaj antaŭjuĝoj tamen konserviĝis, kiel ŝajnas plej forte en certaj landoj, kie judoj preskaŭ ne plu ekzistas kaj due kie la gazetaro malmulte raportas pri tiaj temoj kaj problemoj kaj kie ankaŭ la scienco apenaŭ traktas ilin. Al tiu grupo de landoj apartenas, krom ekzemple Litovio kaj Ukrainio, ankaŭ Slovakio, kie la ĉi-koncerna historio estis plej multe neglektata ĝis nun.

Ampleksan kaj tre konsiderindan empirian esploron lastatempe entreprenis *Lenka Bustiková* kaj *Petra Guasti*. La detalecon de tiu ege interesa studo ne eblas reprodukti ĉi tie, pro kio ni ĉerpos nur la plej esencajn rezultojn kaj konkludojn, kiuj koncernas la traktitajn problemojn. La aŭtoroj, kiuj kolektis datenojn el la jaroj 1990, 1995 kaj 2008, konstatis, ke 1e depost la 90aj jaroj la antisemitismo en Slovakio malkreskis, 2e la antisemitismo estas pli malforta ĉe loĝantoj de la ĉefurbo (Bratislavo) kompare kun iuj provincaj urboj kaj 3e la sinteno de la enketitoj, kiuj esprimis sin antisemitisme, estas malklara kaj ampleksas adeptojn aŭ membrojn kaj de la Slovaka Nacia Partio (SNS), kaj de la Kristandemokratia Movado (KDH), kaj de la naciisma partio de Vladimir Mečiar (HZDS). Kvankam en iuj kazoj la juda deveno de slovakaj politikistoj povas veki atenton, la „juda demando“ apenaŭ plu ludas gravan rolon en la nuntempa slovaka politiko, kompare kun la signifo de la hungara lingvo kaj de la „romaa (aŭ cigana) demando“, kiuj estas ĉefaj motivoj de la ĉi-rilata diskuto. Do, kvankam en Slovakio antisemitismo ekzistas ĝis hodiaŭ, ĝi manifestiĝas sur tute alia nivelo ol en la 1990aj jaroj. Fakte, ĝiaj formoj estas ambivalentaj. Dum unuflanke okazas malfermo de nova juda muzeo en Bratislava, aliflanke povas okazi malpuraj kampanjoj kontraŭ politikistoj, kiuj laŭdire havas judan devenon (la kazon de Lipšic en 2002 vd. pli sube). La grado de la antisemitisma sinteno en Slovakio varias de regiono al regiono kaj dependas de la socia tavolo, etna aparteneco kaj politika medio. Unu el la okulfrapaj simptomoj de antisemitismo respeguliĝas en la ideo, ke „havi judon kiel najbaron estas io malbona“ (tia estis la ĉi-koncerna demando en la enketo). Dum en la 1990aj jaroj 34% de la enketitoj ne deziris judon kiel najbaron, en 2008 tiu procentaĵo estis nur 12,5%. Ĉi tiu malkresko de la grado de la sento de antaujuĝoj koncernis en tiu periodo ankaŭ aliajn „outgroups“ kiel enmigrintojn aŭ romaojn (ciganojn). En 1990 pli ol tri kvaronoj diris, ke ili ne deziras romaojn kiel najbarojn, en 2008 tiun sintenon esprimis jam malpli ol la duono. La datenoj de 2008 montris, ke la t.n. „socia distanco“ al judoj estis ĉe slovakianoj plej malgranda (13%), kompare kun enmigrintoj (17%) kaj romaoj (ciganoj), kie la cifero daŭre estas relative alta (47%). Per tio oni povas konkludi, ke homoj en Slovakio daŭre plej malŝatas romaojn (ciganojn). La alteco de la procentaĵo forte varias de regiono al regiono. En la fruaj 1990aj jaroj, „plej antisemitisma“ estis Žilina kaj Banská Bystrica (41%), dum Bratislavo estis „plej malmulte antisemitisma“ (12%). En Nitra, Trenčin kaj Trnava ĝi estis 34%, en Prešov kaj Košice 32%, do relative alta. Do, en Slovakio la antisemitismo estis plej forta en malgrandaj urboj kaj en la kamparo – kie ekzistas plej malmultaj judoj, fakte praktike neniuj. Kurioze estas, ke fine de la 90aj jaroj la antisemitismo draste reduktiĝis ĝuste en tiuj malgrandaj urboj de Slovakio, kie la averaĝa procentajo falis al 10%. La du plej rimarkindaj kazoj estis Banská Bystrica, kie la procentaĵo falis de 41% al 6%, kajj Bratislavo, kie la koncerna cifero restis praktike sur la sama nivelo (de 12% al 11%). En 2008 la aŭtoroj konstatis malgrandan rekreskon de la procentaĵoj praktike en ĉiuj regionoj, precipe en orienta Slovakio, kie la antisemitismo estis plej forta. Inter 1999 kaj 2008 en Bratislavo la procentaĵo estis 14%. Se oni komparas ĉiujn tri periodojn, do 1990, 1999 kaj 2008, oni konstatas, ke la grado de la antisemitismo por ĉiuj tri periodoj estis kun averaĝe 12% en Bratislavo plej malalta kaj en Žilina kun 22% plej alta, sekvate de Trnava (21%), Prešov (20,4%), Nitra (19%), Banská Bystrica (18%), Košice (17,6%) kaj Trenčín (16%). Inter 1999 kaj 2008 en Slovakio la grado de la antisemitismo do stabiliĝis sur la nivelo de 10%. En Žilina, kie en 1999 okazis ĉefaj aktivecoj de la festado de la 60a datreveno de la slovaka ŝtateco, oficis Ján Slota, prezidanto de SNS (Slovakia Nacia Partio) kiel urbestro ĝis 2006. En 2000 Slota intencis starigi memortabulon honore al Tiso, sed fine devis rezigni pri ĝi, ĉar la internacia premo estis tro granda. Feliĉe, la relative alta procentaĵo de antisemitismaj antaŭjuĝoj ne respeguliĝis en la gazetaro aŭ politiko de Slovakio, ekzemple en formo de retorikaj atakoj kontraŭ judoj, kaj kvankam iuj naciismaj politikistoj postulis la rehabilitadon de la Tiso-reĝimo, cetere kun la helpo de kelkaj gazetoj kiel *Kultura* kaj *Zmena*, kiuj ne estis liberaj de antisemitisma retoriko. La slovakaj aŭtoritatoj faris malmulte por bridi tiajn ekscesojn.

Interesa estas ankaŭ la statistiko pri la antisemitisma sinteno en la unuopaj politikaj partioj. Plej okulfrapa estas ĉi tie la evoluo en la Slovaka Nacia Partio (SNP), kie la grado de la socia distanco al judoj falis de 41% en 1990 al 17% en 1999 kaj stabiliĝis ĉe 16% en 2008. La analogaj ciferoj por la

Kristandemokratia Partio estas de 39% al 12,50% en 1990, 10,38% en 1999 kaj 9,46% en 2008. En 1990 la procentaĵoj por aliaj partioj kiel la Demokratia Partio estis 33,33%, por la partio „Publikeco kontraŭ perforto“ 32,47%, por la Partio de la Verduloj 25,71% kaj por la Komunisma Partio 24,49%. Videble temas pri relative altaj procentaĵoj. En 1999 aperis aliaj partioj en la statistiko, en kiu oni mezuris relative malaltajn procentaĵojn de antisemitismo; temis pri procentaĵoj de inter 9% kaj 12%. Verŝajne la temoj judoj kaj antisemitismo simple ne ludis gravan rolon en tiuj partioj, kiuj ĉefe okupiĝis pri aliaj problemoj kaj en kiuj verŝajne membras iom alitipa publiko ol en la tradiciaj partioj. Eĉ en la kazo de la Partio de la „hungara koalicio“ oni mezuris malaltan procentajon de 4,26%, kaj ĉe la maldekstruloj la procentajo restis 2,76%. Tamen, en 2008 la procentaĵoj konsiderinde rekreskis en la kazo de la Partio de la „hungara koalicio“ (16,46%), dum ĉe la Kristandemokratia Partio ĝi estis 9,46% kaj ĉe la Slovaka Nacia Partio 7,69%. En la kazo de „SMER“, nova partio de maldekstruloj, kiu formiĝis en la ĉirkaŭaĵo de Robert Fico, la procentaĵo estis relative alta, nome preskaŭ 10%.

Kio ŝanĝiĝis estis ankaŭ la origina percepto de judoj kiel eksplicita etna minoritato favore al la apartenigo de judoj kiel unu el la diversaj sociaj grupoj, al kiuj apartenas ankaŭ ciganoj, muzulmanoj, migrantoj, samseksemuloj, AIDS-malsanuloj, droguloj, krimuloj, alkoholuloj, homoj de alia raso kaj aliaj. Do, oni povas diri, ke en la kazo de la judoj, kiujn oni nun pli perceptas kiel socian minoritaton, okazis ilia mal- aŭ senetnigo (ĉar verŝajne multaj homoj ne plu povas imagi, kio estas judo, ĉar ili apenaŭ plu ekzistas, aK).

En alia enketo de la jaro 2008 pri la demando „kiu estas vera slovako“, plimulto indikis la sekvajn kriteriojn, laŭ jena sinsekvo de signifo: regado de la slovaka lingvo (77-99%), respektado de slovakaj leĝoj kaj institucioj (71-98%), longe vivi en Slovakio (38-70%), esti naskita en Slovakio (30-70%), havi slovakajn antaŭulojn (28-59,9%). Ĉe homoj (´naciistoj´) kun antisemitismaj sentoj tiuj procentaĵoj en la enketo estis ankoraŭ pli altaj. Kompreneble, por la etnaj hungaroj la regado de la slovaka lingvo ne estas grava afero, ĉar por ili la hungaraj valoroj estas pli signifaj. La slovaka lingvoleĝo de 1994 respektive 1999 estis subfosita de SMER kaj en 2009 tiel modifita, ke ĝi limigas la rajtojn de la hungaroj utiligi la propran lingvon en Slovakio kun la argumento, ke la slovaka lingvo estas esprimo de la slovaka suvereneco (ion similan asertis ankaŭ rusoj, aK). Paradokse, tiu modifita leĝo revarmigis la politikan antisemitismon. Post longa tempo de trankvilo kaj paco okazis atako kontraŭ juddevena politikisto, nome kontraŭ Daniel Lipšic, membro de la kristandemokratia movado. Al Lipšic oni riproĉis (anonime), ke li havis/as dubindan kontakton kun agento de la israela sekreta servo (Mosado). La ĉi-rilata kompromita materialo estis anonime publikigita en la interreto kaj misuzita de liaj malamikoj por esplori kontraŭ signifaj slovakaj politikistoj kun la celo diskrediti la klopodojn, kiujn la partio de Lipšic entreprenis por malkaŝi korupton. La skandalo, kiu skuis la slovakian politikan pejzaĝon, sekvigis lavangon de antisemitismaj kaj kontraŭ-israelaj komentoj, plej ofte anonime aperigitaj en la interreto, kaj ne estis liberaj de kalumnioj.

Do,en Slovakio antisemitismaj argumentoj povas servi al diversaj motivoj kaj celoj: Ili povas esti utiligataj a) por defendi kaj glori la nacian ´heroan´ memoron pri la Slovaka Ŝtato (de la dua mondmilito) (temas pri la historia antisemitisma diskurso), b) por emfazi la batalon inter la naciaj fortoj kaj la „juda lobio“, kiu kontraŭstaras la rehabilitadon kaj gloradon de slovakaj naciistoj kaj antisemitoj (kiel Hlinka, Tiso aŭ Vojtaššak) (politika antisemitisma diskurso), kaj c) por kritiki la aktivecojn de Israelo en la palestina konflikto (internacia antisemitisma diskurso).

La dua esprimformo de la antisemitisma diskurso en Slovakio baziĝas sur la malamikeco kontraŭ romaoj (ciganoj) kaj hungaroj. Al tiu kategorio apartenas ankaŭ la debato pri fremduloj kaj deeksteraj enmigrintoj. En tiu diskurso havas lokon ankaŭ stereotipaj teorioj pri la „internacia konspiro“ de judoj, cionistoj kaj framasonoj. Konkretaj formoj manifestiĝas en agresemaj riproĉoj kaj akuzoj kaj en kalumnioj. Tiajn antisemitismajn esprimojn aplikas precipe ekstremdekstraj partioj, novnazioj kaj posteuloj-adorantoj de la Hlinka-gvardio kaj kelkaj radikalaj reprezentantoj de la katolika eklezio. Inter maldekstruloj tiu antisemitismo estas ligita kun kontraŭ-usonismo kaj la kredo, ke Usono estas gvidata de „cionisma lobio“. La ekzemplo de Slovakio (kaj certe ne nur de ĝi) montras, ke en la menciitaj kazoj anisemitismo povas esti revivigita en ajna momento kaj formo, eĉ se la kunteksto ŝanĝiĝis, pro kio oni parolas en tiaj kazoj pri duagrada antisemitismo.

Ĉar la slovaka popolo malmulte konas la historion de la judoj de Slovakio kaj pri la aktiva rolo, kiun la Slovaka Ŝtato ludis dum la dua mondmilito kaj en la holokaŭsto, la neokazo de vasta publika diskuto pri la rolo de la Tiso-ŝtato taŭgas por prepari fekundan grundon por diversaj spekulativoj kaj dubindaj interpretoj pri la historia pasinteco de Slovakio. Kvankam Tiso estas konsiderata de la slovaka

publiko kiel sufiĉe negativa figuro, la rolo, kiun lia reĝimo ludis dum la dua mondmilito, estas bagateligita. Granda okazo por trakti tiujn aferojn estis maltrafita per la morto de László Csatáry, unu el la plej lastaj vivintaj hungaraj militkrimuloj, kiu organizis la deportadon de slovakiaj judoj el Košice en 1944. Je la hungara flanko preskaŭ maturis la transdono de Csátary por prezenti lin al tribunalo en Slovakio. Sed lia morto en aŭgusto 2012 en Budapeŝto fermis ĉi tiun malbelan ĉapiron.

La tasko de la slovaka politiko devus esti malaltigi la procentaĵon de antisemitismaj sentoj, kiuj en Slovakio mezuras averaĝon de 10-12% (en 2008), kiu estas tro alta cifero, kaj kiuj komencis miksiĝi kun ksenofobiaj kaj rasismaj antaŭjugoj kaj agresoj kontraŭ diversaj sociaj minoritatoj, kiuj estis supre menciitaj. La plej aktuala esprimformo de tia sinteno estas la obstina rifuzo de la slovakia registaro akcepti laŭlandan kvoton por transpreni rifuĝintojn, kiun EU trudis al siaj membroŝtatoj. Kune kun Ĉeĥio, Hungario kaj Pollando Slovakio apartenas al tiuj EU-landoj, kiuj opinias, ke la islamo ne apartenas al Slovakio kaj ke oni ne sentas sin devigita akcepti amason de rifuĝintoj el arabaj kaj islamaj landoj, ĉar la popoloj de tiuj landoj evidente ne estas pretaj por bonvenigi ilin. En Slovakio oni devas elturniĝi unuavice kun hungaroj kaj romaoj. Nature, Slovakio havas la rajton defendi tian sintenon, se ĝi ne sentas sin preta akcepti tiajn rifuĝintojn, eĉ se tiu sinteno kolizias kun la sento de solidareco, kiu devus regi la politikan spiriton de Eŭropo. Sendube, ankaŭ Slovakio povus digesti kelkcent aŭ kelkmil tiajn rifuĝintojn, kiuj parte eble povus utili al la slovakiaj socio kaj ekonomio kiel kvalifikitaj laborfortoj (aK).

## Pritakso de la demokratio kaj de la liberecoj en Slovakio

Anstataŭ fari longan analizon pri la stato de la demokratio kaj de la liberecoj en Slovakio, indas noti la ciferojn de diversaj indeksoj, kiuj mezuras la dimensiojn de tiuj rajtoj. Tiel, laŭ la *Indekso pri demokratio* de la gazeto *Economist*, Slovakio situis en 2014 sur la nesufiĉe bona 45a de 167 rangoj, tuj post Brazilo kaj antaŭ Orienta Timoro, Panamo, Trinidado kaj Tobago kaj Indonezio. Nature, demokratio povas esti formale enkondukita en iun landon, sed la aplikado de la demokratia sinteno bezonas kulturon, kiu flegas toleremon, respekton, paciencon, emancipiĝon, plurismon kaj liberismon. Se ĝi neniam antaŭe estis reale praktikata de iu konkreta popolo aŭ socio en certa lando, la procezo povas daŭri plurajn generaciojn. Laŭ la *Indekso pri percepto de korupto* de Transparency International, Slovakio okupis en 2015 la 50an de entute 167 rangoj, post Saŭdarabio kaj Barejno, kaj ĉi-rilate troviĝis sur la sama rango kiel Kroatio kaj Hungario, do antaŭ Malajzio, Kuvajto kaj Kubo. Laŭ la *Indekso pri libereco de la gazetaro* de Freedom House, la gazetaro de Slovakio ĝuas la statuson „libera“ kaj okupas la 24an rangon; laŭ la listo de Reporteroj sen limoj ĝi okupas la sufiĉe bonan 12an de 180 rangoj. Grandparto de la slovakia gazetaro estas posedata de okcidentaj konzernoj. Fine, laŭ la *Monda Evolua Indekso* (Human Development Index), Slovakio situas sur la 37a de 187 pozicioj (2013) post Ĉeĥio, Estonio kaj Litovio, sed antaŭ Portugalio, Hungario kaj Kroatio.




Slovakio nuntempe

## Esenca literaturo (utiligita kaj alia)


Barnovský, Michal: Die Slowakei nach dem Staatsstreich im Februar 1948. Aperinta en: *Bohemia* 37/1996, p. 120-139).
Rete: https://www.bohemia-online.de/index.php/bohemia/article/view/3204/4912. *(Pri Slovakio post la ŝtata puĉo en februaro 1948.)*

Bartl, Július, k.a.: Lexikon der Slowakischen Geschichte. Slovenské Pedagogické Nakladatel´stvo, Bratislava 2002. *(Sufiĉe alloge farita, objektiva, sciencpopulara kaj detala prezentado de historiaj faktoj kompilitaj surbaze de la slovaka, ĉeĥa, hungara, aŭstra kaj germana historiografioj.)*

Benz, Wolfgang (eld.): Dimensionen des Völkermordes. Die Zahl der jüdischen Opfer des Nationalsozialismus. Dtv, München 1996. p. 368-374 (Der slowakische Staat). *(Unu el la ĉefaj verkoj pri la holokaŭsto kun koncizaj informoj ankaŭ pri la tiamaj okazaĵoj en Slovakio.)*

Benz, Wolfgang, Wetzell, Juliane (eld.): Solidarität und Hilfe für Juden während der NS-Zeit. Regionalstudien 4. Slowakei usw. Berlin 2004. *(Pri la holokaŭsto en diversaj landoj kun aparta konsidero de la helpagadoj favore al judoj.)*

Bertleff, Erich: Mit blossen Händen. Der einsame Kampf der Tschechen und Slowaken 1968. F. Molden, Wien/München/Zürich 1968. *(Pri la „Praga Printempo“ en Ĉeĥoslovakio de la jaro 1968.)*

Bil´ak, Vasil´: Wir riefen Moskau zu Hilfe: der „Prager Frühling“ aus der Sicht eines Beteiligten. Eld. kaj trad. de Klaus Kukuk. Edition ost, Berlin 2006. *(Vasil Bil´ak memuaras pri la „Praga Printempo“ el persona perspektivo.)*

Bodensieck, Heinrich: Das Dritte Reich du die Lage der Juden in der Tschecho-Slowakei nach München. Aperinta en: *Vierteljahreshefte für Zeitgeschichte.* München. N-ro 9/1961, kajero 3, p. 249-261.
Rete: http://www.ifz-muenchen.de/heftarchiv/1961_3_3_bodensieck.pdf. *(Pri la „Tria Regno“ kaj la situacio en Ĉeĥoslovakio post Munkeno 1938.)*

Brandmüller, Walter: Holocaust in der Slowakei und katholische Kirche. Ph. C.W. Schmidt, Neustadt an der Aisch 2003. *(Pri la holokaŭsto en Slovakio kaj la rolo de la katolika eklezio, el la vidpunkto de kardinalo.)*

Bumová, Ivica: Protižidovské výtržnosti v Bratislave v historickom kontexte" (august 1946). In: *Štúdie Pamäť Národa* (UPM), 3/2007, p. 14-29. *(Pri la problemo de la perforto kontraŭ judoj tuj post la holokaŭsto en Slovakio.)*
*Rete:* http://www.upn.gov.sk/publikacie_web/pamat-naroda/pamat-naroda-03-2007.pdf

Bustiková, Lenka; Guasti, Petra: Hass auf den imaginären Nachbarn. Eine Analyse des Antisemitismus in der Slowakei. In: *Jahrbch für Antisemitismusforschung* 23/2014, p. 183-211. *(Kompara empiria studo pri ksenofobio, rasismo kaj antisemitismo en Slovakio en 1990, 1999 kaj 2008.)*
Rete: http://bustikova.faculty.asu.edu/lbs/papers/jahrbuch_23_beitrag_13_bustikova_guasti-libre.pdf.

Bútora, Martin k.a.: Abschied von der Tschechoslowakei. Ursachen und Folgen der tschechisch-slowakischen Trennung. Eld. R. Kipke kaj K. Vodička. Wissenschaft und Politik, Köln 1993. (Pri la *kaŭ*zoj de la *ĉ*e*ĥ-slovaka separo en 1992.)*

Dubček, Alexander: Leben für die Freiheit. Autobiographie. Trad. el la usonangla de Andrea Galler, Birgit Kaiser und Ursel Schäfer. C. Bertelsman, München 1993. *(Aŭtobiografio de Alexander Dubček.)*

Ďurčanský, Ferdinand: Der Weg zur slowakischen Freiheit. Wissenschaftliche Gesellschaft für das Auslandsslowakentum, Bratislava-Pressburg 1944. *(Pri la „slovaka demando“ el la vidpunkto de Ferdinand Ďurčanský.)*

Ďurčanský, Ferdinand: Die Existenzberechtigung der kleinen Staaten. Wissenschaftliche Gesellschaft für das Auslandsslowakentum. Bratislava-Pressburg 1944. *(Pri la ekzistorajto de malgrandaj nacioj el la vidpunkto de Ferdinand Ďurčanský.)*

Ďurčanský, Ferdinand: Die slowakische Frage – eine internationale Frage. Slowakisches Befreiungskomitee. München 1954. *(Pri la „slovaka demando“ el la vidpunkto de Ferdinand Ďurčanský.)*

Ďurčanský, Ferdinand: Zur Geschichte des slowakischen Volkes. In: Der Donauraum. Zeitschrift des Forschungsinstitutes für den Donauraum. 8a Jk., kajero 1-2. 1963. Specila represo. *(Pri la historio de la slovaka popolo el la vidpunkto de Ferdinand Ďurčanský.)*

Ďurica, Milan S.: Die historische und sprachwissenschaftliche Entwicklung der slowakischen Sprache. Matúš-Černák-Institut, München 1981. *(Pri la historia kaj lingva evoluo de Slovakio.)*

Ďurica, Milan S.: Aussenpolitische Beziehungen der Slowakischen Republik. Matúš-Černák-Institut, München 1983. *(Pri la eksteraj rilatoj de Slovakio.)*

Ďurica, Milan: Der slowakische Anteil an der Tragödie der europäischen Juden. In: Zeitschrift des Slowakischen Matúš-Černák-Instituts, München 1984. p. 109-148. *(Pri la kulpo de Slovakio en la tragedio de la eŭropaj judoj.)*

Ďurica, Milan S.: Jozef Tiso. Matica slovenská, Martin 1992 (2a eld.). 251 p.

Ďurica, Milan S.: Dejiny Slovenska a Slovákov. Slovenské pedagogické nakladateľstvo, Bratislava 1995. (2a eld. 1996). *(Multe diskutata historia verko de furora slovaka historiisto vivanta en la ekzilo.)* La kritikan diskuton pri la verko kaj aŭtoro resumis: Kamenec, Ivan: Spor o Ďuricovu knihu. En: Kamenec, Ivan: H´ladanie a blúdenie v dejinách. Bratislava 2000; Okrúhly stôl: Slovensko a fenomén Ďurica. En: *Kritika & Kontext* 2, 2-3/1997; Bartl, Julius: Milan S. Ďurica, Dejiny Slovenska a Slovákov. En: *Historický časopis* 45, 1/1997.
Enhavo: http://aleph.unisg.ch/hsgscan/hm00144788.pdf.
Rete vd. ankaŭ en slovaka lingvo: http://www.sme.sk/c/2077676/historicky-ustav-slovenskej-akademie-vied-o-prirucke-m-s-duricu-dejiny-slovenska-a-slovakov.html.

Eggers, Martin: Das „Grossmährische Reich" Realität oder Fiktion? Eine Neuinterpretation der Quellen zur Geschichte des mittleren Donauraumes im 9. Jahrhundert. In: Monographien zur Geschichte des Mittelalters Band 40. Stuttgart 1995. *(Ĉu Granda Moravio estis realaĵo aŭ fikcio. Novaj interpretoj. Laŭ tiu ĉi aŭtoro, la Grandmoravia Regno troviĝis en la Panonia ebenaĵo ĉirkaŭ la rivero Tiso kun la centro Csanád.)*
Recenzo: http://www.digizeitschriften.de/dms/img/?PID=PPN345858735_0052%7Clog23&physid=phys304. *(La recenzanto ne trovas la teorion de Eggers konvinka).*

Fatran, Gila: Die Deportation der Juden aus der Slowakei 1944-1945. Aperinta en: *Bohemia* 37/1996, p. 98-119). Rete: https://www.bohemia-online.de/index.php/bohemia/article/view/3203/4908. *(Pri la deportado de la judoj el Slovakio en 1944-45.)*

Gogolak, Ludwig v.: Beiträge zur Geschichte des slowakischen Volkes. Vol. 1-3. R. Oldenbourg, München 1969 1972, 1963. *(Elstara klasika prezento de la historio de Slovakio inter 1526 kaj 1919 kun preciza karakterizado de la rolo de elstaraj protagonistoj.)*

Goldhagen, Jonah Daniel: Die katholische Kirche und der Holocaust. Eine Untersuchung über Schuld und Sühne. Siedler, Berlin 2002. *(Multe diskutata provoka libro de juddevena usona aŭtoro pri la laŭdira kulpo de la katolika eklezio en la holokaŭsto, ankaŭ kun mencio de la rolo de Slovakio.)*

Goldhagen, Erich: Der Holocaust in der sowjetischen Propaganda und Geschichtsschreibung. Aperinta en: *Vierteljahrshefte für Zeitgeschichte* (München) 28/1980, p. 502-7.
Rete: http://www.ifz-muenchen.de/heftarchiv/1980_4_5_goldhagen.pdf.

Graus, František: Die Nationenbildung der Westslawen im Mittelalter. Jan Thorbecke, Sigmaringen 1980. *(Pri la formiĝo de la nacioj ĉe la okcidentaj slavoj en la mezepoko).*

Grébert, Arvéd: Die Slowaken und das Grossmährische Reich. Beitrag zum ethnischen Charakter Grossmährens. El la germana trad. de Christoph Greiner. Matúš-Černák-Institut. München 1965. *(Pri la etna karaktero de Granda Moravio.)*

Grébert, Arvéd: Die slowakische Frage als internationales Problem in den Jahren 1938-39. Aperinta en: *Slowakei*. Zeitschrift des Slowakischen Matúš-Černák-Instituts. München 22/1984, p. 3-108. *(La slovaka demando kiek intenacia problem en la jaroj 1938-39.)*

Grébert, Arvéd: Über die schweizerisch-slowakischen Beziehungen während des zweiten Weltkrieges. Aperinta

en: *Slowakei*. Zeitschrift des Slowakischen Matúš-Černák-Instituts. München 25/1988, p. 121-130. *(Pri la svisaj-slovakaj rilatoj dum la dua mondilito.)*

Grivec, Franz: Konstantin und Method. Lehrer der Slaven. Harrassowitz, Wiesbaden 1960. *(Klasika biografio pri Kirilo kaj Metod/i/o).*

Groce, Benedetto: Eintönigkeit und Leere der kommunistischen Geschchtsschrebiung. El la itala lingvo tradukita de Renata Gossen- Eggenschwyler. Aperinta en: Schweizer Monatshefte 9/1952-53, p. 553-565.
Rete: www.e-periodica.ch/cntmng?pid=smh-002:1952-1953:32::1031. *(Pri la trajtoj de la komunisma historiografio).*

Gruber, Simon: Wilder Osten oder Herz Europas? Die Slowakei als EU-Anwärterstaat in den 1990er-Jahren. V&R Unipress. Göttingen 2010. *(Pri Slovakio kiel kandidato de EU en la 90aj jaroj kun aparte konsidero de la Mečiar-periodo.)*

Gutman, Israel (eld.) Enzyklopädie des Holocaust. 4 vol. Piper, München Zürich 1993-1998. *(Populara manlibra enciklopedio de la holokaŭsto.)*

Harna, Josef: Nationalkulturen und Koexistenz der Tschechen und Slowaken in den Jahren der Ersten Tschechoslowakischen Republik. Aperinta en: *Bohemia* 32/1991, p. 412-423).
Rete: https://www.bohemia-online.de/index.php/bohemia/article/view/775/1107. *(Pri la naciaj kulturoj kaj kunekzistado de ĉeĥoj kaj slovakoj en la Unua Ĉeĥoslovaka Respubliko).*

Haselsteiner, Horst; Hrabovec, Emilia: Der Donauraum. Sonderheft „Slowakei“. Nr. 3/4 1994. IDM Wien. *(Speciala eldono de la menciita periodaĵo pri Slovakio).*

Hochberger, Ernst: Das grosse Buch der Slowakei. 3000 Stichworte zur Kultur, Kunst, Landschaft, Natur, Geschichte, Wirtschaf. Hochberger, Sinn 1997. *(Enciklopedieca prezento de Slovakio).*

Hoensch, Jörg K.: Tschechoslowakismus oder Autonomie. Die Auseinandersetzungen um die Eingliederung der Slowakei in die Tschechoslowkische Republik. In: Hoensch, Jörg K.: Studia Slovaca. Studien zur Geschichte der Slowaken und der Slowakei. Festgabe zu seinem 65. Geburtstag. Hrsg. von Lemberg, Hans u.a. R. Oldenbourg, München 2000. p. 71-106. *(Sciencnivela artikolaro pri Slovakio, verkita de elstara fakulo).*

Hoensch, Jörg K.: Die Verfassungsstruktur der ČSR und die slowakische Frage. En: samloke, p. 107-154. *(Pri la konstitucia strukturo de Ĉeĥoslovaka Respubliko kaj la „slovaka demando“).*

Hoensch, Jörg K.: Die Grundlagen des Programms der Slowakischen Volkspartei vor 1938. En: samloke., S. 155-198, kaj en: *Bohemia* 7/1966, p. 320-56).
Rete: https://www.bohemia-online.de/index.php/bohemia/article/view/2416/3707. *(Pri la fundamentoj de la programo de la Slovaka Popolpartio antaŭ 1938.)*

Hoensch, Jörg K.: Die Slowakische Volkspartei Hlinkas. En: samloke, p. 199-220. *(Pri la Slovaka Popolpartio de Hlinka.)*

Hoensch, Jörg K.: Die Slowakische Republik 1939-1945. En: samloke, p. 221-248. *(Pri la Slovaka respubliko inter 1939 kaj 1945.)*

Hoensch, Jörg K.: Grundzüge und Phasen der deutschen Slowakei-Politik im Zweiten Weltkrieg. En: samloke, S. 249-280. *(Pri la trajtoj kaj fazoj de la germana politiko rilate al Slovakio dum la Dua Mondmilito.)*

Hoensch, Jörg. K.: Die Slowakei im Jahre 1945. En: samloke, p. 299-350. *(Pri la situacio de Slovakio en la jaro 1945.)*

Hofbauer, Hannes; Noack, David X.: Slowakei. Der mühsame Weg nach Westen. Promedia, Wien 2012. *(Eble plej freŝdata prezento de la historio de Slovakio, el ´maldekstra´ vidpunkto).*

Holec, Roman: Die slowaksche politische Elite vor 1918 im Spannungsfeld von Kirche, Nation und Staat. Aperinta en: Kaiserová, Kristina; Nižňanský, Eduard; Schulze Wessel, Martin: Religion und Nation. Tschechen, Deutsche und Slowaken im 20. Jahrhundert. Veröffentlichungen der Deutsch-Tschechischen und Deutsch-Slowakischen. Historikerkommission. Klarext Vlg. Essen 2015. P. 17-38. *(Pri la politikista elito en Slovakio*

*antaŭ 1918.)*
Enhavo: http://opac.nebis.ch/objects/pdf03/z01_978-3-8375-1286-1_01.pdf.

Husák, Gustáv: Der slowakische Nationalaufstand. Dietz, Berlin 1972. *(Historio de la slowaka nacia ribelo, verkita de slovaka samtempano kaj grava komunisto).*

Jelinek, Yeshajahu A.: Wenn die Vergangenheit zur Gegenwart spricht. Fünf Publikationen über den Holocaust des slowakischen Judentums. Aperinta en: Bohemia 34/1993, p. 314-327. *(Recenzado de kvin gravaj publicaĵoj, kiuj lastatempe aperis pri la holokaŭsto en Slovakio.)*
(Rete: https://www.bohemia-online.de/index.php/bohemia/article/view/1289/1973)

Kipke, Rüdiger: Das politische System der Slowakei. Aperinta en: Ismayr, Wolfgang (eld.): Die politischen Systeme Osteuropas. Leske + Budrich, Opladen 2002, p. 273-208. *(Karakterizo de la politikaj sistemo kaj kulturo de Slovakio ĝis 2002).*

Kaplan, Karel: Der kurze Marsch. Kommunistische Machtübernahme in der Tschechoslowakei 1945-1948. R. Oldenbourg, München 1981. *(Pri la akaparo de la poltika povo fare de la komunistoj en Ĉeĥoslovakio.)*

Kaplan, Karel: Das verhängnisvolle Bündnis. Unteranderung, Gleichschaltung und Vernichtung der Tschechoslowakischen Sozialdemokratie 1944-1954. Wuppertal 1984. *(Pri la subfosado, egalŝaltado kaj likvido de la Ĉeĥoslovaka Socialdemokratio en la jaroj 1944-54.)*

Kaplan, Karel: Die politischen Prozesse in der Tschechoslowakei. R. Oldenbourg, München 1986. *(Pri la politikaj procesoj en Ĉeĥoslovakio.)*

Kwiet, Konrad: Der Mord an Juden, Zigeunern und Partisanen: Zum Einsatz des Einsatzkommandos 14 der Sicherheitspolizei und des SD in der Slowakei 1944/1945. In: *Jahrbuch für Antisemitismusforschung* 7/1998.

Lendvai, Paul: Antisemitismus ohne Juden. Europaverlag. Wien 1972. *(Elstara detala analizo de la kontraŭjuda sinteno de la komunismaj reĝimoj en orienta Eŭropo, ankaŭ en Ĉeĥoslovakio.)*

Lipscher, Ladislav: Die Einstellung der Slowakischen Volkspartei zu den Juden während der Zweiten Tschechoslowakischen Republik. Aperinta en: Bohemia 14/1973, p. 386-403). (Pri la sinteno de la Slovaka Popolpartio rilate al la judoj dum la intermilita Dua Ĉeĥoslovaka Respubliko. Lipscher estis komunisma publicisto, kiu forlasis Ĉeĥoslovakion en 1969.)
Rete: https://www.bohemia-online.de/index.php/bohemia/article/view/3484/5343. *(Pri la sinteno de la Slovaka Popolpartio rilate la judojn en la Dua Ĉeĥoslovaka Respubliko).*

Lipscher, Ladislav: Die Juden im Slowakischen Staat 1939-1945. R. Oldenbourg München 1980. Aperis en Bratislava en 1992 en la slovaka lingvo: Židia v slovenskom štáte, 1939-1945. *(Probable plej konsultinda scienca prezento de la temo en germana lingvo).*

Lipscher, Ladislav: Das Schweizer Modell und die nationale Frage in der Tschechoslowakei. Aperinta en: Bohemia 30/1989, p. 118-124.
Rete: https://www.bohemia-online.de/index.php/bohemia/article/view/794/1156. *(Pri la svisa modelo kaj la nacia demando en Ĉeĥoslovakio.)*

Lipták, L´ubomir: Das politische System der slowakischen Republik 1939-1945. En: Oberländer, Erwin (eld.): Autoritäre Regime in Ostmittel- und Südosteuropa 1919-1944. F. Schöningh, Paderborn 2001. p. 299-336. *(Pri la politika sistemo de Slovakio inter 1939 kaj 1945 en la kunteksto de la aŭtoritatismaj politikaj sistemoj en Eŭropo de la intermilita tempo.)*

Lônčíková, Michala: Coming back home? Anti-Jews Violence in Slovakia after the Holocaust. In: Benz, W.; Mihok, B.: „Juden unerwünscht“. Anfeindungen und Ausschreitungen nach dem Holocaust. Metropol. Berlin 2016. p. 191-212. *(Pri la problemo de la perforto kontraŭ judoj tuj post la holokaŭsto en Slovakio.)*

Masaryk, T.G.: Masaryk erzählt sein Leben. Gespräche mit Karel Čapek. B. Cassirer. Berlin 1936. *(Memuaroj)*

Masaryk, T.G.: Das neue Europa. Der slawische Standpunkt. Volk und Welt. Berlin 1991. *(Pri Eŭropo kaj la pozicio de la slavoj en ĝi, el la vidpunto de T.G. Masaryk.)*

Matzner-Holzer, Gabriele: Im Kreuz Europas: Die unbekannte Slowakei. Holzhausen, Wien 2001. *(Libro pri la „nekonata" Slovakio.)*

Meier, Jörg: Beiträge zur Kulturgeschichte der Deutschen in der Slowakei. Weidler, Berlin 2006. *(Pri la kulturhistorio de la germanoj en Slovakio.)*

Nižňanský, Eduard: Die Deportation der Juden in der Zeit des autonomen Landes Slowakei im November 1938. Aperinta en: *Jahrbuch für Antisemitismusforschung* 7/1998, p. 20-45.
Rete: http://www.dejiny.sk/Whois/Nizn/Articles%2016.htm aŭ https://www.bohemia-online.de/index.php/bohemia/article/view/591/830. *(Pri la deportado de la judoj en la tempo de la aŭtonoma lando Slovakio 1938).*

Nižňanský, Eduard: Die Aktion Nisko, das Lager Sosnowiec (Oberschlesien) und die Anfänge des Judenlagers Vyhne (Slowakei). In *Jahrbuch für Antisemitismusforschung* 11/2002.

Nižňanský, Eduard: Die Aktion Nisko, das Lager Sosnowiec (Oberschlesien) und die Anfänge des Judenlagers Vyhne (Slowakei). In *Jahrbuch für Antisemitismusforschung* 11/2002.

Nižňanský, Eduard: Der Holocaust in der slowakischen Historiographie der neunziger Jahre. Aperinta en: *Bohemia* 44/2003, p. 370-88.
Rete: https://www.bohemia-online.de/index.php/bohemia/article/view/900/1322. *(Pri la holokaŭsto en la slovaka historiografio de la 90aj jaroj, kun longa bibliografio pri verkaĵoj aprintaj en Slovakio.)*

Nižňanský, Eduard: Die Vorstellungen Jozef Tisos über Religion, Volk und Staat und ihre Folgen für seine Politik während des Zweiten Weltkriegs. Aperinta en: Kaiserová, Kristina; Nižňanský, Eduard; Schulze Wessel, Martin: Religion und Nation. Tschechen, Deutsche und Slowaken im 20. Jahrhundert. Veröffentlichungen der Deutsch-Tschechischen und Deutsch-Slowakischen. Historikerkommission. Klarext Vlg. Essen 2015. P. 39-82. *(Pri la mondkoncepto de Jozef Tiso rilate religion, nacion kaj ŝtaton, kun abunda citado el lia eldira repertuaro.)*
Enhavo: http://opac.nebis.ch/objects/pdf03/z01_978-3-8375-1286-1_01.pdf.

Poulík, Josef: Grossmähren und die Mission des Kyrill und Method. Orbis, Prago 1985. *(Granda Moravio kaj la misio de Kirilo kaj Metod/i/o, el ĉeĥoslvaka vidpunkto.*

Poulík, Josef, Bohuslav Chropovský kaj kolektivo: Grossmähren und die Anfänge der tschechoslowakischen Staatlichkeit. Academia, Prago 1985. *(Pri Granda Moravio kiel komenco de la ĉeĥoslovaka stateco, el ĉeĥoslvaka vidpunkto.)*

Rothkirchen, Livia: The Situation of Jews in Slowakia between 1939 and 1945. In: *Jahrbuch für Antisemitismusforschung* 7/1998.

Scheidl, Karl: Grossmähren und die christliche Mission bei den Slawen. Styria, Graz 1966. *(Pri Granda Moravio kaj la kristana misio ĉe la slavoj).*

Schneider, Franz M.: Josef Tiso: katholischer Priester und Staatspräsident der Slowakei. Slovak Institut, Cleveland 1970. Speciala represo el: Slovak Studies, vol. 10. *(Hagiografio pri Josef Tiso.)*

Schönfeld, Roland: Slowakei. Vom Mittelalter bis zur Gegenwart. F. Pustet, Regensburg / Südosteuropa-Gesellschaft, München 2000. *(Konciza, moderna kaj facile legebla prezento de la historio de Slovakio de la komenco ĝis ĉ. 1998.)*

Slapnicka, Helmut: Die Amts- und Unterrichtssprache in der Slowakei und die österreichische Regierung. Aperinta en: *Bohemia* 16/1975, p. 139-160).
Rete: https://www.bohemia-online.de/index.php/bohemia/article/view/1913/2907. *(Pri la oficiala kaj lingvo de la instruado en Slovakio dum la aŭstra regado.)*

Slowakei: Geschichte, Theater, Musik, Sprache, Literatur, Volkskultur, Bildende Kunst, Slowaken im Ausland, Film. Wieser Klagenfurt 2010. *(Bele produktita ilustrita enciklopedieca verko pri la kulturo de la slovakoj.)*

Spetko, Josef: Die Slowakei. Heimat der Völker. Amalthea Wien/München 1991. *(Historio de Slovakio kun aparta konsidero de la germanoj vivantaj tie.)*

Susko, Ladislav: Das Deutsche Reich und die Slowakische Republik 1938-1945. Bd. 1. Dokumente und Essay. Dresdner Weltbuch Verlag, Nov. 2010. *(Prezentado de dokumentoj el la indikita tempo.)*

Steinhübel, Ján: Die Kirchenorganisation in Neutra um die Jahrtausendwende. Aperinta en: *Bohemia* 40/1999, p. 65-78.
Rete: https://www.bohemia-online.de/index.php/bohemia/article/view/953/1417. *(Pri la organizado de la eklezio en Nitra ĉirkaŭ la jarmila ŝanĝo.)*

Šik, Ota**:** Prager Frühlingserwachen. Busse + Seewald, Herford 1988. *(Memuaroj de Ota Šik unuavice pri la „Praga Printempo“.)*
Tiso, Josef: Über den slowakischen Staat. Rede vom 16. Juli 1939 über die Existenz des slowakischen Staates in Topoľčianky.
Rete: https://www.herder-institut.de/no_cache/bestaende-digitale-angebote/e-publikationen/dokumente-und-materialien/themenmodule/quelle/1847/details.html. *(Naciisma parolado de Josef Tiso el la jaro 1939.)*

Tiso, Josef: Die Wahrheit über die Slowakei. (Verteidigungsrede gehalten am 17. und 18. März 1947 vor dem "National"-Gericht in Bratislava). Eld. Jan Sekera. Tisova Tovarišstvo, 1948. *(Germana traduko de la defenda parolado de Josef Tiso dum lia tribunala proceso de 1947, kun valoraj piednotoj.)*

Tönsmeyer, Tatjana: Die Bedeutung der Slowakei für das Deutsche Reich in den Jahren 1939-1945. Aperinta en: *Bohemia* 37/1996, p. 79-97.
Rete: https://www.bohemia-online.de/index.php/bohemia/article/view/3202/4904. *(Pri la signifo de Slovakio por la Tria Regno en la jaroj 1939-45.)*

Tönsmeyer, Tatjana: Der Holocaust im öffentlichen Bewußtsein in der Slowakei. Antisemitismus, Geschichtsbild und Holocaustrezeption. In: *Jahrbuch für Antisemitismusforschung* 7/1998.

Tönsmeyer, Tatjana: Das Dritte Reich und die Slowakei 1939-1945. Politischer Alltag zwischen Kooperation und Eigensinn. Schöningh, Paderborn 2003. *(Moderna sciencnivela prezento de la historio de Slovakio de 1939-45 kaj ties rilatoj al la „Tria Regno“ kun aparta konsidero al ĝiaj ´konsilistoj´.)*

Tönsmeyer, Tatjana: Vom „Recht auf die eigene Geschichte“ – der Slowakische Staat 1939 bis 1945 in der Historiographie. (Rete: https://www.bohemia-online.de/index.php/bohemia/article/download/899/1318). *(Pri la slovaka ŝtato de 1935-1945 en la historiografio).*

Venohr, Wolfgang: Aufstand für die Tschechoslowakei. Der slowakische Freiheitskampf von 1944. C. Wegner, Hamburg 1969. *(Pri la slovaka nacia ribelo de 1944.)*

Vykoupil, Susanna: Slowakei. C.H. Beck, München 1999. *(Populara eldoneja serio kun aktualaj sciigoj pri Slovakio).*

Ward, James Mace: Priest, politician, collaborator. Jozef Tiso and the Making of Fascist Slovakia, Cornell University Press, Ithaca and London 2013. *(Evidente serioza anglalingva biografio pri Josef Tiso.)*

Wessely, Kurt: Die Wirtschaft der Tschechoslowakei im Jahre 1970.Aperinta en: *Bohemia* 12/1971, p. 385-397).
Rete: https://www.bohemia-online.de/index.php/bohemia/article/view/1626/2470. *(Pri la ekonomio de Ĉeĥoslovakio en 1970).*

Widmann, Peter: Juden und Judenfeindschaft in der Slowakei. Ein Konferenzbericht. In: *Jahrbuch für Antisemitismusforschung* 7/1998.

Witt, Sabine: Nationalistische Intellektuelle in der Slowakei 1918-1945. Kulturelle Praxis zwischen Sakralisierung und Säkularisierung. Ordnungssysteme. Bd. 44, Studien zur Ideengeschichte der Neuzeit. W. de Gruyter, Berlin 2015. *(Moderna sciencnivela studo pri naciismaj intelektuloj en Slovakio 1918-45.)*

Interretaj resursoj

Temoj:

https://de.wikipedia.org/wiki/Geschichte_der_Slowakei
https://de.wikipedia.org/wiki/Slowakischer_Aufstand
https://de.wikipedia.org/wiki/Nationale_Wiedergeburt_der_Slowaken
https://de.wikipedia.org/wiki/Slowakischer_Staat
https://de.wikipedia.org/wiki/Geschichte_der_Juden_in_der_Slowakei
https://de.wikipedia.org/wiki/Slowakischer_Nationalaufstand
https://de.wikipedia.org/wiki/Hlinkas_Slowakische_Volkspartei
https://de.wikipedia.org/wiki/Wannseekonferenz
https://en.wikipedia.org/wiki/Pope_Pius_XII_and_the_Holocaust
https://en.wikipedia.org/wiki/Lustration
https://de.wikipedia.org/wiki/Roma_in_Tschechien_und_der_Slowakei

Lokoj:

https://de.wikipedia.org/wiki/Nováky
https://de.wikipedia.org/wiki/Sereď
https://de.wikipedia.org/wiki/Vyhne
https://de.wikipedia.org/wiki/Ilava
https://de.wikipedia.org/wiki/Zwardoń

Prilaborado de la historio:

http://www.kas.de/wf/doc/kas_9323-544-1-30.pdf?090729102302

Slovakaj „justuloj de la nacioj" de Jad Vaŝem:
https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_Righteous_Among_the_Nations_by_country#By_country_and_ethnic_origin
http://www.yadvashem.org/yv/en/righteous/statistics/slovakia.pdf

Die kommunistische Vergangenheit in der Rechtssprechung der Gegenwart: Urteil im Prozess gegen Jakeš und Lenárt:
http://www.radio.cz/de/rubrik/schauplatz/die-kommunistische-vergangenheit-in-der-rechtssprechung-der-gegenwart-urteil-im-prozess-gegen-jakes-und-lenart

Holocaust-Überlebende Judita Schlesinger. Von den Nazis gejagt, von den Kommunisten verjagt. Von Simon Hehli.
http://www.nzz.ch/schweiz/holocaust-ueberlebende-judita-schlesinger-und-immer-diese-kaelte-ld.16358#login

Die Aufarbeitung der Diktaturen in Tschechien und der Slowakei
http://www.bpb.de/apuz/29477/die-aufarbeitung-der-diktaturen-in-tschechien-und-der-slowakei?p=all

Personoj:

Malnova Slovakio:

https://de.wikipedia.org/wiki/Ján_Chalupka
https://de.wikipedia.org/wiki/Pavel_Jozef_Šafárik
https://de.wikipedia.org/wiki/Ján_Kollár
https://de.wikipedia.org/wiki/Pavol_Országh_Hviezdoslav
https://de.wikipedia.org/wiki/Anton_Bernolák
https://de.wikipedia.org/wiki/Ján_Hollý
https://de.wikipedia.org/wiki/Martin_Hattala

https://de.wikipedia.org/wiki/Samuel_Czambel
https://de.wikipedia.org/wiki/Ľudovít_Štúr
https://de.wikipedia.org/wiki/Jozef_Miloslav_Hurban
https://de.wikipedia.org/wiki/Michal_Miloslav_Hodža
https://de.wikipedia.org/wiki/Svetozár_Hurban_Vajanský

Unua Ĉeĥoslovaka Respubliko:
https://de.wikipedia.org/wiki/Vavro_Šrobár
https://sk.wikipedia.org/wiki/Ferdiš_Juriga
https://de.wikipedia.org/wiki/Milan_Rastislav_Štefánik

Slovakaj naciistoj:
https://de.wikipedia.org/wiki/Andrej_Hlinka
https://de.wikipedia.org/wiki/Jozef_Tiso
https://de.wikipedia.org/wiki/Alexander_Mach
https://de.wikipedia.org/wiki/Vojtech_Tuka
https://de.wikipedia.org/wiki/Ferdinand_Ďurčanský
https://de.wikipedia.org/wiki/Karol_Sidor
https://de.wikipedia.org/wiki/Martin_Sokol
https://de.wikipedia.org/wiki/Jozef_Sivák
https://cs.wikipedia.org/wiki/Karol_Mederly
https://en.wikipedia.org/wiki/Imrich_Karvaš
https://de.wikipedia.org/wiki/Štefan_Tiso
https://de.wikipedia.org/wiki/Otomar_Kubala
https://de.wikipedia.org/wiki/Ján_Vojtaššák
https://en.wikipedia.org/wiki/Karol_Kmetko
https://de.wikipedia.org/wiki/Michal_Buzalka
https://de.wikipedia.org/wiki/Pavol_Jantausch
https://de.wikipedia.org/wiki/Franz_Karmasin
https://de.wikipedia.org/wiki/Ján_Golian
https://de.wikipedia.org/wiki/Ferdinand_Čatloš
https://en.wikipedia.org/wiki/Chaim_Michael_Dov_Weissmandl

Germanaj nazioj en Slovakio:
https://de.wikipedia.org/wiki/Dieter_Wisliceny
https://de.wikipedia.org/wiki/Hanns_Ludin

Komunistoj:
https://de.wikipedia.org/wiki/Karol_Šmidke
https://de.wikipedia.org/wiki/Gustáv_Husák
https://de.wikipedia.org/wiki/Vasiľ_Biľak
https://de.wikipedia.org/wiki/Ladislav_Novomeský
https://cs.wikipedia.org/wiki/Karol_Bacílek
https://de.wikipedia.org/wiki/Ján_Ursíny
https://sk.wikipedia.org/wiki/Jozef_Lettrich
https://sk.wikipedia.org/wiki/Igor_Daxner
https://de.wikipedia.org/wiki/Alexander_Dubček
https://de.wikipedia.org/wiki/Jozef_Lenárt
https://en.wikipedia.org/wiki/Peter_Colotka
https://sk.wikipedia.org/wiki/Martin_Dzúr
https://en.wikipedia.org/wiki/Milán_Václavík
https://de.wikipedia.org/wiki/Miloš_Jakeš

Slovakaj protagonistoj de 1988/89:
https://en.wikipedia.org/wiki/Martin_Bútora
https://en.wikipedia.org/wiki/Miroslav_Kusý
https://de.wikipedia.org/wiki/Ján_Čarnogurský
https://de.wikipedia.org/wiki/František_Mikloško
https://en.wikipedia.org/wiki/Anton_Popovič
https://de.wikipedia.org/wiki/Ján_Langoš
https://sk.wikipedia.org/wiki/Fedor_Gál
https://sk.wikipedia.org/wiki/Peter_Zajac
https://en.wikipedia.org/wiki/Peter_Tatár
https://sk.wikipedia.org/wiki/Ladislav_Snopko
https://de.wikipedia.org/wiki/L´ubomír_Feldek
https://cs.wikipedia.org/wiki/Michael_Kocáb
https://de.wikipedia.org/wiki/Václav_Malý

Postkomunismaj gvidantoj:
https://de.wikipedia.org/wiki/Vladimír_Mečiar
https://en.wikipedia.org/wiki/Mikuláš_Dzurinda
https://de.wikipedia.org/wiki/Iveta_Radičová
https://de.wikipedia.org/wiki/Michal_Kováč
https://de.wikipedia.org/wiki/Ivan_Gašparovič
https://de.wikipedia.org/wiki/Rudolf_Schuster
https://de.wikipedia.org/wiki/Andrej_Kiska
https://de.wikipedia.org/wiki/Liste_der_Ministerpräsidenten_der_Slowakei
https://de.wikipedia.org/wiki/Präsident_der_Slowakei
https://de.wikipedia.org/wiki/Smer_–_sociálna_demokracia
https://de.wikipedia.org/wiki/Nationalratswahl_in_der_Slowakei_2016
https://de.wikipedia.org/wiki/Kotleba_–_Ľudová_strana_Naše_Slovensko
https://de.wikipedia.org/wiki/Marian_Kotleba
https://de.wikipedia.org/wiki/Ján_Figel´ kaj http://uea.org/pdf/uk2016/Pribina4.pdf

Slovakaj historiistoj:
https://de.wikipedia.org/wiki/Milan_Stanislav_Ďurica
https://de.wikipedia.org/wiki/Ivan_Kamenec
https://sk.wikipedia.org/wiki/Daniel_Rapant
https://en.wikipedia.org/wiki/Richard_Marsina
https://de.wikipedia.org/wiki/Yeshayahu_A._Jelinek

Aliaj resursoj:

Matica slovenská:
http://matica.sk

Ústav Pamäti Národa / Nation´s Memory Institute
http://www.upn.gov.sk/ kaj http://www.upn.gov.sk/en
https://en.wikipedia.org/wiki/National_Memory_Institute_(Slovakia)

Múzeum Slovenského národného povstania
http://www.muzeumsnp.sk/

Slovak Jewish Heritage
http://www.slovak-jewish-heritage.org

Jewish Community Museum, Bratislava
http://www.slovak-jewish-heritage.org/jewish-museum-bratislava.html

Rodobrana
http://rodobrana.org

Dokumentaj filmoj:

Parolado de Andrej Hlinka
https://www.youtube.com/watch?v=FR52K8VzUZQ

Parolado de D-ro Jozef Tiso (Dr. Jozef Tiso - Prejav o dôsledkoch Viedenskej arbitráže z novembra 1938)
https://www.youtube.com/watch?v=Z3ym4Q0KBUk

Alia parolado de J. Tiso (Dr. Jozef Tiso - Prejav o úlohách HSĽS a o výbere jej funkcionárov)
Rete: https://www.youtube.com/watch?v=LS6zZVTTacg

Jozef Tiso na *návšteve* Ružomberka
https://www.youtube.com/watch?v=b-weWW5YZCI

Mortkondamno de Josef Tiso
https://www.youtube.com/watch?v=RuhdBkZJHII

Rozhovor: Slovenský štát a jeho gardisti
https://www.postoj.sk/1978/rozhovor-slovensky-stat-a-jeho-gardisti

Vznik Slovenského štátu (14.3.1939)
https://www.youtube.com/watch?v=BHOYFw6nu8o

Un slovaque antisémite de la garde Hlinka témoigne
https://www.youtube.com/watch?v=RchcSJm4C3I

Hitlers Verbündete - Kroatien Bulgarien Slowakei
https://www.youtube.com/watch?v=-a9WyVTzpdw

Gazetartikoloj:

Pri ekstremdekstra popolusmo en Slovakio:
http://www.deutschlandradiokultur.de/rechtspopulismus-in-der-slowakei-der-hass-in-meiner-heimat.1005.de.html?dram:article_id=365884 (germanlingve)

Pri akcepto de azilpetantoj en Slovakio (septembro 2016)
http://www.merkur.de/politik/slowakei-verzeichnet-zehn-asylbewerber-zweiten-quartal-zr-6775392.html (germanlingve)

Diversaĵoj:

Papst Pius XII. und der Holocaust
http://www.atheisten-info.at/downloads/schoenberg.pdf

© Andreas Künzli, www.planlingvoj.ch, publikigita en julio/septembro 2016.

La aŭtoro (lic. phil. / M.A.), nask. en 1962 en Lucerno (Svislando), studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la universitato de Zuriko en 1983-91, kun profundaj studoj pri tiuj fakoj ankaŭ poste. Studado de la ĉeĥa lingvo ĉe la Karola Universitato en Prago en 1986. En la fako internacia juro li verkis studon pri la jura situacio de la Baltaj Ŝtatoj kun aparta konsidero de la tempo de ilia politika emancipiĝo en la 1980aj jaroj, kiu kondukis al ilia sendependiĝo en 1991. Slovakion li unuafoje vizitis en 1984, kun postaj reaj traveturoj.

Definitiva versio.

This is a non-commercial projet for educational purposes, such as teaching, scholarship and research. In case of problems with copyright, please contact the author.